ETO (3; Jü) 1) vira vesto 2) virina jako: A *jacket* [ĝ-] (2), I
tte [ĵakét] (1, 2), G *Jackett* [ĵakét] (2), Po *z'akiet* [ĵ-] (2)
t(ka) (2), (H *chaqué* 1, *chaqueta* 2). Kp I *giacchetta* "jake
da termino bazita sur F (kaj alprenanta la du sencojn de
to). Ps-sf *-et.* – Pri la Z-a *ĵak/o* GE, vd. sub *jako.* (Ĉiuj Eaj r
komenciĝantaj per *ĵ-* sin bazas sur F prononco [ĵ], kut
gata de analoga sono en PoR kaj ofte en G fremdvorto; la
nda sono en A estas [ĝ]. En aliaj pozicioj F [ĵ] kaj A [ĝ] r
e rezult 122.) ¶ Io *j*
2), Ie *j* ignifo 1 ŝaj
nki.
im. de F *j*
UZ/A (fem.: *jal*
z]), I *g* *ĵaketo*), for
ata ank Da *jaloux* "
jaloezie Ia *jelose, zel*
L vulg. Gr *zêlos* "ferv
luzo, envi o"), verŝajne
un *zêteín* "serĉi".
RGON/O (1; Jü): AF *jargon* [A ĝ-, F ĵ-], G *Jargon* [ĵ-]; I g
], Po *z'argon* [ĵ-], R *ĵargon,* (H *jerigonza*). La Ea formo kongr
F (kaj ties kopio G) kaj la slavaj formoj (kp sub *ĵaketo*). ¶
ron, Io *-o.*
redeble par. al F *gargouiller* "gargarbrui" (la radiko *garg-* indikante "gorĝon
UD/O (f; Un): F *jeudi* [ĵ-], I *giovedì* [ĝ-], (H *jueves* [ĥ-]). Kie
eraj nomoj de la tagoj de la semajno, tiu ĉi estas prenita
kio la fina *-i* forfalas, kp *lundo, mardo* ktp). Malfacile klar
estas la diftongo *-aŭ-*; F *eu* en aliaj vortoj rezultigas Eo *e* (
kp *kero, parkere* el F *coeur*) aŭ *eŭ* (*leŭtenanto*). ¶ 1894 *joved-*.
lio, Ie *jovedí,* Ia *jovedi.*
L *Iovis dies* "tago de Jupitero": *Iovis* gen. de *Iuppiter* (< **Iov- pater*), *dies* "t
nbaŭ el HE **djeŭs* "ĉielo" (vd. *hodiaŭ*).
'/I (f; Un): F *jeter* [ĵ-], I *gettare* [ĝ-]; L *iacere* (vd. sube). For

EBBE VILBORG

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

VOLUMO 2: E – Ĵ

ELDONA

EBBE VILBORG

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

VOLUMO 2: E – Ĵ

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
MALMÖ 1991

Ebbe Vilborg:
ETIMILOGIA VORTARO DE ESPERANTO
Volumo 2: E – Ĵ

Eldono: Eldona Societo Esperanto
Malmö 1991
Kompostado: Omnibus, Tyresö
Kovrilo kaj grafika aranĝo: Franko Luin
Preso: Kristianstads Boktryckeri 1991

ISBN 91 85288 19 5

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

Klarigo de signoj

*	ĉe pralingva radiko aŭ vortformo indikas neatestitan, nur supozatan formon
*	post Interlingua-formo indikas vorton ne troveblan en Interlingua-English Dictionary
†	arĥaikiĝinta aŭ malofte uzata vorto [formo]
>	evoluis al
<	evoluis el
=	post la sigloj Io (Ido), Ie (Interlingue), Ia (Interlingua) indikas, ke la responda vorto en la resp. lingvo havas formon identan kun la Esperanta
[ ]	interkrampe estas metataj proksimumaj prononcindikoj, bazitaj sur la Esperanta alfabeto; rimarku la jenajn signojn:
ó	(ktp) indikas lokon de la akcento
ô	(ktp) indikas nazalan vokalon
o:	(ktp) indikas longan vokalon
ä	indikas vastan antaŭan nerondan vokalon (A *a* en *fat*)
e'	indikas mezvastan centran nerondan vokalon (A *a* en *about*)
ö	indikas mezvastan antaŭan rondan vokalon (F *eu* en *neuf*)
c	indikas la palatalalveolaran frikativon signitan per *ch* en G *ich*
dh	indikas voĉan dentalan frikativon (A *th* en *the*)
th	indikas nevoĉan dentalan frikativon (A *th* en *thing*)
k'	(ktp) indikas aspiracion de la koncerna plozivo
l'	indikas moligitan l-sonon kiel en I *figlio*
n'	indikas moligitan n-sonon kiel en F *baigner*
1-8	indikas la numeron de tiu Oficiala Aldono, en kiu la koncerna radiko estas oficialigita

Sigloj de vortaroj kaj aliaj fontoj

AdA	Aktoj de la Akademio
Ald	Aldono al la Dua Libro (1888)
Bat	Batalo de l'vivo (tradukis Zamenhof)
Be	de Beaufront, Dictionnaire Espéranto-Francais (1902)
Brit.Esp.	British Esperantist (periodaĵo)
Cgl	Cosmoglotta (periodaĵo)
Du	Dua Libro de l'Lingvo Internacia (1888)
EG	Meza Vortaro Internacia-Germana (1889)
E-isto	(La) Esperantisto (periodaĵo 1889–1895)
Ekz	Ekzercaro
ER	Plena Vortaro Esperanta-Rusa (1909)
Fab	Fabeloj de Andersen
Fund	Fundamento de Esperanto (9-a eldono 1963)
GD	Waringhien, Grand Dictionnaire Espéranto-Francais (1957)
GE	Zamenhof-Jürgensen, Wörterbuch Esperanto-Deutsch, 1-a eld. (1904)
GE2	sama verko, 2-a eldono (1906)
Haml	Hamleto (tradukis Zamenhof, 8-a eldono 1964)
Jü	Jürgensen, Wörterbuch Esperanto-Deutsch, 3-a eld. (1909)
Jü1	sama verko, 1-a eldono (1904)
Ka	Kabe, Vortaro de Esperanto (1910)
LR	Lingvaj Respondoj (3-a eldono 1936)
LZ	Leteroj de Zamenhof, eldonis G. Waringhien (1948)
Mart	Marta (tradukis Zamenhof)
Neĥ	Neĥemja (Biblio)
Nombr.	Nombroj (Biblio)
OA	Oficiala Aldono (OA1 – OA8)
PIV	Plena Ilustrita Vortaro (1970)

PL	Planlingvistiko (periodaĵo 1981–1986)
PR	Poŝa Lernolibro por Rusoj (1890)
PV	Plena Vortaro (1934)
PVS	Plena Vortaro, Suplemento (1954)
PVZ	Plena Verkaro de Zamenhof (Kioto 1973–)
Rabe	Rabeno de Baĥaraĥ (tradukis Zamenhof)
RE	Plena Vortaro Rusa-Internacia (1889)
Un	Unua Libro (1887): Un R = rusa eldono, Un Po = pola eldono
UV	Universala Vortaro (1894)
Ve	Verax, Enciklopedia Vortareto Esperanta (1910)
Wü	Wüster, Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana (1923–1929)

La publikigaĵoj de la unuaj jaroj estas markitaj per la respektiva numero donita de Zamenhof:

N-ro 14 1888 =	Grabowski, La Neĝa Blovado. Varsovio.
N-ro 15 1888 =	Einstein, La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Weltspracheproblems. Nürnberg.
N-ro 20 1889 =	Einstein, Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Nürnberg.
N-ro 30 1889 =	de Wahl, Princino Mary. Varsovio.
N-ro 35 1890 =	Marignoni, Esperanto ossia la più pratica delle lingue internazionali. Crema.

Mallongigoj de lingvoj

A	angla
Ar	araba
Av	avesta
Ĉe	ĉeĥa
Da	dana
Eg	egipta
Eo	Esperanto
eo	Esperanto (neoficiala)
F	franca
Fk	franka
G	germana
Gr	greka (=helena)
Gt	gota
H	hispana
HE	hindeŭropa pralingvo
He	hebrea
I	itala
Ia	Interlingua
Ie	Interlingue (Occidental)
Io	Ido
Ir	irlanda
Is	islanda
Ji	jida
Ki	kimra
L	latina
Li	litova
Nd	nederlanda
Nl	Novial
No	norvega
Oc	okcitana
Pe	persa
pEo	pra-Esperanto
P	portugala
pĜ	praĝermana
Po	pola
R	rusa
Rm	rumana
Sa	sanskrita
SK	serbokroata
Sl	slava
Sv	sveda
Tu	turka
Vd	veda
Vp	Volapük

La koncerna nomo de lingvo estas ofte kompletigata per aldono signanta epokon aŭ nivelon, ekz. por la latina: L mez., L vulg. ktp. Tiuj aldonoj estas klarigataj en la listo de ceteraj mallongigoj.

Transskriboj

Transskribo de la helena alfabeto:
a, b, g, d, e, z, ê, th, i, k, l, m, n, o, p, x, r, s, t, y, ph, kh, ps, ô.

Transskribo de la rusa alfabeto:
a, b, v, g, d, e, ë, ĵ, z, i, k, l, m, n, o, p, r, s, t, u, f, ĥ, c, ĉ, ŝ, ŝĉ, -, y, ', e, ju, ja.

En polaj vortoj, la diakritaj literoj estas redonataj tiel:
c', l', n', ó, s', z'.
Nazalaj a kaj e ne estas speciale markataj.

Ceteraj mallongigoj

abl.	ablativo
adj.	adjektivo
adv.	adverbo
akt.	aktiva
akuz.	akuzativo
ank.	ankaŭ
anst.	anstataŭ
ant.	antikva
arĥ.	arĥaika
ark.	arkitektura termino
astr.	astronomia termino
beletr.	beletra termino
biz.	bizanca
bot.	botanika termino
C	konsonanto
dat.	dativo
dem.	demonstrativa
der.	deriv/aĵo, -ita
dial.	dialekta formo
dim.	diminutivo
dukateg.	dukategoria
Ea	Esperanta
ekl.	eklezia
eld.	eldono
espismo	esperantismo, imito de Esperanta formo
ev.	eventual/a, -e
f	Fundamenta radiko
f'	radiko trovebla en la Fundamento ekster Universala Vortaro
fam.	familiara esprimo
fiz.	fizika termino
Fund.	Fundamento
gram.	gramatika termino
ĝerm.	ĝermana
her.	heraldika termino
int.	internaci/a, -e
jc	jarcento
jur.	jura termino
k	kaj
kaŭz.	kaŭzativa
kem.	kemia termino
kom.	komerca
komp.	komparativo
kp	komparu
k.s.	kaj simile
kunm.	kunmet/o, -ita
l.c.	loko citita
L.I.	Lingvo Internacia
lok.	lokativo
mask.	maskla genro, virgenro
mez.	mezepoka

mil.	militista termino
miner.	mineralogia termino
mod.	modern(epok)a
nov.	novepoka
okc.	okcidenta
orig.	origin/a, -e
p.	paĝo
par.	parenca
pas.	pasiv/a, -e
perf.	perfekta
plur.	pluralo
postkl.	postklasika
pp.	parolante pri
prep.	prepozicio
prez.	prezenc/a, -o
proks.	proksimume
pron.	pronomo
propr.	propradire
ps-pf	pseŭdoprefikso
ps-sf	pseŭdosufikso
ptc.	participo
rad.	radiko
refl.	refleksiva
resp.	respektiv/a, -e
rim.	rimarku
rom.	romana
s.	kaj sekva(j)
sc.	scienca termino
sing.	singularo
sk.	subkomprenu
spec.	speciale
s.s.	sama senco
sup.	supin/a, -o
superl.	superlativo
s.t.v.	sub tiu vorto
s.v.	sub la vorto
V	vokalo
var.	varianto
vd.	vidu
vet.	veterinara termino
Z	Zamenhof
Za	Zamenhofa
zool.	zoologia termino

Literaturo

(Fontindika listo por vol. 1-2)

AdA:	Aktoj de la Akademio. II:1968-1974. Rotterdam, Paris 1975.
Albault 1959:	Pri la fontoj de Esperanto. Nuntempa Bulgario 9, p. 15.
Albault 1961:	Etimologio, pra-Esperanto kaj Mistrala lingvo. Esperantologio II:2, p. 87-92.
Albault 1987:	Indio – la Hinda – Bharato (debato). En: Akademiaj Studoj 1987, p. 125-129. Bailieboro.
Back 1980:	Pri planlingva etimologio. En Szerdahelyi 1980, p. 266–276.
Bastien:	Naŭlingva etimologia leksikono. 2-a eld. London 1950.
Berger 1947:	Li lingue international justificat. Chapelle.
Bianchini:	Cursus completus Esperanti. San Vito al Tagliamento 1934.
Briquet 1932:	Esperanta Teknika Medicina Vortaro. Bruxelles.
Broccatelli:	Vocabolario Esperanto-Italiano. Milano 1984.
Brückner:	Sl'ownik Etymologiczny. Warszawa 1957.
Carlevaro:	Slipoj de etimologia vortaro. Planlingvistiko n-roj 6, 7, 8, 10, 11, 13, 14, 15, 17. 1983-1986.
Cart 1903:	(kun Merckens & Berthelot) Vocabulaire Francais-Espéranto et Vocabulaire abrégé Espéranto-Francais. 2-a eld. Paris. (Stojan, n-ro 2154.)
Collinson 1959:	Germanic Elements in the Vocabulary of Esperanto. Esperantologio II:1, p. 1-12.

Collinson 1961:	Pri kelkaj kulturvortoj. Esperantologio II:2, p. 93-99.
Couturat-Leau:	Histoire de la langue universelle. Paris 1903.
Dmitriev 1920:	Esp.-rusa vortareto. 2-a eld. S. Peterburg. (Stojan, n-ro 3040.)
Duc Goninaz 1974:	Les influences slaves en Esperanto. Cahiers de linguistique, d'orientalisme et de slavistique 3-4, p. 31-53.
Fund:	Zamenhof, Fundamento de Esperanto. 9-a eld. Marmande 1963.
Gold 1980:	Towards a Study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto. En Szerdahelyi 1980, p. 300-367.
Golden 1979a:	La etimologio de la prepozicio "al" en Esperanto. Filologo 15, p. 5-8.
Golden 1979b:	La etimologio de la esperanta vorto "ajn". Monata Cirkulero 106, p. 2-3, 6.
Golden 1979c:	Kial Esperanto havas la vorton "birdo"? Brit. Esp. 828, p. 219-220.
Golden 1981a:	Deserto en la dezerto. Filologo 18, p. 2-4.
Golden 1981b:	La etimologio de la vorto "ĉevalo" en Esperanto. Dia Regno 7, p. 2343-2344.
Golden 1983:	Kial Esperanto havas la vorton bedaŭri? der esperantist 2, p. 27-28.
Gregor 1958:	La fontoj de Esperanto. Scienca Revuo 34-35 (vol. IX, n-roj 2-3), p. 92-110.
Gregor 1982:	sama verko, 2-a eld. Glasgow.
Grenkamp 1937:	Oficiala Vortaro de Esperanto. Paris.
Grosjean-Maupin 1911:	Dictionnaire usuel Espéranto-Francais. Paris. (Stojan, n-ro 2170.)
Holzhaus 1969:	Doktoro kaj lingvo Esperanto. Helsinki.
Jacob:	Esperanto-Ido, vortaro. Berlin 1934.
Jespersen 1928:	An International Language. London.
LV:	vd. Waringhien.
Manders:	Vijf Kunsttalen. Purmerend 1947.
Mattos:	La deveno de Esperanto. Chapecó s.j.
Modrijan:	Elementoj latinaj en Esperanto. Ljubljana s.j.
OV:	vd. Zamenhof.
Privat VZ:	Vivo de Zamenhof. 2-a eld. Rickmansworth 1937.

PVZ: vd. Zamenhof.
Stojan: Bibliografio de internacia lingvo. Genève 1929.
Stojan 1953: Deveno & vivo de la lingvo Esperanto. Brugge.
Szerdahelyi 1980 (red.): Miscellanea Interlinguistica. Budapest.
Szerdahelyi 1987: Principoj de Esperanta etimologio. En: Duc Goninaz, Studoj pri la internacia lingvo (Gent 1987), p. 109-137.
Vilborg 1951: Pri "brogi". Esperanto 11, p. 286.
Waringhien LV: Lingvo kaj Vivo. La Laguna 1959.
Waringhien 1946: A.B.C. d'Espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres. Paris.
Waringhien 1967: sama verko, 2-a eld. Paris.
Waringhien 1980: 1887 kaj la sekvo... Antverpeno-La Laguna.
Wiener 1950: Ĝemelaj radikoj. Esperantologio I:2, p.98-106.
Wiener 1951: Ŝajnprefiksoj. Esperantologio I:3, p. 145-151.
Wüster Esp. princ.: Esperantologiaj principoj. Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana, vol. II-III (1925 resp. 1926).
Zamenhof LR: Lingvaj Respondoj. 3-a eld. Paris 1936.
Zamenhof OV: Originala Verkaro. Leipzig 1929.
Zamenhof PVZ: Iam kompletigota Plena Verkaro de L.L. Zamenhof. Kajeroj 1–. Kioto 1973–.

E

EBEN/A (f; Un): A *even*, G *eben*. Kp Nd *effen*. Bazita ekskluzive sur G. Laŭ Collinson 1959, 8, la ĝermana formo estis pli facile adaptebla ol I *piano*, H *llano*, F *égal* ktp, ĉar *plan-* kaj *pian-* (cetere ankaŭ *egal-*) estis jam rezervitaj por aliaj signifoj. ¶ 1894 *ekval-* (vd. *egala*). ¶ Io *plana, plata*, Ie *plan, plat*, Ia *plan, platte*.

Kp Da *jaevn*, Gt *ibns* s.s.; pĜ **ebna-*.

EBON/O (f; EG): A *ebony*, F *ebène*, G *Ebenholz* (*Holz* "ligno"), I(H) *ebano*, Po *heban*; L *ebenus*. La formo *eben-* jam havis alian signifon; Z do devis elekti inter **eban-* (IPo) kaj *ebon-* (A), ambaŭ kun sufikssimilaj finiĝoj; tamen *-an* estas multe pli frekventa kaj tial pli evitenda. ¶ 1894 *eben-*. ¶ Ie *eben*, Ioła *-o*.

Pere de Gr *ébenos* el Eg *hebin* s.s.

EBRI/A (1; Be; kp *mal/sobra*): L *ebrius*; F *ivre* (kp *ébriété* "-eco"), I *ubbriaco, ebbro*, (H *ebrio*). Kp A *inebriate* "-igi". ¶ Ie *ebri*, Io *-a*, Ia *-e*.

Nekonata origino. Parenca vorto en Eo: *sobra*, vd. s.t.v.

EBUR/O (2; Jü): L *ebur*; A *ivory*, F *ivoire* (kp *éburnéen* "-a"), I *ivorio* (kp *eburneo* "-a"). (Kp H *ebúrneo* "-a".) L substantivformo apogata de latinidaj adjektivoj. ¶ Io *ivoro*, Ie *ivor*, Ia *ebore*.

Kredeble el Eg *âb(u)* "eburo; elefanto", kp ev. Sa *íbhah* "elefanto" (vd. ank. tiun).

EĈ (f; Un): Malfacile konstatebla etimologio, eble ĉar tiu ĉi partikulo devenas de pEo (1881 *ec'*), kiu ofte montras gravajn modifojn de fontvortoj. Laŭ Waringhien 1946, 23, *eĉ* originas en L *etiam* prononcita laŭ germana maniero (do kun *-ti-* = [tsi]). La L originon rekonas ankaŭ Gregor (1982, 10). Se tiu supozo estas ĝusta, Z tie ĉi sanĝis (*ts*=) *c* al *ĉ* same kiel en *ĉi*, evidente ĉar **ec* kolizius kun sufikso *-ec*. ¶ 1894 *mem* (< F *même*). ¶ IoIe *mem*, Ia *etiam, mesmo* (< F ant. *mesme*).

"Eĉ" estas unu el la sencoj de L *etiam*, kiu plej ofte signifas "ankaŭ", orig. "ankaŭ nun", de *et* "kaj, ankaŭ" (el HE **eti* "pluse", kp Gr *éti* "krome; ankoraŭ", Sa *áti* "preter; tre"); L *iam* "nun, jam " (vd. *jam*).

EDEN/O (1; Be): AFGIPo *Eden*, R *Edem*, (H *Edén*). En ĉiuj fontlingvoj la vorto estas uzata kiel nomo propra kaj (escepte) kiel apelativo. ¶ Io =, Ia *Eden*; ne trovita en Ie.

El He *'êden* "Edeno", propr. "volupto, ĝojo".

EDIF/I (f; RE): A *edi/fy*, I *-ficare*, (H *-ficar*), F *édifier*. Z preferis la mallongan formon laŭ A (iom apogatan de F), kvazaŭ utiligante la duan *-i-* kiel Ean infinitivfinaĵon, same kiel en *modifi*; kontraste *klasifiki* kaj eo *kvalifiki* (Z), *mistifiki* (Z).¶ 1894 *edifik-*. ¶ Io *edi/fikar*, IeIa *-ficar*.

Metafora uzo de L *aedificare* "domkonstrui": *aedes* "domo" (orig. "fajrujo",vd. sub *etero*), *-ficare* var. de *facere* "fari" (vd. tiun).

EDIKT/O (3; Jü): A *edict*, (H *-o*), F *édit*, G *Edikt*, I *editto*, Po *edykt*; L *edictum*. Ps-pf *e(ks)-*.

Orig. ptc. perf. de L *edicere* "proklami", propr. "eldiri": *e* "el", *dicere* "diri" (vd. tiujn).

EDUK/I (f; Un): A *educ/ate*, (H *-ar*), I *-are*, F *éduquer* [-dyké]; L *educare*. Ps-pf *e(ks)-*.

Propr.. "elkonduki" de L *e* "el" (vd. tiun) k *ducare*, var. de *ducere* "konduki" (vd. tiun).

EDZ/O (f; Un): Sendube la plej diskutata ero en la etimologio de Eo - malgraŭ la fakto, ke ĝi estas unu el la maloftaj kazoj, kie Z mem eksplikis la originon; vd. Boirac, Oficiala Gazeto, dec. 1913, citita en LR, 6a eld., p. 28: "La vere primitiva formo estas ne *edz*, sed *edzin*, de kiu devenas la formo *edzo*. ...Jen kiamaniere la Majstro klarigis al mi la aferon: En la germana lingvo, reĝido heredonto de la krono estas nomata *Kronprinz*, kiu fariĝas en Esperanto *kronprinco*. La virino kunigita kun la kronprinco per leĝa ligilo estas nomata germane *Kronprinzessin*. Ĉi tiun lastan vorton Dro Zamenhof transskribis Esperante *kronprincedzino*, kaj li tuj rimarkis, ke la finiĝo de tiu vorto, t.e. *edzino*, ricevis per si mem la sencon de virino kunigita kun viro per leĝa ligilo. Li do faris el ĉi tiu vorto: unue, ĝeneralan sufikson, esprimantan difinitan rilaton, kaj due, vorton memstaran kun tiu sama signifo. Poste el la vorto *edzino* li tute logike devenigis la vorton *edzo*." Oni trovis du motivojn por ne fidi tiun etimologion: (a) unu semantikan: "ne ĉiu princino estas edzino kaj eĉ malpli ofte edzino estas princino" (Gregor 1977, 175); (b) unu fonetikan: la donita etimo ne klarigas la afrikaton *dz*. El tiuj, la unua ne havas gravecon, ĉar Z eksplicite deklaris, ke li eliris de specifa kazo. La dua, kontraŭe, reprezentas veran problemon. Se tiu ĉi vorto estiĝis en frua fazo de la kreado, Z ne povis akcepti la atendatan **es*, ĉar tiu morfemo origine esprimis la imperfekton. Z mem konfirmas tiun supozon sur poŝtkarto al L. Herz 1906-05-22, kie li skribas (citita laŭ Holzhaus 1969, 222): "ĝi (= *edz*) havis en la komenco la formon *es* (prenitan el la francaj 'princesse', 'maîtresse' k.t.p.); laŭ la leĝoj de Esperanto ĝi devis tamen por la virinoj havi la formon *esino* kaj *es* restis sekve por la viroj. Sed 'es' tiam estis okupita por la verbo, en kiu ĝi signifas la tempon 'imperfectum', tial mi el 'es' devis fari 'edz', tiom pli, ke pri 'es' oni ĉiam pensas pri virino." Tiu klarigo ja ne komplete akordas kun la alia donita al Boirac; oni rimarkas, ke *in* ĉi tie estas aldonita sufikso, ne parto de la etimo. Ĉiuokaze necesis eviti homonimecon al la finaĵo *es* kaj ankaŭ al la sufikso *ec* (*edz* mem estis en la komenco rigardata kaj uzata kiel sufikso, vd. Boirac l.c.; ekz. *kudristinedzo, doktoredzino* Du 63): Z solvis la problemon adoptante la afrikaton *dz*. Oni serĉis ĝian originon en la jida formo kiu respondas al G *-essin*, ekz. *Rábbedse* "rabenedzino" ("Jfb" laŭ Butin en Eo-Post 1951, 22), *Rebedzin* (Applebaum, Brit.Esp., nov. 1957), *Rebecin* (Waringhien LV 67 laŭ N. Z. Maimon). Tamen, laŭ Gold 1980, 333, tiuj formoj estas neekzistantaj: la ĝusta formo por "rabenedzino" estas *rebetsn*. Do *dz* ne povas esti prenita el Ji; restas la ebleco, ke la Ji formo inspiris al Z la uzon de afrikato, kiun li poste voĉigis (*ts* > *dz*) por havi maksimuman diferencigon disde *ec*. (Bona resumo de la aktuale konataj faktoj fare de Golden, Heroldo 11-12/1987.) – Ĉar ne temas pri rekta prunto

el Ji, estas vane spekulativi pri tio, ĉu (kaj kial) Z volis kaŝi la judan originon de tiu ĉi kaj certaj aliaj Eaj vortoj (Waringhien l.c.; Silfer,PL 2/1983, 4). Aliaj sugestoj ne mankis: (a) *edzino* el Po *jedzyna* "virinaĉo" (Stojan 1953, 50; laŭdire popola vorto: en Brückner troviĝas *jedzona* kaj *jedza* "megero, sorĉistino" kun epiteto "popola"). Tio implicus kontraŭvirinan tendencon ĉe Zamenhof, kion Gregor (1958, 103) energie kontestas. Decidige ŝajnas, ke la aludita semantika ŝanĝo estas multe tro aŭdaca por esti kredebla. (b) "La vorto *edzo* ne nur estas retro-formaĵo el *edzino*, sed *edzino* mem havas nenion komunan kun iu nacia lingvo"; "..*edzo* kaj *edzino* restas la solaj vere arbitraj vortoj en la Esperanta leksikono" (Gregor l.c.). (c) *edzino* el Po *gaz'dzina* "kamparanino" (kp *gazda* "kamparano") kaj *sedzina* "juĝistedzino" (kp *sedzia* "juĝisto"): Holzhaus 1969, 222. Tio signifus procedon ankoraŭ pli aŭdacan ol tiu, kiun Z mencias en sia ekspliko. (d) *edz* el Gr *ezygên* [edz-] "mi estis ligata (kunigata)" (Eo-Post 1951, 22). Tro ĝenerala signifo por tiu ĉi specifa termino; krome la komenca *e-* ne apartenas al la radiko, estante tempa aŭgmento. (e) *edz* el Gr *hékyros* "bopatro" pere de L transskribo *hecyra*: unue intencita kiel sufikso por peredziĝa parenceco. Sufikso devis esti unusilaba kaj devis komenciĝi per vokalo; el *hec-* do fariĝis *ec*, kiu modifiĝis je *edz* (*ec, ek, eĉ* jam okupitaj): Halvelik, Heroldo 2/1987. Prave karakterizita de Golden kiel "bizara teorio". ¶1882 *marg/idz'/i* "edziĝi" (< F *mariage* "-iĝo"); 1894 *spos-* (< I *sposo* "-o", kp H *esposo* s.s.). ¶ Io *spoz/ulo* "-o", *-ino* "-ino"; Ie *marit/o* "-o", *-a* "-ino" (< F *mari*, I *marito* "-o"); Ia *marito* "-o", *uxor* "-ino" (< L), *spo(n)s/o, -a* "-o, -ino".

G *-essin* en la de Z citita vorto estas kombino de du inaj sufiksoj, la ĝermana *-in* (vd. la liston de sufiksoj) kaj *-ess*, pruntita el latinidaj lingvoj (F *princesse*, I *principessa* "princino" ktp), devenanta pere de L (ekz. *abbatissa* "abatino") el Gr (ekz. *basílissa* "reĝino", kp *basiléus* "reĝo").

EFEKT/O (3; N-ro 30 1889, Be): A *effect*, F *effet*, I *-to*, G *Effekt*, PoR *efekt*, (H *efecto*). Ps-pf *e(ks)-*.

El L *effectus* "efekt(ivig)o" de *efficere* "elfari, efiki" (vd. tiun).

EFEKTIV/A (f; Un): A *effective* (ank. "efika, efekta"), F *effectif*, G *effektiv*†, I *effettivo*, (H *efectivo*). Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-iv*. ¶ 1882 *fekk-* (sama etimo). ¶ Ie *efectiv*, Ia *effective*; mankas en Io, kiu uzas *aktuala, fakta, reala*.

El L *effectivus* "produkta, aganta, efika" de *efficere* "efiki" (vd. tiun).

EFEMER/A (3; Ald, Jü): G *ephemer*, A *-al*, F *éphémère*, I *effimero*, R *efemernyj*. Ps-pf *epi-*, var. *ef-*.

El Gr *ephêmeros* "(dum)unutaga" el *epí* "sur; dum" (vd. ps-pf *epi-*) k *hêméra* "tago".

EFIK/I (f; RE): L *efficere*; kp A *efficient*, FI *efficace* (H *eficaz*) "efika". Ps-pf *e(ks)-*. ¶ 1894 *efekt-*. ¶ Io *efikar*, Ie *effecter*, Ia *haber effecto*.

Propr. "elfari": L *ex* "el", *facere* "fari" (vd. tiujn). Samfamiliaj vortoj en Eo: *efekt/o, -iva, koeficiento*.

EGAL/A (f; Un): A *equal*, F *égal*, I *uguale*, (H *igual*); L *aequalis*. Bazita sur F, fonetike pli simpla kaj iom disvastiĝinta en aliajn lingvojn (ekz. G *egal* "egala, indiferenta"). ¶ Io =, Ie *egal*, Ia *equal*.

De L *aequus* "ebena; egala". Parencaj vortoj en Eo: *ekva/cio, -toro, ekvilibro*.

EGID/O (1; Be): A *aegis*, F *égide*, G *Ägide*, IPoR *egida*, (H *égida*); L *aeg/is -idis*.

El Gr *aig/ís -ídos* s.s., propr. "kapraĵo" (la koncerna kiraso estis kovrita per la felo de la kaprino Amalteo), de *aix* "kapro".

EGOISM/O (1; Be): A *egoism*, I(H) *-o*, F *égoisme*, G *Egoismus*, PoR *egoizm*. Ps-sf

-ism. – **EGOIST/O** (1; Be): AR *egoist,* IPo(H) *-a,* F *égoiste,* G *Egoist.* Ps-sf *-ist.*

Der. (en F, 18a jc) de L *ego* "mi" (> F *je,* H *yo,* I *io*). Kp Gr *egô*; Sa *ahám*; A *I,* G *ich,* Gt *ik*; PoR *ja* (HE **ego*).

EĤ/O (f; RE): A *echo* [-k-], F *écho* [-k-], G *Echo* [-c-], I(H) *eco* [-k-], Po *echo* [-ĥ-], R *eko.* Eo *-ĥ-* estas normala transskribo de Gr *kh* [-k'-] (vd. sube) kaj cetere necesa tie ĉi por diferencigi la radikon disde la pref. *ek-.* ¶ 1894 *ek-.* ¶ Io *eko,* Ie *ecó,* Ia *echo* [-k-].

El Gr *êkhô* "resono, bruo, eĥo", kp *êkheín* "(re)soni", par. al L *vagire* "bleki, krii, pepi". Parencaj vortoj en Eo: *kateĥ/isto, -izi.*

EKIP/I (2; Jü): A *equip,* F *équiper* [-ki-], G *equipieren*† [-ki-], I *equipaggiare,* Po *ekwipowac',* R *ekipirovat',* (H *equipar* [-ki-]). Eo *-ki-* konformas al la prononco en la plejmulto de fontlingvoj. ¶ IoIeIa *equipar.*

Orig. "ekipi ŝipon": F ant. *esquiper* de la ĝerm. vorto por "ŝipo" (ekz. G ant. *scif*), vd. tiun.

EKLEZI/O (1; Be): L *ecclesia*; F *église* [-z] (kp *ecclésiastique* "-a"), I *chiesa* [-z-] (kp *ecclesiastico* "-a"), (H *iglesia,* kp *eclesiástico* "-a"). Kp ank. A *ecclesiastic* "-a". Evidente bazita sur L; *-z-* konforme al la ĝenerala tendenco en Eo voĉigi intervokalan s. ¶ Io =, Ie *eclesie* (kp *eclesia* "preĝejo"), Ia *ecclesia* (ank. "preĝejo").

El Gr *ekklêsía* "asembleo de civitanoj", propr. "elvok(itar)o", de *ékklêtos* "elvokita", part. de *ekkaleín*: *ek* "el" (vd. tiun k ps-pf *ek-*), *kaleín* "voki" (vd. sub *klara*).

EKLIPS/O (3; Jü): A(H) *eclipse,* F *éclipse,* I *eclisse.*Ps-pf *ek-.*

El Gr *ékleipsis* s.s., orig. "forlaso, ĉeso", de *ekleípein* "forlasi": *ek* "el" (vd. tiun k ps-pf *ek-*), *leípein* "(post)lasi" de HE rad. **likŭ-* (kp Sa *rinákti* "forlasas"; L *re/linquere*"postlasi", *-liquiae* "restaĵoj"; A *loan* "prunto", *lend* "prunti"; G *leihen* "prunti". Samfamilia vorto en Eo: *elipso.*

EKLOG/O (2; Jü; *eglog-* Be): A *eclogue* [-g], F *églogue* [-g], G *Ekloge,* I(H) *egloga,* PoR *ekloga*; L *ecloga.* Ps-pf *ek-.*

El Gr *eklogê* "elekt/o, -itaj pecoj" de *eklégein* "elekti": *ek* "el" (vd. tiun k ps-pf *ek-*), *légein* "elekti, kolekti" (vd. *legi*; kp ank. *elekti, logiko*).

EKONOMI/O (1; RE): A *eco/nomy,* I *-nomia,* (H *-nomía*), F *économie,* G *Ökonomie,* Po *eko/nomia,* R *-nomija.* Ps-sf *-i* 1.

El Gr *oikonomía* "mastrumado, administrado" de *oikonómos* "administranto", propr. "dommastro": *oíkos* "domo" (orig. *ŭoikos* el HE **ŭoikos* "loĝejo", vd. sub *vilaĝo*), *-nomos* agantnomo de *némein* "distribui" (vd. *astronomo*).

EKRAN/O (8; ER) 1) mebleto 2) tuko, plato: F *écran* (1,2). Kp A *screen* (1,2). ¶ Io *skreno* (1, 2), Ie *scren* (1), *ecran* (2), Ia *schermo** (2) (< I), *guardafoco* (1).

El F mez. *escren,* el Nd mez. *scherm,* kp G mez. *schirm* "protekto"; do etimologie identa kun *ŝirmi,* vd. tiun.

EKSCELENC/O (f; RE): A *excell/ency,* F *-ence,* G *Exzellenz* [-ksts-], I *eccellenza,* Po *ekscelencja,* (H *excelencia*). Ps-pf *eks-,* ps-sf *-enc.* ¶ 1894 *ekscelenz-.*

El L *excellentia* "eminenteco" de *excellere* "elstari" (kp *excelsus* "alta"): *ex* "el" (vd. tiun), *-cellere* (nur en kunmetoj) "esti alta" (vd. sub *kolono*).

EKSCES/O (2; Jü): A *ex/cess,* F *-cès,* (H *-ceso*), G *Exzess* [-ksts-], I *eccesso,* Po *eksces,* R *ekscess.* Ps-pf *eks-.*

El L *excessus,* propr. "devojiĝo", de *excedere* "devojiĝi, flankeniri": *ex* "el" (vd. tiun), *-cedere* " iri" (vd. *cedi*; kp spec. *abs-, pro-, suk/ceso*).

EKSCIT/I (f; RE): A *ex/cite,* F *-citer,* (H *-citar*), I *eccitare,* Po *ekscytowac'.* Ps-pf *eks-.*

El L *excitare* "eksciti, veki, elpeli": *ex* "el" (vd. tiun), *citare* "movi" (vd. *citi*).

EKSKLUZIV/A (2; *-e* Ka, kp *eksklusiv-* Be, *-e* Jü): A *exclus/ive,* F *-if* [-z-], (H

-ivo), G *exklusiv*, I *esclusivo* [-z-], Po *ekskluzywny*. Ps-pf *eks-*, ps-sf *-iv*.

Propr. "kiu ne permesas enlason", der. de L *exclusus*, ptc. perf. de *excludere* "ne enlasi" (> eo *ekskludi* Wü, ank. *es-* PV): *ex* "el" (vd. tiun), *claudere* "ŝlosi, fermi" (vd. *konkludi*; kp spec. *inkluziva*).

EKSKOMUNIK/I (2; Jü): A *excommun/icate*, F *-ier*, G *exkommunizieren*, I *scomunicare*, Po *ekskomunikowac'*; L ekl. *excommunicare*. Ps-pf *eks-*.¶ Io *ex/komunikar*, Ie *-comunier*, Ia *-communicar*.

Propr. "eligi el la komuneco", de L *ex* "el" k *communis* "komuna" (vd. tiujn; kp spec. *komuniki*).

EKSKREMENT/O (1; Jü): A *excrement*, (H *-o*), F *excrément*, G *Exkrement*, I *escremento*, Po *ekskrement*; L *excrementum*. Ps-pf *eks-*; ps-sf *-ment*.

Propr. "ekskrecio", de L *excernere* "ekskrecii, elkribri": *ex* "el" (vd. tiun), *cernere* "kribri" (vd. s.t.v.).

EKSKURS/O (f; EG): AF *excurs/ion*, (H *-ión*), I *escursione*, R *ekskursija*; L *excurs/io, -us*. Kp G *Exkursion* "esplor-ekskurso". Bazita sur la mallonga L varianto, probable kun konsidero pri konvena verba formo (**ekskursii* estus malpli oportuna). Ps-pf *eks-*. ¶ Io *ex-kurso*, IeIa *excursion*.

Propr. "elkur(ad)o", de L *excurrere* "ekskursi, elkuri": *ex* "el", *currere* "kuri" (vd. tiujn; kp spec. *kurso*).

EKSPED/I (f; RE): F *expédier*, G *exped/ieren*, (H *-ir*), Po *eksped/iowac'*, R *-irovat'*. Ps-pf *eks-*. ¶ Io *expediar*, IeIa *expedir*.

El L *expedire* "prizorgi, finfari; forsendi" (kp *expeditio* "militiro" > eo *ekspedicio* ER), orig. "malligi, liberigi", de *ex* "el" (vd. tiun) k **pedis* "piedkateno" (var. de *pedica* s.s.) de *pes pedis* "piedo" (vd. tiun).

EKSPERIMENT/O (1; Be): A *experi/ment*, (H *-mento*), G *Experiment*, I *esperimento*, Po *eksper/yment*, R *-iment*; L *experimentum*. Kp F *expérimenter* "-i". Ps-pf *eks-*, ps-sf *-ment*.

Orig. "provo", de L *experiri* "provi" (kun ptc. perf. *expertus* "provinta, eksciinta", kp eo *eksperto* Ka), kies unua elemento estas *ex* "el" (vd. tiun); la dua ekz. en *periculum* "provo; danĝero" (de HE rad. **per-* "penetri, trairi; provi"), vd. plue *porti, sperta*.

EKSPLOD/I (f; RE): A *ex/plode*, F *-ploser*, G *-plodieren*, (H *-plotar*), I *esplodere*, Po *eksplodowac'*. Ps-pf *eks-*. ¶ Io *ex/plozar*, IeIa *-ploder*.

El L *explodere* "per bruoj (aplaŭdoj k.s.) forpeli [aktoron] de la scenejo": *ex* "el, for" (vd. *el*), *plaudere* "aplaŭdi" (vd. tiun kaj *plaŭdi*).

EKSPLUAT/I (2; Be): A *ex/ploit*, F *-ploiter* [-ŭa-], (H *-plotar*), Po *eks/ploatowac'*, R *-pluatirovat'*. Bazita sur F prononco, transskribita laŭ R maniero (Z citas la vorton en rusa formo inter internaciismoj Un p. 10); kp. *buduaro*. Ps-pf *eks-*. ¶ IoIe *ex/plotar*, Ia *-ploitar*.

Orig. "(sukcese) finfari", de F *exploit*, en F ant. "io finfarita; rezulto, gajno", el L *explicitum*, ptc. perf. de *explicare* "plenumi, ordigi", propr. "disvolvi": *ex* "el, dis-" (vd. *el*), *plicare* "faldi" (vd. *impliki*).

EKSPORT/I (1; Jü): A *export*, F *-er*, G *-ieren*, (H *-ar*), I *esportare*, Po *eksport/owac'*, R *-irovat'*; L *exportare*. Ps-pf *eks-*.

Propr. "elporti", de L *ex* "el" k *portare* "porti" (vd. tiujn).

EKSPOZICI/O (f; UV): AF *exposi/tion*, (H *-ción*), I *esposizione*, R *ekspozicija*. Ps-pf *eks-*, ps-sf *-cio*. ¶ 1894 *eksposizi-*. ¶Io *expozo*, IeIa *exposition*.

El L *expositio* "el/montrado, -metado" de *exponere* "elmeti": *ex* "el" (vd. tiun), *ponere* "meti" (vd. *deponi*; kp spec. *pozicio*).

EKSPRES/O (1; *-a* Jü): 1) kuriero 2) trajno: A*express* (1,2), F *exprès* (1), *express* (2), G *Express* (2), I *espresso* (2), PoR *ekspres* (2), (H *expreso* 2). Ps-pf *eks-*. ¶ Ie *express* (2), Ia *-o* (1,2); Io *espreso* (2), *specala kuriero* (1).

Orig. adj. (sk. "kuriero" aŭ "trajno") signifanta "ekstra, specifa", orig. "klare difinita (esprimita)", el L *expressus*, ptc. perf.

de *exprimere* "esprimi" (vd. tiun).

EKSTAZ/O (1; Jü): A *ecstasy*, F *extase* [-z], G *Ekstase* [-z-], I *estasi* [-z-], R *ekstaz*, Po *-a*, (H *éxtasis*). Ps-pf *ek-*, ps-sf *-z*. ¶ Io *extazo*, Ie *extase*, Ia *ecstase*.

Pere de L ekl. *ecstasis*, *exstasis* s.s. el Gr *ékstasis* "ekstazo, raviteco", propr. "starado ekster (si mem)", de *exístasthai* "esti (stari) ekster si, freneziĝi": *ex* "el, ekster", *hístasthai* "star(iĝ)i" (vd. *el* resp. *stari*).

EKSTER (f; Un): Deirpunkto, kiel ofte ĉe prepozicioj, estis la L formo: *extra* (cetere troviĝanta en pluraj modernlingvaj derivaĵoj, ekz. A *extra/ordinary*, F *-ordinaire* "eksterordinara"). Finiĝante per *-a*, la formo ne estis rekte transprenebla (kp L *circa* > Eo *ĉirkaŭ*); krome ĝi havas en la modernaj lingvoj alian tute internacian signifon ("aldona, plia": vd. *ekstra*). Ioma modifo do necesis. La fakte akceptita formo povas esti rigardata kiel konservo de la L radiko kun silabigo de *r* (**ekstr* > *ekster*); pli kredeble tamen estas, ke ĝin sugestis la apartena L adjektivo *exterus* "ekstera" (komparativo: *exterior*, kp Waringhien 1967, 35) aŭ ĝiaj modernlingvaj derivaĵoj: A *external*, F *extérieur*, I *esteriore*, (H *exterior*) "ekstera". Forme analoga estas la prep. *inter*. ¶ 1881 *ja* (sen etimologio, vd. PVZ 5, 137); 1906 *ster* (kripligo de *ekster*). ¶ Io *exter* (espismo), Ie *éxter* (espismo), Ia *extra*.

Etimologie identa kun *ekstra*, vd. tiun.

EKSTERM/I (f; RE): A *extermin/ate*, F *-er*, (H *-ar*), I *esterminare*. La ellaso en la Ea formo de *-in-* (sufiksidenta kaj nenecesa por rekono de la radiko) estas analoga al tiu en *imagi* (< L *imaginare*) kaj *prokrasti* (< L *procrastinare*). Ps-pf *eks-*. ¶ IoIeIa *exterminar*.

El L *exterminare* "ekzili, forpeli (trans la limon)", el *ex* "el, for" (vd. tiun) k *terminus* "limo" (vd. *termino*).

EKSTR/A (f; RE): AFG *extra* "-a, -e", (H *extra* "-e"), R *ekstrennyj* "-a". En la fontlingvoj uzata adjektive kaj adverbe (eĉ substantive, ekz. A *extra* "ekstr/aĵo, -ulo", F *extra* "-ulo"); la formo mem antaŭdestinis la vorton por adjektiva kategorieco en Eo. ¶ IoIe *extra* (adv., pref.); Ia *extra* (adv., pref.; krome prep. "ekster").

El L *extra* "ekster" (prep.), "krome, pluse" (adv.), orig. oblikva formo de adj. *exterus* "ekstera" der. de *ex* "el" (vd. tiun). Samfamiliaj vortoj en Eo: *ekster*, *ekstrema*, *stranga*.

EKSTRAKT/O (1; RE): A *extract*, (H *-o*), F *extrait*, G *Extrakt*, I *estratto*, PoR *ekstrakt*. Ps-pf *eks-*. ¶ Io *extrakt-uro*, Ie *extract/e*, Ia *-o*.

El L *extractum*, propr. "eltiritaĵo", de *extrahere* "eltiri" el *ex* "el" (vd. tiun) k *trahere* "tiri", eble parenca al A *draw* "tiri", G *tragen* "porti". Kp spec. *abstrakta*; vd. ank. *trakti*.

EKSTREM/A (f; RE): A *extrem/e*, (H *-o*), F *extrême*, I *estremo*; L *extremus*. Kp G *Extrem* "-o", *extrem* "-eca"; R *ekstremist* "-isto". ¶ 1882 *str-* (*prestre* "tre ekstreme"): kripligo de *extrem-*.

Orig. "plej ekstera", superl. de L *exterus* "ekstera" (vd. *ekster*, *ekstra*).

EKVACI/O (2; Jü): A *equa/tion* [-kŭ-], I *-zione* [-kŭ-], F *équation* [-kŭ-], (H *ecuación* [-kŭ-]); L mod. *aequat/io -ionis* [-kŭ-]. Eo *-kv-* estas la normala ekvivalento de L *qu*: vd. *akvo* kaj kp la sekvajn vortojn. Ps-sf *-cio*. ¶ Io *equacion-o*, IeIa *equation*.

Propr. "egaligo", de L *aequare* "egaligi" de *aequus* "egala" (vd. tiun; kp *ekv/atoro*, *-ilibro*).

EKVADOR/O (8; Wü): AGI(H) *Ecuador* [-kŭ-], F *Équateur* [-kŭ-], Po *Ekwador* [-kv-], R *Ekvador*. Eo *-kv-* certe baziĝas sur analogio al *ekvatoro* sed fakte estas la sole ebla alternativo (*kŭ* estante praktike neuzata). Kp *gv* en *Gvatemalo*, *Nikaragvo*, *Urugvajo*. Ps-sf *-or* 1. ¶ IoIe *Equador*, Ia *Ecuador*.

La lando estas nomita pro sia situo ĉe la ekvatoro (H *ecuador*). Vd. plue *ekvatoro*.

EKVATOR/O (1; RE): A *equa/tor* [-kŭ-], I *-tore* [-kŭ-], F *équateur* [-kŭ-], G *quator* [-kv-], R *ekvator*, (H *ecuador* [-kŭ-]); L mod. *aequator* [-kŭ-]. Pri Eo *-kv-*, vd. *ekvacio*. Ps-sf *-or* 1.

Propr. "egaliganto" (pri la linio dividanta la terglobon en du egalajn partojn), agantnomo de L *aequare* "egaligi" (vd. *ekvacio*). Etimologie identa estas *Ekvadoro*.

EKVILIBR/O (2; Be): A *equilibr/ium* [-kŭ-], I(H) *-io* [-kŭ-], F *équilibre*, L *aequilibrium* [-kŭ-]. Kp G *Equilibrist*, Po *ekwilibrysta*, R *ekvilibrist* "-isto". Pri Eo *-kv-*, vd. *ekvacio*. ¶ Io *equilibr/o*, Ie *-ie*, Ia *-io*.

El L *aequus* "egala" (vd. tiun) k *libra* "pesilo", mediteranea vorto de sicilia origino (kp. *litro*).

EKZAKT/A (4; N-ro 35 1890, Jü; *eksakt-* N-ro 15 1888): AF *exact* [-gz-], (H *-o*), G *exakt*, I *esatto*. Ps-pf *eks-*. Tiu ĉi vorto ne ekzistas en R sed tamen alprenis la R-inspiritan skribon *ekz-*, kiu fariĝis la normala reprezentiĝo de latinida *ex-* antaŭ vokalo en Eo: vd. *ekzameno*. ¶ Io *exakta*, Ie *exact*, Ia *-e*.

El L *exactus* "(bone) plenumita, zorga, preciza", ptc. perf. de *exagere* "plenumi, elfari": *ex* "el", *agere* "agi, fari" (vd. *el* resp. *agi*).

EKZAMEN/O (f; RE): A *exam(ination)* [-gz-], F *examen* [-gz-], G *Examen*, I *esame*, Po *egzamin*, R *ekzamen*, (H *examen*); L (univ.) *exa/men -minis*. Ps-pf *eks-*; antaŭ vokalo tiu alprenas en Eo la varianton *ekz-* (kp. *ekzakta, ekzekuti, ekzempl/o, -ero, ekzerci, ekzili, ekzisti*; kontraŭe *eks-* antaŭ konsonanto, ekz. *ekscelenco, ekskurso, ekspedi, ekstermi*) laŭ modelo de R ortografio; krome la sono [z] ofte havas apogon en AFPo. La skribo ne estas tute fonetika (Wiener 1951, 148, nomas ĝin "parta fonetika imito de la franca kaj angla prononcoj"; Szerdahelyi 1987, 116, parolas – laŭ mi neklare – pri "asimilado"), kaj la grafemkombino fakte ofte estas prononcata [gz]. La sola vorto de tiu ĉi tipo en Un estas *ekzempl-*, kiu ja ne ekzistas en R; tio indikas ke ne temas pri simpla kopiado de R sed ke la aliaj fontlingvoj kun prononco [-gz-] ankaŭ ludis rolon. Ĉiuokaze la koncerna skribmaniero disvastiĝis al aliaj radikoj sen reprezentiĝo en R (vd. ekz. *ekzakta, ekzekuti, ekzerci*). En la apartenanta verbo la plimulto de la fontlingvoj radikfine montras vokalon *i* (A *exam/-ine*, F *-iner*, G *-inieren*, I *esaminare*); la Ea radiko tamen ne estas rigardenda kiel modifita, ĉar Z deiris probable de la substantivo. Iom analoga estas *specimeno;* kp. *stameno, volumeno* (nur subst.). ¶ 1894 *eksamen-*. ¶ Io *exameno*, Ie *exámine*, Ia *examine*.

L *examen* "ekzameno, provo, kontrolo", orig. "pesado", propr. "dekliniĝo, flankeniro (de la pesila lango)", de *exigere* "forpeli" (ankaŭ "pesi, ekzameni"): *ex* "el, for", *agere* "peli" (vd. *el* resp. *agi*).

EKZEKUTI (f; RE): A *execute*, F *exécuter* [-gz-], (H *ejecutar*). Kp G *Exekution*, I *esecuzione*, Po *egzekucja* "-o". Ps-pf *ekz-*: pri tiu varianto de *eks-*, vd. sub *ekzameno*. ¶ 1894 *eksekut-*. ¶ Io *exekutar*, Ie *execut/er*, Ia *-ar*.

Verbo der. de L subst. *exsecutio* "plenumo, efektivigo" de *exsequi* "plenumi": *ex* "el", *sequi* "sekvi" (vd. tiujn).

EKZEM/O (1; Jü): AI(H) *eczema*, F *eczéma*, G *Ekzem*, Po *egzema*, R *ekzema*; L med. *eczema*. En tiu ĉi vorto, Eo *-kz-* respegulas la plej internacian skribon (*z* troviĝas en ĉiuj fontlingvoj); ĝi do ne estas analoga al la apero de la sama fonemkombino en la ĉirkaŭstarantaj radikoj. Ps-pf *ek-*. ¶ Io =, IeIa *eczema*.

El Gr *ékzêma* s.s., propr. "ekstera fermentado (bolado)": *ek* "el" (vd. tiun), *zéma* "bolado" de *zein* "boli, fermenti" (HE rad. **jes-* "boli", kp Sa *yásati* "bolas", A *yeast* "fermentaĵo").

EKZEMPL/O (f; Un): A *example* [gz-], F *exemple* [-gz-], G *Exempel*†, I *esempio*,

(H *ejemplo*); L *exemplum*. Ps-pf *ekz-*: pri tiu varianto de *eks-*, vd. *ekzameno*. ¶ 1894 *eksempl-*. ¶ IoIa *exempl/o*, Ie *-e*.

*Propr. "io elprenita", el **ex-em-lom* (la *-p-* do estas parazita), der. de L *eximere* "elpreni": *ex* "el" (vd. tiun), *emere* "preni; aĉeti" (HE rad. **em-* "preni", kp R *imet'* "havi"). Parencaj vortoj en Eo: *ekzemplero, konsumi, premio*.

EKZEMPLER/O (f; RE; *ekzemplar-* Ald): F *exemplaire* [-gz-,-ér], G *Exemplar*, I *esemplare*, Po *egzemplarz*, R *ekzempljar*, L *exemplar*. Ps-pf *ekz-*; pri tiu varianto de *eks-*, vd. *ekzameno*. Por eviti kolizion kun *ekzempl/ar/o*, Z ŝanĝis la radikfinan *ar* je *er* (kun apogo de la F prononco); kp *cirkulero*. ¶ 1894 *eksempler-*. ¶ Io *exempl/ero* (espismo), Ie *-are*, Ia *-ar*.

En L "modelo; kopio", de *exemplum* "modelo; kopio; specimeno, ekzemplo" (vd. tiun).

EKZERC/I (f; RE): A *exercise*, F *exercer* [-gz-], I *esercitare*, (H *ejercitar*); L *exercere* (intensa var.: *exercitare*). Kp G *exerzieren* [-tsí-] "soldatekzerc(iĝ)i". Kiel oni povas atendi, Z preferis la malpli longan formon de AF(G) (**ekzercit-* estigus malbonsonan participon **ekzercitita*).– Ps-pf *ekz-* (var. de *eks-*) analogie al aliaj radikoj (vd. *ekzameno*) malgraŭ tre malforta apogo por [z]. ¶ 1894 *ekserc-*. ¶ Io *exerc/ar*, Ie *-ir*, Ia *-er*.

De L *ex* "el" (vd. tiun) k *arcere* "enfermi" (do propr. "liberigi" > "ekpeli, movigi"), kp L *arcanus* "sekreta", Gr *arkeín* "defendi, protekti" (HE rad. **ark-* "bari, fermi").

EKZIL/o (f; RE): F *exil* [-gz-], A *-e*, (H *-io*), G *Exil*,I *esilio*; L *ex(s)ilium*. Ps-pf *ekz-*; pri tiu varianto de *eks-*, vd. *ekzameno*. ¶ 1894 *eksil-*. ¶ Io *exil/o*, Ie *-ie*, Ia *-io*.

De L *exsul* "ekzilito", kredeble el *ex* "el" (vd. tiun) k *solum* "grundo" (vd. *soleo*).

EKZIST/I (f; RE): A *exist* [-gz-], F *-er* [-gz-], G *-ieren*, (H *-ir*), I *esistere*. Kp Po *egzystencja* "-ado", R *ekzistencializm* "-adismo". Ps-pf *ekz-*; pri tiu varianto de *eks-*, vd. *ekzameno*. ¶ 1894 *eksist-*. ¶ Io *exist/ar*, IeIa *-er*.

El L *ex(s)istere* "aperi; fariĝi", propr. "elstariĝi": *ex* "el" (vd. tiun), *sistere* "stariĝi, ekstari" (samradika kun *stare*, vd. *stari*). Kp. spec. *konsisti, rezisti*.

EL (f; Un): Deirante de L *e* (antaŭ konsonanto)/*ex* (antaŭ vokalo), Z ne povis adopti ĝin senŝanĝe: **e* estis neebla pro la adverba finaĵo, **eks* kreus riskon de konfuzo kun aliaj internaciaj kunmetitaj vortoj (ekz. *eksporti* kaj *elporti* estus samformaj). Li do donis al la prepozicio asimilitan formon *el*, glate kombineblan kun kaj vokaloj kaj konsonantoj (Waringhien 1959, 62). Estas eble, ke lin inspiris kelkaj L verboj komenciĝantaj per *e* plus *l*, ekz. *elaborare* "ellabori", *elicere* "ellogi", *eloqui* "eldiri"; pli probable estas, ke li en asimilado sekvis la ekzemplon de *al* (tiel Waringhien 1967, 35). Tio lasis la neŝanĝitan prepozicion libera por alia funkcio, nome kiel prefikso *eks-* (aperanta nur antaŭ substantivaj radikoj kaj tial ne kaŭzanta konfuzojn de la menciita tipo). – L *e/ex* ne pluvivas kiel prepozicio en modernaj lingvoj sed troviĝas kiel prefikso en multaj internaciaj vortoj (vd. liston sub ps-pf *eks-*); por *e* plus *l*, kp F *élaborer*, I *elaborare* "ellabori" k.a. ¶ 1881 *he*. Waringhien 1959, 47, kalkulas tiun prepozicion inter la arbitre elpensitaj; PVZ 5, 136, indikas L *e/ex* kiel fonton. Al mi ŝajnas probable, ke *he* estas modifo de L *e*; nura *e* estis neakceptebla, ĉar jam en pEo *e* rolis kiel adverba finaĵo. Kp Eo *ho* (modifita tiel, ĉar *o* havis gramatikan funkcion). ¶ Io *ek* (kp Gr sube), IeIa *ex*.

El HE **eghs* "el", kp Gr *ek/ex*, R *iz*. Etimologie identaj estas ps-pf *ek-* k *eks-*; kp. ank. *ekster, ekstra*.

ELAST/A (f; RE): A *elast/ic*, G *-isch*, I *-ico*, Po *-yczny*, R *-ičnyj*, F *élastique*, (H

elástico). La adjektiva sufikso trovebla en la fontlingvaj formoj estas anstataŭita per *-a* same kiel en *identa* kaj ev. *elektra*. ¶ Io *elast/ika*, IeIa *-ic*.

El L mod. *elasticus*, farita el Gr *elastós*, adj. de *elaúnein* "peli, puŝi".

ELEFANT/O (f; RE): A *elephant*, F *éléphant*, G *Elefant*, I(H) *elefante*; L *eleph/as -antis*, *elephantus*.

El Gr *eléph/as -antos* "elefanto; eburo", eble (kiom koncernas la finan vorteron *-ephas*) par. al Eg *âb(u)* "elefanto; eburo" (kp *eburo*).

ELEGANT/A (1; Du, Be): AG *eleg/ant*, I(H) *-ante*, Po *-ancki*, R *-antnyj*, F *élégant*; L *eleg/ans -antis*. Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-ant*.¶ 1881 *lug-* (laŭ War LV 45, el F *élégant*; ĉu konekso kun F *luxe* ktp ne estas pli probabla?).

Propr. "elektema", kromformo de L *elig/ens -entis*, ptc. prez. de *eligere* "elekti" (vd. tiun).

ELEGI/O (1; RE): A *eleg/y*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*); L *elegia*.

El Gr *elegeía* s.s. de *élegos* "funebra kanto", vorto de malgrandazia origino.

ELEKT/I (f; Un): A *elect*, F *élire* (kp *élection* "-o"), I *eleggere* (kp *elezione* "-o"), (H *elegir*, kp *elección* "-o"); L *eligere* (supina radiko: *elect-*). Bazita sur la supina radiko, eble pro ĝiaj pli grandaj disvastigiteco kaj produktiveco en la modernaj lingvoj (ekz. F *électeur* "-anto", *électif* "-a", *électoral* "-a", *électorat* "-antaro"). Ps-pf *e(ks)-*. ¶ Io *elektar*, Ie *electer*, Ia *eliger*.

Propr. "elpluki": L *e* "el" (vd. tiun), *legere* "pluki, kolekti" (vd. *legi*, kp spec. *kolekti*).

ELEKTR/a (1; RE):A *electr/ic*, G *-isch*, F *électrique*, I *elettrico*, Po *elektr/yczny*, R *-iĉeskij*, (H *eléctrico*). Plej bone klarigata kiel transpreno de la citita adjektivo kun ellaso de la fontlingva adjektiva sufikso (analoge al *elasta*, *hipnota*, *identa*). Se substantivkategoria (tiel prezentita jam en Be), ĝi probable baziĝas ne sur la plena substantivo (A *electricity*, F *électricité* ktp), sed sur ties mallongigita formo A *electro-*, F *électro-*, G *Elektro-* ktp, troviĝanta en multaj fakterminoj (ekz. F *-chimie*, *-magnétisme*, *-technique*, *-thérapie*). ¶ Io *elektr-ala*, IeIa *electric*.

El L mod. *electricus*, kreita (de Gilbert, 1600) el Gr *êlektron* "sukceno" (ĉar li observis la elektran forton ĉefe en tiu materio), de *êléktôr* (nomepiteto de la Suno, probable:) "radianta". Kp sekv.

ELEKTRONIK/O (8; *elektron/iko* PIV): A *electronics*, F *électronique*, G *Elektronik*, H *electrónica*, I *elettronica*, Po *elektronika*, R *elektronika*. Ps-sf *-ik*.

Der. de *elektrono* (kp PIV) < A *electron*, F *électron*, G *Elektron*, H *electrón*, PoR *elektron*, termino farita (en A de Stoney 1891) el *electr(icity)* "elektro" k *-on* el *ion* "jono". Kp *elektra*.

ELEMENT/O (1; RE): APoR *element*, I(H) *-o*, F *élément*, G *Element*; L *elementum*.

En L plej ofte plurala (*elementa* "aboco, literoj"); probabla semantika evoluo: "litero" > "konsistiga ero" > "fundamenta substanco". De nekonata origino; oni sugestis devenon de *el-em-en* (= *LMN*), nomoj de la unuaj literoj de la dua alfabetduono en L.

ELF/O (2; Jü): APoR *elf*, F *-e*, I(H) *-o*. ¶ Io =, IeIa *elf*.

Ĝerm. vorto, par. al G *Alp* "inkubo".

ELIKSIR/O (1; Jü): A(H) *elixir*, F *élixir*, G *Elixier*, I *elisir(e)*, PoR *eliksir*. ¶ Ia *elixir*, Io *-o*, Ie *-e*.

El Ar *al-iksîr* (*al* dif. art., vd. *algebro*) "ŝtono de saĝuloj" (kiu laŭdire transformas nevalorajn metalojn en valorajn; semantika evoluo: > "refortigilo" > "sanigilo"), el Gr *xêríon* "seka pulvoro (medikamento)", de *xêrós* "seka" (vd. *serena*).

ELIPS/O (1; Be) 1) geom. 2) lit. : A *ellipse* (1), *ellipsis* (2), F *ellipse* (1,2), G *Ellipse* (1,2), I *ellisse* (1), *ellissi* (2), Po *elipsa* (1,2), R *ellips* (1,2). Ps-pf *en-*, var. *e-*.

El Gr *élleipsis* (1,2), propr. "manko, ella-

so" (la koncerna kurvo estas tiel nomata, ĉar ĝia plano formas rilate al la bazo de la konuso malpli grandan angulon ol tiu de la parabolo), de *elleípein* "postlasi [ion] en [io]" (> "lasi [ion] nefarita" > "esti mankhava"): *en* "en" (vd. tiun), *leípein* "lasi" (vd. *eklipso*).

ELIZI/O (1; *-i* Jü): A *elis/ion*, I *-ione* [-z-], (H *-ión*), F *élision* [-z-], G *Elision*, Po *eliz/ja*, R *-ija*; L *elis/io -ionis*. Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-zio*, var. de *-cio*. ¶ Io *elizio-no*, IeIa *elision*.

Propr. "elpuŝo", de L *elidere* "elpuŝi": *e* "el" (vd. tiun), *laedere* "bati, puŝi" (kp. *kolizio*).

ELOKVENT/A (f; RE): A *eloquent*, I *-e*, F *éloquent*, (H *elocuente*); L *eloqu/ens -entis*. Pri *-kv-*, vd. *akvo*. Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-ent*. ¶ Io *eloqu/enta*, Ie *-ent*, Ia *-ente*.

Orig. ptc. prez. de L *eloqui* "elparoli": *e* "el" (vd. tiun), *loqui* "paroli".

EMAJL/O (f; RE): A *enamel*, F *émail*, G *Email*, I *smalto*, Po *emalia*, R *emal'*, (H *esmalte*). Z kopiis la F formon kiel la plej internacian (F > GPoR). Pri la transskribo *-ajl-*, vd. *ajlo*. ¶ 1894 *emal-*. ¶ Io *emalio*, Ie *esmalte*, Ia *smalt*.

F formo (kun proteza *e-*) eł ĝerm., kp G *Schmelz* "emajlo", orig. "fandaĵo", de *schmelzen* "fandi" = A *smelt* (pĜ **smaltjan*). De HE rad. **(s)meld-* "fandiĝi" (kp *malto*).

EMANCIP/I (1; Jü): A *emancip/ate*, I *-are*, (H *-ar*), F *émanciper*, G *emanzipieren* [-ts-], Po *emancypowac'*, R *emancipirovat'*. Ps-pf *e(ks)-*.

El L *emancipare* "liberigi [filon] de la patra aŭtoritato" el *e* "el" kaj *mancipium* "posed(rajt)o", der. de *manceps -cipis* "iu kiu transprenas proprajon, aĉetanto", propr. "iu kiu prenas [ion] en la manon", el *manus* "mano" k *capere* "preni". Vd. *el, mano, kapti*.

EMBARAS/O (f; RE): A *embarrassment*, F *embarras*, I *imbarazzo*, Po *ambaras*, (H *embarazo*). Bazita sur la F ortografio (F > APo). Ps-pf *en-*, var. *em-*. ¶ Io =, Ie *embarass/e*, Ia *-o*.

Unua elemento FH *en* resp. I *in* "en" (vd. tiun); dua elemento eble H aŭ I *barra* "baro" (vd. *bari*).

EMBLEM/O (1; RE): A *emblem*, IR(H) *-a*, Po *-at*, F *emblème*, G *Emblem*. Ps-pf *en-*, var. *em-*; ps-sf *-m(at)-*.

El Gr *émblê/ma -matos*, propr. "enmetaĵo", de *embállein* "enmeti": *en* "en" (vd. tiun), *bállein* "meti, ĵeti" (vd. *balistiko*; kp ank. *problemo*).

EMBRI/O (f; RE): A *embry/o*, F *-on*, G *Embryo*, IPo *embrion*, (H *embrión*). Same kiel en *ganglio, skeleto, stadio*, Z uzis la grekdevenan vortfinon *-on* por formi Ean substantivon, tie ĉi laŭ modelo de AG. Ps-pf *en-*, var. *em-*. ¶ Ie *embrion*, Io *-o*, Ia *embryon*.

El Gr *émbryon* "feto", propr. "io kreskanta en (ino)" el *en* "en" (vd. tiun) k *bryein* "ŝveli, ĝermi".

EMBUSK/O (f; RE): A *ambush*, F *embuscade*, I *imboscata*, (H *emboscada*). Z forstrekis, laŭ modelo de A, la sufikson por ebligi uzadon de la homonima Ea sufikso. La vokalismo baziĝas sur F; per *u* Z eble alstrebis klaran diferencigon disde *en bosko*. Ps-pf *en-*, var. *em-*. ¶ Io =, Ie *inboscade*, Ia *imboscada*.

Romana der. de la responda verbo (F *embusquer* ktp), propr. "meti en boskon, kaŝi en bosko": FH *en*, I *in* "en" (vd. tiun); H *bosque*, I *bosco* "bosko" (vd. tiun).

EMERIT/O (8; Jü): A *emeritus*, G *Emerit/us, -ierter*, (H *emérito*); L mod. *emeritus*. Ps-pf *e(ks)-*.

Propr. "ĝisfine servinta", ptc. perf. de L *emereri* "fini servadon": *e* "el" (vd. tiun), *mereri* "servi" (vd. *merito*).

EMFAZ/O (3; Jü): A *emphasis*, F *emphase* [-z], G *Emphase*, I *enfasi* [-z-], Po *emfaza*, (H *énfasis*). Ps-pf *en-*, var. *em-*; ps-sf *-z*.

El Gr *émphasis* "klara prezentado" de *emphaínein* "prezenti, montri": *en-* "en" (vd. tiun), *phaínein* "montri" (vd. *fantazio*).

EMINENC/O (3; Jü): A *Emin/ence*, (F *É-*), G *-enz*, I *-enza*, (H *-encia*), Po *emi-*

nencja. Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-enc*.

El L *eminentia* "eminenteco, elstareco" de *eminens* (vd. sekv.)

EMINENT/A (f; RE): A *eminent*, I(H) *-e*, F *éminent*; L *emin/ens -entis*. Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-ent*.

Propr. "elstara", ptc. prez. de L *eminere* "elstari" el *e* "el" (vd. tiun) k elemento troviĝanta ank. en *minae* "murdentoj" (vd. sub *monto*; kp *minaci*).

EMOCI/o (*-i* 3; *-i* Jü): A *emotion*, F *émotion*, I *emozione* [-ts-], Po *emo/cja*, R *-cija*, (H *emoción*). Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-cio*.

Latineska der. de F *émouvoir* "emocii", orig. "movi [la animon]", el L *emovere* "el-, for/movi": *e* "el", *movere* "movi"(vd. tiujn).

EMPIRI/O (4; Jü): G *Empirie* [-i], Po *empir/ia*, R *-ija*. Kp A *empiricism* "-o, -ismo", F *empir/isme*, I(H) *-ismo* "-ismo". La radiko ŝajnas bazita sur la Gr originvorto (vd. sube) en ties germana kaj slavaj formoj. Ne estas klare, kial Z malakceptis **empir-* (kiu oportune donus *-a*, *-ismo*); la radiko eo *empir-* "stilo de meblaro" (Wü), kiu povus kaŭzi kolizion, ne estis uzata de Z. Tamen aperas aparta radiko *empirism/o* jam en Jü. Ps-pf *en-*, var. *em-*; ps-sf *-i* 1. ¶ Io *empir/iko*, Ie *-ie*, Ia *-ismo*.

El Gr *empeiría* "sperteco" de *émpeiros* "sperta" el *en* "en" (vd. tiun) k *peíra* "sperto", orig. "provado" (HE rad. **per-* "penetri, trairi; provi", vd. *sperta*).

EMULSI/O (1; Wü): A *emuls/ion*, I *-ione*, F *émulsion*, G *Emulsion*, Po *emulsja*, R *emul'sija*. Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-cio*, var. *-sio*. ¶ Io *emuls-uro*, IeIa *emulsion*.

Propr. "lakteca (flu)aĵo", term. farita (en F, 16a jc) el L *emulsus*, ptc. perf. de *emulgere* "elmelki": *e* "el", *mulgere* "melki" (vd. tiujn).

EN (f; Un): AGI *in*, F(H) *en*; L *in*; Gr *en*. Z hezitis inter la du formoj (1878 *in*, 1881 *i*, 1894 *in*); certe la fakto, ke *in* ekzistas kiel sufikso en la versio de 1887, influis la definitivan elekton. ¶ Io *en*, IeIa *in*.

El HE **en* s.s., kp ank. Gt *in*; Po *w*, R *v(o)*, Sl ant. **vŭ(n)*; Gr *eis* (< *ens*) "al; en [ion]" (kp *epizodo*). Vd. ank. *inter*.

ENCIKLOPEDI/O (2; RE): A *encyclo/paedia*, F *-pédie*, G *Enzyklopädie* [-ts-], I(H) *enciclopedia*, Po *encyklopedia*, R *enciklopedija*. Ps-pf *en-*; (ps-sf *-i* 1).

El L mod. *encyclopaedia* (1508), farita laŭ Gr *enkyklios paideía* "edukado ĝenerala", propr. "enronda" (= ampleksanta la tutan rondon de scioj) el *en* "en" (vd. tiun) k *kyklos* "rondo, cirklo" (vd. *ciklo*); Gr *paideía* de *paideúein* "eduki", de *pais paidós* "infano" (kp *pedagogo*).

ENDIVI/O (2; Jü): AF *endiv/e*, I(H) *-ia*, R *-ij*, G *Endivie*, Po *endywia*; L bot. *Cichorium endivia*. ¶ Io *endivi/o*, Ie *-e*, Ia *-ia*.

Pere de L mez. *endivia* el Gr biz. *endivi*, el Gr *éntybon* (kp L klas. *intubus* "cikorio"), kredeble de Gr *en* "en" k Eg *tybi* "januaro" (en kiu monato la koncerna herbo aperas en Egiptujo).

ENERGI/O (f',1,7; Ald, Be): A *energ/y*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), F *énergie*, G *Energie*; Ps-pf *en-*; (ps-sf *-i* 1).

El Gr *enérgeia* "agado, aktiveco" de *energês* "aktiva", propr. "kiu havas laboron en si", el *en* "en" (vd. tiun) k *érgon* "laboro, agado" (vd. *verko*).

ENIGM/O (f; N-ro 14 1888,RE): AI(H) *enigma*, F *énigme*; L *aenigma*. Ps-sf *-m(at)-*. ¶ Io *enigmato*, IeIa *enigma*.

El Gr *aínigma* s.s. de *ainíssesthai* "paroli enigme", der. de *aínos* "parolo, rakonto".

ENKET/O (1; Jü): A *inquiry* (kp *inquest* "jura -o"), F *enquête* [-ké:t], G *Enquete* (fremdvorto kun F prononco), I *inchiesta* [-k-], Po *ankieta*, R *anketa*. Franca formo adaptita al Ea ortografio; tiu formo fakte disvastiĝis en GPoR kaj do havas certan internacian karakteron. Ps-pf *en-*. ¶ Io *inquest/o*, Ie *-e*, Ia *-a*.

Der. de F *enquérir* (kp H *inquirir*, I *inchie-*

dere) "pridemandi, esplori" el L *inquirere* s.s.: *in* "en" (vd. tiun), *quaerere* "demandi, serĉi" (vd. *konkeri*).

ENTOMOLOG/O (7; Ka): PoR *entomolog*, A *-ist*, F *-iste*, I *-o*, G *Entomologe*, (H *entomólogo*). – Sciencnomo: **ENTOMOLOGI/O** (2; Jü): A *entomolog/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Entomologie*. Ps-pf *en-*; ps-sf *-i* 1.

La sciencnomo estas farita (en F de Bonnet, ĉ. 1745) el Gr *éntomon* "insekto", propr. "entranĉita (besto)" (pro la mallarĝeco de la meza korpoparto; kp *insekto*) de *entémnein* "entranĉi": *en* "en" (vd. tiun), *témnein* "tranĉi" (vd. *atomo*); la dua elemento estas *-logía* "scienco", der. de *-logos* "esploristo" (*entomolog-* estas kreita analoge al similaj vortoj: kp *arkeologo*, vd. ank. *logiko*).

ENTREPREN/I (f; RE; *enterpren/o* N-ro 20,1889): F *entreprendre*, I *intraprendere*, (H *emprender*). Kp A *enterprise* "-o". Bazita sur F; la dua elemento alprenis la formon de la simpla verbo *preni*. La prefiksa formo estas unika (vd. Wiener 1951, 149). ¶ Io *entraprezar*, IeIa *interprender*.

Propr. "preni inter (la manojn)": F *entre* "inter", *prendre* "preni" (vd. tiujn). Kp semantike G *unternehmen* s.s.: *unter* "inter", *nehmen* "preni".

ENTUZIASM/O (f; RE): A *enthusi/asm* [-z-], F *-asme* [-z-], I(H) *-asmo* [I -z-], G *Enthusiasmus*, Po *entuz/jazm*, R *-iazm*. Ps-pf *en-*; ps-sf *-asm*. ¶ 1894 *entusiasm-*.

El Gr *enthousiasmós* "inspiro, ekstazo" de *enthousiázein* "esti inspirita (posedata) de dio", der. de *éntheos* "diinspirita, havanta dion en si": *en* "en" (vd. tiun), *theós* "dio" (vd. *teologio*).

ENU/I (f; Un): F *s'ennuyer* [ânyijé] (kp *ennui* "-o"), I *annoiarsi*. Kp A *ennui* (fremdvorto kun F prononco) "-o", (H *enojar* "-igi"). Z probable deiris de la F substantivo, kiu havas formon tre konvenan por Ea verbo. Senrefleksivigo analoga al tiu en *aboni* (vd. tiun). Ps-pf *en-*. – La semantika malakordo inter la gramatika parto kaj la vortaro en Un R, kiun notas PVZ 1b, 17 (gram. *enuo* "toska" = 'sopiro', vortaro *enu'* "skuĉat'" = 'enui') fontas en kroma senco de R *skuĉat'* (kun prep. *po* plus lok., dat. = 'sopiri je'). El Un R transiris la signifo 'sopiro' al la respondaj sekcioj en Un PoFG, kie ĝi aperas neeksplikebla. ¶ Io *enoyar*, Ie *enoyar se*, Ia *enoiar se*.

Orig. "ĉagreni, ĝeni", el L vulg. *inodiare* el *in* "en" (vd. tiun) k *odium* "malamo".

ENVI/I (f; Un): A *envy* [-i], F *envier*, I *invidiare*, (H *envidiar*). Bazita sur F kun forta apogo de A. Ellasante la etimologie motivitan *-d-* (kp L sube), Z evitis eventualan konfuzon kun la radiko *vid-*. Ps-pf *en-*. ¶ Io *envidiar*, IeIa *invidiar*.

Der. de la responda subst.: F *envi*, H *envidia*, I *invidia* el L *invidia* de *invidere* "envii", propr. "rigardi al (iu per malica okulo)": *in* "en; sur", *videre* "vidi" (vd. *en* resp. *vidi*).

EPIDEMI/O (1; RE): A *epidem/ic*, IPo(H) *-ia*, R *-ija*, F *épidémie*, G *Epidemie*. Ps-pf *epi-*; ps-sf *i* 1..

El Gr *epidêmía* s.s., propr. "alpopola (malsano)" de *epidêmios* "al-, en/popola" el *epí* "sur, al, en, ĉe; post" (par. al Sa *ápi* "ĉe; ankaŭ, eĉ", L *ob* "en la direkto al, kontraŭ" el HE **epi/opi*) k *dêmos* "popolo" (vd. *demokratio*).

EPIDERM/O (1; Jü): A(H) *epiderm/is*, I *-ide*, R *-a*, F *épiderme*; L med. *epiderm/is -idis*. Z utiligis la mallongan formon de FR. Ps-pf *epi-*. ¶ Io =, Ie *epiderm/a*, Ia *-is*.

El Gr *epiderm/ís -ídos* s.s. el *epí* "sur" (vd. *epidemio*) k *dér/ma -matos* "haŭto; felo" de *dérein* "senhaŭtigi"de HE rad. **der-* "disŝiri", kp Sa *drnáti* "krevas", A *tear* "ŝiri".

EPIFANI/O (2; Jü): A *Epiphan/y*, F *-ie*, G *-ias*, *-ienfest*, I *-ia*, (H *-ía*); L ekl. *epiphania*. Ps-pf *epi-*; (ps-sf *-i* 1). ¶ Io *epifani/o*, Ie *-e*, Ia *epiphania**.

El Gr *epipháneia* "apero" (la festo celebras la aperon de Kristo al la magoj) de *epiphanês* "videbla, aperanta" el *epiphaínein* "montri" (en medialo: "montriĝi"): *epí* "al" (vd. *epidemio*), *phaínein* "montri" (vd. *fantazio*).

EPIGRAF/O (1; Jü): A *epi/graph*, I *-grafe*, PoR *-graf*, F *épigraphe*. Kp G *Epigraphik* "-iko". Ps-pf *epi-*. ¶ Io =, Ie *epigraf*, Ia *epigraphe**.

El Gr *epigraphê* s.s., propr. "surskribo", el *epí* "sur" (vd. *epidemio*) k *graphê*, subst. de *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*). Etimologie kvazaŭ identa estas la sekva.

EPIGRAM/O (1; Be): APo *epigram*, IR *-ma*, (H *-a*), F *épigramme*, G *Epigramm*. Ps-pf *epi-*; ps-sf *-m(at)-*.

El Gr *epígramma* "surskribo" (orig. uzata pri mallongaj poemoj skribitaj sur monumentoj k.s.), subst. de *epigráphein* "surskribi": *epí* "sur" (vd. *epidemio*), *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*). Kp la antaŭan.

EPILEPSI/O (1; RE): A *epileps/y*, I(H) *-ia*, Po *-ja*, R *-ija*, F *épilepsie*, G *Epilepsie*; L med. *epilepsia*. Ps-pf *epi-*; ps-sf *-i* 1.

El Gr *epilêpsía* s.s., propr. "atako (de malsano)", subst. de *epilambánein* "ataki", propr. "kapti": *epí* "sur" (vd. *epidemio*), *lambánein* (rad. *lab-*) "preni" (kp *dilemo*, *silabo*).

EPILOG/O (1; Be): A *epi/logue* [-g], I *-logo*, PoR *-log*, F *épilogue* [-g], G *Epilog*, (H *epílogo*). Ps-pf *epi-*.

El Gr *epílogos* "fina parto (de parolado aŭ teatraĵo)": *epí* "post" (vd. *epidemio*), *lógos* "parolo" (vd. *logiko*).

EPISKOP/O (f; RE): A *bishop*, F *evêque*, G *Bischof*, I *vescovo*, Po *biskup*, R *episkop*, (H *obispo*); L *episcopus*. Kp A(H) *episcopal*, I *-e*, F *épiscopal* "-a". La adjektivo donas (kune kun LR) la bazon por la internacia formo. Ps-pf *epi-*. ¶ Io =, Ie *episcop*, Ia *-o*.

El Gr *epískopos* "inspektisto", agantnomo de *episkopeín* "inspekti": *epí* "al, en" (vd. *epidemio*), *skopeín* "rigardi" (vd. *mikroskopo*). Por la semantiko, kp *inspekti*.

EPITET/O (1; Be): A *epithet*, F *épithète*, G *Epitheton*, PoR *epitet*, I *-o*, (H *epíteto*); L *epitheton*. Ps-pf *epi-*.

El Gr *epítheton* "epiteto, adjektivo", propr. "aldonaĵo", subst.- igita verbadj. de *epitithénai* "aldoni, surmeti": *epí* "sur, al" (vd. *epidemio* G), *tithénai* "meti" (vd. *tezo*). Por la semantiko, kp *adjektivo*.

EPIZOD/O (1; Be): A *episod/e*, I(H) *-io* [I -z-], F *épisode* [-z-], G *Episode* [-z-], PoR *epizod*. Ps-pf *epi-*. ¶ Io =, Ie *episod/e*, Ia *-io*.

El Gr *epeisódion* "epizodo (parto de epopeo aŭ tragedio)", orig. "en-, inter/metaĵo" (la tragediaj epizodoj estis origine enmetaĵoj en la ĥorkantaron), propr. "io kio envenas apude" el *epí* "apud, ĉe" (vd. *epidemio*), *eis* "al, en" (vd. *en*) kaj derivaĵo de *hodós* "vojo" (vd. *metodo*).

EPOK/O (f; RE): A *epoch* [-k], F *époque* [-k], G *Epoche* [-k-], I(H) *epoca*, PoR *epoka*. Ps-pf *ep(i)-*. ¶ Io =, Ie *epoca*, Ia *epocha*.

El Gr *epokhê* "tempa fikspunkto", propr. "paŭzo, halto", de *epékhein* "haltigi", propr. "reteni": *epí* "sur, je" (vd. *epidemio*), *ékhein* "teni, havi" (vd. *skemo*; kp spec. *paroĥo*).

EPOLET/O (f; RE): A *epaulet* [-o-], F *épaulette* [-o-], G *Epaulette* [-o-], PoR *epolet*. Ps-sf *-et*. ¶ Io =, Ie *epolette*, Ia *epaulette*.

Der. de F *épaule* "ŝultro", kun proteza *e-* el L *spathula* "skapolo; ŝpateto" (> I *spalla* "ŝultro", el kiu *spallina* "epoleto"), dim. de *spatha* "ŝpato; spado" (vd. tiun).

EPOPE/O (1; Be): A *epopee*†, F *épopée*, G *Epopöe*†, I *epopea*, PoR *epopeja*, (H *epopeya*). Bazita sur F kun apogo de I(AG); eventuala radikfino *ej* estus neoportuna en Eo. Kp spec. eo *onomatopeo* (PV; Grabowski). ¶ Io *epika poemo*, Ie *epopé*, Ia *epopeia*.

El Gr *epopoiía* "epika poezio" el *épos* "vorto, (en pluralo:) epopeo" (vd. sub *voĉo*) k *poieín* "fari, krei" (vd. *poezio*). Kp AR *epos*, G *Epos* "epopeo" > eo *eposo* (Jü) "rakonta

poezio".

ERAR/I (f; Un): L *errare*, A *err*, G *irren*, I *errare*, (H *errar*). Kp AL *err/or*, F *-eur*, I *-ore* "-o". Rekta fonto estas la L infinitivo (vd. *diri* por aliaj ekzemploj de konservita infinitiva finaĵo). – La ankoraŭa (kaj origina) signifo "vagi" (A†FGHIL) enestis dekomence en la Ea radiko; ĝi estas specife indikita en Un RPo kaj restas ankoraŭ en UV sed aliflanke estas forigita jam en la 2a eldono de Un R. ¶ 1906a *erori*. ¶ Io *erorar*, IeIa *errar*.

Komuna origino de L k la ĝerm. vortoj estas HE rad. **ers-* "(mis)vagi", kp Sa *irasyáti* "koleras".

ERIK/O (2; Jü): L *erice* (L bot. *Erica*); I *erica*. Botanika termino prenita el L. ¶ Io =, IeIa *erica*.

El Gr *ereíkê* s.s. R *veresk*, Po *wrzos* s.s. povas esti praparencaj.

ERINAC/O (f; RE): L *erinaceus* (L zool. *E. europaeus*); F *hérisson*, I *riccio*, (H *erizo*). Zoologia termino prenita el L; la transpreno de la sufikso *-aceus* kiel *-ac-* estas paralela al la neoficiala botanika sufikso (L *Rosaceae* > eo *roz/ac/oj*). ¶ Io *herisono*; Ie *erinaceo*, Ia *ericio* (vd. sube).

L *erinaceus* havas kromformon *ericius* (el kiu la FHI formoj k A *urchin*†); ambaŭ estas der. de *(h)er* s.s., kp Gr *khêr* "erinaco". Kp. *hirta*.

ERIZIPEL/O (2; RE): L *erysipel/as -atis*; A *erysipelas*, F *érysipèle* [-z-], I *risipola* [-z-], (H *erisipela*). Medicina termino bazita sur L, apokopita laŭ F (alie en *pankreas/o* PV, *pankreat/o* PIV < L *pancre/as -atis*, kie tamen ankaŭ F havas *pancréas*). ¶ Io =, Ie *erisipel*, Ia *erysipela*.

El Gr *erysípel/as -atos* s.s., propr. "haŭtruĝiĝo"; la unua elemento apartenas al la vortfamilio de *erythrós* "ruĝa" (vd. tiun), la dua troviĝas en *pélma* "pland(um)o" (< ***"haŭto"), vd. *felo*.

ERMEN/O (f; RE): L zool. *Mustela erminea*; A *ermine*, F *hermine* [er-], G *Hermelin*, I *ermellino*, (H *armiño*). Bazita sur AF, apogata de scienca L. Vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti aspekton de virinsufiksa vorto (krome, **ermin/ino* estus neoportuna derivaĵo), vd. *abomeni*. ¶ Io *ermino*, Ie *hermeline*, Ia *armenio*.

Supozata ĝerm. origino (la G formo estas dim. de G ant. *harmo* "galputoro"); aŭ origine el L *(mus) Armenius* "armena muso" (ĉar tiuj bestoj abundis en Malgrandazio)?

ERMIT/O (f; RE): A *hermit*, F *ermite*, G *Eremit*, I *eremita*, (H *ermitaño*). Kp R *ermitaĵ* "ermitejo". Videble bazita sur F; la konsonantsekvo *-rm-* sen intera vokalo estas trovata en pluraj fontlingvoj. Ps-sf *-it* 2. ¶ Io *eremit/o*, Ie *-e*, Ia *-a*.

Pere de L ekl. *eremita* el Gr *eremítês* (adj.) "vivanta en dezerto", de *érêmos* "dezerta", eble par. al L *rarus* "malofta, rara".

EROTIK/A (3; Be): A *erot/ic*,G *-isch*, I *-ico*, Po *-yczny*, R *-iĉeskij*, F *érotique*, (H *erótico*). Eble la ekzisto de samelementa substantivo (A *erot/ic*, Po *-yk*, R *-ika*, G *Erotik* "erotiko") influis la formon. Ps-sf *-ik*.

El Gr *erôtikós* s.s. de *ér/ôs -ôtos* "am(or)o", kp *erán* "ami".

ERP/I (1; RE): I *erpicare*. Kp F *herser* [er-]. Bazita sur I kun apokopo de radikfina *ic*; kp la vortojn sub *atriplo*. ¶ Io *hers-agar*, Ie *hersar*, Ia *hirpicar*.

Der. de la resp. subst. (I *erpice*, F *herse*) el L *hirp/ex -icis*, kredeble de Oska *hirpus* "lupo" (la ilo estis origine farata el vulpodentoj).

ERUDICI/o (3; Wü): A *erudi/tion*,, I *-zione*, R *-cja*, (H *-ción*), F *érudition*, Po *erudycja*. Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-cio*. ¶ Io *eruditeso*, IeIa *erudition*.

El L *erudit/io -ionis* "erudicio, instruado", de *erudire* "instrui, klerigi", propr. "malkrudigi" el *e* "el, mal-" (vd. *el*) k *rudis* "kruda; neklera, necivilizita".

ERUPCI/O (3; Jü): A *erup/tion*, Po *-cja*, (H *-ción*), F *éruption*, G *Eruption*, I *eruzione*. Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-cio*.

El L *erupt/io -ionis* "subita eliro", propr. "elrompo", de *erumpere* "elfali, elataki": *e* "el", *rumpere* "rompi" (vd. tiujn).

ESCEPT/I (f; Un): A *except*, F *-er*, (H *-uar*), I *eccettuare*. Z deiris de la AF verbo, kiu baziĝas sur la L intensa formo (vd. sube). Radikkomence aperas speco de asimilado: *eks-* > *es-*, certe inspirita de I (kp la analogajn *esplori, esprimi, estingi*); la celo estis probable eviti tro komplikan konsonantkombinon [eksts] (kiu tamen ekzistas en *ekscelenco, eksceso, eksciti*). Ps-pf *e(k)s-*. ¶ Io *eceptar*, Ie *except/er*, Ia *-ar*.

El L *exceptare*, intensa formo de *excipere* "elpreni": *ex* "el" (vd. tiun), *capere* "preni" (vd. *kapti*).

ESENC/O (f; RE) 1) fil., 2) kem.: AF *ess/ence* (1,2), I *-enza* (1,2), R *-encija* (2), G *Essenz* [-ts] (2), Po *esencja* (1,2), (H *esencia* 1,2). Ps-sf *-enc.*

El L *essentia* "naturo, kvalito", propr. "est(ad)o" de *esse* "esti" (vd. tiun).

ESKADR/O (f; EG): A *squadron*, F *escadre*, G *Geschwader*, I *squadra*, PoR *eskadra*, (H *escuadra*). Militista termino bazita sur F, kies formo disvastiĝis al PoR; *e-* estas proteza antaŭ *s* plus (origine) duobla konsonanto. Estis necese diferencigi tiun ĉi radikon disde *skadr/o* (Silfer, PL 9/1984). ¶ Io =, Ie *escadre*, Ia *esquadra*.

Der. de I *squadrare* "kvadratigi" (do orig. pri grupo ordigita en kvadrata formacio), el L vulg. **exquadrare* el *ex* "el" (vd. tiun; tie ĉi kun faktitiva rolo) k *quadrus* "kvadrata" (vd. *kvar*). Etimologie identa estas *skadro.*

ESKAP/I (8; PV; ne uzita de Z): A *escape*, F *(s')échapper* (kp *escapade* "-o, fuĝo"), H *escapar(se)*, I *scappare*. ¶ Io *eskapar*, Ie *escapar*, Ia *escappar.*

El Romana **excappare*, el L *ex* "el" (vd. tiun) k L mez. *cappa* "mantelo" (do orig. "elvestiĝi"; kp semantike Gr *ekdyein* "senvestiĝi; eskapi").

ESKORT/I (2; Jü): A *escort*, F *-er*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, G *eskortieren*, I *scortare*, (H *escoltar*). ¶ Io *eskort-esar*, IeIa *escortar.*

La F formo, kiu disvastiĝis en plurajn alian lingvojn, estas pruntita (kun proteza *e-*) el I, der. de *scorta* "-o" de *scorgere* "gvidi" el L vulg. **excorrigere*: *ex* "el" (intensiga pref.; vd. *el*), *corrigere* "korekti, gvidi" (vd. *korekti* k plue *regi*).

ESPER/I (f; Un Po; Un R *sper-*): F *espérer*, I *sperare*, (H *esperar*); L *sperare*. La radiko estas krome konata per derivaĵoj en aliaj lingvoj, ekz. A *despair* "malesperi", G *desperat* "ekster si de malespero". Bazita sur F; Z evidente hezitis inter la franca kaj la latin-itala formoj: 1882 *sper-* (*Dum mo es speré* 'dum mi ankoraŭ esperas' 10:25); 1887 Un R vortaro *sper'* (sed *pri l'espero...doloroj kaj esperoj...en espero* en "Mia penso", Un R p. 21-22); Un Po ktp *esper-*; 1906, 1907 *sper-*. Ĉiuokaze la intencita formo en 1887 estis *esper-*, videbla ankaŭ en la aŭtora pseŭdonimo (Un R ktp) *Dro Esperanto.* Ne estas klare, kial Z definitive preferis la formon kun proteza *e-*; oni pensis pri plibelsoneco (PVZ 1b, 18; Golden, PL 11/1984), pri rimedo doni pli da emfazo al la vorto (Piron, samloke). Silfer (PL 9/1984) lanĉis la hipotezon, ke la origino de *esper-* estas serĉenda en Gr *ésperos* (envere *hésperos*) "vespera stelo; okcidento"; tio donus novan interpreton al la aŭtorpseŭdonimo, kiu signifus '(doktoro) okcidenta' aŭ eĉ '(doktoro) transiranta (al nova vivo)' (ĉar okcidente sin trovis la ĝardeno de la Hesperidinoj, simbolanta transiron al la morto). Prave tiu hipotezo estas refutita de Piron kaj Golden (l.c.: ĝi ne klarigas la mankon de *h-*; ekzistas nenia ligo inter la Gr vorto kaj la nocio 'esperi'); ili defendas la evidentan tradician etimologion. Estas konstateble, ke Z foje preferis francan formon, eĉ kiam latina estus pli internacia. Piron

mencias i.a. *ĉevalo* kaj *etendi* anstataŭ **kavalo* resp. **ekstendi.* Oni povus aldoni *ĵeti* anst. **jekti, kajero* anst. **kvaderno, neĝo* anst. **nivo.* – Pri la lingvonomo *Esperant/o,* vd. sekv. ¶ Vp *spelön,* Iole *esperar,* Ia *sperar.*

Der. de L *spes* "espero", eble par. al *spatium* "spaco" (vd. tiun; kp spec. *prosperi*).

ESPERANT/O (7): La lingvo nomiĝas laŭ la pseŭdonimo de ĝia aŭtoro, *Dro Esperanto* (Un). La transiro de la persono al la lingvo estas priskribita jene de Z (*La E-isto* 1890, p.60; OV p.86; PVZ 2, 142): "...la nomo de nia lingvo ne estas elpensita, kaj jen estas ĝia historio: Eldonante la unuan lernolibron de nia lingvo, mi prenis por mi la pseŭdonimon: ‚Esperanto'; la lingvo mem havis nenian propran nomon kaj estis nomata ‚la lingvo internacia proponita de Esperanto'. Pro oportuneco oni komencis uzadi la esprimon ‚lingvo de Esperanto' (die Esperanto-Sprache); aliaj esprimoj, kiujn kelkaj provis uzadi (ekzemple ‚la lingvo internacia', ‚la internacia'), montris sin ne oportunaj kaj ne enfortikiĝis, ĉar ili estis ne bone elparoleblaj, ne memoreblaj por la publiko kaj prezentis nenion difinitan...multaj amikoj komencis baldaŭ en siaj leteroj aŭ artikoloj uzadi simple la solan vorton ‚Esperanto', ekzemple ‚la afero Esperanto', ‚skribi en Esperanto', k.s. Tiel iom post iom ellaboriĝis unuvorta nomo de nia lingvo." Do laŭ Z la nomon iniciatis la uzantoj. Tamen (laŭ PVZ 1b, 237) la venkonta lingvonomo aperas unuafoje en poŝtkarto de Z al Majnov 1889-06-21:"Kolekto da novaj verkoj en la lingvo Esperanto" (PVZ 2, 41). En presita formo ĝia unua apero ŝajnas esti N-ro 1 de *La E-isto,* sept. 1889 (subtitolo: "Gazeto de la amikoj de la lingvo Esperanto"). La vorto *esperantisto,* kiu implicas la nomon *Esperanto,* aperas unue en letero de Z al Majnov de nekonata dato (sed ĉiuokaze antaŭ julio) en la jaro 1889: "Kelkajn adresojn de esperantistoj donos al vi sinjoro E. de Wahl" (PVZ 2, 35). – En ruslingva kunteksto Z uzis la esprimon "VSEMIRNYJ JAZYK ESPERANTO" (tutmonda lingvo E.) jam en nov. 1888 (anonco en *Niva*: Holzhaus 1969, 76; PVZ 2, 23). Antaŭaj nomoj: Z nomis Du (jan. 1888) "Dua libro de l'lingvo internacia" (PVZ 1, 43). Analoge Einstein (sept. 1888) nomis verkon "La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems" (N-ro 15 en la Z-a librolisto). Letero de Einstein estas citita en *La E-isto* 1889, p. 50: "en la ‚Internacia', la unua parto kaj la dua estas solvitaj tre bone" (OV p. 70; PVZ 2, 114). Adepto de la lingvo internacia estis nomata *internaciisto* (Z en Antaŭparolo al la Dua libro: OV p. 29; PVZ 1, 55). Nomon survoje al la definitiva reprezentas "Nomaro de l'verkoj pri la lingvo internacia (Esperanta), kiuj eliris ĝis Januaro 1889" (Ald, 2a eld.: PVZ 1, 104.). Laŭ tiuj datoj oni do povas supozi, ke la nomŝanĝo komenciĝis en la unua duono de la jaro 1889 kaj ke Z, eĉ se la inspiro venis de la uzantoj de la lingvo (kio ne estas konfirmebla per atestoj), volonte adoptis la novan nomon, tuj ekuzante ĝin. – Laŭ Kuznecov (Revuo *Esperanto* 2/1990, p. 35) la alinomiĝo okazis pro rusa misprononco: "la nominativo 'Esperanto' sonas tute same kiel genitivo 'de Esperanto', kaj la vortkombino 'lingvo de (Doktoro) Esperanto' povas esti (kaj estis!) facile miskomprenata kiel 'lingvo (nomiĝanta) Esperanto'".

ESPLOR/I (f; RE): A *explor/e,* F *-er,* (H *-ar*), I *esplorare;* L *explorare.* Radikkomenco laŭ I, apenaŭ por eviti prononcajn malfacilaĵojn (ja ekzistas *eksplodi, ekspluati*), pli probable ĉar troviĝas aliaj radikoj *eks, plor.* Ps-pf *e(k)s-* (sama

varianto en *escepti, esprimi, estingi*). ¶ IoIeIa *explorar.*

Orig. ĉasista termino, signifanta "elkrii" (t.e. "per krio elvoki [la ĉasaĵon]"): L *ex* "el", *plorare* "krii" (vd. *el* resp. *plori*).

ESPRIM/I (f; Un): A *express*, F *exprimer*, I *esprimere*, (H *expresar*); L *exprimere*. Kp R *ekspressija* "-o". Vorto kun duobla radikformo en L. La supina radiko *express-* alprenis en modernaj lingvoj specialigitan sencon (> Eo *ekspres-*); restis por la origina senco la prezenca radiko *exprim-*. La Ea formo havas komencon *es-* laŭ I (kiel en *escepti, esplori, estingi*) sen evidenta kialo. Ps-pf *e(k)s-*. ¶ Io *expresar*, Ie *expresser*, Ia *exprimer.*

Propr. "elpremi": L *ex* "el", *premere* "premi" (vd. tiujn). Kp semantike G *ausdrücken* s.s., propr. "elpremi".

EST/I (f; Un): L *est* "-as" (kp *esse* "-i"); F *est* "-as" (kp *être* "-i"), I *essere* "-i", (H *es* "-as", kp *estar* "-i"). Kp ank. A *is* "-as", G *ist* "-as"; Po *jest*, R *est'* "ekzistas". Bazita sur la triapersona singulara L formo, kiu havas facile rekoneblajn paralelajn formojn en ĝermanaj kaj slavaj lingvoj. La demando, kial Z ne preferis la nuran bazon *es-*, ne havas certan respondon; eble li timis troan similecon al sufikso *ec-* (*eco* : **eso*). – La triapersona L *-t* ankaŭ en *debeto, deficito, konstati.* ¶ 1878 *está* "-as"; 1881 *esti*; 1906ab *i* (nura verba signo). ¶ Io *esar*, IeIa *esser.*

El HE **es-ti* "(li/ŝi) estas", kp Sa *ásti* "(li/ŝi) estas"; Gr *estí* "(li/ŝi) estas". Parencaj vortoj en Eo: *esenco, interesi.* – H *estar* ne estas parenca; ĝi signifas orig. "stari" (> "troviĝi").

ESTABL/I (4; EG): A *establish*, F *établir*, I *stabilire*, (H *establecer*). Kp G *Etablissement*† "-aĵo". Ŝajnas bazita sur A, kvankam la F formo fakte havas iom pli grandan disvastiĝon (krom G ankaŭ ekz. Nd kaj Sv). ¶ Io *establisar*, Ie *etablisser*, Ia *establir, stabilir.*

Latinida vorto kun proteza *e-* el L *stabilire* "firmigi" de *stabilis* "firma" (> eo *stabil/a* PV) de *stare* "stari" (vd. tiun).

ESTETIK/O (1; RE): A *aesthetics*, F *esthétique*, G *Ästhetik*, I *estet/ica*, Po *-yka*, R *-ika*, (H *estética*). Ps-sf *-ik.*

Kreita (en L formo *aesthetica* de Baumgarten, 18a jc; vd. Collinson 1961, 93) el Gr *aisthêtikós* "sentema, perceptiva" de *aísthêsis* "percept(ad)o" de *aisthánesthai* (bazo *aisth-*) "percepti, senti, rimarki", probable prapar. al L *audire* "aŭdi" (kp tiun).

ESTIM/I (f; Un): A *esteem* [-í:m], F *estim/er*, (H *-ar*), I *stimare.* ¶ IoIeIa *estimar.*

El L *aestimare* "taksi", kies unua elemento probable estas *aes* (gen.: *aeris*) "bronzo, kupro", kp Sa *áyas* "metalo, fero", G *Erz* "erco, bronzo" (HE **ajos* "metalo"); la dua elemento restas obskura.

ESTING/I (f; Un): A *exstingu/ish*, (H *-ir*), F *éteindre* (kp *extinction* "-o"), I *estinguere*; L *ex(s)tinguere.* Radikfino evidente farita analogie laŭ *distingi*; ĉu tiu vorto ludis rolon ankaŭ ĉe la radikkomenco, inspirante al laŭitala *est-*? (Kp *escepti, esplori, esprimi.*) La ekzemplo de *ekstermi* montras, ke supozataj prononcaj malfacilaĵoj ne sufiĉas kiel klarigo. Ps-pf *e(k)s-*. ¶ Io *extingar*, Ie *extinter*, Ia *extinguer.*

Propr. "forpiki [fajron]": L *ex* "for, el" (vd. *el*) k *stinguere* "piki" (vd. *instigi*; kp spec. *distingi*).

ESTON/O (8; Wü; *Est/a* La E-isto 1893): A *Esthonian*, F *Estonien*, G *Este*, I *eston/e*, R *-ec*, (H *-io, -iano*), Po *Eston'czyk.* ¶ IoIa *Estoniano*, Ie *e-.*

El L mez. *Esthon/es* "-oj", *-ia* "-ujo". La popolnomo *Aestii* aperas jam ĉe Tacito (1a jc p.K.) kun probabla signifo "baltoj"; eble de ĝerm. origino.

ESTRAD/O (1; Be): AF *estrad/e*, PoR *-a*, (H *-o*), G *Estrade.*

Latinida vorto kun proteza *e-* el L *stratum*, propr. "(io) sternita", part. perf. de *sternere* "sterni" (vd. tiun, kp spec. *strato*).

EŜAFOD/O (f; RE): A *scaffold*, F *échafaud* [eŝafó], G *Schafott* [ŝ-], Po *szafot* [ŝ-], R *eŝafot*. Bazita sur F kun apogo de R. ¶ 1894 *ecafod-*. ¶ Io *eshafodo*, Ie *scafote*, Ia *scafolt*.

F vorto, orig. "stablo", bazita sur F ant. *chafaud*, responda al I *catafalco* (vd. plue *katafalko*); la komenco de la F vorto laŭ *échasse* "stilzo; lignostango†".

ETAĜ/O (f; Un): F *étage* [-ĵ], G *Etage* [-ĵe], R *etaĵ*. Ps-sf *aĝ*. ¶ 1894 *etag-*. ¶ Io *etajo*, IeIa *etage*.

F vorto, orig. "restad(ej)o", kun proteza *e-* el L vulg. **staticum* (resp. al L klas. *statio* "restado") de *stare* "resti, stari" (vd. *stari*).

ETAP/O (8; Wü; ne uzita de Z): F *étape*, G *Etappe*, I *tappa*, PoR *etap*, (H *etapa*). ¶ Io =, Ie *etape*, Ia *etap/a*, -e**.

Pere de F ant. *estaple* "deponejo, magazeno" (semantika evoluo: > "provizejo por pasantaj trupoj" > "haltejo de trupoj") kun proteza *e-* el Nd mez. *stapel* "deponejo" (kp G *Stapel* > eo *stapl/o* EG "vartenejo").

ETAT/O (f; RE): F *état*, G *Etat*, Po *etat*. Kp I *stato*, R *ŝtat(y)*. ¶ Io =, Ie *etate*; mankas en Ia.

F vorto kun orig. signifo "rango, pozicio" (> "listo pri oficistoj de certa rango"), kun proteza *e-* el L *status* "pozicio, stato". Etimologie identa kun *stato* k *ŝtato* (triĝemela radiko; vd. Szerdahelyi 1987, 130), vd. tiujn.

ETEND/I (f; RE): A *extend*, F *étendre*, I *stendere*, (H *extender*); L *extendere*. La laŭfranca formo estis elektita supozeble por malebligi eraran analizon (*eks, tend*); oni povas kompari la laŭitalan *esplori* (pro *eks, plor*). Ps-pf *e(ks)-*. ¶ Io *extensar*, IeIa *extender*.

El L *ex* "el" (vd. tiun) k *tendere* "streĉi" (supinaj radikoj: *tent-*, *tens-*) de HE rad. **ten-* "streĉi", kp Sa *tanóti* "streĉas"; Gr *teínein* "streĉi" (kp eo *hipotenuzo*), *tónos* "streĉo" (kp *tono*); L *tenere* "teni" (kp tiun, kun parencoj); G *dehnen* "etendi"; R *tjanut'* "etendi, streĉi". Parencaj vortoj en Eo: *atendi, atenta, intenco, intensa, standardo, tendo, tendeno, tendenco, tenio, tetano, tenoro*.

ETER/O (f; Du, Be) 1) beletr., 2) fiz., 3) kem.: A *ether*, F *éther*, G *Äther*, I *etere*, Po *eter*, R *efir*, (H *éter*) (ĉiuj 1,2,3). ¶ Io = (1,2,3), Ie *etere* (3, ank. 1,2?), Ia *ethere* (1,2,3).

Pere de L *aether* el Gr *aithêr* "(pura) aero, (serena) ĉielo", de *aíthein* "bruligi; lumi" el HE rad. **aidh-* "bruli, lumi", kp Sa *édha-* "hejtligno"; L *aedes* "fajrujo; domo" (kp *edifi*), *aestas* "somero". Kp ank. *etiopo*. – Kiel kemia termino la vorto estis ekuzata de la germano Frobenius (1730).

ETERN/A (f; Un): A *etern/al*, I(H) *-o*, F *éternel*; L *aeternus*. Bazita sur LI. ¶ Io =, Ie *etern/i*, Ia *-e*.

De L *aevum* "aĝo, epoko" (vd. *aĝo*).

ETIK/O (1; RE): A *ethics*, F *éthique*, G *Ethik*, I *et/ica*, Po *-yka*, R *-ika*, (H *ética*). Ps-sf *-ik*.

El Gr *êthik/ê, -ón* s.s., subst.-igita adj. de *êthos* "moro", vorto paralela al *éthos* "kutimo" (ambaŭ el **swethos*), par. al Sa *svadhâ* "kutimo, karaktero", L *(con)suescere* "alkutimiĝi", *consuetudo* "kutimo" (kp tiun), G *Sitte* "moro". La HE radiko estas probable tiu de la refleksiva pronomo **sŭe* "si" (orig. signifo de la cititaj subst. do "proprajo"). Vd. *si*.

ETIKET/O (3; RE; ank. *etiked/o* 1 PV) 1) ceremoniaro, 2) karteto: A *etiquette* [-k-] (1), F *étiquette* [-k-] (1,2), G *Etikette* (1,2), I *etichetta* [-k-] (1,2), Po *etykieta* (1,2), R *etiket* (1), *etiketka* (2), (H *etiqueta* [-k-] 1,2). Kp A *ticket* "bileto; (papera) peceto". Ps-sf *-et*. ¶ Io = (2), *ceremoniaro* (1), Ie *etiquett/e*, Ia *-a* (1,2).

Orig. "alnajlita karteto" (semantika evoluo: > "listo pri la rango de korteganoj" > "[kortega] ceremoniaro"), de F ant. *estiquer* "alfiksi, alnajli", kun proteza *e-* el Nd *stikken* "najli, piki", kp G *stechen* "piki" (vd. sub *instigi*).

ETIMOLOG/O (7; Wü; antaŭe *etimo-*

logi/ist/o): A *etymologist*, F *étymologiste*, G *Etymolog*, I *etimolog/o*, *-ista*, Po *etymolog*, R *etimolog*, (H *etimólogo*). Formita laŭ la responda sciencnomo: **ETIMOLOGI/O** (2; RE): A *etymo/logy*, Po *-logia*, F *étymologie*, G *Etymologie*, I *etimo/logia*, R *-logija*, (H *-logía*); L *etymologia*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *etymo/lógos* resp. *-logía* s.s. La unua elemento estas *étymon* "la vera senco de vorto laŭ ĝia origino", subst.-igita formo de *étymos* "vera, reala", kies bazo *et-* supozeble devenas de HE adj. de rad. **es-* "esti"; por la signifo, kp Sa *sátya-* "vera", propr. "esta". Por la dua elemento, kp *arkeolog(i)o*.

ETIOLOG/O (7; PIV): Formita laŭ la sciencnomo; la supozata ekvivalento en la fontlingvoj estas apenaŭ uzata (kp tamen I *eziologo* Broccatelli). – Sciencnomo: **ETIOLOGI/O** (1; Be): A *aetiology*, *e-*, F *étiologie*, G *Ätiologie*, I *eziologia*, Po *etio/logia*, R *-logija*, (H *-logía*). Ps-sf *-i* 1.

El Gr *aitiología* "esplorado de kaŭzoj" el *aitía* "kaŭzo; akuzo; kulpo" de *aítios* "kulpa, respondeca" (eble orig. "komplica, parto- prenanta [en io]"; tiuokaze par. al la radiko citita sub *dieto*) k *-logía* "esplorado" (kp *arkeologio*).

ETIOP/O (8; Jü): A *Ethiopian*, F *Éthiopien*, G *Äthiopier*, I(H) *etiope*, R *efiop*. ¶ Io *Etiopiano*, Ie *etiopian(o)*, Ia *ethiope*.

El Gr *Aithíôps* s.s., propr. "kun bruligita vizaĝo" (aludanta la malhelan haŭtkoloron de la etiopoj), el *aíthein* "bruligi" (vd. *etero*) k *ôps* "vizaĝo" (vd. sub *optiko*).

ETNOGRAF/O (7; Wü; antaŭe *etnografi/ist/o*): A *ethnographer*, F *éthnographe*, G *Ethnograph*, I *etno/grafo*, PoR *-graf*, (H *etnógrafo*). – Sciencnomo: **ETNOGRAFI/O** (2; Be): A *ethnography*, F *éthnographie*, G *Ethnographie*, IPo *etno/grafia*, R *-grafija*, (H *-grafía*). Ps-sf *-i* 1.

Termino signifanta "popolpriskribo", farita (19a jc) el Gr *éthnos* "popolo, gento" (eble orig. "la propra [gento]" de HE refleksiva rad. **sŭe*, vd. *si*) k *-graphía* de *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*). Sciencistnomo (19a jc) farita laŭ modelo de *geograf-* k.a.

EŬKARISTI/O (2; Be): A *Eucharist*, G *-ie*, F *eucarist/ie*, I *-ia*, (H *-ía*) (ĉiuj [-k-]), Po *eucharystia*, R *evħaristija*; L ekl. *eucharistia*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *eukharistía* "dankdono, dankemo" de *eukháristos* "dankema" el *eu* "bone" (vd. *evangelio*) k *kharízesthai* "favori" de *kháris* "favoro, graco", kp *khaírein* "ĝoji". De HE rad. **gher-* "deziri"; kp Sa *háryati* "ŝatas"; L *hortari* "instigi"; A *yearn* "sopiri", G *gern* "volonte", *gierig* "avida".

EŬNUK/O (2; RE): APo *eun/uch* [-k], F *-uque* [-k], I(H) *-uco*, G *Eunuch* [-k], R *evnuk*. ¶ Io *eun/uko*, Ie *-uc*, Ia *-ucho*.

El Gr *eunoúkhos* s.s., propr. "litgardanto", de *eunê* "lito" k *-okhos*, agantnomo de *ékhein* "havi, teni" (vd. *skemo*).

EŬROP/O (f,7; Du, Be): AF *Europ/e*, GIPo(H) *-a*, R *Evropa*; L *Europa*. ¶ IoIeIa *Europa*.

El Gr *Eurôpê* s.s. (unue pri la kontinenta parto de Grekujo; ankaŭ nomo de princino en la greka mitologio). Oni ne povas ekskludi grekan originon, sed ofte oni konsideris semidan: kp. Asiria *êrêb* "(sun)subiro" (kp la ev. analogan *Azio*).

EVANGELI/O (1; Be): F *évangile*, G *Evangelium*, I *vangelo*, Po *ewangelia*, R *evangelie*, (H *evangelio*); L ekl. *evangelium*. Kp A *evangelical* "-a". Pri la vortfino *-i/o*, kp sub *idilio*.

El Gr *euangélion* "bona mesaĝo" (en Nova Testamento pri tio, kion predikis Jesuo) el *eu* "bone" (= *eŭ-* en *eŭkaristio*) de adj. *eys* "bona", kp ev. Sa *vásu-* "bona") k *ángelos* "sendito" (vd. *anĝelo*).

EVENT/O (8; Grabowski, PV; ne ĉe Z): A *event*, I(H) *-o*; L *eventus*. Kp F *événement* s.s. Ps-pf *e(ks)-*. ¶ IoIa =, Ie *eventu*.

De L *evenire* "okazi", propr. "elveni (kiel rezulto)": *e* "el", *venire* "veni" (vd. tiujn).

Kp spec. sekv. k *advento.*

EVENTUAL/A (1; Jü): F *éventu/el* (kp. *-alité* "-aĵo"), G *eventuell* (kp. *Eventualität* "-aĵo"), I *eventu/ale,* (H *-al*), Po *ewentualny.* Kp A *eventuality* "-aĵo". Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-al.* ¶ Io =, IeIa *eventual.*

Propr. "(en)okaza", de L *eventus* "evento, okazo" (vd. *evento*).

EVIDENT/A (1; Be): A *evident,* I(H) *-e,* F *évident;* L *evid/ens -entis.* Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-ent.* ¶ Io =, Ie *evident,* Ia *-e.*

Kreita de Cicerono, propr. proks. "klare videbla", el L *e* "el" k *videre* "vidi" (vd. tiujn); por la signifo, kp L *elucens* "klara", propr. "el-luma".

EVIT/I (f; RE): F *éviter,* I *evit/are,* (H *-ar*); L *evitare.* Ps-pf *e(ks)-.* ¶ IoIeIa *evitar.*

De L *e* "el" (vd. tiun) k *vitare* "eviti".

EVOLU/I (2; Wü): A *evolve,* F *évoluer,* Po *ewoluowac',* (H *evolucionar*). Ŝajnas bazita sur F kun apogo de Po; pli ĝuste tamen oni rigardu tiun ĉi radikon kreita per mallongigo de la sekva. Ps-pf *e(ks)-.* – **EVOLUCI/O** (3; Be): A *evolu/tion,* I *-zione,* (H *-ción*), F *évolution,* G *Evolution,* Po *ewolucja,* R *evoljucija.* Laŭ Z, *evoluo* kaj *evolucio* estas duoblaj formoj intertempe toleratoj (vd. PIV sub la lasta). Ps-pf *e(ks)-*; ps-sf *-cio.* ¶ Io *developar* "evoluigi" (< A *develop,* F *développer,* I *sviluppare*), *develop(ad)o* "evoluo" (kp *evoluciono* "evoluado laŭ evoluisma senco"); Ie *developar, evoluer* "evoluigi" kun subst. *developation, evolution;* Ia *disveloppar, evolver* "evolu-(ig)i" kun subst. *disveloppamento, evolution.*

El L *evolut/io -ionis* "elvolv(ad)o" de *evolvere* "elvolvi": *e* "el", *volvere* "volvi" (vd. tiujn).

EZOFAG/O (1; Jü): A *oesophag/us,* F *-e* [F ez-], I *esofago* [-z-], (H *esófago*); L med. *oesophagus.* Eo *-z-* apogata de FI. ¶ Io =, Ie *eso/fag,* Ia *-phago.*

El Gr *oisophágos* s.s., propr. "portanto de manĝaĵoj", kp *oísein* "porti" k *phageín* "manĝi" (de HE rad. **bhag-* "disdoni", kp Sa *bhájati* "distribuas", R *bog* "dio", orig. "disdonanto")

EZOK/O (f; RE): L zool. *Esox lucius.* Scienca termino prenita el L. Eo *-z-* estas sen apogo en la fontlingvo; ĝi dependas de la ĝenerala tendenco voĉigi intervokalan s-sonon. Rilate la traktadon de la radikfino mankas ekzakta paralelo, sed oni povas kompari *limak/o* el L *limax, perdrik/o* el L *perdrix* (Szerdahelyi 1987, 120). ¶ 1894 *esok-.* ¶ IoIe(Ia*) *lucio.*

El L *es/ox -ocis* (Plinio), nomo de ia rejna fiŝo; la nomo estas de gaŭla origino, kp Ir *eo* "salmo".

F

FAB/O (f; RE): L *faba*; F *fève*, I *fava*, (H *haba*). Botanika termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *fab/e*, Ia *-a*.

El (H)E **bhabha*, kp R *bob* "fabo". La ev. praparenceco de A *bean*, G *Bohne* s.s. restas nepruvita.

FABEL/O (f; RE; kp *mir/rakont/o* Du): L *fabula* (ank. "fablo"); I *fiaba*. Kp A *fabul/ous*, F *-eux*, (H *-oso*), G *fabelhaft* "fabeleca". La responda substantivo en la fontlingvoj signifas "fablo, bestfabelo" (vd. sekv.); nur I evoluigis pli ĝeneralan sencon. Z diferencigis la du signifojn, traktante L *fabula* laŭ du diversaj manieroj (vd. plue sub *artikolo*): tiu ĉi radiko ricevis la formon de G *Fabel* "fablo" (aŭ eble de L *fabella* "fableto, fabeleto"); kp forme *cirkelo, sitelo, tabelo*. ¶ 1882 *mirk/o* (< G *Märchen*); 1894 *narat-* (< L *narratio* "rakonto"). ¶ Mankas en Io (oni uzas *rakonto*) kaj Ie (oni uzas *raconta*); Ia *conto* (< F *conte*).

Etimologie identa kun *fablo*, vd. tiun.

FABL/O (f; RE): AF *fable*, G *Fabel*, I *favola*, (H *fábula*); L *fabula*. Formo laŭ AF, diferencigita disde la ĝemela radiko *fabel-* (kp. tiun; analogaj radikformoj de la sama tipo estas *disĉiplo, kuniklo, miraklo*). ¶ Io =, Ie *fabul*, Ia *-a*.

Orig. "parolo" (semantika evoluo: > "rakonto" > "fablo"), der. de L *fari* "paroli" (vd. *famo*).

FABRIK/O (f; Du, RE): F *fabr/ique* [-ík], Po *-yka*, R *-ika*, G *Fabrik*, I *fabbrica*, (H *fábrica*). Kp A *fabricate* "-i". Ps-sf *-ik*. ¶ Io *fabrik-erio*, IeIa *fabrica*.

El L *fabrica* "laborejo" de *fab/er -ri* "manlaboristo, forĝisto". Parenca vorto en Eo: *forĝi*.

FAC/O (8; Wü; ne ĉe Z): AF *face*, H *faz*, I *faccia*. La radiko estis origine retrograda formaĵo el *faceto* (analizata kvazaŭ *fac/et/o*). ¶ Io *plan-ajo*, IeIa *facie*.

Latinida plursenca vorto (ank. "ekstero; vizaĝo") el L *facies* "aspekto, staturo; vizaĝo", orig. "formo, kreaĵo", de *facere* "formi, fari" (vd. *fari*). Kp spec. sekv.

FACET/O (f; RE): AR *facet*, F *-te*, (H *-a*), G *Facette*, I *faccetta*, Po *faseta*. Ps-sf *-et*. Retrograda formaĵo: *fac/o*, vd. tiun. ¶ Io =, Ie *facette*, Ia *facietta*.

Dim. de la vorto citita sub *faco*.

FACIL/A (f; Un): FI *facile*, (H *fácil*); L *facilis*. Ps-pf *-il*. Semantike, la Ea vorto estis influata de R *lëgkij* kaj Ji *laykht* (vd. Goninaz 1974, 39; Gold 1980, 324). ¶ 1882 *fal-* (sama etimo). ¶ Io =, IeIa *facil*.

Orig. "farebla", de L *facere* "fari" (vd. tiun).

FADEN/O (f; Un): G *Faden* [fá-]. La akcentŝanĝo havas analogojn en *ĝardeno* (G *Garten*), *haveno* (G *Hafen*), *posteno* (G *Posten*). Adopto de ĝermana radiko ĉar la romana ekvivalento (F *fil*, I

-o; L *filum*) estigus kolizion kun *fil/o* (Collinson 1959, 6). ¶ Ie *fil*, Ioꞌa *-o*.

Orig. signifo "klafto" (= A *fathom*; semantika evoluo en G: > "tiom da ŝnuro, kiom oni mezurante tenas inter la etenditaj brakoj" > "ŝnuro, fadeno"). La baza nocio de la vorto estas "etendo" (HE rad. **pet-* "etendi, malfaldi", vd. *patento*).

FAG/O (f; RE): L *fagus*; I *faggio*, (H *haya*). Kp ank. F *faîne* "fagofrukto" (kaj F slango *fayard* "fago": Waringhien 1946, 40). Botanika termino el L. ¶ Ioꞌeꞌa =.

El HE **bhagós* "fago", kp A *beech*, G *Buche* s.s. (kaj A *book*, G *Buch* "libro", orig. "fagoligno taŭga por enĉizado de runoj"); Gr *phêgós* "kverko"; R *buk* "fago".

FAGOT/O (4; ER): G *Fagott*, PoR *fagot*, I *-to*, (H *fagote*). ¶ Io *basono* (< A *bassoon*, F *basson*); Ie *fagott/e*, Ia *-o*.

Itala muzika termino, propr. "fasko" (eble aludante la du paralelajn tubojn kunigitajn).

FAJENC/O (f; RE): A *faience*, F *faïence*, G *Fayence*, PoR *fajans*. ¶ 1894 *fajenz-*. ¶ Io *fayenco*, Ie *fayance*, Ia *faience**.

El la nomo de itala urbo *Faenza*, kie tiu ceramiko unue estis fabrikata (16a jc.).

FAJF/I (f; Un): G *pfeifen* [pfajf-]. Kp Ji *fayfn*. Simpligita komencsono kiel en *flegi* (< G *pflegen*), *fusi* (< G *pfuschen*), tie ĉi eble inspirita de Ji (vd. diskuton ĉe Gold 1980, 315 s.), eble ankaŭ kun rigardo al A *fife* [faif] "fluti, ludi fifron" (kp Bastien). – G *ei* [ai] > Eo *aj* ankaŭ en *fajli*, *ŝajni*; kp *hejmo*. ¶ 1881 *fajf-*; 1894 *fif-*. ¶ Io *siflar*, Ie *sifflar* (< F *siffler*); Ia *sibilar* (< L *sibilare*).

El G mez. *pfifen*, orig. "pepi", vd. tiun.

FAJL/I (f; RE): A *file* [fail], G *feilen* [fail-]. Pri Eo *aj* el A *i*, vd. *fajro*; el G *ei*, vd. *fajfi*. – La responda latin(id)a radiko (LI *lim/are*, F *-er*, H *-ar*) kolizius kun Eo *lim-* (Collinson 1959, 8). ¶ 1894 *lim-*. ¶ Ioꞌeꞌa *limar*.

De la responda subst.: A *file*, G *Feile* "fajlilo" < pĜ **finhlô*, formita per instrumenta sufikso *-lo* (kp *ŝovelo*) el radiko kredeble par. al L *pingere* (vd. *pentri*).

FAJR/O (f; Un): A *fire* [faie'], G *Feuer*. Bazita sur A prononco (A *i* [ai] > Eo *aj* ankaŭ en *najtingalo*, *rajdi*, *rajto*); al la konservo de *r* eble kontribuis la G formo. Oni povas diveni la motivojn por prefero de ĝermana formo: L *ignis* estas nuntempe malpli konata, kaj formo bazita sur L *focus* (F *feu*, I *fuoco*) estis neebla pro homonimoj (Eo *fok/o*, *fokus/o*). ¶ 1882 *ign/o*; 1894 *fuok-*. ¶ Vp *fil*; Io *fairo* (espismo); Ie *foy*, Ia *foco*, *igne*.

El HE **peŭor* "fajro"; kp Gr *pyr* s.s. (kp *pirito*, *pirozo*), *pyrrós* "fajroruĝa" (kp *pirolo*).

FAK/O (f; EG) 1) dividaĵo de kesto, 2) brancо de scienco, profesio: G *Fach* [faɦ] (1,2), Po *fach* [faɦ] (2). Kp ank. Nd *vak*, Sv *fack* [fak] (1,2). Radikfina sonŝanĝo [ɦ] > [k] pro nekonata kialo (paralela estas *tuko* < G *Tuch* [tu:ɦ]; vd. Szerdahelyi 1987, 123). ¶ 1894 *partiment* (1) (kp A *compart/ment*, F *-iment*). ¶ Io *fako* (1,2) (espismo); Ie *compartiment* (1), *branche* (2); Ia *compartimento* (1), *branca* (2).

Senco n-ro 2 evoluis el n-ro 1; orig. signifo "kunmetaĵo": pĜ **faɦ-*, par. al Gr *pêgnynai* "fiksi" (HE rad. **pag-*, vd. *paco*).

FAKIR/O (2; Be): AFPoR *fakir*, G *Fakir*, I *fachiro* [-k-], (H *faquir* [-k-]). ¶ Io =, Ie *fakir*, Ia *fakir**.

El Ar *faqîr* "malriĉa" (la subst.-igo orig. signifis islamajn monaĥojn-almozistojn) de *faqara* "trabori; (kaŭz.) malriĉigi".

FAKSIMIL/O (1; Jü): AI(H) *facsimile*, F *fac-similé*, G *Faksimile*, Po *fak/symile*, R *-simile*. ¶ Io =, Ie *fac-simile*, Ia *facsimile*.

De L *fac simile* "faru [ĝin] simila": *facere* "fari", *similis* "simila" (vd. tiujn).

FAKT/O (1; N-ro 14 1888,RE): A *fact*, F *fait*, G *Faktum*, I *fatto*, PoR *fakt*, (H *hecho*). Kompreneble ankaŭ la L originformo (vd. sube) ludis rolon ĉe la fiksado de la radiko. ¶ Io =, Ie *fact/e*, Ia *-o*.

El L *factum* "faritaĵo", part. perf. de *facere*

"fari" (vd. tiun).

FAKTOR/O (2; RE) 1) kom., 2) mat., 3) kaŭzo: A *fact/or* (1,2,3), F *-eur* (2,3), (H *-or* 1,2,3), G *Faktor* (1,2,3), I *fattore* (1,2,3), Po *faktor* (1), R *faktor* (1,3). Ps-sf *-or* 1. ¶ Io = (2,3), Ie *factor* (2), Ia *factor* (1,2,3).

El L *factor* "tiu kiu faras" (1: persono kiu faras laboron; 2: la multiplikataj nombroj faras rezulton, kp semantike *koeficiento*, propr. "kun-efikanto"; 3: la kaŭzoj kune faras rezultaton), agantnomo de *facere* "fari" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

FAKTUR/O (f; RE): F *fact/ure*, (H *-ura*), G *Faktur*, I *fattura*, PoR *faktura*. Ps-sf *-ur*. ¶ Io =, IeIa *factura*.

Der. de la antaŭa (vd. *faktoro*) en ties senco n-ro 1 ("komerca agento").

FAKULTAT/O (1; RE): A *facul/ty*, F *-té*, (H *-tad*), G *Fakultät*, I *facoltà*, Po *fakultet*, R *fakul'tet*; L mez. *facul/tas, -tatis*. Ps-sf *-tat*.

Orig. "farebleco, kapableco" (semantika evoluo: > "sciado" > "scienca branĉo" > "fako de universitato"), der. de antikva formo de L *facilis* "farebla, facila" (vd. *facila* k plue *fari*).

FAL/I (f; Un): A *fall*, G *-en*. Kp ank. Nd *vallen* [f-], Sv *falla*. (Bastien citas ĉi-vorte F *défaillir* "ruinfali" kun HP ekvivalentoj kaj I *fallire* "fali en eraron", kies semantika rilato al tiu ĉi nocio estas tro fora por ke ili estu konsideritaj.) Pritraktita de Collinson 1959, 9, sen indiko de motivoj por la elekto; efektive Z la tutan tempon hezitis inter la ĝermana kaj la romanaj alternativoj (LI *cadere*, H *caer*, F *tomber*), kiel estas videble: 1878 *kad/ó* "falu"; 1881 *kad-*; 1887 Un R (vortaro) *tomb-* (ŝajnas esti senduba eraro, ĉar Un R p. 23 *tomb-* estas uzata kun sia posta signifo, samkiel en la vortaro de Un Po); 1894 *kad-*. ¶ Io *falar*, IeIa *cader*.

El pĜ **fallan* "fali", par. al Li *pùlti* s.s.

FALANG/O (2; Jü) 1) mil., 2) anat.: A *phal/anx* (1,2), *-ange* (2), F *-ange* (1,2), G *Phal/anx* (plur. *-angen*) (1), I(H) *falange* (1,2), PoR *falanga* (1); L *phal/anx -angis* (L klas. 1, L med. 2). ¶ Io = (1,2), Ie *falang/e* (2), *-ine*, *-ette* (1), Ia *phalange**.

El Gr *phál/anx -angos* (1,2), orig. "trabo, trunko" (la fingra falango estis komparata kun trunketo; la militista falango ricevis la saman nomon pro sia kompakteco), de HE rad. **bhel-* "ŝveli" (vd. *bulo*, kp spec. *planko*).

FALBAL/O (f; RE): A *furbelow*, G *Falbel*, FR *fal/bala*, I *-palà*, Po *-bana*, (H *-balá*). Moda termino bazita sur F. ¶ Io =; mankas en IeIa.

F vorto (kp Oc *farbello* "franĝo") de obskura origino.

FALĈ/I (f; RE): F *faucher*, I *falciare* [-ĉa-]; L *fal/x -cis* "-ilo". Eo *-ĉ-* laŭ modelo de I (kp *feĉo*) aŭ per nura cirkumfleksigo (kp *fianĉo*) por eviti **falc-* prononce tro similan al *fals-*. ¶ 1894 *falc-*. ¶ Io *falchar*, Ie *falc/ear*, Ia *-ar*.

La latinida verbo el L vulg. **falcare* de L *falx* "falĉilo". Kredeble parenca estas *falko*.

FALD/I (f; Un; dukateg. *-i/-o* laŭ OA 8): A *fold* "-i,-o", G *falten* "-i", *Falte* "-o", Po *fal'dowac'* "-i", *fal'd(a)* "-o". La Ea formo laŭŝajne estas miksita (*-a-* laŭ G, *-d* laŭ A), sed pli probable la Po formo ludis decidigan rolon. Ne estas klare, kial Z preferis la ĝermanan vorton al la romana alternativo (L *plicare*; F *plier*, H *plegar*, I *piegare*): vd. Collinson 1959, 9. ¶ 1894 *plik-*. ¶ Io *faldar* (espismo); IeIa *plicar*.

El pĜ **falth-* (kp Gt *falthan*), kp spec. Sa *put'a-* "faldo", de HE rad. **pel-* "faldi": Gr *diploús* "duobla" (kp. *diplomo*), *péplos* "virina mantelo"; L *plicare* "faldi" (kp. *im-*, *kom/-pliki*), *sim-plex* "simpla" (vd. tiun); G *Falte* ank. "sulketo" (> eo *falt/o* GE), *Zwei-fel* "dubo"; G ant. *valt-stuol* "faldebla seĝo" (> F *fauteuil* > eo *fotelo* Wü); vd. ank. *-obl* en la listo de sufiksoj.

FALK/O (f; RE): A *falc/on*, I *-o*, F *fau-*

con, G *Falke*, (H *halcón*); L *falc/o -onis*. GI kaj la L nominativo (L zool. *Falco*!) inspiris al adopto de formo sén fina *n*; analoge ĉe *drako*. ¶ Io *falkono*, IeIa *falcon*.

Kredeble der. de *fal/x -cis* "falĉilo" (vd. *falĉi*) pro la kurbaj ungoj kaj beko.

FALS/a (f; RE; dukateg. *-a/-i* laŭ OA 8): L *fals/us* "-a", *-are* "-i"; A *fals/e* "-a", *-ify* "-i", F *faux* "-a", *falsifier* "-i", G *falsch* "-a", *fälschen* "-i", I *fals/o* "-a", *-ificare* "-i", Po *fal'sz/ywy* "-a", *-owac'* "-i", R *fal'/šivyj* "-a", *-sificirovat'* "-i", (H *fals/o* "-a", *-ear*, *-ificar* "-i"). La rekta fonto de la radiko ŝajnas esti la adjektivo en ĝia L formo. ¶ Adj.: Io =, Ie *fals*, Ia *-e*. Verbo: Io *fals/igar*, IeIa *-ar*, *-ificar*.

L *falsus* orig. part. perf. de *fallere* "trompi", kp ev Gr *phêlós* "trompa".

FAM/O (f; RE): A *fam/e*, I(H) *-a*; L *fama*. Kp F *fameux* "-a". ¶ Io =, IeIa *fama*.

L *fama* estas paralela al Gr *phêmê* s.s., ambaŭ de HE rad. **bhâ-* "paroli" (do orig. "diratajo"); vd. *infano*.

FAMILI/O (f; Un): A *famil/y* [-i], F *-le*, R *-ija*, (H *-ia*), G *Familie*, I *famiglia* (akcento [famí-] en FGHIR, kiun Z klopodis konservi en la pra-Esperantaj formoj). Efektive, la L originformo *familia* (kiu tamen ne signifas "familio") certe havis decidigan rolon ĉe fiksado de la definitiva formo. ¶ 1878 *familj/e*; 1882 *famill/o*. ¶ Io =, Ie *famili/e*, Ia *-a*. - Adj.: **FAMILIAR/A** (2; Jü): A(H) *famili/ar*, F *-aire*, G *-är*, I *-are*, Po *-arny*, R *famil'jarnyj*. Ps-sf *-al*, var. *-ar*.

El L *familiaris* "familia, hejma" de *familia* "domanaro", orig. "servistaro", de *famulus* "servisto".

FANATIK/A (2; RE): A *fanat/ic*, F *-ique*, G *-isch*, I(H) *-ico*, Po *-yczny*, R *-ičnyj*, *-ičeskij* (kp PoR *fanatik* "-ulo"). Ps-sf *-ik*.

El L *fanaticus* "furioza; diinspirita", der. de *fanum* "templo" (el **fasnom*; la sama radiko troviĝas en kelkaj aliaj religiaj vortoj, ekz. L *feriae* "feriaj tagoj", vd. *ferio*, *foiro*, kaj *festus* "festa", vd. *fest/o*, *-eno*).

FAND/I (f; RE): F *fond/re*, I-*ere*, (H *fundir*); L *fundere*. Kp A *foundry* [faundri] "-ejo". La Ea *a*-vokalo ne havas apogon en la fontlingvoj. Radikformoj *fond-*, *fund-* havis aliajn signifojn; ankaŭ *fend-* estis bezonata por alia rolo. Evidente Z serĉis alian vokalon; ĉu li trovis ĝin en la prononco de A *foundry*? ¶ 1894 *fond-*. ¶ Io *gisar* (< G *giessen*); Ie *fuser*, Ia *funder*.

L *fundere* (supina rad.: *fus-*, kp *in-*, *kon-*, *ri/fuzi*) orig. "verŝi", de HE rad. **gheŭ-/ghu-* "verŝi", kp Sa *ju-hóti* "oferas, verŝas trinkoferon"; Gr *khein* "verŝi" (kp *ĥemio*); G *giessen* "verŝi; fandi".

FANFAR/O (2; Jü): AF *fanfar/e*, IPoR *-a*, G *Fanfare*. ¶ Io =, Ia *fanfar*, Ie *-e*.

F vorto onomatopea.

FANFARON/I (f; RE): F *fanfar/onner*, (H *-ronear*). Kp A *fanfaronade* "-ado", I *fanfarone* "-ulo". ¶ IoIeIa *fanfaronar*.

De H *fanfarrón* "-ulo", probable el Ar *farfâr* "babilema, nestabila", de onomatopea origino.

FANTAZI/O (1; Du, RE): A *fantasy*, *fancy*, F *fantaisie*, G *Phantasie*, I(H) *fant/asia*, Po *-azja*, R *-azija*. Eo *-z-*, atendata jam pro la intervokala pozicio havas apogon en la prononco de FGIPoR. Ps-sf *-i* 1. ¶ Io =, Ie *fantasie*, Ia *phantasia*.

El Gr *phantasía* "imag(pov)o", orig. "apero, vidaĵo", de *phantázein* "videbligi, prezenti", de *phantós* "videbla" de *phaín/ein* "montri", pas. "montriĝi" (radiko *phan-*, kp. *diafana*, *emfazo*, *fantomo*, *fazo*, *fenomeno*). HE rad. **bhâ-* "lumo", kp Sa *bhâ* "lumo", Gr *pháos* (*phôs*) "lumo" (kp *fosforo*, *fotografi*).

FANTOM/O (f; RE): A *phantom*, F *fantôme*, G *Phantom*, R *fantom*. Kp, kun alia sufikso, I(H) *fantasma* s.s. Ps-sf *m(at)-*. ¶ Io =, Ie *fantoma*, Ia *phantasma*.

F aliformigo (pere de **fantauma*) de Gr *phántasma* "aperaĵo, fantomo", de *phantá-*

zein "videbligi, prezenti" (vd. plue *fantazio*).

FAR/I (f; Un): F *faire* [fer], I *fare*, (H *hazer*); L *facere*. La Ea formo enkorpigas la latinidan infinitivan finaĵon *-r-* (paralela estas *diri*; s.t.v. troviĝas listo de aliaj analogaj formoj). Bazita sur I kun eventuala apogo de F (rim. tamen, ke F *faire* aperas kun e-vokalo en Eo *afero* < *affaire*). ¶ 1881 *fakt-* (el L supino, vd. sube). ¶ Io *facar*, Ie *far*, Ia *facer*.

L verbo (supina rad.: *fact-*; kunmetaj formoj *-ficere, -ficare*; agantnomo: *factor*) kun orig. signifo "meti" (probabla semantika evoluo ekz. "meti iun kiel reĝon" > "fari iun reĝo"). Parencaj vortoj en Eo: *afekti, afero, deficito, defekto, efekt/o, -iva, efiki, fac/o, -eto, facila, faksimilo, fakto, fakt/oro, -uro, fakultato, fasono, fetiĉo, infekti, konfekcio, konfiti, ofic/o, -iro, perfekta, prefekto, profito, sufiĉi*. De HE rad. **dhê-* "meti": Sa *dádhâti* "metas"; Gr *tithénai* "meti" (vd. *tezo*); A *do*, G *tun* "fari", G *Tat* "faro"; R *det'* "meti".

FARB/O (8; Ka; antaŭe *kolor/il/o* Jü): G *Farbe*. Kp Ji *farb*; ank. Da *farve*. Z, elektinte latin(id)an vorton por la ĝenerala signifo, utiligis la ĝermanan por specialigita senco (kiel ĉe *piedo* : *futo, vitro* : *glaso*, inverse *ciro* : *vakso*; utiligo de ambaŭ radikoj ankaŭ ĉe *devi* : *ŝuldi, lakto* : *melki, lito* : *bedo*). En tiu ĉi okazo influo de Io ne estas ekskludebla. ¶ Io =; IeIa *color*.

El pĜ **farhwa-* "kolora" de HE rad. **perk-* "bunta" (vd. *perko*).

FARING/O (f; RE): AF *phar/ynx* (kp A *-yngeal* "-a", F *-yngite* "-ito"), I(H) *faringe*. Efektive bazita sur la stemo de la Gr originvorto, vd. sube. ¶ Io =, Ie *faringe*, Ia *pharynge**.

El Gr *phár/ynx -y(n)gos* s.s., par. al L *frumen* s.s.

FARM/I (f; RE): A *farm* (ank. "-bieno"), F *affermer* (kp *ferme* "-o, -bieno"). Kp G *Farm*†, Po *farma*, R *ferma* "farmbieno". La A formo estas vaste konata internacie; cetere **ferm-* estus neebla pro alia signifo. ¶ Io *farmar*, Ie *afarmar*, Ia *ferma* "-bieno".

El F ant. *fermer* "kontrakti" el L *firmare* "konfirmi, certigi" de *firmus* "firma" (vd. tiun; kp spec. la etimologie identan *fermi*).

FARMACI/O (1; Be): A *pharmac/y*, F *-ie*, G *Pharmazie*, I(H) *farmac/ia*, Po *-ja*, R *-ija*. (Ps-sf *-i* 1.)

El Gr *pharmakeía* "uzado de medikamentoj" de *phármakon* "medikamento, kuracilo".

FARS/O (1; Jü): AF *farce* [-s], G *Farce* [-s-], R *fars*, IPo(H)*-a*. La skribo de IPoR kune kun la prononco de la ceteraj fontlingvoj rekomendas formon kun *s*. ¶ Io =, Ie *farse*, Ia *farsa, farce*.

F teatra termino el L vulg. **farsa*, subst. -igita part. perf. de L *farcire* "ŝtopi", do propr. "ŝtopita, enŝovita (en misterdramon)"; etimologie identa al eo *farĉ/o* ER (< F *farce*) "viando enmetita en legomon aŭ sim."; par. al L *frequ/ens -entis* "plena, multnombra; ofta", kp *frequentare* "ofte viziti" (> eo *frekventi* Wü).

FART/I (f; Un): Sen evidenta etimologio. Bastien s.v. citas A *farewell* "adiaŭ" (propr. "fartu bone") kaj la nur distance parencajn F *se porter* "farti", I *portarsi* "konduti" (ambaŭ propr. "sin porti"); se la intenco estas kredigi, ke la fina *-t* de la radiko *fart-* estas prenita el tiuj romanaj esprimoj, tio certe estas eraro. La klarigo de la formo prefere estu serĉata en la dua elemento de A *welfare* kaj spec. G *Wohlfahrt* "bonfarto, bonstato" (tiel Gerdman, La Espero 1951, p. 74; samopinie Collinson 1959, 10). Eventuale A *farewell* kontribuis al la radikelekto; tamen **far-* ja estis neebla pro *far/i*. Tro fantazia la klarigo de Berger 1947, 16, ke Z eliris de A *how do you do?* "kiel vi fartas?", tradukante *do* = Eo *far-* kaj aldonante *-t* por eviti radikkolizion. ¶ 1894 *kvale esten vue stato?*

"kiel vi fartas?"; 1906a *valtud/i* (< L *valetudo* "sanstato"); 1906b, 1907 *stat/i.* ¶ IoIe *standar* (kp G *Zustand* "stato"); Ia *sentir se* ("senti sin").

A *farewell* (kp Sv *farväl* s.s.), G *Wohlfahrt* enhavas derivaĵon de ĝerm. verbo (Gt *faran*) signifanta "vojaĝi, iri" (kaj sekundare "esti en certa stato"; semantika evoluo: "iri bone" > "farti bone") de HE rad. **per-/por-* "(tra)iri", kp Gr *poréuein* "vojaĝi". Vd. *porti.*

FARUN/O (f; RE): AI *farin/a,* F *-e,* (H *harina*); L *farina.*Vokalŝanĝo *i* > *u* en Eo (Waringhien LV 79) por eviti aspekton de vorto formita per sufikso *-in.* (Ne temas pri preseraro, vd. AdA II, 46.) Normale oni en tia okazo atendas ŝanĝon al *e;* vd. tamen sub *dungi.* Oni ne povas ekzakte determini la fonton de la ĉi-tiea *u*-vokalo. ¶ Io *farin/o,* Ie *-e,* Ia *-a.*

Der. de L *far -ris* "spelto (speco de tritiko)", par. al A *barley* "hordeo".

FASAD/O (1; Jü): AF *facade,* G *Fassade,* I *facciata,* R *fasad,* Po *-a,* (H *fachada*). Granda plimulto de la fontlingvoj prononcas [-s-] (AFGIPoR); tio rezultigas Ean formon similan al tiu de PoR. Iom analoga estas *fasono.* Ps-sf *-ad.* ¶ Io =, Ie *fassade,* Ia *faciada.*

Der. de F *face* "fronto, vizaĝo" (vd. *faco*).

FASK/O (f; RE): L *fascis* [-sk-]; F *faisceau,* I *fascio,* (H *haz*). La formo ŝajnas bazita sur L ekskluzive. Z uzis alian formon de la sama bazo en eo *fasĉin/o* Jü "barfasko el branĉetoj" (< AF *fascine,* G *Fascine,* I *fascina,* R *faŝina*); ankoraŭ alia (ne-Za) troviĝas en eo *faŝism/o* Wü (vd. sube). ¶ Io =, IeIa *fasce.*

El HE **bhasko-* s.s. (kp ekz. Ir *basc* "kolĉeno"). – La vortoj signifantaj *fasĉino* devenas de L *fascina,* der. de *fascis; faŝismo* el I *fascismo* [-ŝ-] de I *fascio* "fasko; garbo; (politika) grupo" (nomo donita de Mussolini al batalorganizo).

FASON/O (f; RE): A *fashion,* F *facon* [-s-], G *Fasson* (pli frue *Facon*), PoR *fason.* La prononco [-s-] en FGPoR donas Ean formon similan al PoR (kp *fasado*). ¶ Io =, Ie *fasson,* Ia *faction, fashion.*

F moda termino el L *fact/io -ionis* "fabrikado, far(manier)o", de *facere* "fari" (vd. tiun).

FAST/I (f; RE): A *fast,* G *-en.* Kp ank. Sv *fasta.* Z elektis ĝermanan radikon pro la malfacileco adapti I *digiunare,* H *ayunar* kaj F *jeûner* (laŭ Collinson 1959, 10). ¶ 1894 *jegun-* (< L *ieiunare; -g-* laŭ I?). ¶ Io *fastar* (espismo); Ie *caremar* (< F *Carême* "karesmo"); Ia *jejunar.*

Ĝerm. vorto (Gt *fastan*) orig. signifanta "firme stari, firme obei [regulon]", de adj. kun la senco "firma" (G *fest,* Sv *fast*).

FATAL/A (1; RE): AFG(H) *fatal,* I *-e,* Po *-ny,* R *-'nyj;* L *fatalis.* Ps-sf *-al.*

De L *fatum* "fatalo, sorto" (> eo *fat/o* ER), orig. "(orakola) eldiro" de *fari* "eldiri, paroli" (vd. *infano*; kp spec. *feo*).

FAŬK/O (f; RE): L *fauces* [-k-] (plur.); I *fauci* (plur.), (H *fauces,* plur.). Kvazaŭanatomia termino bazita sur L. ¶ Io *fauko,* Ie *fauc;* mankas en Ia.

L vorto malofte uzata en sing. (*faux*). Parenca vorto en Eo: *sufoki.*

FAV/O (f; RE): L med. *favus.* Medicina termino prenita el L. ¶ IoIa *favo;* mankas en Ie.

El L *favus* "mielkuko" ('pro la dubeflavaj krustoj de la favo', Bastien s.v.).

FAVOR/o (f; RE): A *fav/our,* F *-eur* (kp AF *favorable* "-a"), I *-ore,* (H *-or*); L *favor.* La radiko estas krome konata per internacia derivaĵo signifanta "favorato" (ekz. G *Favorit,* Po *faworyt,* R *favorit*). Ps-sf *-or* 2. ¶ 1906a *favr-.*

De L *favere* "favori, akceli", ofte asociita kun *Faunus* "Faŭno" (dio de kampoj kaj gregoj).

FAZ/O (1; Jü): AF *phase* [-z], G *Phase,* I(H) *fase* [I -z-], PoR *faza.* Ps-sf *-z.*

El Gr *phásis* "aspekto, apero" de *phaínein* "montri, vidigi" (vd. *fantazio*).

FAZAN/O (f; RE): A *pheasant* [-z-], F, *faisan* [-z-], G *Fasan*, I *fagiano*, Po *baz'ant*, R *fazan*, (H *faisán*); L *phasianus*. GR ŝajnas esti la bazo de la Ea formo (kun apogo de F). Ps-sf *-an*. ¶ Io =, Ie *fasane*, Ia *faisan*.

El Gr *phasianós* s.s., propr. "(birdo) de la rivero Phasis" (en Kolĥido, oriente de Nigra Maro).

FAZEOL/O (1; Be): L *phaseolus*; F (fam.) *fayot*, I *fagiolo*, R *fasol*, Po *fasola*. Vorto krome tre disvastigita en mediteraneaj lingvoj (vd. Waringhien 1946, 40), kp Rm *fasol*, Gr mod. *fasóli*, Tu *fasulya*, Ar *fasûlja*. La Ea formo estas la latina (botanika termino); *-z-* povas esti klarigita nur per la tendenco voĉigi intervokalan s-sonon. ¶ Io =, Ie *faseol*, Ia *phaseolo**.

El Gr *phásêlos* s.s.

FE/O (f; *fe/in-* UV; *fein-* Be): A *fairy* "-ino", F *fée* "-ino", G *Fee* "-ino", I *fata* "-ino", R *feja* "-ino", (H *hada* "-ino"). En la fontlingvoj la vorto estas inseksa, kaj ankaŭ en Eo la unua formo uzata estas *fein/o* (vd. UV), el kiu *fe/o* estas formita kvazaŭ retrograde. Tiurilate tiu ĉi radiko estas unika: *edz-*, *fraŭl-* kaj *kuz-* estas nur ŝajne analogaj, ĉar ĉe tiuj radikoj la ne-inseksa formo estis uzata dekomence kaj paralele kun la inseksa. – Formo laŭ FG. ¶ Io *fe/o*, *-ino*; Ie *fea* "-ino", Ia *fee* "-ino".

El L vulg. *fata* "deino de l' fatalo" de L *fatum* "fatalo, sorto" (vd. *fatala*).

FEBR/O (f; RE): A *fever* (kp *febrile* "-a"), F *fièvre* (kp *fébrile* "-a"), G *Fieber*, I *febbre*, (H *fiebre*); L *febris*. La L originvorto estis la modelo por la Ea formo. ¶ Io =, IeIa *febre*.

Kredeble par. al L *fovere* "varmigi" (HE rad. **dhegŭh-* "bruli", vd. *tago*).

FEBRUAR/O (f; letero 1887-10-05, Du, RE): G *Februar*, A *-y*, F *février*, I *febbraio*, R *fevral'*, (H *febrero*); L *(mensis) Februarius*. Kiel por la aliaj monatnomoj, la L originvorto estis modelo por la Ea formo. Ps-sf *-ar(i)*. ¶ Io =, Ie *februar*, Ia *-io*.

Orig. signifo "(monato) de puriga ceremonio" de L *februa* "puriga ceremonio", kp *februare* "purigi".

FEĈ/O (f; EG): L *fae/x -cis*; I *feccia* [feĉa], (H *hez*). Pro *-ĉ-*, la bazo por la Ea radiko ŝajnas esti I (kp *ĉelo*, *ĉesi*, *ĉirkaŭ*, *falĉi*, *feliĉa*); la L prononco [-k-] respeguliĝas en la ĝemela radiko eo *fek/i* Wü (< L med. *faeces*, A *f(a)eces*, F *fèces* "fekaĵo", kp A *fecal*, F *fécal* "feka"). Kp Carlevaro en PL 17/1986, p. 16. ¶ Io *lizo* (< A *lees*, F *lie*); Ie *sediment*; Ia *fece* (ank. "fekaĵo").

I *feccia* el L vulg. **fecia*, subst.-igo de adj. L *faeceus* de *faex*, kiu en sing. signifas "feĉo", en plur. (*faeces*) "malpuraĵo" (> "fekaĵo").

FEDER/I (8; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *federaci/i*): A *feder/ate*, I *-are*, (H *-ar*), F *fédérer*, G *(kon)föderieren*. Envere retrograda formaĵo el la sekva por eviti maloportune longan verbformon. – **FEDERACI/O** (1; Be): A *feder/ation*, I *-azione*, Po *-acja*, R *-acija*, (H *-ación*), F *fédération*, G *Föderation*. Ps-sf *-cio*. ¶ Io *feder/ar*, *-uro*; IeIa *feder/ar*, *-ation*.

El L postkl. *foederat/io -ionis* "ligo, alianco", de *foederatus* "kunaliancano" de *foed/us -eris* "traktato, alianco", propr. "fideleco, lojaleco", par. al L *fidere* "fidi" (vd. tiun). Kp spec. *konfederacio*.

FEL/O (f; RE): A *fell*, G *Fell*. Kp Ji *fel*; ank. Sv *fäll* [fel]. La latin(id)a alternativo (L *pellis*; F *peau*, I *pelle*, kp H *piel*) estis neebla, ĉar *pel-* estis bezonata por alia signifo (Modrijan 44). ¶ 1894 *kut-* (< L *cutis*). ¶ Io = (espismo); IeIa *pelle*.

El HE **pelno-* "haŭto, felo", kp Gr *erysipélas* "erizipelo" (vd. tiun), *pélma* "pland(um)o"; L *pellis*, vd. supre; A *film* "membrano; filmo" (vd. *filmo*), *peel* "ŝelo (de frukto)", *pelt* "pelto" (vd. tiun); R *plënka*, *pleva* "membrano".

FELIĈ/A (f; Un): L *fel/ix -icis*; I *felice*

[-ĉ-], (H *feliz*). Kp A *felicity* "-eco", F *félicité* "-eco". La finsono de la L radiko estas ŝanĝita laŭ I, kiu do ŝajnas estis la vera fonto de la Ea radiko (vd. *feĉo* pri analogaj kazoj). ¶ 1894 *felic-*. ¶ Io *felic/a*, Ie *-i*, Ia *-e*.

Orig. "fekunda, fruktodona" (kp L *Arabia felix* 'la fruktodona parto de Arabio'), der. de **fela* "mamo" (de HE rad. **dhe-* "mamsuĉi", vd. *filo*).

FELIETON/O (1; Be): AF *feuilleton*, G *Feuilleton*, I *foglietto*, Po *felieton*, R *fel'eton*, (H *folletin* [-l'-]). La F(AG) formo estis malfacile transskribebla (F *-euille-* prononciĝas [öj]); Z anstataŭe trovis facile asimileblan formon en la slavaj lingvoj. Pri rom. [l'] > Eo *-li-*, vd. *bataliono*. Ps-sf *-et*, *-on*. ¶ Ie *folieton*, Io *-o*; Ia *feuilleton**.

Propr.. "folieto" (la unuaj felietonoj estis presataj sur aparta folieto), der. (kun duobla dim. sufikso) de F *feuille* "folio" (vd. tiun); la I formo respondas al Eo *foli/et/o*.

FELT/O (f; RE): A *felt*, F *feutre*, G *Filz* [-ts], I *feltro*, Po *filc*, R *fetr*, (H *fieltro*). Z transprenis la A formon, eble por eviti troan similecon al *filtr-*. ¶ Io =, Ie *feltr/e*, Ia *-o*.

El pĜ **felt/az*, *-iz* (la romanaj formoj, kun L mez. *filtrum*, devenas de ĝerm.), orig. "fulaĵo, kunpremitaĵo" (vd. PIV s.v. *fuli*), de HE rad. **pel-* "puŝi, bati" (vd. *peli*; kp spec. Gr *pílos* "ĉapelo"). Etimologie identa kun *filtro*.

FEMINISM/O (2; Be): A *femin/ism*, PoR *-izm*, (H *-ismo*), F *féminisme*, G *Feminismus*, I *femminismo*. Ps-sf *-ism*. – Nomo de ano: **FEMINIST/O** (2; Be): AR *femin/-ist*, Po(H) *-ista*, F *féministe*, G *Feminist*, I *femminista*. Ps-sf *-ist*.

La unua el la supraj terminoj estas farita laŭ la dua, konstruita (en F, 1872) el L *femina* "virino", propr. "mamnutranta" (kp *felare* "mamsuĉi"), de HE rad. **dhe-* "mam/nutri, -suĉi" (vd. *filo*; kp *feliĉa*).

FEMUR/O (f; RE): L *fem/ur -oris* (ank. "-alo"). Kp A *femur*, F(H) *fémur*, I *femore* "-alo"; A *femor/al*, I *-ale*, F *fémoral* "-a". Anatomia termino prenita el L. ¶ 1894 *femor-*. ¶ Io =, Ie *fémur*, Ia *femore*.

L vorto kun nekonata etimologio.

FEND/I (f; Un): F *fend/re*, I *-ere*, (H *hender*); L *findere*. Vokalo laŭ la modernaj fontlingvoj, kp. *meso*, *peĉo*. ¶ Io *fend/ar*, Ie *-er*, Ia *finder*.

De HE rad. **bhid-* "fendi": Sa *bhinádmi* "mi fendas"; A *bite* "mordi", *bit* "peco", (ev.) *boat* "boato" (kp tiun); G *beissen* "mordi".

FENESTR/O (f; Un): F *fenêtre*, G *Fenster*, I *finestra*; L *fenestra*. Bazita sur L. ¶ Io =, Ie *fenestr/e*, Ia *-a*.

L vorto, kredeble de etruska origino.

FENIKS/O (2; Be): A *phoenix*, F *phénix*, G *Phönix*, I *fenice*, PoR *feniks*, (H *fénix*). (Plej ofte uzata kiel propra nomo kaj skribata per majusklo.) ¶ Io *fenixo*, Ie *fénix*, Ia *phenice*.

Pere de L *Phoenix* el Gr *Phoínix* s.s.; la nomo de la fabela birdo estas kredeble de egipta origino (Eg *byn*).

FENKOL/O (f; EG): A *fennel*, F *fenouil*, G *Fenchel*, I *finocchio*, Po *fenkul'*, R *fenňel'*, (H *hinojo*); L *feniculum*. Kp ank. Sv *fänkål* [fénkòl]. Je tia botanika termino kun tre variaj formoj en la diversaj fontlingvoj oni atendas formon rekte prenitan el L. Tamen Z modifis la L formon per ellaso de la (neakcentita) *-i-*, tiel kreante dusilaban radikon laŭ modelo de la plimulto de fontlingvoj; kp spec. Po. La radikfino *-ol* reprezentas unu el la manieroj trakti L *-ulum* (vd. *artikolo*). ¶ 1894 *fenikl-*. ¶ Io *fenikulo*, Ie *fenicul*, Ia *fenuculo* (tiel!).

Der. de L *fenum* "fojno" (pro la fojneca odoro). Vd. *fojno*.

FENOMEN/O (1; Be): A *phenomenon*, F *phénomène*, G *Phänomen*, PoR *fenomen*, I *-o*, (H *fenómeno*). ¶ Io =, Ie *fenomen*, Ia *phenomeno*.

El Gr *phainómenon* "aperaĵo", propr. "(io) aperanta", subst.-igita part. prez. de *phaínesthai* "aperi, montriĝi" (vd. *fantazio*).

FER/O (f; Un): L *ferrum*; F *fer*, I *ferro*, (H *hierro*, kp *férreo* "-a"). Kp A *ferreous* "-(oz)a". ¶ Io =, Ie *ferr/e*, Ia *-o*.

De necerta origino (kp He *barzel* s.s.?).

FERDEK/O (f; RE): G *Verdeck* [ferdék]. Kp A *deck*, R *dek*. La pli internacia formo **dek-* estis neebla pro la homonima numeralo. ¶ 1894 *deg-* (evidente modifo de **dek-*). ¶ Io = (espismo), Ie *deck*; Ia *ponte* (< F *pont*, I *-e*).

Ĝerm. vorto (kiel multaj ŝip- k maristaj terminoj), propr. "tegaĵo", kp G *(ver)decken* "tegi" (vd. tiun; por la unua elemento - tie ĉi responda al Eo *el-* "komplete" – kp. *forgesi*; vd. ank. *por*).

FERI/O (3; Wü; antaŭe *liber/temp/o* "-oj", *libera tago* "-o"): F *jour férié* (*jour* "tago"), G *Ferien* "-oj", I(H) *feria*; Po *ferje* "-oj". Kp A *ferial* "-a". ¶ Io *vakanci*, Ie *vacanties* "-oj"; Ia *ferias* "-oj".

El L *feriae* (plur.) "ferioj, festotagoj" de sama radiko kiel *festus* "festa" (vd. *festo*). Etimologie identa kun *foiro*.

FERM/I (f; Un): F *fermer*. Ne estas klare, kial Z preferis tiun ĉi radikon, ekskluzive francan, al la pli internacia alternativo (A *close*, I *chiudere*; L *claudere*, *-cludere*; vd. *konkludi*): asimilaj malfacilaĵoj apenaŭ ekzistas. ¶ 1881 *ferm-*. ¶ Io *klozar*, Ie *cluder*, Ia *clauder*.

El L *firmare* "firmigi, fiksi" ("fiksi [pordon] per fermo" > "fermi"), de *firmus* "firma, fiksa" (vd. *firma*; ankaŭ *farmi* estas etimologie identa).

FERMENT/I (f; RE): A *ferment*, F *-er*, I *-are*, Po *-owac'*, (H *-ar*). Kp R *ferment* "-ilo". ¶ Io *ferment/acar*, IeIa *-ar*.

El L *fermentare* "-igi", de *fermentum* "-ilo", par. al *fervere* "boli, agitiĝi" (vd. *fervoro*).

FERVOR/O (f; RE): A *ferv/our*, F *-eur*, I *-ore*, (H *-or*); L *fervor*. Ps-sf *-or* 2. ¶ Io =, Ia *fervor*, Ie *-e*.

De L *fervere* "boli, agitiĝi", de HE rad. **bhru-* (*bher-*) s.s., kp Sa *bhuráti* "agitiĝas"; L *fermentum* (kp *fermenti*); A *broth*, I *brodo* "buljono"; G *brühen* "brogi" (kp tiun).

FEST/O (f; Un): F *fête*, G *Fest*, I *festa*, (H *fiesta*, kp *festejar* "-i"); L *festum*. Kp A *fest/ive*, *-ival* "festa". ¶ Io =, IeIa *festa*.

Orig. subst.-igo de L adj. *festus* "-a, feria", orig. "sankta"; kp *feriae* "festaj [feriaj] tagoj" (vd. *ferio*), *fanum* "templo" (vd. *fanatika*) de rad. *fas-/fes-* "sankta". Kp spec. *festeno*, *festono*.

FESTEN/O (f; RE): A *feast*, F *festin* [-ê], I *festino*, (H *festín*). Vokalŝanĝo *i* > *e* (kun apogo de F prononco) probable por eviti aspekton de virinsufiksa vorto (vd. *abomeni*). ¶ IoIa *festin/o*, Ie *-e*.

Propr "festeto", dim. de I *festa* "festo" (vd. tiun).

FESTON/O (1; Be):A *fest/oon*, FPoR *-on*, I *-one*, (H *-ón*), G *Feston*. Ps-sf *-on*. ¶ Io =, IeIa *feston*.

Propr "fest(a ornam)aĵo", de I *festa* "festo" (vd. tiun).

FETIĈ/O (1; Jü; *fetic/o* sed *fetiĉism/o* Be): A *fet/ish*, I *-iccio* [-íĉo], Po *-ysz*, R *-iš*, (H *-iche*), F *fétiche*, G *Fetisch*. Eo *-ĉ-* sin apogas sur I prononco kaj FI skribo; konante la preferon de Z por radikfina *-ĉ* (vd. *fianĉo*), oni emas indiki I kiel la ĉefan fonton. ¶ Io *fet/isho*, IeIa *-iche*.

El P ant. *feitico*, orig. "amuleto", el L *facticius* "artefarita", der. de *fact-*, supina radiko de *facere* "fari" (vd. tiun).

FEŬD/O (2; Jü): AF *fief*, (A ank. *feud*), I(H) *feudo*. Kp AG *feudal*, Po *-ny*, F *féodal*, R *feodal'nyj* "-a". Probable la internacia adjektivo, senigita de la adjektiva sufikso *-al*, estas la vera fonto de la radiko. ¶ IoIa *feud/o*, Ie *-e*.

El L mez. *feudum* s.s. (var.: *fevum*). La formo kun *-d-* estas rigardata kiel neorigina kaj la vorto kutime devenigita de ĝerm. (Franka) **fehu-* "brutaro" (supozata semantika evoluo: > "propraĵo; riĉeco" > "bieno" > "feŭdo"; kp L *pecunia* "mono" de *pecu* "brutaro", A *fee* "honorario" = G *Vieh* "brutaro"). HE **peku-* "brutaro", kp ank. Sa *pacú-* s.s., Gt *faihu* "mono".

FI (f', 1, 7; Du, RE): A *fie*, FR *fi*, G *pfui*,

Po *fe*. Kp ank. Sv *fy*. ¶ IoIe =; Ia *fi**.

Kp ank. L *fu*, Gr *phy*; la komenca sono [f-, p-, pf-] probable reprezentas elsputon de fiata afero. Vd. ank. *putra*.

FIAKR/O (2; Be): F *fiacre*, G *Fiaker*, I *fiacch/er(r)e*, *-ero* [-k-], Po *fiakier*, R *fiakr*. ¶ Io =, IeIa *fiacre*.

Orig. propra nomo: en Parizo, fiakroj unue estis lueblaj (depost 1650) ĉe Hôtel St-Fiacre, portanta kiel ŝildon la bildon de Sankta Fiakro.

FIANĈ/O (f; Un): AF *fiancé*, I *fidanzato*. La radiko, bazita sur AF, prezentas *-ĉ* anst. *-c* pro nekonata kialo (tie ĉi eble por eviti similecon al la pseŭdosufikso *-anc*? cetere Z ofte preferis *-ĉ* en radikfino, kp *falĉ-*, *feĉ-*, *feliĉ-*). ¶ 1894 *fianz-*. ¶ Io *fianc/ito*, *-ulo*, Ia *fidantiato*; Ie *sponso* (< L *sponsus*).

Orig. part. perf. de F *fiancer* "fari edziĝopromeson", de F ant. *fiance* "promeso" de *fier* "fidi" (vd. tiun).

FIASK/O (1; Be): AFI(H) *fiasco*, G *Fiasko*, PoR *fiasko*. ¶ Io =, IeIa *fiasco*.

La I frazo *far fiasco* signifas propr. "fari botelon" (kp F *flacon* "flakono, boteleto", A *flask*, G *Flasche* "botelo"), sed la semantika evoluo "botelo" > "fiasko" restas neklarigita (unu el multaj hipotezoj en Esperanto-Post 1951, 140).

FIBR/O (f; RE): AF *fibr/e*, IR(H) *-a*, G *Fiber*; L *fibra*. ¶ Io =, Ie *fibr/e*, Ia *-a*.

Kredeble samradika kun L *filum* "fadeno" (kp s.t.v.), par. al R *ĵila* "tendeno". Kp *franĝo*.

FID/I (f; RE): L *fidere*; F *se fier*, I *fidarsi*, (H *fiarse*) (refl. en FIH). Kp A *faith*, G *Fiduz* "fido". ¶ Io *fidar*, Ie *fider*, Ia *fider se*.

L vortfamilio (ank. *fides* "fido, fideleco"; *fidus* "fidela"; *fiducia* "fido"; *foedus* "alianco"; kp en Eo *federacio*, *fianĉo*, *fidela*, *konfid/i*, *-enco*, *perfidi*) de HE rad. **bheidh-* "persvadi", ekz. Gr *peíthein* "persvadi", pas. "fidi"; G *bitten* "peti", *beten* "preĝi".

FIDEL/A (f; Un): L *fidelis*; F *fidèle*, I *fedele*, (H *fiel*, kp *fidelidad* "-eco"). Kp A *fidelity* "-eco". ¶ Io =, IeIa *fidel*.

De L *fides* "fido, fideleco" (vd. *fidi*).

FIER/A (f; Un): F *fier*, I *-o*. ¶ Io =, Ie *fier*; Ia *fer* (ank."sovaĝa, kruela").

Orig. "malmilda" (> "orgojla" > "fiera", kp H *fiero* "kruela"); el L *ferus* "sovaĝa, malmilda" (kp. *fera* "sovaĝbesto") el HE **ghjer-* "sovaĝbesto", kp Gr *thêr*, R *zver'* s.s.

FIG/O (f; RE): A *fig*, F *figue* [fig], G *Feige*, I *fico*, PoR *figa*, (H *higo*); L *ficus*. Z ne uzis la L originformon, probable ĉar la modernaj lingvoj preskaŭ unuanime montras *-g-* (krome formo kun *-k-* povus kunporti obscenajn asociojn, kp G *ficken* = eo *fik/i* PIV). ¶ Io =, Ie *figue*, Ia *fico*.

Probable, samkiel Gr *sykon* s.s., pruntita el iu mediteranea lingvo.

FIGUR/O (f; RE): AF *figur/e*, IPoR(H) *-a*; L *figura*. Ps-sf *-ur*.

Propr. "formo, kreaĵo", de L *fingere* (radiko *fig-*) "formi", de HE rad. **dheigh-* "formi, knedi", kp Sa *dehí* "digo"; Av *pairidaeza* "ĉirkaŭbarejo" (vd. *paradizo*); Gr *teíkhos*, *toíkhos* "muro"; A *dike*, G *Deich* "digo" (kp tiun), G *Teig* "(farun)pasto". Kp spec. *fikcio*, *fiktiva*.

FIKCI/O (4; Wü): AF *fic/tion*, (H *-ción*), G *Fiktion*, I *finzione*, Po *fik/cja*, R *-cija*. Ps-sf *-cio*.

El L *fict/io -ionis* "formado, kreado", de *fingere* "formi, krei" (vd. *figuro*). Kp spec. *fiktiva*.

FIKS/I (1; Be; dukateg. *-a/-i* laŭ OA 8): A *fix* "-i", *-ed* "-(it)a", F *fix/er* "-i", *-e* "-a", I *fiss/are* "-i", *-o* "-a", (H *fij/ar* "-i", *-o* "-a"); L *fixus* "-a". Ank. G *fix* "senmova, fiksa", *-ieren* "-i, -e rigardi"; R *fiksirovat'* "fiksi". ¶ Io *fiks/a*, *-igar*, Ie *fix*, *-ar*, Ie *fix/e*, *-ar*.

Verbo der. de la adj.; L *fixus* orig. "-ita", part. perf. de*figere* "fiksi". Parencaj vortoj en Eo: *afikso*, *afiŝo*, *fini*, *prefikso*, *sufikso*.

FIKTIV/A (1; Be): F *fictif*, G *fiktiv*, R *-nyj*. Respondas al A *fict/itious*, (H *-icio*), I *fittizio*, Po *fikcyjny*. FGR estis evidente multe pli facile asimilebla ol

la tipo reprezentata de AIPo. Ps-sf *-iv*. ¶ Io =, Ie *fict/iv*, Ia *-ive, -icie*.

Formita en F laŭ L *fictus* "fikcia, inventita", part. perf. de *fingere* "krei, inventi, formi" (vd. *figuro*; kp *fikcio*).

FIL/O (f; Un): L *filius*; F *fils*, I *figlio* [-l'-], (H *hijo*). Kp A *filial* "-a". Mallonga formo en Eo laŭ la latinidaj lingvoj, kie la dua *-i-* aŭ malaperis (FH) aŭ nur moligis la antaŭan *l* (I). Tiu formo permesas konservi la akcenton de la fontlingvoj kaj eviti maloportunan hiaton en **fili/ino*. La adopto de la malpli longa formo *fil-* ebligis, ke *fili-* povis esti uzata kun alia signifo. ¶ 1882 *fil/aŭ* "filino". ¶ Io *fili-ul-o*, IeIa *filio*.

Orig. "suĉinfano", par. al L *felare* "mamsuĉi", *felix* "fruktodona" (kp *feliĉa*), *femina* "virino" (kp *feministo*), de HE rad. **dhe-* "mam/nutri, -suĉi", ekz. en Sa *dháyati* "mamsuĉas", Gr *thêlê* "mamo", R *doit'* "melki". Kp spec. *filio*.

FILANTROP/O (1; RE): A *philanthrop/ist*, F *-e*, G *Philanthrop*, PoR *filantrop*, I *-o*, (H *filántropo*). – Ec- kaj agnomo: **FILANTROPI/O** (1; Jü; antaŭe *filantrop/ec/o* Be): A *philanthrop/y*, F *-ie*, G *Philanthropie*, IPo *filantrop/ia*, R *-ija*, (H *-ía*). Ps-sf *-i* 1.

El Gr *philanthrôpía* "humaneco, afableco" de *philánthrôpos* (adj.) "homama, humana" el *phílos* "amiko" (kp *filolog/o, -io, filozof/o, -io*) kaj *ánthrôpos* "homo" (kp *antropolog/o, -io*), ambaŭ kun necerta etimologio.

FILI/O (3; Be): Po *fili/a*, FI *-ale*, R(H) *-al*, G *Filiale*. Formo reduktita je *-al* (laŭ Po?), probable por elimini la ideon de adjektivo, kiun tiu pseŭdosufikso enhavas. Vd. ankaŭ sub *filo*. ¶ Io *fili-alo*, Ia *filial*, Ie *-e*.

Orig. latinida adj. ("fila [firmo]"), el L mez. *filialis* de L *filius* "filo" (vd. tiun).

FILIK/O (f; RE): L *fil/ix -icis*; F *fougère*, I *felce*, (H *helecho*). Botanika termino prenita el L; kp forme *lariko, saliko*, plue *heliko, histriko, korniko*. ¶ Io =, IeIa *filice*.

L vorto (FH de L vulg. plus sufikso) sen etimologio.

FILM/O (8; Wü; ne ĉe Z): AFIPo(H) *film*, G *Film*, R *fil'm*.¶ Io =, IeIa *film*.

El A ant. *filmen* "membrano", par. al Gr *pélma* "plando" kaj L *pellis* "felo" (vd. tiun).

FILOLOG/O (1; Jü): A *philo/logist*, F *-logue* [-g], G *Philologe*, PoR *filolog*, I *-o*, (H *filólogo*); L *philologus*. – Sciencnomo: **FILOLOGI/O** (1; RE): A *philolog/y*, F *-ie*, G *Philologie*, IPo *filolog/ia*, R *-ija*, (H *-ía*); L *philologia*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *philología* "scienca (precipe literatura) studado", de *philólogos* "studama": *phílos* "amiko" (vd. *filantropo*), *lógos* "studo, scienco" (vd. *logiko*). Sencospecialigo okazis en L *philologia*: "literatura studado" > "eksplikado kaj komentado de literaturaj verkoj, filologio"; analogan sencevoluon trapasis *philologus*.

FILOZOF/O (1; Du, RE): A *philosoph/er*, F *-e*, G *Philosoph*, R *filosof*, I *-o*, Po *filozof*, (H *filósofo*); L *philosophus*. Eo *-z-* pro la ĝenerala tendenco voĉigi intervokalan *s*-sonon, tie ĉi kun apogo de Po. ¶ Io =, Ie *filosof*, Ia *philosopho*. – Sciencnomo: **FILOZOFI/O** (1; Ald, RE: kp *filosofi-* N-ro 15 1888): A *philosoph/y*, F *-ie*, G *Philosophie*, I *filosof/ia*, R *-ija*, (H *-ía*), Po *filozofia*; L *philosophia*. Pri *-z-*, vd. la antaŭan. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *philosophía* "filozofio, serĉado de scioj" de *philósophos* "filozofo", propr. "amanto de saĝeco": *phílos* "amiko" (vd. *filantropo*), *sophós* "saĝa", ambaŭ kun necerta etimologio.

FILTR/I (f; RE): A *filter*, F *filtr/er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *-ovat'*, (H *-ar*). ¶ IoIeIa *filtrar*.

Der. de la responda il-vorto: A *filt/er*, F *-re*, I(H) *-ro*, PoR *-r* "filtrilo" el L mez. *filtrum* s.s., orig. "felto" (oni uzis felton kiel filtrilon), vd. tiun.

FIN/I (f; Un): L *finire*; A *fin/ish*, F *-ir*, I

-ire, (H *-alizar*). La radiko estas krome internacie konata per la derivaĵo *final-*, vd. sekv. ¶ Io *fin/ar*, IeIa *-ir.*

Der. de L *finis* "fino; limo" (> FH *fin*, I *-e* "fino"); se la signifo "limo" estas primara, la vorto povas esti par. al *figere* "fiksi" (orig. "fiksita limsigno" aŭ sim.), vd. tiun. Samfamiliaj vortoj en Eo: *difini, finalo, financo.*

FINAL/O (1; Jü): AFI *fin/ale*, R(H) *-al*, Po *-al'*, G *Finale.* Ps-sf *-al.*

I muziktermino, propr. "fina (ludo)", subst.-igita adj. de *fine* "fino" (vd. *fini*).

FINANC/O (1; Be): AF *fin/ance*, I *-anza*, Po *-anse* (plur.), R *-ancy* (plur.), G *Finanzen* (plur.). Ps-sf *-anc.* ¶ Io =, Ie *financi/e*, Ia *-a.*

El L mez. *finantia* "pago", de L vulg. *finare* "finpagi", orig. "plenumi, fini", de L *finis* "fino" (vd. *fini*).

FINGR/O (f; Un): A *finger*, G *Finger.* Kp ank. Sv *finger.* Sinkopo por konservi la fontlingvan akcenton kaj eviti sufiks-similan radikfinon, kp spec. *ŝultro, hamstro* (kontraste *cifero, kelnero, telero*). Unu el kelkaj ĝermandevenaj radikoj por korpopartoj (vd. Collinson 1959, 5); ĉu la romana alternativo (F *doigt*, I *dito*; L *digitus*) estis pli malfacile asimilebla (kp ank. IoIe) ? ¶ 1894 *digit-.* ¶ Io =, Ie *fingre* (espismo); Ia *digito.*

El pĜ **fingraz* (kp Gt *figgrs*), kredeble par. al pĜ **fimfi* (G *fünf*) "kvin" (vd. tiun).

FIRM/A (f; Un): L *firmus*; A *firm*, (H *-e*), F *ferm/e*, I *-o.* ¶ Io *ferma*; Ie *firm*, Ia *-e.*

L vorto (der.: *firmare* "firmigi, konfirmi") de HE rad. **dhar-* "teni, apogi", ekz. en Sa *dhârâyati* "tenas, portas", *dhárma(n)-* "leĝo, ordo"; Gr *thrónos* "trono" (< "apogilo"), vd. tiun. Samfamiliaj vortoj en Eo: *farmi, fermi, firmo, konfirmi.*

FIRM/O (f; N-ro 15 1888, EG; *firma/o* Wü por eviti homonimecon kun *firm/a*): A *firm*, F *-e*, R(H) *-a*, G *Firma.* ¶ Io =, IeIa *firma.*

El IH *firma* "(certiga) subskribo" (semantika evoluo: > "subskribo de komercanto" > "komerca nomo" > "komerca entreprenо", unue en AG) de I *firm/are* (H *-ar*) "konfirmi, certigi" el la homonima kaj sinonima L vorto (vd. *firma*).

FISK/O (3; Be): AF *fisc*, I(H) *-o*; L *fiscus.* Kp Po *fisk/alny*, R *-al'nyj* "-a". ¶ Io =, IeIa *fisco.*

Orig. "korbo" (por la semantika evoluo, kp *kaso*).

FISTUL/O (f; RE): AR *fist/ula*, F *-ule*, I *-ola*, Po *-ul'a*, G *Fistel*, (H *fístula*); L *fistula.* Latineca formo kun *-ul-* konservita en tiu ĉi medicina termino (vd. sub *artikolo*). ¶ Io =, Ie *fistula*; Ia *fistula*.*

La L vorto signifas origine (kaj precipe) "tubo". Necerta etimologio.

FIŜ/O (f; Un): A *fish* [fiŝ], G *Fisch* [fiŝ]. Ne estas klare, kial Z preferis la ĝermanan vorton al la romana (L *piscis* > F *poisson*, H *pez*, I *pesce*), ĉar nek **pisk-* nek **pesk-* estis okupitaj per aliaj sencoj; eble la radikfina *ŝ* ŝajnis pli senproblema ol la diversaj respondaj sonoj de la latinidaj formoj (L [-sk-], F [-s-], I [-ŝ-], H [-th]). Alia ebleco estas, ke la Ea formo reprezentas "korekton" de Vp *fit.* ¶ 1894 *pisk-.* ¶ Io *fisho* (espismo); IeIa *pisce.*

El pĜ **fiska-* (kp Gt *fisks*, Sv *fisk*) kun parencoj en L (vd. supre) kaj en Ir; ĝi do ŝajnas aparteni al la okcidentaj HE lingvoj (same kiel *maro*).

FIZIK/O (f, 1, 7; RE): A *phys/ics* [fíz-], F *-ique* [fizík], G *Physik*, I *fisica* [-z-], Po *fiz/yka*, R *-ika*, (H *física*). Ps-sf *-ik.* ¶ Io =, Ie *fisica*, Ia *physica.*

El Gr *physikê* (*tékhnê*) "prinatura (scio)", subst.-igita adj. de *physis* "naturo" (kp *fiziolog/o, -io, fizionomio*), de *phyein* "generi, produkti", pas. "naskiĝi, ekesti", de HE rad. **bhu-* "(ek)esti, kreski", kp Sa *bhávati* "estas"; L *fui* "mi estis", *probus* (el **pro-bho-s*) "prava, brava" (kp *probabla, provi, pruvi*); A *be* "esti"; G *ich bin* "mi es-

tas", *bauen* "konstrui", *Nach/bar* "najbaro" (kp tiun); R *byt'* "esti".

FIZIOLOG/O (7; Wü; antaŭe *fiziologi/isto* Ka): A *physio/logist* [-z-], F *-logue* [-z-, -g], G *Physiologe*, I *fisi/ologo* [-z-], (H *-ólogo*), Po *fizjolog*, R *fiziolog*; L *physiologus*. Pli ĝuste, tamen, oni konsideru la Ean terminon kiel analogaĵon al aliaj vortoj kun *-logo*, vd. ekz. *arĥeologo*. - Sciencnomo: **FIZIOLOGI/O** (1; Du, RE): A *physiolog/y* [-z-], F *-ie* [-z-], G *Physiologie*, I *fisio/logia*, (H *-logía*), Po *fizjologia*, R *fiziologija*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *physiología* "naturscienco" de *physiológos* "naturscienciisto" el *physis* "naturo" (vd. *fiziko*) k *-logos* "esploristo" (kp *arĥeologo*, vd. *logiko*).

FIZIONOMI/O (1; RE): A *physio/gnomy* [fiziónomi], F *-nomie* [fiz-], G *Physiognomie*, I *fis(i)onomia* [-z-], Po *fizjonomia*, R *fizionomija*, (H *fisonomía*). Ps-sf *-i* 1. ¶ Io =, Ie *fisionomie*, Ia *physiognomia*.

Orig. pri la arto determini ies karakteron laŭ la trajtoj de lia vizaĝo; el L *physiognomia*, mallongigo el Gr *physiognômonía*: *physis* "naturo" (vd. *fiziko*); *gnômôn* "konanto"de rad. *gnô-*, ekz. en *gignôskein* "koni" (vd. tiun).

FJORD/O (2; Jü): A *fjord*, *firth*, FPoR *fiord*, I(H) *-o*. ¶ Io *fyordo*, IeIa *fiord*.

El No *fjord*, el pĜ **ferthu-*, el HE **pertu-* "trapasejo aŭ sim.", kp L *portus* "haveno"; G *Furt*, A *ford* "vadejo"; de HE rad. **per-* "trans/iri, -igi" (vd. *porti*; kp ank. *farti*).

FLAG/O (f; RE): AR *flag*, Po *-a*, G *Flagge*. Radiko kun ĝerman-slava bazo. ¶ Io =, Ie *flagga*; Ia *bandiera* (< H *band/era*, I *-iera*).

Probable el A *flag* "pendi velke", kp G *flackern* (vd. sekv.).

FLAGR/I (3; Jü): L *flagrare*. Ank. en AF *conflagra/tion*, I *-zione*, (H *-ción*) "kunflagrado". G *flackern*, kiun la vortaroj donas kiel ekvivalenton de *flagri*, povas esti rigardata kiel apogo al la radiko, eĉ se ĝi ne lasis spuron en la formo mem (kompromiso L-G rezultigus **flakr-*). ¶ IoIeIa *flagrar*.

La L vorto de HE rad. **bhleg-* "brili" (vd. *flamo*). – G *flackern* estas neparenca.

FLAM/O (f; RE): A *flame*, F *flamme*, G *Flamme*, I *fiamma*, (H *llama*); L *flamma*. ¶ Io =, Ie *flamm/e*, Ia *-a*.

L *flamma* el **flagma*, de HE rad. **bhleg-* "brili": Sa *bhárgah* "brilo"; Gr *phlégein* "bruligi" (kp *flegmo*); L *fulgere* "brili", *fulgur* "brilo", *fulmen* "fulmo" (kp tiun), *flagrare* "flagri" (kp tiun); A *blaze* "flameg/o, -i"; G *blank* "brila" (kp *blanka*), *blass* "pala", *Blitz* "fulmo". – Etimologie identa estas *flegmo*; kp cetere spec. *inflamo*.

FLAN/O (f; RE): A *flawn* [flo:n] (arĥ., dial.), F *flan*, G *Fladen*. Kp A *flan* "speco de torto". Bazita sur F (kulinara termino). Pri (mis)korekto de la signifo donita en UV, vd. Fund., p. 25. ¶ Io *flado*, Ia *flaon* (< F ant.); mankas en Ie.

Pere de L mez. *flad/o -onis* el ĝerm. (G ant. *flado*, pĜ **flathon*, propr. "plataĵo", vd. *plata*).

FLANEL/O (f; RE): A *flan/nel*, F *-elle*, I *-ella*, Po *-ela*, R *-el'*, G *Flanell*, (H *franela*). ¶ Io =, Ie *flanell/e*, Ia *-a*.

A der. de Ki *gwlân* "lano" (vd. tiun).

FLANK/O (f; Un): A *flank*, F *flanc*, I *fianco*, (H *flanco*); ank. G *Flanke* (mil., vet.), Po *flanka* (mil.), R *flang* (mil.). ¶ 1881 *flank/o*; 1882 *kott/o* (< F *côté*). ¶ Io =, Ie *flanc/a*, Ia *-o*.

De ĝerm. orig.: G ant. *hlanca* "lumbo", orig. "parto kie la korpo kliniĝas", kp G *Gelenk* "artiko".

FLAR/I (f; Un): F *flairer* "(pri)flari". Deirante de la F vorto, Z plivastigis la sencon (> "uzi la flarsenton" ĝenerale) kaj modifis la formon, redonante *-ai-* [e] per nura *-a-* (kp *glavo* el F *glaive* kaj *aglo*, almenaŭ parte el F *aigle*). ¶ Laŭ LZ I, 352, ekzistis komence en pEo paralelaj formoj *flad-* "senti per la nazo" : *flat-* "flari"; kp 1882 (14:14) *flad-* , vd. PVZ 5, 135. 1894 *olfakt-* (<L *olfactus*

"flarsento"). ¶ IoIe *flarar* (espismo); Ia *olfacer* (< L *olfacere*).

Orig. "odori", el L vulg. **flagrare*, malasimilita formo de L *fragr/are* "bonodori" (kp HI *-ante* "bonodora").

FLAT/I (f; RE): AF *flatter*. ¶ Io *flatar*, IeIa *flattar*.

F der. de Fk **flat* "plata" (kp A *flat* s.s.; orig. signifo "karesi per la manplato"), vd. tiun.

FLAV/A (f; Un): L *flavus*. Bazita ekskluzive sur L; la modernaj fontlingvoj prezentas diversajn, malfacile adapteblajn vortojn. ¶ Io =; Ie *yelb* (< A *yellow*, G *gelb*); Ia *jalne* (< F *jaune*).

Kp. L *fulvus* "flavbruna". Etimologie identa kun pĜ **blewa-* (vd. *blua*).

FLEG/I (f; RE): G *pflegen*. Kp ank. Da *pleje* "-i", Nd *pleegzuster* "-istino". Bazita ekskluzive sur G; simpligita komencsono (*pf* > *f*) kiel en *fajfi*, *fosto*, *funto*, *fuŝi*. Ankaŭ la sinonimoj *varti*, *zorgi* estas ĝermandevenaj (Collinson 1959, 9: 'Ne ekzistas komparebla vortgrupo en la romanaj lingvoj'). ¶ Io *flegar* (espismo); Ie *cuidar* (< H), Ia *coler* (< L *colere*), ambaŭ ank. *curar* (< L *curare*).

El G ant. *pflegan* "responsi (pri)"; la responda subst. estas G *Pflicht* "devo".

FLEGM/O (f; RE): A *phlegm*, F *flegm/e*, PoR *-a*, G *Phlegma*, I *flemma*, (H *flema*). ¶ Io =, Ie *flegma*, Ia *phlegma*.

El Gr *phlégma* "muko" (unu el la kvar korpaj fluidaĵoj, rezultiganta la flegman temperamenton), orig. "inflamo, brulo", de *phlégein* "bruli". Etimologie identa kun *flamo*, vd. tiun.

FLEKS/I (f; RE): L *flectere* (supina radiko: *flex-*); F *fléchir*; kp AF *flex/ible*, G *-ibel*, I *flessibile* "fleksebla". Z alprenis la supinan radikon, sendube pro la internacieco de la derivita adjektivo (kaj de la responda substantivo, vd. *fleksio*). ¶ Io *flex/ar*, Ie *-er*, Ia *flecter*.

Samfamiliaj vortoj en Eo: *cirkumflekso*, *fleksio*.

FLEKSI/O (1; Jü): A *inflection*, F *flex/-ion*, (H *-ión*), G *Flexion*, I *flessione*, Po *flek/sja*, R *-cija*. Ps-sf *-cio*, var. *-sio*. ¶ Io *flex/iono*, IeIa *-ion*.

Propr "fleksado" (la fleksio estis rigardata kiel devio de unu 'rekta' baza formo, kp. semantike *deklinacio*), de L *flectere* "fleksi" (vd. tiun).

FLIK/I (f; RE): G *flicken* [flík-]. Kp ank. Da *flikke*. La ĝermana vorto estis akceptata 'por diverstipaj romanaj esprimoj' (Collinson 1959, 9). ¶ 1894 *rapez-* (< F *rapiécer*). ¶ Io *rapecar*; Ie *lappar* (G *Lappen* "flikaĵo"); Ia *sarcir* (<L *sarcire*), *reparar* ('ripari').

Der. de G *Fleck* "makulo" (en G ant. ank. "ĉifono, flikaĵo").

FLIRT/I (f; RE) 1) flugeti 2) amindumi: A *flirt* (1, 2), F *flirt/er* (2), G *-en* (2; kp *flattern* 1), I *-are* (2), Po *-owac'* (2), R *-ovat'* (2), (H *-ear* 2). Ambaŭ sencoj ĉe Z, sed nur 1) en RE kaj UV; 2) aperas en Jü. Ŝajnas do, ke Z adoptis A *flirt* (kun konsonantisma apogo de G kaj de la A sinonimo *flutter*) en senco 1), dum la dua sin trudis pro internacieco. Z sekvis la A ortografion sen konsidero al la prononco, kiel en *birdo*. ¶ 1894 *volet-* (< F *voleter*). ¶ Io *flug-et-ar*, *fluktuar* (1) (< L *fluctuare* "ondi"), Ie *volettar* (1), Ia *papilionar* (1) (propr. "papiliumi"); IoIeIa *flirtar* (2).

A *flirt* orig. "ekfrapeti", laŭdire de sonimita origino (la senco "amindumi" eble influita de F ant. *fleureter* "diri komplimentojn" de *fleuret* "floreto; komplimento").

FLOK/O (f; RE): A *flock*, F *flocon*, G *Flocke*, I *fiocco*; L *floccus*. ¶ Io =, Ie *floc*, Ia *-co*.

Orig. "floko de lano" (L).

FLOR/o (f; *-o* Un Wü PV, *-i* UV Be Jü PIV; substantivkategoria laŭ AdA II, 37): A *flower* "-o", *flourish* "-i, prosperi", F *fleur* "-o", *fleurir* "-i", I *fiore* "-o", *fiorire* "-i" (kp *florido* "-hava, -anta"), (H *flor* "-o", *florecer* "-i"); L *fl/os -oris* "-o", *florere* "-i". Bazita precipe sur L. La radiko

estas krome internacie konata per la nomo de la flora diino (L *Flora*) uzata kiel botanika termino "floraro, plantaro (de iu regiono)" (ekz. G *Flora*, AR *flor/a* F *-e*). ¶ 1881 *flor/o*. ¶ Io =, IeIa *flor*.

De HE rad. **bhlo-* "floro": G *Blume*, A *bloom* "floro"; eble ank. A *blood*, G *Blut* "sango" (pro la intensa koloro). De la sama rad. devenas la vortoj por 'folio', vd. tiun. Kp spec. sekv.

FLOREN/O (2; RE): ARF(H) *florin* [F -ê], G *Florin*, I *fiorino*, Po *floren*. Vokalŝanĝo *i* > *e* (laŭ Po, kun ioma apogo de F pron.) por eviti aspekton de virinsufiksa vorto (vd. *abomeni*). ¶ IoIa *florin/o*, Ie *-e*.

Unue nomo de monero en mezepoka Florenco (ekde 1252): L mez. *florinus* de L *flos* "floro" (vd. tiun); la monero surhavis lilion, blazonan signon de tiu urbo.

FLOS/O (f; RE): A *float*, G *Floss*. Kp F *flotter* "-i". La semantiko de Eo *floso/flosi* (orig. 'flose transporti') respondas al tiu de G *Floss/flössen* kaj A *float/to float*. La sekundara senco de *flosi* ('maldroni': Wü interkrampe, PV) probable estas inspirita de AF, kie la verbo havas ambaŭ sencojn. La motivo por elekti ekskluzive G formon restas neklara (eo *flot-* "militŝiparo" aperas nur en PVS; ĉu estas eble, ke Z rezervis tiun formvarianton kiel iam bezonotan?). ¶ Io *rafto* "-o" (< A *raft*), *flotacar* "-i"; Ie *flott/uore* "-o", *-ar* "-i"; Ia *rate* "-o" (< L *ratis*), *flottar* "-i".

G subst. der. de *fliessen* "flui" (pĜ **fleutan*); A *float* reprezentas alian apofonian gradon de la sama radiko. Praparenca R *plot'* "floso". (HE rad. **pl(e)u-* "flui", vd. *pluvi.*) – F *flotter* povas esti de ĝerm. origino; ankaŭ estas eble, ke ĝi prezentas miksformon de la citita ĝermana radiko kaj L *fluctuare* "flui, ondi" (vd. *flui*).

FLU/I (f; Un): L *fluere*; I *flu/ire*, (H *-ir*). Kp F *fluide* "flua" kaj la vortojn citajn sub *fluida*; ank. A *flow* "flui", G *Fluss* "fluo; rivero". Radiko sin apogan-ta sur (hazarda) simileco de vortoj en la romana kaj ĝermana lingvofamilioj; analoge ĉe *havi*. ¶ 1881 *kul-* (< F *couler*). ¶ Io *flu/ar*, IeIa *-er*.

L *fluere* (kun der. *fluct/us* "ondo", *-uare* "ondi", *fluidus* "flua" - vd. *fluida* -, *flumen* "rivero") de HE rad. **bhleu-* "abundi, ŝveli", kp Gr *phlyein* "abundi, superakvi" (plivastigo de HE rad. **bhel-* "ŝveli", vd. *bulo*). – Pri la AG vortoj, vd. *floso*.

FLUG/I (f; Un): A *fly*, G *fliegen* (impf.: *flug*; kp *Flug* "-o"). Kp ank. Nd *vliegen* [flígen], Sv *flyga*. Bazita sur G; formo **flig-* estis rigardata kiel neoportuna, eble pro la eventuala derivaĵo **flig/ig/-i*: kp Waringhien LV 79, kiu parolas pri "la neŭtrala vokalo *u*". Tamen *-u-* kredeble estis inspirita de la subst. *Flug*; tial ne estas necese kompari la ekzemplojn de G *i* > Eo *u* cititajn sub *dungi*. Ĝermana radiko estis elektata ĉar la romana *vol-* estis rezervita por alia signifo (Collinson 1959, 10). ¶ 1894 *vol-* (< F *vol/er*, I *-are*, kp H *-ar*). ¶ Io *flugar* (espismo); IeIa *volar*.

El pĜ **fleugan*, eble el plivastigo de HE rad. **pl(e)u-* "flui" ('flugi' estas kvazaŭ 'flosi en la aero'), vd. *pluvi*.

FLUID/A (f; Un): L *fluidus*; A *fluid*, F *-e*, I(H) *-o*. Kp G *Fluidum* "fluidaĵo". ¶ Io =, Ie *fluid*, Ia *-e*.

Der. de L *fluere* "flui" (vd. tiun).

FLUSTR/I (3; Wü): G *flüstern*. G *ü* > Eo *u* (Szerdahelyi 1987, 123) kiel en *frua*, *kajuto*. Ellaso de neakcentata *-e-* kiel en *bedaŭri*, *daŭri*, *kaŭri*; kp ank. *fingro*. Fonetike pli oportuna ol A *whisper* aŭ la alternativo adoptita de Ie; la ekvivalento troviĝanta en IoIa ja ekzistas en Eo sed kun pli ĝenerala signifo (= *flustri* PIV 2). ¶ 1882 *s'epp/i* (< R *ŝepnut'*: PVZ 5, 147). ¶ Io *susurar*, Ia *susurrar*; Ie *chuchotar* (< F *chuchoter*).

El G ant. *flistiran* "karesi".

FLUT/O (f; RE): A *flute*, F *flûte*, G *Flöte*, I *flaut/o*, (H *-a*), Po *flet*, R *flejta*. Ba-

zita sur AF. ¶ Io =, Ie *flaut/e*, Ia *-o*.

El Oc *flaüt* s.s., kun necerta etimologio (ĉu onomatopea? ĉu ligita kun L *flatus* "blovo"?).

FOIR/O (f; RE): A *fair*, F *foire* [fŭár], I *fiera*, (H *feria*). Bazita sur F ortografio. F *oi* [ŭa] estas en Eo redonata en tri diversaj manieroj: (1) *oi*, kp. ank. *soifo*; (2) *oj*, kp *fojo, fojno, ĝojo, kojno*; (3) *ua* (laŭ la prononco), kp *buduaro, trotuaro, tualeto, vualo*. (1) kaj (2) aperas en vortoj kiuj konservas karakterizan francan formon, (3) nur en internaciaj vortoj, kie PoR ortografias *ua*. ¶ Io *feri/o*, Ia *-a*; Ie *mercate*.

El L *feria(e)* "ferio(j)" (la foiroj okazis origine dum feriaj tagoj), vd. tiun.

FOJ/O (f; Un): F *fois* [fŭá]. Bazita sur F ortografio (kun konsidero al la prononco en tio, ke la neprononcata *s* estas ellasita); kp sub *foiro*. La kombino *-oj-* probable estas elektita ĉar poste sekvas vokala finaĵo; analoge en *ĝojo*. ¶ 1881 *fi/o* (< L *vices* laŭ PVZ 5, 135; pli probable sama etimo kiel *foj/o*); 1894 *volt-* (< I *volta*). ¶ Io *foyo* (espismo); Ie *vez* (< H =), Ia *vice* (< L).

El L *vices* (plur.; sing. gen. *vicis*, nom. neuzata) "alternado, ŝanĝiĝo", vd. *vico*.

FOJN/O (f; Un): F *foin*, I *fieno*, (H *heno*); L *fenum* (var.: *faenum, foenum*). Bazita sur F ortografio; kp sub *foiro*. La motivo por elekti *-oj-* anstataŭ *-oi-* ne estas klara (kp *soifo*); ĉu povas esti, ke Z estis influata de la klasika prononco de la L varianto *foenum* [fojn-]? ¶ 1894 *fien-*. ¶ Ie *fen*, IoIa *-o*.

Eble orig. "(kampara) produkto", par. al L *fecundus* "fruktodona" (vd. *feliĉa*).

FOK/O (f; RE): L *phoca*; F *phoque* [fok], I(H) *foca*, Po *foka*. ¶ Io *mar-hundo*, Ie *foca, cane marin* ('marhundo'), Ia *phoca*.

El Gr *phôkê* s.s., kp *phôkaina* "foceno, marporko".

FOKUS/O (f; RE): F *foyer* (kp *focal* "-a"), G *Fokus*, I *fuoco*, R *fokus*, (H *foco*). Certe ankaŭ la L originformo *focus* influis. La saman tipon kun konservita origina nominativa finaĵo *-us* reprezentas *konuso, moruso, papiruso, poluso, rubuso, taksuso*. Formo sen *-us* estis tie ĉi neebla, ĉar *fok-* estis bezonata por alia signifo (kiel ankaŭ *kon-, pol-, rub-*; same Eo *glob-* : eo *globus-*). Z do enkondukis radikfinon *-us* ĉefe por eviti homonimojn (kaj krome en kelkaj L botanikaj terminoj). ¶ Io *foko*, IeIa *foco*.

Moderna scienca uzo de L *focus* "fajrujo".

FOLI/O (f; Un): L *folium*; F *feuille*, I *fogli/a, -o* [-l'-], (H *hoja*). Kp A *foliage* "-aro". Bazita sur L; pri *-li-* reprezentanta latinidan [l'], vd. *bataliono*; kp spec. *felietono*. ¶ IoIa =, Ie *folie*.

De HE rad. **bhel-* (**bhle-*, **bhlo-*) "folio; floro", kp Gr *phyllon* "folio"; G *Blatt* "folio"; vd. ank. sub *floro*. Samfamiliaj vortoj en Eo: *felietono, trefo*.

FON/O (5; ER): F *fond* [fô], I *sfondo*, R *fon*, (H *fondo*). La F prononco (kun nazala vokalo kaj neprononcata finkonsonanto) estas apogata de R ortografio, kiu donas konvenan formon por Ea radiko. Formo *fond-* (F ortografio, I) estis okupita per alia signifo. ¶ Ie *fund/e*, Ia *-o*.

Etimologie identa kun *fundo* kaj *fondi*, vd. tiujn.

FOND/I (f; Un): A *found*, F *fond/er*, I *-are*, Po *fundowac'*, (H *fundar*); L *fundare*. La *o*-vokalo diferencigas tiun ĉi radikon disde *fund-* (kun *profund-*); kp *mosk-/musk-*. ¶ 1894 *fund-*. ¶ Io *fondar*, IeIa *fundar*.

Propr "meti fundon al [io]", vd. *fundo*.

FONETIK/O (1; Be): A *phonet/ics*, F *-ique*, G *Phonetik*, I *fonet/ica*, Po *-yka*, R *-ika*, (H *fonética*). Ps-sf *-ik*.

Subst.-igo de Gr *phonêtikós* "parola, sona", de *phoneín* "soni" de *phônê* "sono" (kp *fonografo, gramo-, mikro-, tele/fono, simfonio*), de HE rad. **bhâ-* "paroli" (vd. *infano*).

FONOGRAF/O (2; Be): E *phonograph*, F *-e*, G *Phonograph*, PoR *fonograf*, I *-o*,

(H *fonógrafo*).

Konstruita (en F, 1877, de Lenoir) el Gr *phônê* "sono; voĉo" (vd. *fonetiko*) k *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*). Kp spec. *gramofono* (speco de fonografa aparato), kies nomo estas kvazaŭa inversigo de tiu ĉi termino.

FONT/O (f; Un): L *fo/ns -ntis*; A *fount* (poet.), I *fonte*, (H *fuente*). La radiko estas krome internacie konata per la derivaĵo *fontan-* (vd. tiun). Samtipaj L stemoj en *monto, ponto*; kp ank. *gento.* ¶ Io =, IeIa *fonte.*

Kredeble par. al Sa *dhánvati* "fluas". Samfamilia vorto en Eo: *fontano.*

FONTAN/O (f; RE): A *fountain*, F *font/aine*, I(H) *-ana*, Po *-anna*, R *-an*, G *Fontäne.* Ps-sf *-an.* La ebla varianto *fonten-* (FG prononco) aperas en 1906 kaj en Io. ¶ 1906ab *fonten-.* ¶ Io *font/eno*, Ie *-ane*, Ia *-ana.*

El L vulg. *fontana (aqua)* "fonta (akvo)", de L *fons* "fonto" (vd. tiun).

FOR (f; Un): A *forth*, G *fort* (Waringhien 1967, 23). Kp. la prefiksojn G *ver-* [f-] (*verlassen* "forlasi"), Ji *far-* (*farvishn* "forviŝi"). Ank. I *fuori* "ekstere" foje proksimiĝas al la signifo de Eo *for* (ekz. *mandar fuori* "forpeli", *fuori!* "for!"). La bazo estante la citita AG adverbo, apokopo de *-t* estis necesa pro ekzisto de alia radiko *fort-*; cetere dukonsonanta fino estus maloportuna por radiko ofte prefikse uzata. La apokopo similigis la radikon al G *ver-*, kies kunmetoj evidente ludis gravan rolon kiel modelo por tiuj kun *for-*. Oni ne povas ekskludi, ke I *fuori* estis konsiderata kiel apogo por la formo sen *t.* ¶ 1882 *for*; 1894 *ab* (< L). ¶ IoIe *for*(espismo); Ia *via* (< I).

Ĝerm. adv. orig. signifanta "antaŭen" (> "de tie ĉi" > "for") el pĜ **fortha-*, de HE bazo **pr-* "antaŭe" (vd. *pro* kaj la sinoptikon sub *por*). Kp. sekv. – (I *fuori* ne estas parenca; kp L *foras* s.s.)

FORGES/I (f; Un): A *forget*, G *vergessen* [f-]. Kompromisa formo inter A (*-o-*) kaj G (*-s-*); simila miksaĵo de A vokalismo kaj G konsonantismo troviĝas en *draŝi, ŝlimo, ŝtono.* ¶ 1881 *ubl-* (< F *oublier*); 1894 *obliv-* (< L *oblivisci*). ¶ IoIe *obliviar*, Ia *oblidar.*

Propr "perdi [ion] el sia posedo", kunm. el pref. A *for-*, G *ver-* (kp *ferdeko*; tie ĉi kun nea signifo) k pĜ **getan* "akiri" (> A *get* "ricevi, akiri"), de HE rad. **ghe(n)d-* "preni" (vd. tiun).

FORĜ/I (f; Un): A *forge* [-ĝ], F *forger* [-ĵ-], (H *forjar* [-ĥ-]). Eo *-ĝ-* respegulas la ortografion de AF sed aludas ankaŭ la molan prononcon en ambaŭ fontlingvoj, vd. *aĝo.* ¶ IoIe *forjar*, Ia *forgiar.*

El L *fabricare*, de *fabrica* "laborejo" (en L vulg. spec. "forĝejo"), vd. *fabriko.*

FORK/O (f; Un): A *fork*, F *fourchette* (kp *fourche* "-ego"), I *forchetta* [-k-] (kp *forca* "-ego"). Kp G *Forke* "-ego", (H *horca* "-ego"). Laŭ Fund, p. 320, la vorto origine estis dusignifa: (1) "fork(et)o (de manĝanto)", (2) "fork(eg)o (de fojnisto)" (tiel Un RPo; nuna signifo ekde la franca traduko en UV); kp ank. PVZ 1b, 17 s. ¶ Io *fork/o* "-ego", *-eto* "forko"; Ie *furca*; Ia *fur/ca* "-o, -ego", *-chetta* "-o".

El L *furca* "forkego".

FORM/O (f; Un): A *form*, F *-e*, IPoR(H) *-a*; G *Form*; L *forma.* ¶ Io =, Ie *form/e*, Ia *-a.*

L *forma* (kun der. *formare* "formi, krei", *formula* "regulo, normo") estas de nekonata origino; prunto de Gr *morphê* s.s. (tiaokaze kun metatezo) estas supozata de kelkaj. Samfamiliaj vortoj en Eo: *form/ala, -ato, -ulo, informi, reformacio, uniformo.*

FORMAL/A (2; letero 89-03, Jü): AG(H) *form/al*, F *-el*, I *-ale*, Po *-alny*, R *-al'nyj.* Ps-sf *-al.*

El L *formalis* "rilata al la formo", de *forma* "formo" (vd. tiun).

FORMAT/O (1; RE): AFPoR *format*, I(H) *-o*, G *Format.*

El L *formatum* "formitaĵo", ptc. perf. de *formare* "formi" (vd. *formo*).

FORMIK/O (f; RE): L *formica*; F *fourmi*, I *formica*, (H *hormiga*). Kp A *formic acid* "-a acido". Zoologia termino bazita sur L. ¶ Io =, Ie *form/ica*, Ia *-ica*.

Malasimilita el HE bazo **mormo-* "formiko", kp Gr *myrmêx*; Po *mrówka*, R *muravej*; Sv *myra*; kp Sa (kun malasimilado) *valmîka* "-ejo".

FORMUL/O (1; RE): AIR *form/ula*, F *-ule*, Po *-ul'a*, G *Formel*, (H *fórmula*). Pri diversaj manieroj trakti L-devenan radikfinon *-ul* en Eo, vd. sub *artikolo*; tie ĉi ĉiuj fontlingvoj krom G prezentas *-ul-*. ¶ Io =, Ie *formul*, Ia *-a*.

El L *formula* "regulo, normo", orig. "formujo, modelo", dim. de *forma* "formo" (vd. tiun).

FORN/O (f; Un): F *four(neau)* [-nó], I *forno*, (H *horno*); L *forn/ax*, *-us*, *furnus*. Kp A *furnace* "-ego". Videble bazita sur LI. ¶ Io =, Ie *forne*, Ia *furno* (ank. "-ego"), *fornace* "-ego".

De HE rad. **gŭher-* "varma" (vd. tiun), kp spec. Sa *ghrná-* "varmo", R *gorn* "fandeja forno".

FORT/A (f; Un): L *fortis*; F *fort*, I *forte* (internacie konata kiel muzika termino), (H *huerte*). Kp A *force* "-o". ¶ Io =, Ie *fort*, Ia *-e*.

Kredeble par. al Sa *brhánt-* "alta, granda, forta" (de HE rad. **bhergh-* "alta", ekz. en G *Berg* "monto"; kp ev. *burĝo*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *fortepiano*, *fortika*, *komforto*.

FORTEPIAN/O (f; RE): AI *pianoforte*, G *Fortepiano*†, Po *fortepian*, R *-o*†. Verŝajne inspirita de la slavaj formoj; la mala ordo de la elementoj (**pianofort-*) povus kaŭzi konfuzon kun la radiko *fort-*. Poste mallongigita (en pluraj fontlingvoj kaj en Eo) al *piano* (vd. tiun). ¶ Ie *forte-piano*, Ia *pianoforte*; en Io nur *piano*.

Farita el I esprimo (Cristofori, ĉ. 1710) *clavicembalo a piano e forte*, t.e. klavara instrumento per kiu oni povas ludi laŭte kaj mallaŭte (kontraste al la konstantaj tonoj de la klavceno). Vd. *forta* k *piano*.

FORTIK/A (f; RE): Neniu evidenta modelo en la fontlingvoj. Supozeble Waringhien pravas dirante (LV 77) ke Z deiris de substantivoj kiel F (kaj A) *fortific/ation* (= I *-azione*, G *Fortifikation*, R *fortifikacija*), farante el tiuj *fortikaĵo*. La transformo de la fontlingva sufikso *-ation* ktp al Ea sufikso *-aĵo* estas sen ekzaktaj paraleloj (Waringhien nomas tiun procedon 'deformo al najbara konsonanto'); iomgrade oni povas kompari *kondiĉo* el L *conditio*. El *fortikaĵo* Z poste tiris la adjektivon *fortik/a*. Restas klarigi la modifon de la elemento *-fic-* al nura *k* (kp *artifik-*, *klasifik-*; *edif-*, *modif-*). Kontribuis sendube deziro eviti la faktitivan signifnuancon kiun portas *-if(ik)-* (rimarku, ke Z evitis adjektivojn kun tiu radikfino: li akceptis nek **magnifik-* nek **pacifik-*). Per la sinkopo *ifik* > *ik* li ricevis radikfinon kun adjektiva pseŭdosufikso, kiun li ofte allasis (vd. la liston de pseŭdosufiksoj). Probable la baza simileco al *fort-* inspiris la uzadon de tiu ĉi adjektivo en pli vasta senco (F ktp *fortification* estas militista termino; kp tamen R *krepost'* "fortik/aĵo, -eco"). ¶ 1894 *solid-*. ¶ Sen ekzakta ekvivalento en la aliaj L.I. (Io *solida*, *ferma*; Ie *solid*, *firm*; Ia *solide*, *robuste*). Kp. Io *fort/reso*, Ie *-eresse*, Ia *-alessa* "fortikaĵo".

El L postkl. *fortificatio* "fort(ik)igo" de *fortificare* "fortigi": *fortis* "forta", *-ficare* kunmeta formo de *facere* "fari" (vd. tiujn).

FORUM/O (2; Jü): L *forum*; AFPoR *for/um*, I(H) *-o*, G *Forum*. La L originformo estas ankaŭ la plej internacia formo de la radiko. Enkorpigita L neŭtra finaĵo *-um* kiel en *albumo*, *maksimumo*, *mediumo*, *minimumo*, *serumo*. ¶ Io =, Ie *fórum*, Ia *foro*.

Orig. signifo "vendplaco" (sur la Roma Forumo oni ankaŭ pritraktis publikajn

aferojn kaj okazigis procesojn), kredeble komence "ĉirkaŭbarejo", de *forus* "tabulo" (HE rad. **bher-* "tranĉi, haki", vd. *bori*).

FOS/I (f; Un; dukateg. *-o/-i* laŭ OA 8): L *fodere* (supina radiko: *foss-*) "-i", *fossa* "-o"; F *fouir* "-i", *fosse* "-o", I *fossa* "-o", (H *foso* "-o"). Kp P *fossar* "-i". Bazita sur la L supina radiko. ¶ Io *fos/o* "-o", *-ifar* "-i"; Ie *foss/e* "-o", *-ar* "-i"; Ia *foder* "-i", *fossa* "-o".

Ev. par. al A *bed*, G *Bett* "lito" (kp *bedo*).

FOSFOR/O (f; RE): A*phosphor/us*, F *-e*, G *Phosphor*, PoR *fosfor*, I *-o*, (H *fósforo*). ¶ Io *fosfo*, Ie *fosfor*, Ia *phosphoro*.

Moderna adapto (17a jc) de Gr *phôsphóros* "lumportanto" (blanka fosforo aperas luma en mallumo) el *phô/s -tós* "lumo" (vd. *fantazio*) k *-phoros*, agantnomo de *phérein* "porti" (vd. *oferi*). Kp spec. *fotograf/i, -io*.

FOST/O (f; RE): G *Pfosten*. Kp A *post*, F *poteau*, (H *poste*); L *postis*. Bazita sur G kun radikkomenca ŝanĝo *pf* > *f* (kiel en *fajfi*, *flegi*, *fuŝi*) kaj ellaso de la finsilabo (tie ĉi probable laŭ AL, sed kp. ank. *groŝo* < G *Groschen*). Diferencigo estis necesa pro la plureco de radikoj internaciaj kun formo *post-* (pri la problemo, vd. *post*). Rimarku la kontrastan traktadon de G *Posten* > Eo *posteno*. ¶ Io =; Ie *pal*, Ia *-o* (< L *palus*).

Probable propr. "elstaraĵo" (< **por-st-is*; pri la unua elemento, vd. *por*, pri la dua, *stari*), kp la idente formitajn Sa *pr-sthám* "pinto", G *First* "tegmentosupro".

FOTEL/O (8; Wü; ne ĉe Z): F *fauteuil* [fotöj], G *Fauteuil*† [=F], Po *fotel*. Kp ank. Nd *fauteuil*, Sv *fåtölj* [fotölj]. F kulturvorto kun certa internacia disvastiĝo. Ortografio laŭ Po (la F formo estis malfacile adaptebla). ¶ Io *stul-ego*, Ie *fotel*, Ia *chaise de bracios* ('brakseĝo'), *confortabile*.

El F ant. *faldestoel*, de ĝerm. origino; propr. "faldseĝo", kp G *falten* "faldi" (vd. tiun) kaj *Stuhl* "seĝo" (vd. sub *stari*).

FOTOGRAF/I (f', 1; RE): A *photograph*, F *-ier*, G *-ieren*, I *fotograf/are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*). – Nomo de koncerna arto: **FOTOGRAFI/O** (8; N-ro 20 1889, Wü; ne ĉe Z; antaŭe *fotograf/ado* Be, *-arto*): A *photograph/y*, F *-ie*, G *Photographie*, I(H) *fotograf/ia*, Po *-ia*, *-ika*, R *-ija*. Ps-sf *-i* 1.

La verbo el A *photograph* "fotografaĵo", farita (1839, de Herschel) el Gr *phô/s -tós* "lumo" (vd. *fosforo*) k *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafi*), do propr. "(io) desegnita per lumo". La artnomo estas farita analoge al aliaj similaj (vd. ekz. *biografio*).

FRAG/O (f; RE): L *fragum*; F *fraise*, I *fragola*, (H *fresa*). Kp ank. Rm *fragâ*. Bazita sur la klasika L vorto kun apogo de I radiko (preferita al L bot. *Fragaria* eble pro mallongeco). ¶ Io =, Ie *fresbere*, Ia *fraga*.

L vorto (de kiu la botanika termino kaj I estas derivitaj) kun necerta etimologio. (La F formo estas krucigita kun *framboise* "frambo".)

FRAGMENT/O (f; RE): AFPo *fragment*, (H *-o*), G *Fragment*, I *frammento*; L *fragmentum*. Ps-sf *-ment*.

Propr. "rompitaĵo", de L *frangere* "rompi" (baza rad.: *frag-*; supina rad.: *fract-*), de HE rad. **bhreg-* "rompi", kp A *break*, G *brechen* "rompi" (vd. *brečo*, *briko*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *frakcio*, *frangolo*, kp ank. *frakasi*.

FRAJ/O (f; EG): A *fry* [fraj], F *frai*, I *fregola*, (H *freza*). Formo reprezentanta samtempe A prononcon kaj F ortografion. ¶ Io *frayo*, Ie *fraye*, Ia *ovos de pisce*.

El F *frayer* "-i", en F ant. "froti" (ĉar la fiŝino frajante frotas la fundon per sia ventro) el L *fricare* "froti", par. al R *brit'* "razi". Kp ev. *froti*.

FRAK/O (f; N-ro 14 1888, RE): FI(H) *frac*, G *Frack*, PoR *frak*. ¶ Io =, Ie *frac*, Ia *frac(k)**.

F modtermino; el A *frock* "robo" el F *froc* "monaĥa kapoto" de ĝerm. origino (Fk **hrok*, kp G *Rock* "jupo").

FRAKAS/I (f; RE): F *fracass/er*, I *-are*. Kp P *fracassar*. ¶ Io *frakasar*, IeIa *fracassar*.

Probable krucigo de L *frangere* "rompi" (vd. *fragmento*) kaj *quassare* "skuegi, dispecigi" (intensa verbo de *quatere* "skui", kp *diskuti*; vd. ank. *ŝuti*).

FRAKCI/O (1; Jü) 1) pol. 2) mat.: AF *fraction* (1, 2), G *Fraktion* (1), I *frazione* (1, 2), Po *frakcja* (1), R *frakcija* (1). Ps-sf *-cio*.

Propr "parto derompita de tutaĵo", el L *fract/io -ionis* "rompo" de *frangere* "rompi" (vd. *fragmento*).

FRAKSEN/O (f; RE): L *fraxinus*; F *frêne*, I *frassino*, (H *fresno*). Botanika termino kun formo bazita sur L, tamen kun vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti asocion al la sufikso *-in* (vd. *abomeni*). ¶ 1894 *fraksin-*. ¶ IoIa *fraxin/o*, Ie *-e*.

L orig. adj.; el HE **bhereg-* "betulo", kp Sa *bhûrjá-*, G *Birke*, R *berëza* (de HE rad. **bhreg-* "brili, blanki", ekz. Sa *bhrâjate* "brilas", R *brezĵit'* "tagiĝi"). En Italio, kie la betulo estas malofta, la nomo transiris al alia arbospeco.

FRAMASON/O (f; EG): A *freemason*, F *franc-macon* [frâmasô], I *frammassone*, PoR *mason*, (H *franc-masón*). Ŝajne bazita sur FI prononco; la unua elemento ne povis havi la formon **frank-* en Eo pro ebla konfuzo kun la radiko *frank-*. ¶ Io = (espismo), Ie *franc-masson*, Ia *francmason*.

A esprimo signifanta "libera masonisto" (A *free*, F *franc* ktp "libera"; kp ank. la laŭvortan G tradukon *Freimaurer*): la framasonismo originas el masonistaj gildoj en Anglujo. Vd. plue *franco* resp. *masoni*.

FRAMB/O (f; RE): F *framboise*, (H *frambuesa*). Bazita sur F kun apokopo de la sufikssimila fino (kp *burĝo* el F *bourgeois*); la vortinterna *o* povis oportune esti transformata en Ean substantivfinaĵon. ¶ Io = (espismo), Ie *frambere*, Ia *frambese*.

F vorto de ĝerm. origino: Fk **brambasi* (F *fr-* sub influo de *fraise* "frago"), kp G *Brombeere* "rubuso", A *broom* "genisto" (komuna origina signifo "dorna" aŭ sim.). (Pri la dua elemento, vd. *bero*.)

FRANC/O (f', 7; Un F): A *Frenchman* (kp *France* "-ujo"), F *Francais* [-s-], G *Franzose* [-ts-], I *francese*, Po *Francuz* [-ts-], R *francuz*, (H *francés*). Kompreneble bazita precipe sur F, sed ankaŭ la aliaj fontlingvoj unuanime apogas formon kun *c*. Kp *franko*. ¶ Io *Franc(ul)o*, Ie *frances/o*, Ia *-e*.

Der. de F *France* "-ujo" el L mez. *Francia* "Frankujo" (la Frankoj estis ĝermana tribo kiu konkeris Francujon en la 5a k 6a jc p. K.) de *Francus* "Franko" (vd. *franko*).

FRAND/a (f; RE): F *friand*. Sinkopo de *-i-* (Szerdahelyi 1987, 135), sendube por eviti hiaton. ¶ 1894 *friand-*. ¶ Ie *friand*, Io *-a*; Ia *delicate, saporose* (< A *savoury*, F *savoureux*, H *sabroso*, I *saporoso*).

Orig. uzata pri personoj ("frandemulo"), ptc. prez. de *frire* "friti" (vd. tiun).

FRANGOL/O (f; RE):L bot. *Rhamnus frangula*; I *frangola*, (H *frángula*). Botanika termino bazita sur L, tamen kun forma influo de I (kp. *garolo*, vd. plue *artikolo*). ¶ 1894 *frangl-*. ¶ Ie *frangul*, Io *-o*; mankas en Ia.

Orig. signifo "rompiĝema" (pro la facile rompebla ligno), de L *frangere* "rompi" (vd. *fragmento*).

FRANĜ/O (f; RE): A *fringe* [-ĝ], F *frange* [-ĵ], G *Franse*, I *frangia* [-ĝ-], Po *fredzla*, (H *franja*). Eo *-ĝ-* redonas kaj la grafismon kaj la molan prononcon de AFI (kp *aĝo*). ¶ Io *franjo*, Ie *frang/e*, Ia *-ia*.

Pere de **frimbia* (kun metatezo de *r*) el L *fimbria* s.s., eble par. al *fibra* "fibro" (vd. tiun).

FRANK/O (f', 1; Du, RE): AF *franc* [A -k], G *Franc* ("franca franko"), *Franken* ("svisa franko"), I(H) *franco*, PoR *frank*. La prononco en la fontlingvoj do unuanime (escepte de F) apogas

frank-, tiel nature kreante diferencigon disde la popolnomo *franc-*. ¶ Io =, (Ie *franc*), Ia *franco.*

F vorto kreita laŭ la L surskribo sur oraj moneroj unue faritaj en 1360 de reĝo Johano II-a: *Francorum Rex* "reĝo de la Frankoj" (el L mez. *Francus* "Franko", kp A *Frank*, G *-e*, el **frank* "Franko"; (kp *franco*). Eble ĉar la Frankoj en sia franca teritorio estis suverenaj, la tribnomo ekhavis la sencon "libera" (F *franc*, IH *-o*; kp AG *frank* "malkaŝema"); tiu sencnuanco troviĝas en la etimoj de *afranki*, *framasono.*

FRAP/I (f; Un): F *frapper.* ¶ Io *frapar*, Ie *frappar*, Ia *colpar* (< I *colpire*).

Eble de ĝerm. origino (kp tiuokaze A *rap* "frapi", G *rappeln* "klaki", onomatopeaj vortoj).

FRAT/O (f, Un): L *frat/er -ris*; F *frère* (kp *fraternel* "-a"), I *fratello.* Kp A *fraternity* "-eco", G *fraternisieren* "interfratiĝi", (H *fraternal* "-a"). Eo *frat-* aperas kiel malasimilita formo de L rad. *fratr-* (vd. PIV s.v. *asimili*); kp kontraŭe Eo *patr-* el L *patr-*. Kiel rektan fonton oni povas konsideri I *frat/ello*, kie *-ello* estas (dim.) sufikso; povas esti, ke ankaŭ R *brat* (praparenca) ludis rolon. ¶ 1881 *fradr-*. ¶ Io *frat-ul-o*, IeIa *fratre.*

El HE **bhrâtêr* "frato", kp Sa *bhrâtar-*, A *brother*, G *Bruder*, PoR *brat*, ank. G *phrâtêr* "ano de (politika) fratularo". La sama HE sufiksoido **-ter* aperas en **mâtêr* "patrino" (vd. *matrono*) k **patêr* "patro" (vd. tiun).

FRAŬL/O (f; Un): Eo *fraŭl-* estas retrograda formaĵo el *fraŭlin-* (f; Un), kiu sin bazas sur G *Fräulein* "fraŭlino" (*Frau* "sinjorino", *-lein* dim. sufikso); evidente la ioma simileco (tute hazarda) de G *-lein* kaj Eo *-in* inspiris Z al tiu procedo. *Fräu-* estas apofonia formo de *Frau*; Z adoptis la vokalismon de tiu lasta. Post apartigo de *-in* restas *le* de la G sufikso: *e* estas forlasita sed *l* konservita, eble kiel utila rimedo eviti la trivokalan sekvon *aŭi.* La deiro de virina formo povas esti pravigita per tio, ke ĝi havas multe pli oftan uzon ol la responda vira. ¶ 1894 *fral-*. ¶ Io *damzelo* "-ino" (< A *damsel* "-ino, knabino", kp F *mademoiselle*), *celibo* "-o" (< L *caelebs*); IeIa *senioretta* "-ino" (propr. "sinjorineto"), Ie *celib/o* "-o", IeIa *celibatario* "-o".

G *Fräulein* el G mez. *frouwelîn*, dim. de *frouwe* "sinjorino", virina formo de pĜ **fraujan-* (Gt *frauja*) "sinjoro, mastro", bazita sur HE **pro-* "antaŭe" (kp *for*, vd. plue *por*); kp semantike *princo.*

FRAZ/O (1; Be): AF *phrase* [-z], G *Phrase*, I(H) *frase* [I -z-], Po *frazes*, R *fraza.* Ps-sf *-z.*

El gr *phrásis* "esprimo", de *phrázein* "indiki, deklari (ktp)".

FREGAT/O (1; Be): A *frigate*, F *frégate*, G *Fregatte*, R *fregat*, IPo *-a*, (H *fragata*). ¶ Io =, Ie *fregatte*, Ia *fregata**.

I ŝiptermino de nekonata origino.

FREMD/A (f; RE): G *fremd.* Kp ank. Da *fremmed*, Nd *vreemd* [f-]. Tiu ĝermana radiko 'provizas utilan diferencigitan sinonimon de *strang*' (Collinson 1959, 8). ¶ 1881 *frind-* (sama etimo); 1894 *alien-* (< A *alien*, L *-us*). ¶ Io *stranjera*, Ie *extran*, Ia *estranie* (ank. "stranga"); kp *stranga.*

Kp Gt *framaths* s.s., orig. "fora, malproksima", de la radiko en Gt *fram* "for de", A *from* "de" (bazita sur HE **pro-* "antaŭ(e)"; kp *for*, vd. plue *por*).

FRENEZ/o (f; RE): A *frenzy* (kp *frenzied* "-a"), F *frénésie* [-z-], I *frenesia* [-z-], (H *frenesí*). Kvankam oficialigita kiel adjektiva, la radiko videble baziĝas sur la FI substantivo (kun apokopita *-i-* same kiel en *herezo*). En tiuj du fontlingvoj signifanta "furioz(ec)o", la vorto alprenis en Eo pli vastan semantikan sferon ("mensa malsaĝo"), eble laŭ modelo de A ("furiozeco; frenezo").¶ 1894 *frenes-*. ¶ Io *fola* (< F *fou*, I *folle*), *dementa* (< L *demens*); Ie *folli*, *dement*; Ia *folle*, *demente.*

El L *phrenesis* "freneza deliro", grekdevena paralelformo al Gr *phrenítis* "cerba inflamo" (kun der. *phrenitismós* "deliro, frenezo") de *phrên* "menso; diafragmo".

FRESK/O (2; Be): A(H) *fresco*, F *fresque* [-k], G *Freske*, I *affresco*, Po *fresk*, R *-a*. ¶ Io =, IeIa *fresco*.

El I esprimo *dipingere a fresco* "pentri sur freŝa (t.e. ankoraŭ malseka) [stukaĵo]"; vd. la etimologie identan *freŝa*.

FREŜ/A (f; Un): A *fresh* [-ŝ], F *frais* (ingenra formo: *fraîche* [freŝ]), G *frisch* [-ŝ], I(H) *fresco*. La Ea formo respegulas la A ortografion kaj la AF prononcon. ¶ 1894 *fresk-*. ¶ Io *fresha*, Ie *frisc*, Ia *fresc*.

El pĜ **friska-*, par. al R *presnyj* "dolĉa, freŝa (pri akvo)". Etimologie identa vorto en Eo: *fresko*.

FRING/O (f; RE): L *fringilla* (L zool. *Fringilla caelebs*); I *fringuello*.

El la L zoologia termino Z faris du radikojn por nomi du speciojn de la genro *Fringilla*: (1) *fringel-* (vd. sekv.), (2) *fring-* (per apokopo de la lasta silabo; "laŭ AG", Wüster Esp. princ. 53: evidente Wüster sugestas, ke la formoj A *finch*, G *Fink* inspiris al Z tiun mallongigon). Oni povas kompari *ĉif-* kaj *ĉifon-*, ambaŭ el F *chiffon*. ¶ Io *finko*; Ie *pinson* (< F), Ia *pincion*.

Vd. la etimologie identan *fringelo*.

FRINGEL/O (f; RE): L zool. *Fringilla spinus* (nuntempe: *Carduelis spinus*). Kp P *fringilo*. Probable por eviti la sufikssimilan finon *-il*, Z ŝanĝis *i* al *e* (tie ĉi kun ebla apogo de I *fringuello*, vd. sub *fringo*), cetere ne malofta procedo en sciencaj Eo-terminoj (Waringhien 1967, 47): kp spec. *makzelo* < L *maxilla*, *mirtelo* < L *myrtillus*. Ĝemela radiko: *fringo*, vd. tiun. ¶ Io *serino* (< F *serin*), Ie *fringille*, Ia *fringilla**.

Kaj L kaj la ĝermanaj nomoj (vd. sub *fringo*) baziĝas sur la voksono *'pink pink'* de la fringo. Kp Gr *spíngos* "fringo".

FRIPON/O (f; RE): F *fripon*. Ps-sf *-on*. ¶ 1881 *vóri/o* (< F *vaurien*: PVZ 5, 150). ¶ Io =, Ie *fripon*; Ia *picaro* (< H).

De F *friper* "engluti" (> "ŝteli").

FRIS/O (2; Jü): A *frieze*, F *frise*, G *Fries*, I *fregio*, Po *fryz*, R *friz*, (H *friso*). Atendata Eo-formo **friz/o* estis neebla pro la jam ekzistanta *friz/i*. ¶ Io =, Ie *frise*, Ia *fris(i)o**.

Kredeble pere de L mez. *frisium* el L *phrygium (opus)* "laborajo el Frigio" (oni importis el Frigio orbroditajn ŝtofojn; la arĥitektura ornamajo povis esti komparata kun tia brodajo). Por klarigi la formon de F (kaj, nerekte, tiujn de AGHPoR) oni supozas kruciĝon kun F *friser* "krispigi" (vd. *frizi*).

FRIT/I (1; Be): A *fry*, F *frire* (ptc. perf.: *frit*), I *friggere* (ptc. perf.: *fritto*), (H *freir*, ptc. perf.: *frito*). Bazita sur la ptc. perf., kiu havas identan formon en FI(H), dum la infinitivo ne prezentas unuforman alternativon. ¶ Io *fritar*, Ie *frir*, Ia *friger*.

El L *frigere* "rosti", de HE rad. **bhreg-* s.s., kp Sa *bhrjjáti* "rostas", G *phrygein* "rosti". Samfamilia radiko en Eo: *franda*.

FRIVOL/A (1; Jü): G *frivol*, A *-ous*, F *-e*, I(H) *-o*, R *-'nyj*; Po *friwolny*.

El L *frivolus* "senvalora", orig. "rompiĝema", kunligita kun *friare* "dispecigi" (kaj *fricare* "froti", vd. s.t.v.).

FRIZ/I (f; RE): A *friz(z)*, *-le*, F *friser* [-z-], G *frisieren* [-z-], (H *rizar*). ¶ 1894 *fris-*. ¶ Io *frizar*, Ie *friser*; Ia *pectinar* (< L *pectinare*, propr. "kombi").

F moda termino, eble de ĝerm. origino.

FROMAĜ/O (f; Un): F *fromage* [-áj], I *formaggio* [-ĝ-]. Gastronomia termino bazita sur F. Ps-sf *-aĝ*. ¶ 1894 *fromag-*. ¶ Io *fromajo*; IeIa *caseo* (< L *caseus*).

El L vulg. *formaticum*, orig. pri fromaĝo farita en formujo, der. de L *forma* en la senco "formujo" (vd. *formo*).

FRONT/O (f; RE): AFPoR *front*, I *-e*, G *Front*, (H *frente*); L *fro/ns -ntis*. Kp la ĝemelan vorton *frunto*, diferencigitan disde tiu ĉi. Pri aliaj Eaj vortoj de la

sama L tipo, vd. *fonto*. ¶ Io =, IeIa *fronte*.

L vorto ("fronto, frunto") kun necerta etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *frontono, frunto*.

FRONTON/O (1; Jü): AFPoR *fronton*, I *-e*. Ps-sf *-on*. ¶ Io =, IeIa *fronton*.

I ark. termino, de *fronte* "fronto" (vd. tiun).

FROST/O (f; Un): A *frost*, G *Frost*. Kp ank. Sv *frost*. Unu el pluraj ĝermandevenaj veterterminoj en Eo (vd. sub *vetero*; kp Collinson 1959, 7). ¶ 1894 *gel-* (< L *gelu*). ¶ Io =; Ie *gela*, Ia *gelo*.

El pĜ **frustaz*, subst. responda al la verbo **freusan* "frosti", kp A *freeze*, G *frieren*. De HE rad. **preus-* "frosti": Sa *prušvá* "prujno", L *pruina* "prujno" (kp. tiun).

FROT/I (f; Un):F *frott/er*, G *-ieren*†, I *fregare*, (H *frotar*). Bazita sur F, kies formo iom disvastiĝis internacie. ¶ 1894 *frig-* (< L *fricare*). ¶ Io *frotar*, Ie *frottar*, Ia *fricar*.

Probable el L *fricare* s.s. (> I), kvankam la fonetika šanĝo restas neklarigita. Kp ev. *frajo*.

FRU/A (f; Un): G *früh*. Kp ank. Nd *vroeg* [fru-]. G *ü* > Eo *u* (Szerdahelyi 1987, 123), kp *flustri*. Collinson konstatas (1959, 8): 'Ne ekzistas unuvorta romana ekvivalento de *fru*...ĉar kelkaj lingvoj uzas frazon kiel I di buon'ora aŭ F de bonne heure, kvankam H havas temprano'. ¶ 1894 *prekoc-* (< L *praecox* "frumatura"). ¶ Io = (espismo); Ie *tost* (kp F *tôt* "frue", I *tosto* "tuj"), *temporan*; Ia *de bon hora*.

Par. al Gr *prôí* "frue", Sa *prâtár* "frumatene" (el HE **pro* "frue" de la bazo **pr-* "antaŭ, -e"; vd. *for* kaj *por*).

FRUGILEG/O (f; RE): L zool. *Corvus frugilegus*. Zoologia termino prenita el L. ¶ Io =, Ia *grande corvo**; mankas en Ie.

Termino kunmetita de Lineo, signifanta "korvo frukto- (t.e. semo-)kolektanta": L *fru/x -gis* "frukto" (vd. tiun), *legere* "kolekti, pluki" (vd. *legi*), kp *akvilegio*.

FRUKT/O (f; Un): AF *fruit* (kp A *fructi/fy*, F *-fier* "-i"), G *Frucht*, I *frutto*, R *frukt*, (H *fruto*); L *fructus*. Bazita sur L, el kiu la aliaj formoj evoluis. ¶ Io =, Ie *fruct/e*, Ia *-o*.

L vorto signifanta "frukto (de arbo); produkto; ĝuado, uzado (de kampoj ktp)", subst. de *frui* "ĝui, uzi, posedi"; kp *frux* "frukto (de tero)" (vd. *frugilego*), de HE rad. **bhrug-* "ĝui, uzi", ank. ekz. en G *brauchen* "uzi".

FRUNT/O (f; Un): F *front*, I *-e*, (H *frente*); L *fro/ns -ntis*. Z šanĝis la vokalon *o* de la fontlingvoj al *u* por diferencigi la anatomian sencon disde la pli ĝenerala nocio *front/o* ("antaŭaĵo"). Kp Wiener 1950, 100 s.: "Arbitra diferencigo de la sama vorto (latine frons, frontis). La angla kaj la germana lingvoj uzas aliajn vortojn por b) [frunto] (forehead, Stirn), sed la franca ne diferencigas (front)." Kredeble Z tie ĉi aplikis duoblecon *o/u*, kiu ekzistas en multaj vortoj de la fontlingvoj kaj kiun li plurfoje uzis por eviti homonimojn (ekz. *fondi:fundo, mosko:musko, provi:pruvi*). ¶ 1894 *front-* (rezigno de la diferencigo). ¶ En IoIeIa ne ekzistas tiu ĉi diferencigo; vd. la formojn sub *fronto*.

Etimologie identa kun *fronto*, vd. tiun.

FTIZ/O (f; RE): A *phthis/is*, F *-ie* [-z-], G *Phthisis*†, I *tisi* [-z-], (H *tisis*); L *phthisis*. Ps-sf *-z*. ¶ 1894 *ftis-*. ¶ Io *ftizio*, Ie *ftise*, Ia *phthisis*.

El Gr *phthísis* s.s., propr. "konsumiĝo, forvelkado", de *phtínein* "forvelki, malaperi", par. al Sa *kšináti* "detruas".

FUĜ/I (8; Wü; *fug/i* Z): F *fuir*, I *fuggire* [-ĝ-], (H *huir*); L *fugere*. Kp ank. P *fugir*. Šajne inspirita de la I prononco; envere la radiko probable estas ekstraktita el *rifuĝi* per forpreno de la prefiksoido. Per la formo *fuĝ-* oni ankaŭ evitis homonimecon al eo *fug/o* (muz.). La Z-a formo baziĝas sur L (Z

eble ne vidis homonimproblemon en tiu ĉi radiko, ĉar ankaŭ la muzika termino devenas de L *fuga* "fuĝo"). ¶ Io *fugar*, Ie*la *fugir*.

L *fugere* estas identa al Gr *pheúgein*, *phygeín* "fuĝi" kaj Li *bugti* "ektimi".

FUK/O (2; Wü): L *fucus*; F *fuc/us*, I(H) *-o*. Botanika termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *fuc*, Ia *fuco**.

El Gr *phykos* "fuko; ŝminko (fabrikita el fuko)", vorto pruntita el semida lingvo (kp He *pûk* "ŝminko; farbi").

FULG/O (f; RE): L *fulig/o -inis*; I *fuliggine*. Kp F *fuligin/eux* (H *-oso*) "-eca"; ank. P *fuligem* "-o". L substantivo de la tipo *-o/-inis* normale rezultiĝas en Ea subst. kiu egalas al la L nominativo (kp *hirudo, hirundo, homo, kartilago, lanugo, lentugo, plantago, testudo*). En tiu ĉi radiko okazis sinkopo de *-i-*, evidente por eviti sufikssimilan radikfinon. ¶ 1894 *fulig-*. ¶ Io *fuligin/o*, Ia *-e*, Ie *fulígine*.

El HE **dhûli-* "polvo aŭ sim.", kp Sa *dhûlî* "polvo", Li *dúlis* "nebulo" (rad. **dhû-*, vd. *fumo*).

FULM/O (f; Un): L *ful/men -minis*; I *fulmine*. Kp F *fulmin/er* "eksplodi", (H *-ar* "fulmofrapi"). Bazita sur L; mallonga formo kiel en *bitumo, ĝermo, krimo, lumo, nomo, pronomo, reĝimo*; kp kontraste *ekzameno*. ¶ 1894 *fulmin-*. ¶ Io *fulmin/o*, Ia *-e*, Ie *fúlmine*.

De L *fulgere* "fulmi, brili"; de HE rad. **bhelg-* "brili" (vd. *flagri, flamo*); G *Blitz* "fulmo" estas praparenca.

FUM/O (f; Un): L *fumus*; F *fumée*, I *fumo*, (H *humo*). Kp A *fume* "haladzo, fumo". ¶ IoIa =, Ie *fum*.

El HE **dhûmos* s.s., kp Sa *dhûmá-* "fumo"; Gr *thymós* "animo, pasio" (< "spiro" < "fumo", kp semantike *animo*), *thymon* "timiano" (vd. tiun); R *dym* "fumo"; de rad. **dhû-* "kirliĝi, vapori, boli k.s.", kp Gr *thyein* "oferi (bruligante ion)", A *dust* "polvo", G *Dunst* "vaporo, haladzo"; vd. ank. sub *fulgo*. Kp spec. *parfumo*.

FUND/O (f; Un): L *fundus*; F *fond*, I(H) *-o*. Kp P *fundo*. L vokalismo diferencigas tiun ĉi radikon disde *fond-* (kp tiun). ¶ IoIa =, Ie *funde*.

El HE **bhudhno-* "fundo", kp Sa *budhná-* "grundo", PoR *dno* "fundo", A *bottom* "fundo", G *Boden* "grundo, fundo". Samfamiliaj vortoj en Eo: *fono, fondi, fundamento, profunda*.

FUNDAMENT/O (f; Ald, RE): APoR *fundament*, (H *-o*), F *fondement* (kp *fondamental* "-a), G *Fundament*; L *fundamentum*. Ps-sf *-ment*.

Propr "fondaĵo", de L *fundare* "fondi" (vd. tiun); kp la antaŭan.

FUNEBR/A (f; RE): F *funèbre*, I *funebre*, (H *fúnebre*); L *funebris*. ¶ Io *funer-ala* (vd. sube), *traur-ala* (kp G *Trauer* "funebro"); Ie *funebr/i*, Ia *-e*.

De L *fun/us -eris* "enteriga ceremonio, funebra procesio" (kp A *funeral* "funebra solenaĵo").

FUNEL/O (f; RE): A *funnel*. Kp P *funil*. Analoga estas *barelo* < A *barrel*. ¶ Io =, Ie *funel*; Ia *infundibulo* (< L, vd. sube).

Pere de Oc el L *(in)fundibulum* s.s., propr. "(en)verŝilo" de *(in)fundere* "(en)verŝi" (vd. *konfuza*).

FUNG/O (f; RE): L *fungus*; A *fung/us*, I *-o*, (H *hongo*). Botanika termino bazita sur L. ¶ IoIeIa =.

El Gr *spóngos* "spongo" (vd. tiun). Kelkaj lingvoj havas la saman vorton por 'fungo' kaj 'spongo' (evidente pro la porozeco de ambaŭ), ekz. Sv *svamp*.

FUNKCI/O (1; Du, Be): A *fun/ction*, I *-zione*, (H *-ción*), F *fonction*, G *Funktion*, Po *funk/cja*, R *-cija*. Ps-sf *-cio*. ¶ Io *funciono*, IeIa *function*.

El L *funct/io -ionis* "plenumo, efektivigo", de *fungi* "plenumi, finfari, prizorgi; ĝui ĝisfine", probable par. al Sa *bhunkté* "ĝuas".

FUNT/O (f; RE): A *pound*, G *Pfund* [pfunt], PoR *funt*. Kp Ji *funt*. Z utiligis

la slavan formon (plus G, ĉar G *pf-* donas en Eo *f-*, kp *fajfi, flegi, fuŝi*) por krei radikon diferencan de *pund/o* (monero). Kp Wiener 1950, 100: "La angla kaj la germana ('Pfund') lingvoj uzas la samajn vortojn por ambaŭ signifoj: 'pund' estas alsimiligita al la angla, 'funt' al la germana prononcoj. Pasante mi rimarkigas, ke ankaŭ la franca lingvo uzas la saman esprimon por ambaŭ signifoj ('la livre'). La ekspliko estas kompreneble, ke en pli fruaj tempoj la valoro de mono estis indikata laŭ ĝia pezo." ¶ Io *"pfund", mi-kilogramo*; Ie *pund*, Ia *libra* (< L), ambaŭ ank. "pundo".

El L *pondo* s.s., propr. "en pezo, pezanta [tiom]", abl. de *pondus* "pezilo; pezo", de *pendere* "pesi" (vd. tiun).

FURAĜ/O (f; RE): A *for/age*, I *-aggio*, F *fourage* [-u-], G *Fourage*†, Po *fur/az'*, R *-aj*, (H *forraje*). Bazita sur FPo. Ps-sf *-aĝ*. ¶ 1894 *furag-*. ¶ Io *forejo*, IeIa *forrage*.

De F *feurre* "pajlo" el Fk **fodar*, kp A *fodder*, G *Futter* "furaĝo" (pĜ **fothra-*, de HE rad. **pa-* "nutri", vd. *paŝti*).

FURI/O (1; RE): A *fur/y*, F *-ie*, IPo(H) *-ia*, R *-ija*, G *Furie*, L *furia*. ¶ Io *furi/o*, Ie *-e*, Ia *-a*.

Orig. "furiozo" (la vorto havas ankaŭ tiun sencon en AFHI), vd. *furoro*. Kp spec. sekv.

FURIOZ/A (f; RE): A *furi/ous*, F *-eux*, I(H) *-oso*; L *furiosus*. Ps-sf *-oz*. ¶ Io *furi-oza*, Ie *furios/i*, Ia *-er*.

De L *furia* "furiozo", kp. *furio, furoro*.

FUROR/O (3; Wü): AI *fur/ore*, F *-eur*, Po *-ora*, R(H) *-or*, G *Furore*. Ps-sf *-or* 2. ¶ Io *suces-ego*, Ie *furore*; ne en Ia (*furor* "furiozo, frenezo").

El L *furor* "furiozo; raviteco, entuziasmego", de *furere* "furiozi, frenezi" kun pluraj eblaj etimologioj (ev. par. al R *burja* "ŝtormo"). Samfamiliaj vortoj en Eo: *furio, furioza*.

FURUNK/O (f; RE): A *fur/uncle*, F *-oncle*, I *-oncolo*, Po *-unkul'*, R *-unkul*, (H *-únculo*), G *Furunkel*; L *furunculus*. El multaj manieroj adapti la L vortfinon *-ulus* (*-ula, -ulum*), tiu ĉi estas la plej radikala: apokopo de la tuta sufikso (aplikata nur se la antaŭa radiko estas dusilaba; pri analogaj kazoj, vd. sub *artikolo*). ¶ 1894 *furunkl-*. ¶ Io *fur/unklo*, Ie *-uncul*, Ia *-unculo*.

Orig. "ŝtelisteto, friponeto" (> "forprenanto de sano"), dim. de L *fur* "ŝtelisto" (kp Gr *phôr* s.s.), orig. "(for)portanto", de *ferre* "porti" (vd. *oferi*).

FUSTEN/O (f; RE): A *fust/ian*, I *-agno*, (H *-án*), F *futaine* [-ên]. Eo *-en* (kun vokalŝanĝo de fontlingva *a* > *e*) celas eviti sufikssimilan radikfinon; ĝi havas apogon en la F prononco. ¶ Io =, Ie *fustan/e*, Ia *-io**.

El L mez. *fustane/um, -a* s.s., propr. "ligna (lano)", de L *fustis* "ŝtipo" (vd. *afusto*). Kp semantike G *Baumwolle* "kotono", propr. "arba lano".

FUŜ/I (f; RE): G *pfuschen*, Po *fuszerowac'* [fuŝ-] (kp *fuszer* "fuŝulo"). Kp ank. Sv *fuska*. G *pf-* > Eo *f-* kiel en *fajfi, flegi, fosto, funto* (tie ĉi kun apogo de Po same kiel ĉe *funt-*). ¶ 1894 *fuc-*. ¶ Io *fushar* (espismo); Ie *bosillar* (< F *bousiller*); neniu ekvivalento en Ia (*facer inhabilmente* "fari nelerte" k.s.).

G vorto, eble originanta en interjekcio malplivaloriga.

FUT/O (f; RE): A *foot* [fut], G *Fuss*, R *fut*. El inter la fontlingvoj, nur R diferencigas 'futo' disde 'piedo'; Z supozeble estis inspirita de R fari tiun distingon. Neniu diferencigo en IoIeIa. – Apartenas do al tiu kategorio de radikoj, kie Z utiligis kaj ĝermanan kaj romanan formojn; vd. liston sub *farbo*. ¶ 1894 *ped-*.

Propr "piedo" (> "piedlongo") el pĜ **fot-*; vd. la etimologie identan *piedo*.

G

GAD/O (f; RE): L zool. *Gadus.* Kp P *gado.*Zoologia termino prenita el L. ¶ 1894 *merluc-* (nomo reprezentanta alian genron de gadedoj, L zool. *Merlucius,* kp eo *merluĉ/o* PIV). ¶ IoIa *gad/o,* Ie *-e.*

El Gr *gádos* "gado, (precipe:) merlango".

GAJ/A (f; Un): A *gay,* F *gai,* I *-o.* Eo *aj* reprezentas la I prononcon sed ankaŭ aludas la AF ortografion. ¶ 1882 *gav/a* (< L *gavisus,* PVZ 5, 136). ¶ Io *gaya,* Ie *gay,* Ia *gai.*

El Oc *gai* "gaja, vigla".

GAJL/O (f; RE; kp *gal/pom/o* N-ro 15 1888): A *gall-nut* (*nut* "nukso"), F *noix de galle* (*noix* "nukso"), G *Gallapfel* (*Apfel* "pomo"), I *noce di galla* (*noce* "nukso"), Po *galas,* (H *agalla*); L *galla.* La fontlingvoj montras al radiko **gal-*; ĉar tiu sonkombino jam estis okupita per alia signifo, Z traktis *ll* analoge al la kazoj kun moligita [l']-sono (cetere H *agalla* kaj P *galha* enhavas tiun sonon!), kiun li transskribis per *jl* (kp *ajlo, emajlo, kanajlo, pajlo*). ¶ 1894 *gal-.* ¶ Io *galo,* Ie *galle;* mankas en Ia.

Probable de HE rad. **gel-* "buligi" (vd. *globo*).

GAJN/I (f; Un): A *gain,* F *gagner* [-n'-], I *guadagnare* [-n'-], H *ganar.* La Ea formo precipe respegulas la A ortografion (kp. *hajli, najlo*) sed ankaŭ ŝajne reprezentas la moligitan [n']-sonon de FI (*jn* estas unika, sed komparu *jl* por [l'], vd. *gajlo*). ¶ 1894 *gan-.* ¶ Io *ganar,* IeIa *ganiar.*

El ĝerm. (Franka) **waidanjan* "serĉi nutraĵon" (semantika evoluo: > "akiri rabaĵon" > "profiti" > "gajni"), kp G *weiden* "paŝt(iĝ)i", kredeble par. al L *venari* "ĉasi", Sa *véti* "alstrebas, persekutas". Por rom. *g-* el ĝerm. *w-,* vd. *gardi.*

GAL/O (f; RE): A *gall,* G *Galle.* Kp ank. Sv *galla.* (Pri homonima kolizio kun *gajl-,* vd. tiun.) ¶ 1894 *fel-* (< L *fel*). ¶ Io *bil/o,* Ie *-ie,* Ia *-e* (< L *bilis,* F *bile*).

El pĜ **gallôn-* de HE bazo **ghel-,* kp L *fel,* Gr *kholê* (kp *ĥolero, kolera*), Po *z'ol'c',* R *ƶëlč.* La galo havas sian nomon pro la flava koloro (HE rad. **ghel-* "flava", ekz. en A *yellow* "flava", G *gelb* "flava", AG *gold* "oro", R *zoloto* "oro", Sa *hári-* "flavbruna". Vd. ank. sub *glaso.*

GALANT/O (2; Wü): L bot. *Galanthus.* Botanika termino prenita el L. – (Homonima radiko eo *galant/a* sin trudis pro internacieco, vd. sub sekv.) ¶ Io *niveolo* (< F *nivéole*), Ie *nivale* (< L specinomo *nivalis*); Ia *galantho*.*

Termino (de Lineo) aludanta la koloron de la floroj: Gr *gála* "lakto" (vd. tiun) k *ánthos* "floro" (vd. *antologio*).

GALANTERI/O (f; RE): Po *galanter/-ia,* R *-eja;* kp G *Galanteriewaren* (*Waren* "varoj"); ank. Sv *galanterivaror* (*varor* "varoj"). Radiko forme internacia (kp

ank. A *gallantry*, F *galanter/ie*, I *-ia* "galant/eco, -aĵoj") sed semantike baziĝanta sur la slavaj lingvoj. Ps-sf *-eri*. ¶ Io (Jacob) *mercero* (< F *mercerie*), *galantajo*; neniu ekvivalento en la aliaj L.I.: Ie *galanter/ie*, I *-ia* signifas "galanteco".

F subst. der. de adj. *galant* "rafinite ĝentila al virinoj" (> A *gallant*, G *galant*, HI *-e*, R *-nyj*, ank. eo *galant/a* Bat, Wü), ptc. prez. de F ant. *galer* "amuziĝi" (kp FHI *gala* "festo, parado") de ĝerm. orig. (ev. Fk **wala* "bone", kp A *well* s.s.).

GALANTIN/O (2; Be): AF *galant/ine*, I(H) *-ina*, Po *-yna*, R *-in*. Radikfina *-in* konservita, eble por eviti troan similecon al *gelaten-*. ¶ Io *galanteno*; Ie *gelatine de carne*, Ia *hachato* ("hakaĵo") *in gelatina*.

El L mez. *galantina* s.s., eble varianto de *gelatina* (vd. *gelateno*).

GALER/O (1; Jü): A *galley*, F *galère*, G *Galeere*, IPoR *galera*. ¶ Io =, Ie *galer/e*, Ia *-a*.

I ŝiptermino, varianto de *galea* s.s., el Gr mez. *galéa* "speco de ŝipo", kredeble el Gr *galéê* "speco de fiŝo", orig. "galputoro" (la ŝipo povis esti tiel nomata ĉu per aludo al la fiŝo ĉu pro sia galputoreca rapido), eble par. al L *glis* "gliro, dormomuso".

GALERI/O (f; RE): A *galler/y*, I *-ia*, F *galer/ie*, Po *-ia*, R *-eja*, (H *-ía*), G *Galerie*. ¶ Io =, Ie *galeri/e*, Ia *-a*.

I arkitektura termino, orig. "antaŭhalo de preĝejo", kredeble (kun sufiksŝanĝo) el L mez. *galilaea* "portiko de preĝejo", verŝajne laŭ la landnomo *Galilaea* "Galileo" (ekster la preĝejo, same kiel Galileo estis ekster la religia centro Judeo!).

GALON/O (f; RE): A *galloon*, FPo *galon*, I *gallone*, R *galun*, (H *galón*). Kp G *galonieren* "-i". ¶ Io =, IeIa *galon*.

F vestaĵa termino, de *galonner*, en F ant. "ornami la hararon per rubandoj".

GALOP/O (1; RE): A *gallop*, FPoR *galop*, (H *-e*), G *Galopp*, I *galoppo*. ¶ IoIa =, Ie *galoppe*.

De F *galoper* "-i", el Fk **walahlaupan* "bone kuri" (por la unua elemento, kp G *wohl*, A *well* "bone"; por la dua, kp G *laufen* "kuri", A *leap* "salti"). Por rom. *g-* el ĝerm. *w-*, vd. *gardi*.

GALOŜ/O (f; RE): A *gal/osh* [-ŝ], F *-oche* [-ŝ], I *-oscia* [-ŝ-], R *-oŝa*, (H *-ocha*), G *Galosche* [-ŝ-], Po *kalosz* [-ŝ]. ¶ 1894 *galoc-*. ¶ Io *gal/osho*, Ie *-oche*, Ia *-ocha*.

F vestaĵa termino, orig. "ligna ŝuo", de pridisputata origino (transformo de L *gallicula*, dim. de *gallica* "gaŭla sandalo"? pere de L el Gr *kalópous* "botoŝtipo": *kálon* "ligno", *pous* "piedo"?).

GAM/O (f; RE): A *gamut*, F *gamm/e*, I *-a*, PoR(H) *gama*. ¶ Io =, Ie *gamm/e*, Ia *-a*.

El Gr *gámma*, nomo de la tria litero en la greka alfabeto, vorto aplikita de Guido d'Arezzo (ĉ. 1000) por marki la unuan noton de la gamo kaj poste la tutan gamon.

GAMAŜ/O (f:; RE): G *Gamasche* [-ŝ-], Po *kamasz* [-ŝ], R *gamaŝa*. ¶ 1894 *gamac-*. ¶ Io *getro* (< F *guêtre*), Ie *gamache*; mankas en Ia.

Pere de F *gamache*† "surŝtrumpo butonumebla" el H *guadamecí* "ledo tanita kaj ornamita per desegnaĵoj" el Ar *gadâmasî* "(ledo) el Gadamas (en Tripolio)".

GANGLI/O (1; Be): AF *gangl/ion*, I(H) *-io*, R *-ij*, G *Ganglion*; L med. *ganglion*. Ĉe la elekto inter *-i/o* kaj *-ion/o*, Z preferis la mallongan formon same kiel en *embri/o* (vd. tiun). Rimarku Briquet 1932 *ganglion/o* en specialigita senco, por kiu la fontlingvoj posedas nur duvortajn esprimojn (F *ganglion lymphatique* ktp). ¶ Io *gangl/iono*, IeIa *-ion*.

El Gr *ganglíon* "tendena tumoro" (la nervaj nodoj estis komparataj al tiaj tumoroj).

GANGREN/O (1; RE): A *gangr/ene*, F *-ène*, PoR(H) *-ena*, G *Gangrän(e)*, I *cancrena*; L *gangraena*. ¶ Io =, Ie *gangren*, Ia *-a*.

El Gr *gángraina* s.s. (kun intensige duobligita radiko), kredeble par. al *gráo* "(mi) manĝas, rodas", kp Sa *grásati* "forglutas".

GANT/O (f; Un): F *gant*, I *guant/o*, (H *-e*). Kp A *gauntlet* "(fer)ganto". Vestaĵa termino bazita sur F. ¶ Io =, Ie *gante*, Ia *guanto*.

F vorto de ĝerm. origino (Fk **wanth*, kp Sv *vante* "trikita ganto": pĜ **wantuz*, eble par. al la vortoj cititaj sub *vindi*.

Por rom. *g-* el ĝerm. *w-*, vd. *gardi*.

GARAĜ/O (8; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *aŭtomobil/ej/o*, *aŭtomobil/a remiz/o*): AFI *garage*, G *Garage*, (H *garaje*). Ps-sf *-aĝ*. ¶ Io *gar-eyo*; IeIa *garage*.

Orig. "ŝirmejo", de F *garer* "protekti, ŝirmi" el Fk **warôn*, kp G *wahren* "gardi", *bewahren* "konservi"; vd. plue sub *gardi*.

GARANTI/O (f; RE): A *guarantee* [*u* neprononcata], F *garant/ie*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Garantie*, I *garanzia* (kp *garantire* "-i"), Po *gwarancja*. Ps-sf *-i* 1. ¶ Io =, Ie *garant/íe*, Ia *-ia*.

De F *garant* "-anto", de ĝerm. origino, nome G ant. *werênto* (kp A kromformon *warrant* "-o, - i"), ptc. prez. de *(gi)wërên* "doni garanti(aĵ)on" (kp G mod. *Gewähr* "-o"). Por rom. *g-* el ĝerm. *w-*, vd. *gardi*.

GARB/O (f; RE): F *gerbe*, G *Garbe*. Kp ank. Nd *garf*. Bazita sur G kun F apogo. ¶ Io =, Ie *garbe*; Ia *fasce* (< L *fascis*, vd. *fasko*).

Orig. probable "manpleno" (kp Sa *grâbhâ* "manpleno"), de HE rad. **ghrebh-* "ek/-preni, -kapti", ekz. en Sa *grbhnáti* "ekprenas", A *grab* "ekpreni".

GARD/I (f; Un): A *guard* [ga-], F *garder*, (H *guardar*). Kp I *guardarsi* "gardi sin". La fontlingvoj prezentas en tiu ĉi vortfamilio parte *g-*, parte *gu-* [gŭ]; Z utiligis ambaŭ, alprenante *gard-* kaj *gvardi-* (kp tiun). Tiu ĉi radiko baziĝas semantike nur sur AF; la komenco *ga-* tiam estas natura (AF prononco, F ortografio). Kp Wiener 1950, 104. ¶ IoIe *gardar*, Ia *guardar*.

Romana vorto de ĝermana origino: pĜ **wardhon*, kp A *ward* "gardi†; zorgato", G *warten* "flegi, varti", de HE rad. **(s)ŭer-* "gardi", kp Sa *varûtâ-* "protektanto"; Gr *horán* "vidi" (kp *panoramo*; semantika evoluo: "gardi" > "atenti" > "observi"); L *vereri* "respekti"; F *garer* (vd. *garaĝo*); A *beware* "sin gardi"; G *wahren* "gardi" (vd. *garaĝo*), *wehren* "defendi", *warnen* "atentigi, averti" (kp *garni*). Parencaj vortoj en Eo: *garaĝo*, *garn/i*, *-ituro*, *-izono*, *gvardio*, *rigardi*; *riverenci*; *varti* (etimologie identa). Aliaj ekzemploj de rom. *g-* el ĝerm. *w-* aperas en *gajni*, *galopo*, *ganto*, *garantio*, kp ank. *gvidi*.

GARDENI/O (1; Be): AIPo(H) *garden/ia*, R *-ija*, F *gardénia*, G *Garden/ia*, *-ie*; L bot. *Gardenia*. Ps-sf *-i* 4. ¶ Io =, Ia *gardenia*; mankas en Ie.

Botanika termino farita (de Lineo) el la nomo de amerika botanikisto Garden (1730–1792).

GARGAR/I (f; RE): F *se gargar/iser*, I *-izzare*, (H *-izar*); L *gargarizare*; ĉiuj "-i la buŝon", dum Z donis al la Ea radiko ankaŭ pli vastan sencon "tralavi". Apokopo de *-iz-*, evidente por eviti asocion al faktitiva signifo, kiun la ps-sf *-iz* havas en *centralizi*, *civilizi*, *mobilizi*. Analoga apokopo okazis en *bapti*. – Kroman apogon la radiko havas (almenaŭ rilate la konsonantismon) en A *gargle*, F *gargouiller*, G *gurgeln* "-i la buŝon". ¶ Io *gargar/ar*, Ie *-isar*, Ia *-isar** "-i la buŝon"; IoIe *rinsar* "tralavi" (< A *rinse*), Ia *re-aquar* "tralavi".

El Gr *gargarízein* "-i la buŝon", onomatopea duobligo de la sama tipo kiel *barbaro*.

GARN/I (3; Jü): A *garn/ish*, F *-ir*, G *-ieren*, Po *-irowac'*, R *-irovat'*, I *guarn/ire*, (H *-ecer*). ¶ Io *garnisar*, Ie *garnir*, Ia *guarnir*.

Romana vorto de ĝerm. origino: pĜ **warnôn* "atentigi (pri io)" (semantika evoluo: > "prepari [por io]" > "ŝirmi" > "ŝirme provizi [per]"), kp A *warn*, G *warnen* "averti"; vd. plue sub *gardi*. Samfamiliaj vortoj en Eo: *garnituro*, *garnizono*.

GARNITUR/O (2; Be): F *garnit/ure*, PoR *-ur*, G *Garnitur*. Ps-sf *-ur*.

Orig. "garnaĵo" (tiel A *garniture*), der. de F *garnir* "garni" (vd. tiun).

GARNIZON/O (1; Jü): A *garrison*, F *garni/son* [-z-], PoR *-zon*, G *Garnison*, I *guarnigione*. ¶ Io =, Ie *garnison*, Ia *guarnition*.

F militista termino, orig. "protekto, ŝirmo", der. de *garnir* "ŝirmi" (vd. *garni*).

GAROL/O (2; Jü; *garul/o* ER): L zool. *Garrulus*. Zoologia termino prenita el L. Kiel ofte en biologiaj terminoj, la L sufikso *-ul(us)* modifiĝis al *-ol* por eviti kolizion kun la homonima Ea sufikso (kp *frangolo, kukolo, lupolo, pirolo, primolo, regolo*; vd. plue sub *artikolo*). Estas rimarkinde, ke Z ne iniciatis tiun ŝanĝon en tiu ĉi radiko (vd. ER 1909). ¶ Io *jeo* (< A *jay*, F *geai*); Ie *garrul*, Ia *-o**.

Termino farita de Lineo, kiu adoptis la L adjektivon *garrulus* "babilema" (pro la babilsimila bleko de tiu birdo) de *garrire* "babili" (de HE rad. **gar-* "voki", kp Gr *gêrys* "voĉo").

GAS/O (f; RE): AI(H) *gas*, FPoR *gaz*, G *Gas*. En la du homonimaj radikoj, kiuj en Eo aperas kiel *gas/o* kaj *gaz/o*, la ortografio de la fontlingvoj montras la vojon al diferencigo: en tiu ĉi radiko, pluraj el ili skribas *s* (kp *gazo*). ¶ Io =, IeIa *gas*.

Kreita komence de la 17a jc de flandra kuracisto van Helmont (1577- 1644) el L *chaos* (< Gr *kháos*), vd. *ĥaoso*. Vd. ekz. Eo-Post 1951, 140.

GAST/O (f; Un): A *guest* [*u* neprononcata], G *Gast*; Po *gos'c'*, R *gost'*. Kp. ank. Sv *gäst*. Bazita sur G, fonetike kaj ortografie pli simpla ol la aliaj cititaj formoj. ¶ 1894 *host-* (< F *hôte*, I *ospite*). ¶ Io =, Ie *gaste*; Ia *hospite*.

Ĝermana (pĜ **gastiz*, kp Gt *gasts*) kaj slava vorto, el (H)E **ghostis* "fremdulo", kp L *hostis* "fremdulo, malamiko", *hosp/es -itis* "gasto". Parencaj vortoj en Eo: *hospitalo, hotelo*.

GAZ/O (1; Be): A *gauze*, F *gaze*, G *Gaze*, I *garza*, PoR *gaz*, (H *gasa*). La ortografio de la fontlingvoj nature rezultigas *-z* en Eo; kp *gaso*. ¶ Io =, Ie *gaz/e*, Ia *-a*.

Ĝenerale klarigata kiel devenanta de la nomo de la urbo *Gaza* (Ar *G'azza*) en Palestino. Oni ankaŭ proponis kiel etimon Ar *qazz* "kruda silko" el Pe *käz'*, *gäz'* s.s.

GAZEL/O (f; EG): AF *gaz/elle*, I *-zella*, Po *-ela*, R *-el'*, G *Gazelle*, (H *gacela*). ¶ Io =, Ie *gazelle*, Ia *gazella**.

El Ar *g'azâl* s.s.

GAZET/O (f; Du, RE): AF *gaz/ette*, I *-zetta*, PoR *-eta*, (H *gaceta*). ¶ Io *jurnalo, revuo*; Ie *gazette*; Ia *jornal, magazine, gazetta**.

Orig. venecia nomo de perioda novaĵletero (16a jc), nomita laŭ la monero *gazeta*, ĉar ĝi kostis unu tian.

GELATEN/O (f; RE): A *gelat/ine*, I(H) *-ina*, F *gélatine*, G *Gelatine*, R *ĵelatin*, Po *z'elatyna*. Eo *g-* laŭ la ortografio de la plimulto de fontlingvoj, kvankam la prononco ĉie estas mola (AI [ĝ], FG-PoR [ĵ]). La samo validas por la plej multaj Eaj radikoj komenciĝantaj per *ge-*, *gi-*; speciale ĉe vortoj de L kaj Gr origino Z preferis sekvi la ortografion. - Sonŝanĝo *i* > *e* ĉe la radikfino por eviti similecon al la virina sufikso; aliaj ĥemiaj ekzemploj: *plateno, rubeno, sukceno* (vd. plue *abomeni*; kp *galantino*). ¶ 1894 *gelatin-*. ¶ Io *gelatin/o*, Ie *-e*, Ia *-a*.

El L nov. *gelatina* s.s., farita el L *gelatus* "glaciigita", ptc. perf. de *gelare* "glaciigi", kp *gelu* "frosto", de HE rad. **gel-* "frostiĝi" en L *glacies* "glacio" (kp tiun); A *cold*, G *kalt* "malvarma". Samfamilia estas ev. *galantino*.

GEM/O (2; Jü): A *gem*, F *-me*, IPoR *-ma* [PoR g-], (H *-a*), G *Gemme* [g-]; L *gemma* [g-]. ¶ Io =, Ie *gemm/e*, Ia *-a*.

L vorto, orig. signifanta "burĝono".

GENCIAN/O (4; Jü): A *gen/tian*, F *-ciane*, I *-ziana* [-ts-], (H *-ciana*), G *Enzian* [-ts-]; L *gentiana* [g-]. Bazita sur F

ortografio; la prononco [-ts-] trovas apogon en GI(L). Ps-sf *-an*. Pri *g-*, kp *gelateno*. ¶ Io =, Ie *gentian/e*, Ia *-a*.

Eble der. de *Gentius*, nomo de iliria reĝo, kiu laŭdire malkovris la specialajn ecojn de tiu planto (Plinio).

GENEALOG/O (7; Wü; antaŭe *genealogi/ist/o*): A *genealog/ist*, I(H) *-ista*, F *généalogiste*, G *Genealoge* [g-], R *genealog* [g-]. Akceptita analoge al aliaj agantnomoj finiĝantaj per *-log*, kvankam la fontlingvoj fakte favoras la derivaĵon per *-ist*. – Sciencnomo: **GENEALOGI/O** (2; RE): A *genealog/y*, I *-ia*, Po *-ia* [g-], R *-ija* [g-], (H *-ía*), F *généalogie*, G *Genealogie* [g-]. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *genealogía* s.s. de *genealogeín* "fari [ies] genealogion" de *genealógos* "genealogo": *geneá* "gento, familio" (kp *gígnesthai* "naskiĝi"; vd. sub *gento*), *-logos* "esploristo" de *légein* "diri, diskuti" (vd. *logiko*).

GENERACI/O (f; RE): A *genera/tion*, I *-zione*, , Po *-cja* [g-], R *-cija* [g-], (H *-ción*), F *génération*, G *Generation* [g-]. Ps-sf *-cio*. ¶ 1894 *generazi-*.

El L *generat/io -ionis* "naskado, produktado" de *generare* "naski, produkti", der. de *gen/us -eris* "raso, gento, sekso, klaso, speco", kp *genere/gignere* "naski" (de HE rad. **gen-*, vd. plue *gento*). Kp spec. *generalo, ĝenerala*.

GENERAL/O (f', 1; RE): APoR(H) *gener/al* [A ĝ-, PoR g-, H ĥ-], I *-ale* [ĝ-], F *général* [ĵ-], G *General* [g-]. Z utiligis la prononcan diversecon en la fontlingvoj, diferencigante *ĝeneral-* (subst., bazita sur GPoR) disde *ĝenerál-* (adj.). Kp Wiener 1950, 101; vd. sub *ĝenerala*. ¶ Io =, Ie *gener/ale*, Ia *-al*.

Mallongigo de la F esprimo *colonel général* "ĝenerala kolonelo" (t.e. oficiro sen limigita komando); pri la adj., vd. *ĝenerala*.

GENI/O (1; Du, RE): A *geni/us*, I(H) *-o*, Po *-usz* [g-], F *génie*, G *Genie*, R *genij* [g-]. ¶ IoIa =, Ie *genie*.

El L *genius* "protektanta spirito" (> "sprito, talento"), orig. personigo de la genera forto, de *genere/gignere* "naski, generi" (kp *generacio*; vd. plue *gento*).

GENIST/O (4; Wü; ne ĉe Z): L *genista* [g-]; F *genêt*, G *Ginster* [g-], I *ginestra*, (H *hiniestra*). Botanika termino prenita el L. ¶ Io *ginesto*, Ie *genista*, Ia *genista**.

De nekonata origino.

GENITIV/O (f; RE): A *genitiv/e*, I(H) *-o*, F *génitif*, G *Genitiv* [g-]; L *(casus) genetivus/genitivus* [g-]. Ps-sf *-iv*.

Propr adj. signifanta "genta, naskiĝa" (termino farita laŭ la responda Gr *genikê* de *génos* "gento": la genitivo ofte estis uzata por indiki la nomon de patro, ekz. *Aléxandros Philíppou* "Aleksandro de Filipo"), de *genere/gignere* "naski, generi", kp *genus* "gento" (vd. tiun).

GENOT/O (f; RE): A *genet*, F *-te*, G *Genetkatze* [g-] (*Katze* "kato"), I *genetta*, Po *z'eneta*, R *genetta* [g-] (*ĵenot*), (H *gineta*); L zool. *Genetta*. Radikfino *-et* ne estis akceptata, evidente por eviti similecon al diminutivo; *-ot* ŝajnas baziĝi sur R kromformo (Bastien; formoj kun *ot* ekzistis pli frue ankaŭ en aliaj lingvoj, ekz. G *Genotte*, Sv *genott*). ¶ 1894 *genet-*. ¶ Io *jineto*; Ia *genetta**; mankas en Ie.

El Ar *ĝarnait'* s.s.

GENT/O (f; RE): L *gens* (gen.: *gentis*) [g-]; (H *gente*). Bazita forme kaj semantike sur L. Formo analoga al *dent/-o*, vd. s.t.v. ¶ Io =; Ia *gente* (ank. "homoj"); Ie *gente* (precipe "homoj, personoj").

L vorto signifanta tiujn, kiuj devenas de la sama vira prapatro ("klano, familiaro; tribo; nacio, popolo"), der. de *genere/gignere* "generi, naski" de HE rad. **gen-* "naski, generi": Sa *jánah* "gento, raso", *jánati* "generas"; Gr *génos* "gento", *génesis* "naskiĝo, kreiĝo", *geneá* "gento, familio" (kp *genealog/o, -io*), *gígnesthai* "naskiĝi, fariĝi", *gennán* "generi" (kp *hidro-, oksi/-geno*); L *genetivus* "genta, naskiĝa" (kp *genitivo*), *gen/us -eris* "gento, raso, sekso,

klaso" kun der. *generare* "generi, produkti", *generatio* "naskado, produktado" (kp *generacio*), *generalis* "klasa; ĝenerala" (kp *generalo, ĝenerala*); *genius* "protektanta spirito" (kp *genio*); L *gens* (> F *gens*, I *gente* "homoj") kun der. *gentilis* "(sam)genta" (kp *ĝentila*); *germen* "ĝermo" (kp tiun); *indigena* "indiĝeno" (kp tiun); *ingenium* "(natura) talento" (kp. *inĝeniero*); A *kin* "raso", *kind* "speco"; G *Kind* "infano". En kelkaj L formoj la komenca *g-* forfalis: *nasci* "naskiĝi" (kp *naski*), *natio* "nacio" (kp tiun), *nativus* "denaska, laŭnatura" (vd. *naiva*), *natura* "naturo" (kp tiun).

GENU/O (f; Un): L *genu* [g-]; F *genou* [ĵnu], I *ginocchio*. Kp la fremdvorton A *genu/flection*, I *-flessione*, (H *-flexión*) "genufleks(ad)o". L neŭtra *u*-fina stemo: la paralela *cornu* rezultigis en Eo *korn/o*, sed tie ĉi *u* estas konservita, eble pro la forta apogo de F. ¶ Io =, Ie *genú*, Ia *genu*.

El HE **genu* s.s., kp Sa *jánu*, Gr *góny* (kp *diagonalo*), A *knee*, G *Knie*.

GEODEZI/O (2; Be): A *geodes/y*, I *-ia* [-z-], (H *-ía*), F *géodésie* [-z-], G *Geodäsie*, Po *geodez/ja*, R *-ija*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *geôdaisía* "ter/mezurado, -dividado" de *gê* "tero" (vd. *geografio*) k subst. de *daíesthai* "dividi" (vd. *demokrato*; kp ank. *demono*).

GEOGRAF/O (7; Ka; antaŭe *geografi/-ist/o*): A *geographer*, F *géographe*, G *Geograph* [g-], PoR *geograf* [g-], I *-o*, (H *geógrafo*). – Sciencnomo: **GEOGRAFI/O** (f', 1; RE): A *geography*, F *géographie*, G *Geographie* [g-], IPo *geograf/ia* [Po g-], R *-ija* [g-], (H *-ía*). Ps-sf *-i* 1.

El Gr *geôgraphía* s.s., propr. "ter–priskribado", de *geôgráphos* "ter-priskribanto, geografo": *gê* "tero" (kp *apogeo, geodezio, geolog/o, -io, geometr/o, -io*); *-graphos* "skribanto", agantnomo de *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*).

GEOLOG/O (3; Ka; antaŭe *geologi/-ist/o*): PoR *geolog* [g-], A *-ist*, I *-o*, F *géologue* [-g], G *Geologe* [g-], (H *geólogo*). – Sciencnomo: **GEOLOGI/O** (1; RE): A *geolog/y*, IP *-ia* [Po g-], R *-ija* [g-], (H *-ía*), F *géologie*, G *Geologie* [g-]. Ps-sf *-i* 1.

La persontermino estas farita (analoge al *arĥeologo* ktp) el la sciencnomo, kreita (en I, 1603) el Gr *gê* "tero" (vd. *geografio*) k *-logia*, ofta elemento en vortoj signifantaj sciencajn disciplinojn (der. de Gr *-logos* "esploristo", vd. sub *arĥeolog/o, -io*).

GEOMETR/O (7; Ka; antaŭe *geometri/ist/o*): A *geomet/er*, IPo *-ra*[Po g-], R *-rist* [g-], F *géomètre*, G *Geometer* [g-], (H *geómetra*). – Sciencnomo: **GEOMETRI/O** (1; N-ro 14 1888, RE): A *geometr/y*, IPo *-ia* [Po g-], R *-ija* [g-], (H *-ía*), F *géométrie*, G *Geometrie* [g-]. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *geômetría* s.s., der. de *geômétrês* "geometro", propr. "ter- mezuranto" el *gê* "tero" (vd. *geografio*) k *metreín* "mezuri" (de *métron* "mezurilo", vd. *metro*).

GERANI/O (1; RE): APo *geran/ium* [Po g-], I(H) *-io*, F *géranium*, G *Geranium* [g-], R *geran'*; L bot. *Geranium*. Pri la formo, kp *idilio*. ¶ IoIa =, Ie *geranie*.

El Gr *geránion* s.s., de *géranos* "gruo" (ĉar la frukto de tiu planto similas al la beko de la gruo), vd. sub *gruo*.

GERMAN/O (f', 7; Un G): A *German*. Kp I *Germania* "-ujo". La nomo estas internacia, sed kun la senco eo *ĝerman/o* Wü: F *Germain* [ĵ-], G *Germane*, I(H) *germano* [I ĝ-], Po *germanski*, R *germanec*; L *Germanus*. La motivo por akcepti la radikon *german-* kun tiu ĉi senco (ankaŭ en la aliaj L.I.!) estas tutsimple, ke la fontlingvoj havas diversajn, parte malfacile adapteblajn vortojn (F *Allemand*, G *Deutsch*, I *tedesco*, Po *Niemiec*, R *nemec*). Per cirkumfleksigo de *g* Eo povis oportune diferencigi la du sencojn. ¶ Io *Germano*, IeIa *germano*.

Tre pridisputata etimologio; multaj supozas, ke la nomo estas de kelta origino.

GERUNDI/O (1; RE): A *gerund*, I(H)

-io, Po *-ium* [g-], R *-ij* [g-], F *gérondif*, G *Gerundium* [g-]; L *gerundium* [g-]. Gramatika termino (kun diversaj sencoj, vd. PIV) bazita sur L. ¶ IoIa =; ne trovita en Ie.

L vorto, farita el la ekzempla frazo *modus gerundi* "maniero plenumi [ion]", kie *gerundi* estas gerundio, t.e. deklinaciita (genitiva) formo de inf. *gerere* "plenumi, finfari, prizorgi" (vd. *gesto*).

GEST/O (f; RE): A *gesture*, F *gest/e*, I(H) *-o*, G *Geste* [g-], Po *gest* [g-], R *ĵest*; L *gestus* [g-]. ¶ IoIa =, Ie *geste*.

Orig. "sinteno", de L *gerere* "porti; plenumi, (fin)fari, prizorgi; (refl.) sin teni, konduti". Samfamiliaj vortoj en Eo: *digesti, gerundio, registro, sugesti*.

GIGANT/O (1; Jü): A *giant* (kp *gigantic* "-a"), F *géant* (kp *gigantesque* "-a"), G *Gigant* [g-], PoR *gigant* [g-], I(H) *-e*; L *Gig/as -antis*. ¶ Io =, IeIa *gigante*.

El Gr *Gíg/as -antos* "giganto, ano de sovaĝa grandegula mita popolo", kredeble pregreka vorto.

GILOTIN/O (1; RE):AF *guillotin/e* [A gil-, F gij-], (H *-a* [gil'-]), G *Guillotine* [gij-], I *ghigliottina* [gil'-], Po *gilotyna*, R *gil'otina*. La moligita *l*-sono [l'], troviĝanta en IR(H), estas redonata per nura *-l-* (eble Po servis kiel modelo ĉi tie): vd. *abelo*, kp spec. *vanilo*. Ps-sf *-in* 1.¶ Io =, Ie *guillotin/e*, Ia *-a*.

Farita (en F, 1790) el la nomo de la kuracisto *Guillotin* (1738–1814), kiu inventis kaj rekomendis la maŝinon.

GIMNASTIK/O (1; Be): A *gymnast/ics*, F *-ique* [-ík], G *Gymnastik* [g-], I *ginnastica*, Po *gimnast/yka* [g-], R *-ika* [g-]. Ps-sf *-ik*.

El Gr *gymnastikê* (*tékhnê*) "gimnastika (arto)", adj. der. de *gymnázesthai* "ekzerciĝi, trejniĝi", de *gymnós* "nuda" (la ekzercado estis farata kun nuda korpo); se malasimilita el **nymnos*, ĝi povus esti rilatigita al la vortoj cititaj sub *nuda*. Samfamilia vorto en Eo: *gimnazio*.

GIMNAZI/O (2; Be): G *Gymnasium* [g-], I *ginnasio* [-z-], Po *gimnaz/jum*, R *-ija*. (A *gymnasium*, F *gymnase* [-z] signifas precipe "gimnastikejo" – kp sube - sed povas esti uzataj pri gimnazioj en fremdaj landoj.) ¶ Io =, Ie *gimnasie*, Ia *gymnasio*.

Pere de L *gymnasium* el Gr *gymnásion* "sporta ekzercejo" (tiuj, kun la apudaj parkoj kaj portikoj, evoluis al centroj de filozofia instruado; en tiu senco la L vorto estis ekuzata ĉ. 1250 de la fondintoj de universitatoj), der. de *gymnázesthai* "ekzerciĝi" (vd. *gimnastiko*).

GIPS/O (f; RE): A *gypsum*, G *Gips* [g-], I *gesso*, PoR *gips* [g-], (H *yeso*); L *gypsum* [g-]. Kp F *gypse* "gipsoŝtono". ¶ Io =, Ie *gipse*, Ia *gypso*.

El Gr *gypsos* s.s., pruntita el semida lingvo (kp Ar *ĝibs* s.s.).

GIRLAND/O(1; RE): A *garland*, F *guirlande* [gi-], G *Girlande*, I *ghirlanda*, Po *girlanda*, R *girljanda*, (H *guirnalda* [gi-]). Eo *g-* akordas kun la prononco en ĉiuj fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *guirland/e*, Ia *-a*.

Kredeble el F ant. *garlande* "krono".

GITAR/O (f; Du, RE): A *guitar* [gi-], F *-e* [gi-], G *Gitarre*, I *chitarra*, PoR *gitara*, (H *guitarra* [gi-]). Eo *g-* akordas kun la prononco en ĉiuj fontlingvoj krom I. ¶ Io =, Ie *guitarr/e*, Ia *-a*.

H vorto, pere de Ar *qîtâra* el Gr *kithára* "citro" (kp tiun, etimologie identan).

GLACI/O (f; Un): L *glacies*; F *glace*, I *ghiaccio*. Bazita sur L (rilate la formon, kp *rabio* < L *rabies*, *serio* < L *series*); formo kun *-i-* estas konvena bazo por adjektivo *glaci/a*, respondanta al AF(H) *glacial*. ¶ Io =, IeIa *glacie*.

Kp L *gelu* "frosto"; de HE rad. **gel-* "frostiĝi" (vd. *gelateno*).

GLAD/I (f; RE): R *gladit'*. Kredeble la simileco al *glat/a* ŝajnis al Z oportuna (Collinson 1959, 7 citas kiel fonton ankaŭ G *glätten* "glatigi", der. de *glatt* "glata"). Oni povas kompari *glad-/glat-* kun la vortoparo *pes-/pez-*. ¶ 1894 *re-*

pas- (< F *repasser*). ¶ Io *glatigar*, Ie *(ferro)glattar*, Ia *repassar*.

Kaŭzativa verbo de R *gladkij* "glata" (kp Po *gl'adzic'*, Ĉe *hladiti* "glatigi"), prapar. al la vortoj cititaj sub *glata*.

GLADIATOR/O (2; RE): L *gladiator*; APoR *gladiat/or*, F *-eur*, I *-ore*, G *Gladiator*, (H *gladiador*). Ps-sf *-or* 1.

Der. de L *gladius* "glavo" (vd. tiun).

GLAN/O (f; RE) 1) bot. 2) anat. (ekde Wü): L *glan/s -dis* (1, 2); A *glans* (2), F *gland* [glâ] (1, 2), I *ghianda* (1), *glande* (2), (H *glande* 2). Se bazita sur L (kiel oni atendas ĉe botanika termino), Eo *glan-* reprezentas la L nominativan stemon (dum *gland-* respegulas la stemon de oblikvaj kazoj). Pli probable, tamen, Z deiris de la F prononco en ambaŭ okazoj: [glâ] > *glan-*, [glâd] > *gland-* (kp Szerdahelyi 1987, 126). ¶ Io = (espismo), IeIa *glande*.

Vd. sekv.

GLAND/O (f; RE): A *gland*, F *-e*, I *ghiandola*, (H *glándula*); L *glandula*. Evitante la (tie ĉi diminutivan) sufikson *-ul*, Z preferis la mallongan formon de AF. Tio necesigis diferencigon disde alia **gland-*, bazita sur L *glan/s -dis*; pri ĝi, vd. *glano*. ¶ Io =, Ie *glandul*, Ia *-a*.

Propr "glan(et)o" (la glandoj estis tiel nomataj pro sia formo), de L *glans* "glano", el HE **g(ŭ)lan-* s.s., kp Gr *bálanos*, R *ǰëlud'* s.s.

GLAS/O (f; Un): A *glass* (ank. "vitro"), G *Glas* (ank. "vitro"). Kp ank. Sv *glas* (ank. "vitro"). La fontlingvoj ĝenerale ne distingas 'glason (el vitro)' de 'vitro'; Z adoptis kaj la ĝermanan kaj la latinan vortojn, distribuante tiujn sencojn inter ili (Collinson 1959, 6). (Pri similaj kazoj, vd. sub *farbo*.) ¶ 1894 *vitr-*. ¶ Io =, Ie *glass*; Ia *vitro*.

Eble orig. nomo de la sukceno, pĜ **glasa-*, kp L *glesum* "sukceno" (de ĝerm. origino), de HE rad. **ghel-* "brili", ekz. en G *Glanz* "brilo", *glühen* "ardi" kaj diversaj vortoj signifantaj "helkolora, flava" k "galo", vd. sub *galo*; plivastigitaj formoj de la radiko (**ghladh-*, **ghleid-*) estas trovataj en la vortoj cititaj sub *glata* resp. *gliti*. Kp spec. *glazuro*.

GLAT/A (f; Un): G *glatt*. Kp Po *gl'adki*, R *gladkij*; ank. Sv *glatt*. Laŭ Collinson 1959, 8, *'glat* havas pli klaran strukturon ol tiu, kiu povas esti ekstraktita de I *liscio*, H *liso*, F *lisse'*. Rimarku krome, ke radiko *glad-* (kian povus sugesti PoR) estis rezervita por alia signifo en Eo. ¶ 1894 *lis-*. ¶ Io =, Ie *glatt*; Ia *lisie*.

El pĜ **gladha-*, kp A *glad* "ĝoja" (< "brila"), de HE **ghladh-* "brila", kp L *glaber* "kalva", Li *glodùs* "glata"; orig. plivastigo de HE rad. **ghel-* "brili" (vd. *glaso*). Kp spec. *gladi*.

GLAV/O (f; Un): F *glaive*; L *gladius*. Prefere prijuĝenda kiel kompromisa formo kun L vokalismo kaj F konsonantismo. (Ekzistas, tamen, kelkaj okazoj, kie F *ai* estas reprezentata per Eo *a*, kp *aglo* : F *aigle*, *fari* : F *faire*, *flari* : F *flairer*.) La radiko *glad-* estis en Eo rezervita por alia signifo. ¶ Io = (espismo), Ie *gladi/e*, Ia *-o*.

Eble de kelta origino. Samfamilia vorto en Eo: *gladiatoro*.

GLAZUR/O (2; RE): A *glaze*, F *glacure*, G *Glasur*, Po *glazura*, R *glazur'*. Kp ank. Nd *glazuur*. Eo *-z-* laŭ A kaj la slavaj formoj. Ps-sf *-ur*. ¶ Io *glezar* "-i"; Ie *glasura*; Ia *smalt* (vd. *emajlo*).

G vorto, formita (eble laŭ modelo de *Lasur* "lazuro") per romana sufikso el *Glas* "vitro" (vd. *glaso*).

GLICERIN/O (1; Be): A *glycerine*, F *glycérine*, G *Glyzerin* [-ts-], I(H) *glicer/ina*, Po *-yna*, R *-in*. Ps-sf *-in* 2.

Farita (en F, ĉ. 1840) el Gr *glykerós* "dolĉa" (pro ĝia dolĉa gusto), varianto de *glykys* s.s.; se el **dlykys*, ĝi estas par. al L *dulcis* "dolĉa" (vd. tiun). Kp spec. *glicirizo*, *glikozo*.

GLICIRIZ/O (1; Jü): L bot. *Glycyrrhiza*, L *liquiritia*; A *liqu/orice*, *lic-*, F *réglisse*,

G *Lakritze(n)*, I *liquirizia*, Po *lukrecja*, R *lakrica*, (H *regaliz*). Botanika termino bazita sur L bot. ¶ Io *regoliso*, Ie *liquorice*, Ia *liquiritia.*

El Gr *glykyrrhiza* s.s., propr. "dolĉradiko": *glykys* "dolĉa" (vd. *glicerino*), *rhiza* "radiko" (vd. s.t.v.).

GLIKOZ/O (1; Be; **GLUKOZ/O** 8; Wü): AF *glucose* [-z], G *Glykose*, I *glucosio* [-z-], Po *glikoza*, *glukoza*, R *gljukoza*, (H *glucosa*); L sc. *glycosum.* La formo *glukoz-* estis oficialigita "pro evoluo en naciaj lingvoj kaj en Esperanto" (OA 8, p. 12). La origina *-i-* povas esti eksplikata en diversaj manieroj: (a) laŭ la scienca L formo kun *-y-*; (b) laŭ alternativaj formoj troviĝantaj almenaŭ en Po (*glikoza*) kaj F (*glycose*); (c) por konformigi la radikon al la etimologie samradikaj *glicerin-*, *gliciriz-*. Ps-sf *-oz.* ¶ Io *glikoso*, Ie *glucos/e*, Ia *-a.*

Farita (en F, ĉ.1840) el Gr *glykys* "dolĉa" (eble surbaze de transskribo *glukus*), vd. *glicerino.*

GLIM/O (f; RE): G *Glimmer*, kp ank. Sv *glimmer.* La apokopo de *-er* estas la sama kiel en *kelo*, *klafto*, *ledo*; ĝi servas por eviti sufikssimilan radikfinon (alie en *cifero*; *fingro*). ¶ 1894 *mik-* (< AFHI *mica*). ¶ Io *mikao*, IeIa *mica.*

Propr "brileto", kp G *glimmen* "ardeti", A *gleam* "brileti", bazitaj sur HE **ghlei-* (kp Ir *glé* "brila"), plivastigita formo de rad. **ghel-* "brili" (vd. *glaso*).

GLIT/I (f; Un): A *glide*, F *glisser*, G *gleiten.* Kp ank. Sv *glida.* Bazita sur la du ĝermanaj formoj: *glit-* estas kompromisformo kun A vokalo (skriba) kaj G konsonantismo (same kiel en *ŝton-*, *sun-*, *ŝlim-*; vd. Waringhien 1967, 47 s.); F aldoniĝas kiel apogo (poste adoptita kiel sendependa radiko kun specialigita senco: eo *glis-* PVS, vd. Collinson 1959, 9; kp cetere analogan sencospecialigon en *respond-* : *respons-*). ¶ Io *glitar* (espismo), IeIa *glissar.*

El pĜ **gleidan* (la F formo estis influata de F *glacer* "glaciigi") de HE **ghleid-* (kp Li *glitùs* "glata"), plivastigita formo de rad. *ghel-* "brili" (vd. *glaso*; kp, ank. semantike, *glata*).

GLOB/O (f; RE): AF *glob/e*, I(H) *-o*; L *globus.* Kp G *Globus*, Po *glob(us)*, R *globus* "terglobo"; sur GR estas bazita eo *glo-bus/o* EG "terglobo". ¶ IoIa =, Ie *globe.*

De HE rad. **gel-* (kun diversaj plivastigoj) "buligi", kp Sa *gulikâ* "buleto"; Gr *gloutós* "postaĵo"; L *gleba* "terbulo", *galla* "gajlo" (kp tiun); G *Klumpen* "bulo", *Klafter* "klafto" (kp tiun), *Kolbe* "kolbo"; A *cloud* "nubo".

GLOR/O (f; Un): A *glory*, F *gloire*, I(H) *gloria*; L *gloria.* Aŭ Z el la kunmeta formo *glori-* (trovata en L *glori/ficare*, A *-fy*, F *-fier*) faris verbon *glor/i*, aŭ li per apokopo ĉe la substantivo (iom apogata de F prononco [glŭár]) kreis *glor/o* (same kiel *memor/o* el L *memor/ia*). ¶ 1881 *glor/o.* ¶ Io =, Ie *glori/e*, Ia *-a.*

Pridisputata etimologio.

GLU/O (f; RE): A *glue*, F *glu*; L *glu/s -tis*, *glut/en -inis.* Kp I(H) *glutinoso* "-eca". ¶ 1894 *glutin-*. ¶ Io =. IeIa *glutine.*

L *glus* estas retrograde formita el *gluten* (uzita en specialigita senco en modernaj lingvoj: AFHPo *gluten*, G *Gluten*, I *glutine* > eo *gluten/o* Wü); de HE rad. **glei-* "glui, ŝmiri", kp Gr *glía* "gluo"; A *clay* "argilo", G *kleben* "glui"; R *glina* "argilo", *klej* "gluo".

GLUKOZ/O, vd. **GLIKOZ/O**

GLUT/I (f; Un): L *gluttire*; R *glotat'*; en romanaj lingvoj kun diversaj prefiksoj: F *engloutir* [-u-], I *inghiottire*, (H *deglutir*). Kp A *glutton* "-emulo". Bazita sur L, kredeble kun konsidero al la R apogo. ¶ Io *glut/ar*, Ia *-ir*, Ie *glotir.*

L kaj R estas praparencaj; de HE rad. **g(ŭ)el-* "gluti", kp Sa *gala-*, L *gula*, G *Kehle* "gorĝo". Parenca vorto en Eo: *kilo.*

GNOM/O (2; Be): AF *gnom/e*, I(H) *-o*, G *Gnom*, PoR *gnom.*¶ Io =, Ie *gnom*, Ia *-o*.

El L mod. *gnomus* s.s., vorto inventita de Paracelso (16a jc), supozeble surbaze de Gr *gnômê* "inteligento, scio", de *gignôskein* "koni" (kp tiun k *diagnozo*).

GOBI/O (f; RE): L *gobi/o -onis*, *gobius* (L zool. *Gobius*); A *gudgeon*, F *goujon*, (H *gobio*). Zoologia termino bazita sur L. ¶ Io =, Ie *gobie;* Ia *gobio**.

El gr *kôbiós* s.s., kredeble mediteranea vorto.

GOLF/O (f; RE) 1) geogr. 2) ludo (ekde Wü): A *gulf* (1), F *golfe* (1), G *Golf* (1, 2), I(H) *golfo* (1); AFIPo(H) *golf*, R *gol'f* (2). ¶ Io = (1, 2); Ie *golfe* (1), *golf* (2); Ia *golfo* (1), *golf* (2).

La geogr. termino el Gr *kólpos* "kurbiĝo, fleksiĝo", probable par. al G *wölben* "volbiĝi". – La sporta termino estas A vorto kun pridisputata etimologio.

GONDOL/O (1; RE): AIPoR *gondol/a*, F *-e*, G *Gondel*, (H *góndola*). ¶ Io =, Ie *góndol*, Ia *gondola*.

I (venecia) vorto kun pridisputata etimologio (oni proponis kiel etimon Gr *kóndy* "trinkvazo" aŭ klarigis la vorton kiel onomatopean, aludantan la balanciĝadon de la boato).

GORĜ/O (f; Un): AF *gorge* [A -ĝ, F -ĵ], I *gorgia* [-ĝ-]; G *Gurgel*. Kp ank. H *garganta*; pri R vd. sube. Eo *-ĝ-* reprezentas kaj la ortografion kaj la molan prononcon de AF (vd. *aĝo*). ¶ 1894 *guturo-* (< L *guttur*). ¶ Io *guturo*, Ie *gurgul*, Ia *gorga*, *gutture*.

El L *gurg/es -itis* "abismo, (akvo)kirliĝo", kp L *gurgulio* "faringo, gorĝo" (> G *Gurgel*), duobligitaj formoj de HE rad. **gŭer-* "engluti", kp Sa *grnáti* "englutas", Gr *borá* "manĝaĵo", L *vorare* "engluti", R *gorlo* "gorĝo".

GORIL/O (2; Jü): AI *gorill/a*, F *-e*, G *Gorilla*, Po *goryl*, R(H) *gorila*; L zool. *Gorilla gorilla*. ¶ Io =, Ie *gorill/e*, Ia *-a*.

El Gr *Górillas* (nur akuz. plur.), nomo de tribo de vilaj inoj (kredeble = goriloj) en okcidenta Afriko laŭ la vojaĝpriskribo de kartaga esploristo Hanno (5a jc a.K.); do afrika vorto.

GOTIK/A (2; Jü): A *Gothic*, F *gothique*, G *got/isch*, I *-ico*, Po *-ycki*, R *îčeskij*, (H *gótico*). Ps-sf *-ik*. La fontlingva sufikso estas konservita por diferencigi tiun ĉi radikon disde la gentnomo eo *got/o* EG. ¶ Io =, Ie *gotic*, Ia *gothic*.

Propr "gota" (kiel arkitektura termino, unue en F, orig. mallaŭda = 'barbara', 'ne antikvepoka'), el L postkl. *Gothicus* de *Gothi* "gotoj", kp Gt *Gutthiuda* "la gota popolo".

GRACI/o (f; RE): A *grace*, F *grâce*, I *grazia* [-ts-], Po *grac/ja*, R *-ija*; L *gratia*. La ekzisto de *-i-* en la radiko povas supozigi, ke Z efektive deiris de la komuna elemento en la apartenanta adjektivo (la subst. kredeble donus *grac-*, kp *besto* < L *bestia*, *memoro* < L *memoria*): F *graci/eux*, R *-oznyj*, (H *-oso*), G *grazi/ös*, I *-oso*. Pri la semantiko de tiu ĉi radiko vd. Waringhien LV 81: "al *gracia* li (=Z) atribuis la signifon ne de F *gracieux*, A *graceful*, D *graziös*, sed ja de F *délié*, A *slender*, D *schlank*, t.e. 'maldika'". Inspiron al tiu sencoŝanĝo Z eventuale ĉerpis el L *gracilis* "maldika". Poste, tamen, "*gracia*, pro la enveno de la neologismo *svelta*, rekondukiĝis al sia etimologia senco 'harmonie ĉarma'" (Waringhien LV 87). Pri la rolo de de Beaufront ĉe tio, vd. Fund., p.18, kaj LZ I, 23. La adopto de la formo *graci-* donis eblecon poste enkonduki eo *grac-* Wü (ne Z) kun specialigita religia senco. ¶ 1881 *gracc-*. – 1894 *grazi-*. ¶ Io =, Ie *gracie*, Ia *gratia*.

L *gratia* "ĉarmo; favoro, komplezo; danko" de *gratus* "ĉarma, agrabla, kara, danka", resp. al Sa *gûrtá-* "bonvena, agrabla", kp Sa *grnâti* "laŭdas" (HE rad. **gŭer-* "laŭdi, saluti"). Samfamiliaj vortoj en Eo: *agrabla*, *gratuli*.

GRAD/O (f; RE): A *grade*, *degree*, F *de-*

gré (kp *graduel* "-a", *graduer* "-igi"), G *Grad*, I(H) *grado*, R *gradus*. ¶ IoIa =, Ie *gradu*.

El L *gradus* "paŝo" (semantika evoluo: > "ŝtupo" > "grado"), kp *gradi* (ptc. perf.: *grassus*) "paŝi, iri", par. al Li *grìdyti* "iri". Samfamiliaj vortoj en Eo: *degradi, ingredienco, kongreso, progreso.*

GRAF/O (f; RE): G *Graf*, R *graf*. Kp ank. Nd *graaf*. Kiel fremdvorto la radiko troviĝas en A *landgrave* "(germana) landsinjoro", F *burgrave* "burgografo". Radiko kun ĝerman-slava bazo. Efektive la romana alternativo (A *count*, F *comte*, H *conde*, I *conte*) ne estis alloga, ĉar *kont/o* estis bezonata por alia signifo, kaj **komt/o* nesufiĉe distingiĝus de tiu. ¶ 1894 *komt-*. ¶ Io *komto*, Ie *comto*, Ia *conte*.

G vorto, orig. "komandanto", par. al Gt *gagrefts* "komando"; ank. en A *reeve* "vokto", *sheriff* "provinca vokto" (*shire* "provinco").

GRAFIT/O (2; Be): AF *graphite*, G *Graphit*, PoR *grafit*, I *-e*, (H *-o*). Ps-sf *-it* 3.

Kreita de Werner (en G, 1879) el Gr *gráphein* "skribi" (pro ĝia uzado en skribiloj) plus minerala sufikso *-it* (vd. *telegrafo* resp. la liston de pseŭdosufiksoj).

GRAFOLOG/O (7; GE): A *grapho/logist*, F *-logue* [-g], I *-logo*, PoR *-log*, G *Graphologe*, (H *grafólogo*). – Sciencnomo: **GRAFOLOGI/O** (1; Jü): A *graphology*, F *-ie*, G *Graphologie*, IPo *grafolog/ia*, R *-ija*, (H *-ía*).

La persontermino estas farita el la sciencnomo, kreita de Michon (en F, 1868) el Gr *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*) laŭ multaj aliaj sciencnomoj finiĝantaj (en F) per *-logie* (vd. ekz. *arĥeologio*).

GRAJN/O (f; RE): A *grain* [grejn], F *grain* [grê], I(H) *grano*; L *granum*. El tiu ĉi romana vorto Z faris du radikojn (distingante ĝiajn du ĉefajn signifojn): *grajn-* kaj *gren-*; kp Wiener 1950, 104 (kvankam lia aserto, ke "la diferencigo iomete respondas al la franca a) le grain – b) la graine" apenaŭ estas korekta: F *grain* "grajno; greno"; *graine* "semo"). La formo *grajn-* estas bazita sur AF ortografio (por *aj*, kp *gajni* < A *gain* [gejn], *hajli* < A *hail* [hejl], *najlo* < A *nail* [nejl]; la korespondo F *ain* [ê] : Eo *ajn* malhavas ekzaktan paralelon sed estas neniel surpriza, kp F *ai* [e] > Eo *aj* en *gaja, trajto* ktp). Oni tamen atendus *gran-* por unu el la du sencoj, kaj ne estas klare, kial Z fine evitis tiun formon (ĝi troviĝas almenaŭ unufoje: Haml 113). Z uzis *gran-* (RE) por apotekista pezo (1/20 skrupulo), sed konsidero al tiu tre speciala termino apenaŭ povis motivigi la elekton de *grajn-*. – Pri *gren-*, vd. tiun. ¶ 1894 *gran-*. ¶ IoIa *gran/o*, Ie *-e*.

L *granum* (nur "grajno"; la senco "greno" – kolektiva aŭ plurala – evoluis en la latinidaj lingvoj) el (H)E **grânóm* "grajno": G *Korn* "grajno; greno", G *Kern* "kerno" (kp tiun), A *corn* "greno", R *zerno* "grajno", Po *ziarno* "grajno"; orig. "matura frukto", kp R *zrelyj* "matura". Samfamiliaj vortoj en Eo: *granato, granito, grenado.*

GRAM/O (1; Be): A *gram(me)*, F *gramm/e*, I *-o*, G *Gramm*, PoR *gram*, (H *gramo*).

En F ekde 1793, pruntita el Gr *grámma* "$^1/_{24}$ unco, skrupulo", propr. "skribaĵo, litero" (der. de *gráphein* "skribi"); la senco "skrupulo" estiĝis el mistraduko de L *scripulum*, kiun oni nekorekte konsideris derivaĵo de *scribere* "skribi". Vd. *telegrafo*. Kp spec. *gramatiko, gramofono*; *centi-, deci-, mili/gramo*; *deka-, hekto-, kilo/gramo*; *ana-, dia-, epi-, mono-, pro-, tele/gramo.*

GRAMATIK/O (f; Du, RE): A *gramm/ar*, F *-aire* (kp AF *grammatical* "-a"), G *Grammatik*, I *grammat/ica*, R *-ika*, Po *gramatyka*, (H *gramática*); L *grammatica*. Ps-sf *ik*. ¶ 1881 *grammatik/o*.

El Gr *grammatikê (tékhnê)* s.s., propr. "literatura, skriba (arto)", adj. de *grám/ma -matos* "skribsigno, litero" (plur. *grámma-*

ta "literaturo"), de *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*; kp *gramo*).

GRAMOFONO (6; Wü; ne ĉe Z): AF *gramo/phone*, I *-fono*, Po *-fon*, G *Grammophon*, R *gram(m)ofon*, (H *gramófono*).

Inventita en 1887; nomo kreita per inversigo de A *phonogram* "fonografaĵo" (1884) el Gr *phônê* "sono, voĉo" (vd. *fonetiko*) k *grámma* "skribo" (vd. *gramatiko*). Kp spec. *fonografo*.

GRANAT/O (f; RE): A *pomegranate* (*pome-* el L *pomum* "pomo"), F *grenade*, G *Granatapfel* (*Apfel* "pomo"), I *melagrana* (*mela* "pomo"), PoR *granat*, (H *granada*); L *granatum* (kp L bot. *Punica granatum* "-ujo"). Forma akordo inter pluraj fontlingvoj: AGPoRL. La radiko devas esti prijuĝata kune kun la ĝemelo *grenad/o*, kp tiun. – Ps-sf *-at* 1. ¶ Io *grenado*, Ie *granat/e*, Ia *-a*.

Orig. L adj. signifanta "grajnoplena", de L *granum* "grajno" (vd. tiun).

GRAND/A (f; Un): F *grand*, I(H) *-e*; L *grandis*. Kp A *grand* "grandioza". ¶ 1882 *magn/a* (< L *magnus*). ¶ Io =, Ie *grand*, Ia *-e*.

Necerta etimologio. Samfamilia vorto en Eo: *grandioza*.

GRANDIOZ/A (1; Jü): A *grand(iose)*, F *grand/iose* [-z], G *-ios*, I(H) *-ioso* [I -z-], R *-ioznyj*. Ps-sf *-oz*. ¶ Io =, Ie *grandios/i*, Ia *-e*.

El L mez. *grandiosus* s.s., der. de L *grandis* "granda" (vd. tiun).

GRANIT/O (f; RE): FPoR *granit*, A *-e*, I(H) *-o*, G *Granit*. Ps-sf *-it* 3.

Propr "grajnhava (mineralo)", ptc. perf. de I *granire* "grajnigi", de *grano* "grajno" (vd. tiun).

GRAS/O (f; Un): A *grease*, F *graisse* (kp *gras* "-a"), I *grasso*, (H *grasa*). ¶ Io =, Ie *grass/e*, Ia *-ia*.

Formita el la responda adj.: F *gras*, H *-o*, I *-so*, el L *crassus* "dika", kredeble par. al Sa *krtsná-* "kompleta, tuta".

GRAT/I (f,): F *gratt/er*, I *-are*. ¶ Io *gratar*, IeIa *grattar*.

De ĝerm. origino: pĜ **krattôn*, kp A *grate* "raspi", G *kratzen* "grati".

GRATUL/I (f; Un): A *congratul/ate*, F *-er*, I *-arsi* (refl.), (H *-ar*), G *gratul/ieren*, Po *-owac'*; L *(con)gratulari*. La (intensiga) prefikso estas ellasita laŭ LGPo. ¶ 1906a *gratol-*. ¶ IoIeIa *gratular*.

Orig, "diri dankon [al la dioj] pro io", formaĵo el la radiko de L *gratia* "danko ktp" (vd. *gracio*).

GRAV/A (f; Un): AFI(H) *grave*; L *gravis*. ¶ Io = (ank. "peza"), Ie *grav*, Ia *-e* (ank. "peza").

Orig. "peza" (> "grava, serioza, impresa"), de HE rad. **gŭer-* "peza", kp Sa *gurú-*, Gr *barys* "peza" (kp *baritono*, *barometro*); L *brutus* "peza, rigida, malinteligenta" (kp. *bruto*). Samfamilia vorto en Eo: *graveda*.

GRAVED/A (f; RE): L *gravidus*; I *gravido*. Kp ank. P *grávido*, Sv *gravid*. Bazita sur L kiel medicina termino, tamen kun vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti sufikssimilan radikfinon (vd. *abomeni*; tamen mankas aliaj ekzemploj de ĝuste *id* > *ed*). ¶ 1894 *gravid-*. ¶ Io =, Ie *gravid*, Ia *-e*.

De L *gravis* "peza" (vd. *grava*).

GRAVUR/I (f; RE): A *engrave*, F *grav/er*, G *-ieren*, Po *grawerowac'*, R *gravirovat'*, (H *gravar*). Kp F *grav/ure*, R *-jura*, G *Gravüre*, Po *grawiura* "gravuraĵo". Radiko de verba karaktero; por la verbo sin rekomendus unualoke **grav-*, sed por eviti homonimecon (kp *grava*) Z bazis tiun ĉi radikon sur la responda substantivo. Eventuale *polur-* reprezentas similan procedon. Ps-sf *-ur*. ¶ Io *grabar*, Ie *grav/er*, Ia *-ar*.

De ĝerm. origino, kp G *graben* "fosi", A *grave* "tombo; ĉizi!", Gt *graban* "fosi" (pĜ **grabhan*), de HE rad. **ghrebh-* "fosi, skrapi", kp R *grob* "tombo".

GREG/O (6; Wü; antaŭe *brut/ar/o*): L *gre/x -gis*; I *gregge*, (H *grey*). Kp A *gregarious* "-ema", F *grégaire* "-a". Bazita sur

L. De la sama L tipo estas *leĝo, reĝo* (kie la cirkumfleksigo estis necesa por eviti homonimecon, vd. tiujn). ¶ Io *(bestio)-trupo*; Ie *greg*, Ia *-e*.

De HE rad. **ger-* "kolekti, arigi", ekz. en Sa *grâma-* "grupo da homoj"; Gr *ageírein* "kolekti", *agorá* "(kunven)placo" (kp *alegorio, kategorio*); R *gromada* "amaso"; Ir *graig* "grego da ĉevaloj".

GREK/O (8; N-ro 15 1888, PR, Be): A *Greek*, F *Grec*, G *Grieche*, I *Greco*, Po *Grek*, R *grek*; L *Graecus*. ¶ Io *Greko*, IeIa *greco*.

El Gr *Graik/ós*, plur. *-oí*, orig. nomo de la doroj en nordokcidenta Grekujo: *-ik* estas sufiksa, la bazo estante la epira gentnomo *Gráes* de nekonata origino.

GREN/O (f; RE): F *grain* [grê] (kp *grenier* "-ejo"), I(H) *grano*. Kp A *granary* "-ejo". Kreita kiel diferencigo de *grajn-*, kp tiun. La formo *gren-* estas eksplikebla en pluraj manieroj: ĝi povas esti (a) inspirita de la F prononco, (b) ekstraktita de F *gren/ier*, (c) kreita per arbitra vokalŝanĝo *a* > *e* el *gran-*, trovebla en I(H) kaj L (kp ev. *fusteno, orgeno*). Konstatante, ke *grajn-* (almenaŭ parte) baziĝas sur F ortografio, oni povas konsideri la alternativon (a) plej probabla. ¶ 1894 *frument-* (< L *frumentum*). ¶ Io *cere/ali*, Ie *-ales* (< A *cereals*); Ia *grano*.

Vd. *grajno*.

GRENAD/O (f; RE): AF *grenade*, G *Granate* (kp *Grenadier* "-isto"), Po *granat*, IR *-a*, (H *granada*). Kp Po *grenad/-ier*, R *-er* "-isto". Por eviti homonimecon kun la etimologie identa *granat-*, Z elektis por la militista senco la (A)F formon, cetere konatan en pluraj fontlingvoj kiel fremdvorton. (Tria diferencigo estas la mineralogia termino eo *grenat/o* Wü [ne ĉe Z], miksformo inter *granat-* kaj *grenad-*, ne ekzakte respegulante iun nacilingvan formon.) ¶ Io =, Ie *grenade*, Ia *granata*. Kp (miner.) IoIa *granat/o*, Ie *-e*.

Nomita laŭ la granatfrukto (forme simila, ĝi estas plena de eksplodaĵoj kiel la frukto de kernoj) kaj do etimologie identa kun tiu: vd. *granato*.

GRI/O (f; RE): F *gruau* [gryó], G *Grütze*; kp A *grits, groats* (plur.). La Ea vorto estas kredeble transskribo de la F prononco: [gryo] > *grio* ([y] > *i* ank. en *kutimo*; kp Szerdahelyi 1987, 122), kie la finvokalo ricevas la rolon de substantivmarko (kp F [paltó] > Eo *palt/-o*). La radiksilabo estas apogata de G (*ü* > *i* ank. en *kiraso, kripla*: Szerdahelyi l.c. 123) kaj iomgrade de A. ¶ Io *gruelo*, Ie *gruel* (< A *gruel* "griaĵo"); Ia *grano* ("grajno"), *semola* (< I).

Ĝerm. vorto (kp ank. Sv *gryn* "grio"), orig. "grande muelita": pĜ rad. **greu-* de HE rad. **ghreu-* "mueli, pisti k.s." (vd. *gruzo*).

GRIFEL/O (f; RE): G *Griffel*, Po *gryfel*, R *grifel'*. Bazita sur G (kun konservita *-el* kiel en *cirkelo, kitelo*: tie ĉi kompreneble la PoR formoj influis). ¶ 1894 *stil-* (< L *stilus*). ¶ Io *ardez-krayono, stil-eto*, Ie *ardes-crayon*, Ia *stilo*.

El L *graphiolum* (en G kun similigo al *greifen* "preni" kaj aligo al la kategorio de instrumentvortoj kun *-el*, vd. la sufikson *-il*), dim. de *graphium* "skribilo" el Gr *grapheíon* s.s., de *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*).

GRIL/O (f; RE): F *grill/on*, I(H) *-o*, G *Grille*; L *grillus, gryllus* (L zool. *Gryllus*). ¶ Io *grilio*, Ie *grillie*, Ia *grillo*.

El Gr *gryllos* s.s.

GRIMAC/O (f; RE): AF *grim/ace*, R *-asa*, G *Grimasse*, Po *grymas*.

Bazita sur F; estas malfacile diri, kial Z ne preferis la pli simplan formon kun *s* (ĉu pro malbonsoneco de **grimasas*?). ¶ Io *grim/aso*, IeIa *-asse*.

El H ant. *grimazo*, kredeble der. de Gt **grima* "masko" (kp Is *gríma* s.s.).

GRIMP/I (3; Ka): F *grimper*. Kritikita de Bourlet kiel "tute ne internacia", vd. LZ I, 100. ¶ Io *klimar* (< A *climb*), Ie *grimpar*; Ia *scander* (< L *scandere*).

Ekskluzive F vorto, formo nazala de *gripper* "ekkapti" (> *"alkroĉigi"* > *"grimpi"*) el Fk **grîpan*, kp G *greifen* s.s. (vd. *gripo*).

GRINC/I (f; RE): F *grincer*. Kp A *grind (one's teeth)*. Ĉe Bastien ank. I *digrignare* [-grin'-].) ¶ Io *grincar*, Ie *grinsar*; Ia *strid/er, -ular* (< L *stridere*).

Kredeble nazala formo de F ant. *grisser* s.s., kp F *crisser* "grincigi la dentojn", ambaŭ de onomatopea origino.

GRIP/O (2; Be): AFI *grippe*, G *Grippe*, Po *grypa*, R *grip*, (H *gripe*). ¶ 1908 letero 08-51 *"influenco"* (< I *influenza*). ¶ Io =, IeIa *grippe*.

Der. de F *gripper* "ekkapti" (la malsano estis tiel nomata ĉar ĝi subite atakas) el Fk **grîpan*, kp G *greifen* s.s., A *grip* "ekpreni; teni" (pĜ **greipan*; HE rad. **ghreib-*, kp Li *griêbti* "ekpreni"). Samfamilia vorto en Eo: *grimpi*.

GRIZ/A (f; Un): A *grey, grizzly*, F *gris* (in-genra formo: *grise* [griz]), G *grau*, I *grigio*, (H *gris*). Escepte bazita sur F in-formo (same kiel *freŝa*; kp Szerdahelyi 1987, 122); estas tamen eble, ke *-z-* aperas nur pro la ĝenerala tendenco en Eo voĉigi intervokalan *s*-sonon. ¶ Io =, Ia *gris*, Ie *-i*.

La romanaj formoj estas de ĝerm. origino (kp ank. Nd *grijs*), radikparencaj al la AG formoj, kiuj devenas de pĜ **grêwa-*, responda al L *ravus* "griza".

GROG/O (2; Jü): AFIPoR(H) *grog*, G *Grog*. ¶ Io =, IeIa *grog*.

A vorto, el '*Old Grog*', moknomo de la admiralo Vernon (tiel nomata ĉar li ordinare surhavis veston el ŝtofo *grogram*): li ordonis (1740), ke la maristoj miksu la rumon de siaj porcioj kun akvo, por ke ili ne ebriiĝu kaj sendiscipliniĝu. (Vd. ekz. Eo-Post 1951, 140.) – La ŝtofnomo *grogram* el F *gros grain* "(ŝtofo kun) maldelikataj grajnoj", vd. *groŝo* resp. *grajno*.

GROS/O (f; RE): F *groseille à maquereau* (propr. 'ribo skombra'), (H *groselle gruesa*, propr. 'ribo dika'); L bot. *Ribes grossularia* "-ujo". Kp ank. P *groselha*. Plej simple oni klarigas la Ean formon kiel arbitran apokopon de F (kp tiukaze *frambo*, kiu ankaŭ baziĝas sur mallongigita franca formo). Se oni anstataŭe deiras de L bot., oni povas klarigi la mallongan formon per ellaso de du sufiksaj elementoj (*-ul, -ari*). ¶ Io *grozelo*, Ie *spin-crusbere* ("dorn-ribo"), Ia *grossula*.

F *groseille* probable pruntita el G ant. *krusel-bere*, propr. "krispa bero" (kp G *kraus* "krispa"). – L bot. *grossularia* estas moderna latinigo de la F vorto.

GROŜ/O (f; RE): G *Groschen* [-ŝ-], I *grosso*, Po *grosz* [-ŝ], R *groŝ*. Eo videble kopias la PoR formojn; se oni tamen preferas G kiel etimon, oni povas kompari *fosto* < G *Pfosten*. ¶ 1894 *groc-*. ¶ Specialaj formoj mankas en la aliaj L.I.

El L nomo de monero farita dum la mezepoko en Tours (kp Fund., p. 322): *denarius grossus*, propr. "denaro dika/granda" (L postkl. *grossus* "dika, granda" > F *gros*, H *grueso*, I *grosso*); kp sub *grogo*.

GROT/O (f; RE): A *grott/o*, F *-e*, I *-a*, G *Grotte*, R *grot*, Po *-a*, (H *gruta*). ¶ Io =, Ie *grott/e*, Ia *-a*.

El L vulg. **crupta*, responda al L *crypta* "subterajo" (vd. la etimologie identan *kripto*). Kp. spec. sekv. – Pritraktita de Carlevaro, Slipoj de etimologia vortaro, PL 15/1985.

GROTESK/A (2; Be): AF *grot/esque* [-esk], G *-esk*, I *-tesco*, Po *-eskowy*, R *eskovyj*, (H *-esco*). Ps-sf *-esk*. ¶ Io =, Ie *grot/esc*, Ia *-tesc*.

I arttermino. orig. *(pittura) grottesca* "(pentrajo) groteca" de *grotta* "groto" (vd. tiun; la vorto estis unue uzata pri pentrajoj trovitaj ĉ. 1500 en subteraj ruinoj romiaj).

GRU/O (f; RE) 1) zool. 2) tekn. (ekde Wü): L *gru/s -is* (1, 2); F *grue* (1, 2), I *gru* (1, 2), (H *grulla* 1, *grúa* 2). LFI prezentas la saman bazon *gru-*. ¶ Io = (1), *krano* (2) (< G *Kran*); Ie *grue* (1), *cran* (2); Ia *grue* (1, 2).

La zoologia senco estas origina (la maŝino estis tiel nomata pro sia longa 'kolo', analoga al tiu de la birdo). El HE nomo de la gruo: bazo **ger-*, parte kun *n*-sufikso (kp Gr *géranos*, vd. *geranio*, A *crane*, G *Kranich*), parte kun *u(v)*-sufikso (kp R *ŝuravl'*, Po *z'uraw*, L *grus*); la nomo ŝajnas deveni de rad. **ger-* "raŭke krii", kp Sa *járate* "bruas, krakas", L *grunnire* "porkobleki", A *crow*, G *Krähe* "korniko". Kp la etimologie identan *krano*.

GRUMBL/I (2; Jü): A *grumble*, F *grommeler*. Videble bazita sur A. ¶ Io *grun(ach)ar*, Ie *grunir* (< F *grogner*, H *gruñir*); Ia *murmurar*.

A el F (kun parazita *-b-*, kp sub *ekzemplo*), de ĝerm. origino (kp Nd *grommen* s.s.); par. al A *grim* "severa, timiga", Gt *gramjan* "koleriĝi" (HE rad. **ghrem-* "brui", kp R *grom* "tondro").

GRUND/O (4; Ka): A *ground*, G *Grund*, PoR *grunt*. Bazita sur G sed kun ĝenerala ĝermana-slava apogo. La romana ekvivalento (L *solum*; F *sol*, I *suolo*, kp H *suelo*, ank. A *soil*) riskus kolizii kun *sol/a*. ¶ Io *sulo*, Ie *suol*, Ia *solo*.

Ĝerm. vorto (kp Gt *grundu-*), eble par. al G *Grand* "gruzo".

GRUP/O (f; Du, RE): A *group* [gru:p], F *groupe* [grup], G *Gruppe*, I *gruppo*, PoR *grupa*, (H *grupo*). ¶ Io =, Ie *grupp/e*, Ia *-o*.

I vorto (kp. *groppo* "fasko, nodo, bulo"), kredeble de ĝerm. origino (**kroppa* "bulo" aŭ sim., kp G *Kropf* "kropo": vd. tiun).

GRUZ/O (3; Jü): G *Grus*. Kp ank. Nd *gruis*, Sv *grus*. Bazita ekskluzive sur G sed kun radikkomenca apogo de A *grit*, *gravel*, F *gravier*, R *gravij*. Eo *-z-* ne respegulas la fontlingvan prononcon kaj tial verŝajne dependas de la intervokala pozicio de la s-sono (Nd *gruizelen* "gruzi, dispecigi" ne povis influi la Ean formon). ¶ Io *gravi/o*, Ie *-e*, Ia *gravilla**.

De HE rad. **ghreu-* "mueli, disfroti k.s.", kp Li *grudas* "grajno", G *Grütze* "grio" (kp tiun).

GUBERNI/O (2; N-ro 14 1888, RE): Po *gubern/ia*, R *-ija*. Kp A *govern/ment*, I *-o*, F *gouvernement* [gu-], G *Gouvernement* [gu-], (H *gobierno*). (AIFGH ankaŭ "registaro; regado".) Bazita sur la slava termino. ¶ Io =, Ie *guvernia*; Ia nur *provincia* aŭ sim.

R vorto, kunligita kun *gubernator* "guberniestro, registo" (formita laŭ la analogio *imperator* : *imperija* "imperiestro : imperio"), de L *gubernare* "gvidi, regi" (vd. *guverni*).

GUDR/O (f; RE): F *goudron* [-ô]. Se la fontvorto finiĝas per *-on*, ĝia finkonsonanto povas esti ellasata kaj *o* uzata kiel substantivmarko; kp *arbo*, *ĉamo*, *falko*. ¶ Io =, Ie *gudron*, Ia *catran* (kp sube).

Romana vorto (kp H *alquitrán*, I *catrame*) el Ar (Eg.) *qat'râ* s.s. de *qat'ara* "gute flui".

GUF/O (f; RE): I *gufo*; L postkl. *guf/o -onis*. "Tiu termino tute ne posedas internacian formon, kaj en ĉiu lingvo, eĉ en ĉiu provinco estas alimaniere nomata. La manko de tiu vorto prenita el la itala embarasus, ĉar la latina zoologia nomenklaturo (*Bubo bubo*, el familio *bubonidae*) povus proponi nur formojn ne tre taŭgajn en Esperanto: *bubo* : eta knabo, eta petolulo aŭ *bubono* : iu malsano" (Albault en Fund., p. 21). ¶ Io =, Ie *guf*, Ia *bubo**.

De onomatopea origino.

GULDEN/O (1; PR, Jü): A *gulden*, *guilder*, G *Gulden*, Po *gulden*, R *gul'den*; Nd *gulden*. Akcento kiel en *fadeno*, *posteno*. ¶ La aliaj L.I. malhavas specialan formon.

El G mez. *guldîn (phenninc)* "ora (pfenigo)", de *golt* "oro" (kp G mod. *Gold*, A *gold*) el pĜ **gultha-*, propr. "flava (metalo)": vd. sub *galo*.

GUM/O (f; RE): A *gum*, Po *-a*, F *gomm/e*, I *-a*, G *Gummi*, (H *goma*); L *gummi*, *cummi*. ¶ Io =, Ie *gumm/e*, Ia *-a*.

El Gr *kómmi* s.s., el Eg *kemai.*

GURD/O (f; RE): A *hurdy-gurdy* (orig. "violongurdeto", nun plej ofte "gurdo").

Bazita sur A ortografio. ¶ 1894 *turn/o/-lud-.* ¶ Io *turn-orgeno,* Ie *torn-organe,* Ia *organo a cylindro.*

A ripetformaĵo de onomatopea origino, kp A *hurly-burly* "tumulto".

GUST/O (f; Un): L *gustus;* F *goût* (kp. *déguster* "-umi"), I(H) *gusto;* Po *gust* (fig.). Kp A *gustatory* "-uma". ¶ pEo *gud-* "senti per la gusto", *gut-* "gustumi", vd. LZ I, 352. – 1894 *gust-,* kompletigita per *gust/a* "-umi". ¶ IoIa =, Ie *guste.*

De HE rad. **geus-* "gustumi, ĝui", ekz. en Sa *jóŝati* "gustumas; ĝuas, amas"; Gr *geúesthai* "-umi"; G *kosten* "-umi"; R *vkus* "gusto".

GUT/O (f; Un): L *gutta;* F *goutte* [gut], I *goccia,* (H *gota*). Kp A *gutter* "defluilo". ¶ Io =, Ie *gutt/e,* Ia *-a.*

Latin(id)a vorto kun nekonata etimologio.

GUTAPERK/O (2; Jü): AF *gutta-percha* [F -k-], G *Guttapercha,* I *gutta/perca, -perga,* Po *gutaperka,* R *gut(t)aperĉa,* (H *gutapercha*). Eo *-k-* sin bazas sur FIPo. ¶ Io =, IeIa *guttapercha.*

El Malaja *getah-perĉah* s.s.: *getah* "plantosuko, rezino"; *perĉah* "specio de arbo (*Isonandra gutta*)": ĝia gumeca suko estas importata en Eŭropon ekde 1843.

GUVERN/I (f; RE): F *gouverner* [gu-]; kp A *governess,* F *gouvernante,* G *Gouvernante* [gu-], I *governante,* Po *guwernantka,* R *guvernantka* "-istino". Verbo bazita sur F, kiu inspiris ankaŭ la formojn de la aliaj fontlingvoj. ¶ Io *guvern-istino,* Ia *govern-ante* "-istino"; mankas en Ie.

F kulturvorto, propr. "gvidi, direkti, regi", el L *gubernare* "direkti, regi", el Gr *kybernán* s.s. Samfamilia vorto en Eo: *gubernio.*

GVARDI/O (f; RE): A *guard,* F *garde,* G *Garde,* I(H) *guardia* [gj-], Po *gwardia,* R *gvardija.* Eo *gv-* ŝajnas adoptita laŭ RPo, estante kompromisa formo inter [gŭ-] (I) kaj [g-] (AFG). Eble kontribuis la deziro klare diferencigi tiun ĉi radikon disde *gard-*; la saman efekton havas la konservo de *i.* (Kp sub *lingvo.*) ¶ Io *guard/o,* Ie *-ie,* Ia *-a.*

Orig, "ŝirmo, gardo", der. de la resp. verbo (F *garder,* H *guard/ar,* I *-are*). Vd. *gardi,* etimologie identan.

GVATEMAL/O (8; Wü): AGI(H) *Guatemala,* F *Guatémala,* Po *Gwatemala,* R *Gvatemala.* Eo *Gv-* estas tie ĉi klarigebla kiel slaveca transskribo (kp *gvardio*); tiu kombino ankaŭ estas unu maniero redoni en Eo latin(id)an *gu* [gŭ], vd. sub *lingvo.* ¶ IoIeIa *Guatemala.*

El indiĝena indiana nomo *Quauhtematlan,* laŭdire signifanta "loko de lignejoj".

GVID/I (f; RE): A *guid/e,* F *-er,* I *-are* [gŭ-], (H *guiar*). Kp R *gid* "-isto". Eo *gv-* respegulas la ortografion, ne la prononcon de la fontlingvoj (*u* estas prononcata nur en I); vd. sub *lingvo* pri tiu transskribo. ¶ IoIeIa *guidar.*

F vorto, el Fk **wîtan* "montri direkton", par. al G *weisen* "montri", orig. "informi, sciigi" (vd. plue sub *vidi*).

GVINE/O (8; FK, Wü; *Gvin/uj/o* La E-isto 1892): AGI(H) *Guinea,* F *Guinée,* Po *Gwinea,* R *Gvineja.* La transskribo *Gv-* estas paralela al tiu en *Gvatemalo,* kp. tiun. ¶ IoIeIa *Guinea.*

La nomo identas kun tiu de la malnova negra regno *Ghana,* nun reviviĝinta en la ŝtato samnoma (eo *Gana/o* PIV). Ofte asociita al *Djenné,* malnova urbo en nuna Malio (= Ar *ĝanna* "ĝardeno").

Ĝ

ĜARDEN/O (f; Un): A *garden*, F *jardin* [ĵardê], G *Garten*, I *giardino* [ĝ-], (H *jardín* [ĥ-]). Eo *ĝ-* respegulas la ortografion de AFI kaj la molan prononcon de FI; kp la detalan motivigon en Couturat-Leau, p. 333. La radikfino *-en* laŭ AG kun apogo de F prononco evitigas la sufikssimilan finon *-in*. ¶ 1894 *garden-*. ¶ Io *gardeno*, Ia *jardin*, Ie *-e*.

AHIP < F < Fk **gardo*, kp G ant. *garto* > G *Garten*; Gt *garda* "enfermejo (por brutoj)"; A *yard* "korto", el pĜ **gardha(n)-*, kred- eble el HE **ghorto-* "enfermejo", kp L *hortus* "ĝardeno", *co-hors* "korto ktp" (kp tiun); ank. R *gorod*, *-grad* "urbo" (el ĝerm.). Kp. ev. *hangaro*.

ĜEM/I (f; Un): L *gemere*; F *gémir* [ĵ-], I *gemere* [ĝ-], (H *gemir* [ĥ-]). Eo *ĝ* estas normale uzata, kiam la (modernaj) fontlingvoj ortografias *g* sed prononcas mole ([ĝ] aŭ [ĵ]). ¶ 1894 *gem-*. ¶ Io *jemar*, Ie *gem/ir*, Ia *-er*.

Sen certa etimologio.

ĜEMEL/O (4; Wü; antaŭe *du/nask/-it/o*): L *gemellus*; F *jumeau* (in-formo: *jumelle*) [ĵ-], I *gem/ello* [ĝ-], (H *-elo* [ĥ-]). Kp F *Gémeaux* "ĝemeloj" (astr.). Bazita sur LI. Pri *ĝ*, vd. *ĝemi*. ¶ Io *jemelo*, Ie *gemelle*, Ia *gemino* (vd. sube).

Orig. dim. de L *geminus* s.s. (ambaŭ L vortoj tamen precipe adjektive uzataj) kun necerta etimologio.

ĜEN/I (f; RE): F *gêner* [ĵ-], G *genieren* [ĵ-], Po *z'enowac'* [ĵ-]. Kp ank. Sv *genera* [ŝ-] "ĝeni, embarasi". Pri *ĝ*, vd. *ĝemi*. ¶ 1894 *gen-*. ¶ Io *jenar*, Ie *genar*; Ia *embarassar* (< F *embarrasser*), *disturbar* (< A *disturb*), *importunar* (< H), *incommodar* (< A *incommode*).

Der. de F *gêne* "-o", pli frue "turmento", el F ant. *gehine* "konfeso kaŭzita de torturo" de *jehir* "konfesigi" el Fk **jahjan* s.s., kp G ant. *jehan* "konfesi", orig. "paroli", de HE rad. **jek-* "paroli", ekz. en Sa *yâcati* "petas", L *iocus* "ŝerco" (kp sub *ĵongli*). – Historio de la vorto *ĝeni* (parte alia) en Eo-Post 1951, 140.

ĜENDARM/O (2; Wü): AFI(H) *gendarme* [AF ĵ-, I ĝ-, H ĥ-], G *Gendarm* [ĵ-], Po *z'andarm* [ĵ-], R *ĵandarm*. Pri *ĝ*, vd. *ĝemi*. ¶ Io *jendarmo*, IeIa *gendarme*.

F retroformaĵo de plur. *gensdarmes*, propr. "homoj de armiloj": *gens* "homoj, personoj" el L *gens* "gento"; *armes* "armiloj" el L *arma* s.s. Vd. resp. *gento*, *de*, *armi*.

ĜENERAL/A (1; Be): A(H) *general* [A ĝ-, H [ĥ-], I *-e* [ĝ-], F *général* [ĵ-]; L *generalis*. Eo *ĝ* indikas la molan prononcon de la modernaj fontlingvoj; el tio rezultiĝas oportuna diferencigo de la ĝemela radiko *general-* (en kiu kelkaj fontlingvoj prononcas [g-], kp s.t.v.). ¶ IeIa *general*, Io *-a*.

Der. de L *gen/us -eris* "speco, klaso" (do orig. "apartenanta al la tuta klaso"), vd.

sub *gento*. Kp la etimologie identan *generalo*.

ĜENTIL/A (f; Un): I *gentile* [ĝ-]. La vorto troviĝas ankaŭ en A kaj en la ceteraj latinidaj fontlingvoj, tamen kun aliaj senconuancoj: A *gentle* [ĝ-] "milda, dolĉa", F *gentil* [ĵ-] "bona, afabla", (H *gentil* [ĥ-]) "aminda"). Pri la sencomodifo, vd. Waringhien LV 81. Eble la modifo radikas en la internacia vorto A *gentleman*, F *gentil/homme*, I *-uomo* "ĝentilhomo". Pri *ĝ*, vd. *ĝemi*. ¶ 1894 *gentil-*. ¶ Al Eo *ĝentila* respondas Ie *polit*, Io *-a*, Ie *-e*. Kp Io *jentila* "(karaktere) nobla, ĝentila", IeIa *gentil* "plaĉa, afabla; nobla".

El L *gentilis* "de (bona) familio, familia, genta", der. de *gen/s -tis* "gento" (vd. tiun).

ĜERM/O (f; EG): A *germ* [ĝ-], FI *-e* [F ĵ-, I ĝ-], (H *germen* [ĥ-]); L *ger/men -minis*. Mallonga formo analoga al *fulmo*, vd. tiun. Pri *ĝ*, vd. *ĝemi*. ¶ 1894 *germ-*. ¶ Io *jermo*, Ie *gérmine*, Ia *germine*.

L *germen* probable el **genmen* (kp, sub *ĉarmo*, L *carmen* < **canmen*), ligita al L *genere* (poste *gignere*) "naski, produkti" (vd. sub *gento*).

ĜI (f; Un): Necerta etimologio koncerne la konsonanton (ĉiuj personaj pronomoj finiĝas per *-i*, kp *mi*). La hipotezo de Waringhien (LV 59) estas jena: "...restis la triapersona neŭtra pronomo, por kiu neniu eŭropa lingvo prezentis taŭgan konsonanton, ĉar A *it* kaj D(=G) *es* okazigus konfuzojn kun la tabelpronomo *tia* aŭ kun la refleksivo. Estas probable, ke la ina formo *ŝi* inspiris al Z la ideon uzi por tiu neŭtra pronomo alian supersignitan konsonanton; la responda voĉa ĵ ne estis ebla, ĉar ĝi tro similis la francan unuapersonan *je*; tial restis nur ĝ, kiun li elektis por fari nian *ĝi*." (Pli probabla argumento kontraŭ **ĵi* estus ĝia troa simileco al *ŝi*.) Esence same Waringhien 1967, 21: 'Z ... utiligis ... la 3an supersignitan konsonanton *ĝ* (la 1a *ĉ* estis utiligita por la kolektivoj kaj la 2a *ŝ* por la tria persono feminina).' – "Naturan" etimon supozas Albault (Nuntempa Bulgario 9/1959, 15): "ĉu la formo *ĝi* ne estis inspirita de la iom proksima *ji* aŭ *jis* de la litova?". Kp tamen Brozovič (Nuntempa Bulgario 12/1959, 40): "Pri la eventuala ligo inter la esperanta *ĝi* kaj la litova *jis*, *ji* mi pli volonte rezignas – *jis* estas de vira genro, *ji* de ina, kaj la neŭtran la vivantaj baltaj lingvoj kaj dialektoj entute ne konas. Krome, oni ne povas pretervidi la fonetikan diferencon." – Senvaloraj komparoj ĉe Bianchini, 38.

Malgraŭ la objeto de Brozovič la hipotezo pri Li *ji* ŝajnas al mi pripensinda. Kiam estis decidite, ke la finiĝo de la personaj pronomoj estu *-i*, Z probable serĉadis taŭgajn formojn en diversaj lingvoj. Apoginte *mi* per L, *ci* per Po, *li* per F, *ŝi* per A, li trovis la – triapersonan, se ne neŭtran – litovan *ji* (pri Z kaj la litova lingvo, vd. Holzhaus 1969, 184) kaj decidis utiligi ĝin kiel neŭtran formon. Rekta transskribo *ĵi* estis neoportuna pro troa simileco al *ŝi*; tial li pli klare diferencigis la formon per la afrikato (*ĝ* = [dĵ]). Se non è vero... ¶ La pEo de 1881 verŝajne ne havis neŭtran pronomon personan; la vira *ro* estis uzata ankaŭ pri objektoj. – 1894 *lu* (kp L *illud* "tio") aŭ *ho* (propr. "tio ĉi", vd. sub *ĉi*). ¶ Io *ol(u)* (artefarita); Ie *it* (< A); Ia *illo* (< L).

ĜIB/O (f; RE): L *gibba*, *gibber*, *gibbus*; F *gibb/osité* [ĵ-] (kp *-eux* "-hava"), I *-osità* [ĝ-] (kp *-oso* "-hava"), (H *giba* [ĥ-]). Kp A *gibbous* "-hava". La uzo de *ĝ-* indikas kiel fonton mallongigon de FI *gibbo*... kun *o* rolanta kiel Ea substantivmarko. Kompreneble la L formoj kuninfluis. ¶ 1894 *gib-*. ¶ Io *gibo*, Ie *bosse* (< F), Ia *gibbo*.

Eble par. al Sa *kubjá-* "ĝiba, kurba".

ĜIN/O (2; Be): AFI *gin* [ĝ-], G *Gin*

[ĝ-], Po *dz'in* [dĵ-], R *dĵin*, (H *ginebra* [ĥ-]). Eo *ĝ-* respondas al la prononco en ĉiuj fontlingvoj.

A mallongigo de *geneva* s.s. el F mez. *genevre* "junipero" (ĝino estas aromigita per juniperaj beroj), vd. tiun.

ĜIR/o (8; Jü):G *Giro*, I(H) *giro* [I ĝ-, H ĥ-]. Eo *ĝ-* sekvas la I prononcon (la vorto estas origine itala). ¶ Io *indoso* (< F *endosser* "-i"); IeIa *giro*.

I komerca termino, propr. "turniĝo, cirkulado", pere de L *gyrus* el Gr *gyros* "rondo", probable par. al G *kauern* "kaŭri" (HE rad. **geu-* "kurbigi"), vd. tiun.

ĜIRAF/O (f; RE): A *giraff/e* [ĝ-], I *-a* [ĝ-], F *giraf/e* [ĵ-], (H *-a* [ĥ-]), G *Giraffe* [g-], Po *z'yrafa* [ĵ-], R *ĵiraf*, L zool. *Giraffa*. Pri *ĝ*, vd. *ĝemi*. ¶ 1894 *giraf-*. ¶ Io *jirafo*, Ie *giraf/fe*, Ia *-a*.

Pere de H el Ar *zurâfa* s.s., kredeble de centrafrika origino.

ĜIS (f; Un): Ŝajnas esti miksformo de F *jusqu'à* [ĵys-] (prep.) kaj G *bis* (prep., konj.), vd. Waringhien 1967, 35; Bianchini 70 (kiu citas ank. Latva *lîdz*): *ĝ-* estas inspirita de F (envere oni atendas *ĵ-*, sed formo **ĵis* estus eble tro simila al *ĵus*), *-is* de G. Gregor (1982, 11) mencias nur F kiel fonton (kp Berger 1947, 17: 'kripligita F jusqu'à'), sed tiuokaze la vokalo estas neatendita (ĝi tamen povas esti motivita per la necesa diferencigo disde *ĵus*; kp ank. sub *grio*). ¶ 1894 *ad* (< L *ad*). ¶ IoIe *til* (< ASv *till*, DaNo *til*); Ia *usque* (< L).

F *jusque* el **de-usque*, plivastigita formo de L *usque (ad)* s.s. – G *bis* estas kunmeto de prep. G ant. *bî* (G *bei*) "ĉe" (kp *bigota*) k – kredeble – prep. *az'* "al" (A *at*).

ĜOJ/O (f; Un): A *joy* [ĝoj], F *joie* [ĵ-], I *gioia* [ĝója], (H *gozo*). La formo respegulas ĉefe la prononcon de AI, sed ankaŭ F havas molan komencsonon kaj ortografion *-oi-* (kp *fois* > *fojo*, *foin* > *fojno*). ¶ 1882 *let/o* (< L *laetitia*); *rad/o* (< R *radost'*); kp ank. sub *gaja*. – 1894 *jov-* (< F *jovial* "gaja": PVZ 5, 140). ¶ Io *joyo*, Ie *joya*, Ia *gaudio* (vd. sube).

El L *gaudi/um*, *-a* s.s., kp *gaudere* "ĝoji", par. al Gr *gêthéô* "mi ĝojas". Etimologie identa estas *ĝui*.

ĜU/I (f; RE): A *enjoy* [-ĝ-], F *jouir* [ĵ-]. Verŝajne bazita sur F; *ĝ-* povas indiki influon de A (F [ĵ] normale > Eo *ĝ* nur se ortografiata *g*; kp tamen *ĝis*). ¶ 1894 *su delekt-*, propr. "ĝuigi sin" (< L *delectare*). ¶ Io *ju/ar*, Ie *-ir*, Ia *fruer de* (< L *frui*), *gauder de* (vd. sube).

Propr. "ĝoji" (= H *gozar*, I *gioire*) el L *gaudere* "ĝoji" (vd. *ĝojo*, etimologie identan).

ĜUST/A (f; RE): A *just* [ĝ-], F *juste* [ĵ-], I *giusto* [ĝu-], (H *justo* [ĥ-]). Kp G *justieren* "ĝustigi". La du senconuancojn de la citita latin(id)a vorto Z diferencigis, alprenante *just-* rekte el L kaj *ĝust-* laŭ la prononco de AI. Tria samorigina radiko estas *ĵus*: vd. Wiener 1950, 105 (kiu komparas la diferencigon *general-* : *ĝeneral-*). ¶ 1894 *eksakt-*. ¶ Ie *just*, Io *-a*, Ia *-e*.

El L *iustus* "justa; ĝusta" (vd. *justa*).

H

HA (f; Un): Laŭ la tradukoj en UV (FG *ah*, GPo *ach*, R *aĥ*), tiu ĉi vorto ekestis pere de inversigo (vd. Szerdahelyi 1987, 134; kp *ho*); efektive **ah* estis fonetike, **a* morfologie neebla. Tamen ekzistas en la fontlingvoj ankaŭ similsenca interjekcio *ha* (AFGPoL, ank. H), kp R *ĥa*. Rimarku speciale la redonon de ridado: AFG *ha ha*, R *ĥa ĥa*, L *ha hae*, (H *ja ja*) > Eo *ha ha*. Do la hipotezo pri inversigo ne aperas necesa; tamen la paralelo kun *ho* donas al ĝi probablecon. ¶ 1881 *ah.* – 1894 *a.* ¶ IoIe *ha, ah*; Ia *ha*, ah**.

Onomatopea. Por ridado, kp ank. GrSa *ha ha.*

HAJL/O (f; Un): A *hail*, G *Hagel.* Kp ank. NdSv *hagel.* Formo kopianta A; ekzakta fonetika paralelo estas *najlo* < A *nail*, G *Nagel.* Por A *ai* > Eo *aj* kp ank. *gajni, grajno.* ¶ 1894 *grel-* (< F *grêle*). ¶ Ie *grel*, Io *-o*; Ia *grandine* (< L *grand/o -inis*).

El pĜ **haghla-*, el HE **kaghlo-*, kredeble "ŝtoneto", kp Gr *kákhlêx* "(silik)ŝtoneto".

HAK/I (f; RE): A *hack* [häk], G *-en* [hák-], F *hacher* (parte kun sencnuancoj "dishaki", "hakfosi"). (Kp H *hacha* "-ilo".) Kp ank. Da *hakk/e*, Nd *-en.* Bazita sur AG kun apogo de F (Collinson 1959, 8); eble ankaŭ la semantiko de la Ea radiko havas deirpunkton en F *hache* "hakilo". ¶ Io *hachar, hakar*, Ie *haccar*, Ia *hachar.*

Ĝerm. vorto, eble par. al la vortoj cititaj sub *hoko* (tiuokaze orig. "haki per kurba ilo").

HAL/O (f; EG): A(H) *hall*, F *-e*, G *Halle*, Po *hala*, R *ĥoll.* ¶ Io =, Ia *hall*, Ie *-e.*

El pĜ **hallô-*, verŝajne orig. "(io) tegita", de HE rad. **kel-* "kaŝi" (vd. *okulta*).

HALADZ/O (f; Un): A *exhal/ation*, F *-aison*, I *esalazione*, (H *exhalación*); L *exhalat/io -ionis.* Du modifoj saltas al la okuloj: (1) Aferezo de la prefikso, evidente ĉar "radiko devas nek komenciĝi nek finiĝi per silabo simila al afikso" (Waringhien LV 78). Eble L *ex/halare* : *in/halare* donis al Z la ideon izoli la bazon. (2) Unika traktado de la sufikso, kiu normale donas *-cio* en Eo. Oni plej proksime povas kompari *donac-* k.s. (tie ĉi tamen voĉaj konsonantoj [dz] anstataŭ nevoĉaj [ts], eble inspiritaj de la F prononco [-ezô]: rimarku, ke ankaŭ F havas varianton de la sufikso!). ¶ Io *exhal-ajo*, IeIa *exhalation.*

De L *exhalare* "-i": *ex-* "el", *halare* "blovi, haladzi" (kredeble el **ansl-*, HE rad. **an-* "spiri", vd. *animo*).

HALEBARD/O (2; RE): A *hal/berd*, F *-lebarde*, Po *-abarda*, G *Hallebarde*, R *alebarda*, (H *alabarda*). Bazita sur FG kun apogo de R. ¶ Io *hal/bardo*, Ie *-ebarde*, Ia *hallebarda*.*

El G mez. *helmbarte*: la dua elemento signifas "batalhakilo" (G *Barte*†, identa kun *Bart* "barbo": la pendanta klingo estas komparata kun barbo); la unua estas asociita aŭ kun G *Helm* "kasko" (vd. sub *okulta*) aŭ kun G *Helm* "tenilo" (vd. sub *ŝildo*).

HALT/I (f; Un): A *halt*, G *-en*; F *halte* "-o". Kp I *alt*, (H *alto*) "haltu!". ¶ IoIe *haltar*; Ia *halto* "-o", *stationar*, *stoppar* "-i".

Ĝerm. vorto kun ankoraŭa signifo "teni" (> "haltigi"): G *halten*, A *hold*; kp Gt *haldan* "paŝti", kio indikas ke la orig. signifo estis "peli"; kredeble par. al Gr *kéllein* "peli (brutojn)", *boukólos* "paŝtisto", kp Sa *kaláyati* "paŝtas; tenas".

HAMAK/O (1; Jü): A *ham/mock*, F *-ac*, Po *-ak*, (H *-aca*), G *Hängematte*, I *amaca*, R *gamak*. Formo bazita sur FPo kun vokalisma apogo de IR. ¶ Io =, Ie *hamac*, Ia *-a*.

Pere de H el kariba lingvo (Taino) *hamaka*, nomo de pendanta reto destinita por dormado. – La G formo baziĝas sur popola etimologio ("pendanta mato"), vd. Eo-Post 1951, 140.

HAMSTR/O (f; RE): AFI(H) *hamster*, G *Hamster*. Rilate la sinkopitan *-e-* (neakcentatan), kp *fingro*. Escepta ekzemplo de popola bestnomo preferata al la scienca termino, kredeble pro akordo de pluraj fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *hamst/re*, Ia *-er*.

Ĝerm. vorto, kredeble par. al R *ħomjak*, Po *chomik* s.s.

HANGAR/O (8; PVS; ne ĉe Z): AF!Po(H) *hangar*, G *Hangar*, R *angar*. ¶ Io =, Ia *hangar*, Ie *-e*.

F vorto, eble el Fk **haim-gard* "barejo ĉirkaŭ la domo" (vd. resp. *hejmo* k *ĝardeno*).

HAR/O (f; Un): A *hair*, G *Haar* [ha:r]. Kp ank. Nd *haar*, Sv *hår*. Bazita sur G. La romanaj ekvivalentoj (F *cheveu*, H *cabello*, I *capillo* < L *capillus*) prezentas transskribajn malfacilaĵojn aŭ semantikajn konfuzeblojn (*kapel-*; *kap*, *il*). ¶ 1894 *krin-* (< L *crinis*). ¶ Io =; Ie *capill*, Ia *-o*.

El pĜ **hêra-*, eble par. al R *ŝerst'* "haro".

HARD/I (f; EG): A *harden*, G *(ver)härten*, Po *hartowac'*. Kp ank. Nd *harden*, Sv *härda*. Nur A konformas al la Ea formo; Po kredeble ludis rolon ĉe la elekto. ¶ 1894 *indur-* (< I *indurire*). ¶ Io *hard-igar* ("malmoligi"); Ie *durificar* ("malmoligi"), *temprar* (< I *temprare*); Ia *indurar*.

Propr. "malmoligi", de la adj. signifanta "malmola": A *hard*, G *hart*, Gt *hardus* < pĜ **hardhuz*, de HE rad. **kar-* "malmola, forta": Gr *krátos* "forto", *krateín* "esti forta, regi" (vd. *demokratio*); ank. en Sa *karkata-* "krabo", L *cancer* "kankro" (kp tiun), Gr *karkínos* "krabo, kankro".

HAREM/O (2; RE): AFIPo *harem*, G *Harem*, R *garem*, (H *harem*, *harén*). ¶ Io =, IeIa *harem*.

El Ar *h'arâm* "malpermesita" (> "parto de domo malpermesita al eksteruloj", t.e. virinejo) de *h'aruma* "esti malpermesita".

HARING/O (f; Un): A *herring*, F *hareng*, G *Hering*, I *aringa*, (H *arenque*); L postkl. *(h)aringus*, zool. *Clupea harengus*. Ŝajne kompromisa formo (*har-* laŭ F, *-ing* laŭ AG); estas tre rimarkinde, ke Z ne evitis la sufikssimilan radikfinon, des pli ĉar almenaŭ teorie vorto *har/ing/o* estas pensebla. ¶ 1906ab *hareng-*. ¶ IoIa =, Ie *harengo*.

El pĜ **hêringa-*, **hâringa-*, eble par. al A *hoar(y)* "grizeca".

HARMONI/O (1; RE): A *harmon/y*, F *-ie*, Po *-ia*, G *Harmonie*, I *armon/ia*, (H *ía*), R *garmonija*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *harmonía* "harmonio, ordo; junto", kp *harmózein* "kunigi, junti", de HE rad. **ar-* "kunmeti, aranĝi" (vd. *armi*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *harmon/iko*, *-iumo*.

HARMONIK/O (2; RE) 1) instrumento 2)scienco (ekde Wü; antaŭe *harmoni/o/scienc/o*): A *harmon/ica* (1), *-ics* (2), F *harmon/ica* (1), *-ique* [-ík] (2), G *Harmon/ika* (1), *-ik* (2), I *armon/ica* (1), *-ia* (2), Po *harmon/ijka* (*ustna*

"busa") (1), *-ia* (2), R *garmonika* (1), (H *armónica* 1, *armonía* 2). Ps-sf *-ik*. ¶ Io = (1), *harmonio-cienco* (2), Ie *harmonica* (1), *harmonie-scientie* (2), Ia *harmonica* (1, 2).

(1) A vorto farita de B. Franklin (1762) por instrumento inventita de li (la frap-harmoniko), el L adj. *harmonica*, do propr. "harmonia (instrumento)" el Gr *harmonikós*, adj. de *harmonía* (vd. *harmonio*). Same la inventinto de la tirharmoniko, Damian en Vieno, nomis (1829) sian instrumenton *Harmonika*. – (2) Farita laŭ multaj aliaj sciencnomoj formitaj per *-ik*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj; kelkaj lingvoj (ekz. IPo) preferas ne diferencigi inter 'harmonio' kaj 'harmon/iko, -ioscienco'.

HARMONIUM/O (2; Jü): AF *harmonium*, G *Harmonium*, I *armonium*, Po *harmonium*, *fisharmonia*, R *fisgarmonija*, (H *armonio*). Konservo de *um* estis necesa, ĉar *harmoni-* havas alian signifon; kp *forumo*. ¶ Io =, IeIa *harmonium*.

Farita (en F, ĉ. 1840) de Debain, orgenfaristo en Parizo, surbaze de *harmonie* (vd. *harmonio*). – (La komenca elemento en la PoR formoj el Gr *physa* "balgo".)

HARP/O (f; RE): A *harp*, F *-e*, G *Harfe*, I(H) *arpa*, Po *harfa*, R *arfa*. Bazita sur AF kun apogo de I. ¶ Io =, Ie *harp/e*, Ia *-a*.

El pĜ **harpô-*, kredeble de HE rad. **(s)kereb-* "kurbiĝi" (vd. *ŝrumpi*): la instrumento eventuale ricevis sian nomon pro kurba formo aŭ ludado per kurbiĝintaj fingroj.

HARPI/O (2; Be): A *harp/y* [-i], F *-ie*, Po *-ia*, G *Harpyie*, I *arp/ia* (H *-ía*), R *garpija*; L *Harpyia*. ¶ Io =, Ie *harpie*, Ia *harpyia*.

El Gr *hárpyia* s.s., eble kunligita kun *harpázein* "forrabi".

HARPUN/O (1; Be): A *harp/oon* [-u:n], F *-on*, Po *-un*, G *Harpune*, R *garpun*, H *arpón*). Radikfino *-un* laŭ GRPo kaj A prononco. ¶ Io =, Ie *harp/une*, I *-on*.

F vorto kun orig. signifo "(fer)hoko", der. (per sama sufikso kiel en *balono*, *balkono*, *kartono*, *salono*) de *harpe* "ungego" (kp F ant. *harper* "ekpreni"), eble kruciĝo de L *harpe* "falĉilo, serpo" (el Gr *hárpê* s.s.) kaj homonima vorto de ĝerm. origino.

HAŬT/O (f; Un): G *Haut*. Kp A *hide* "besthaŭto"; ank. Nd *huid*, Sv *hud* "haŭto". Ekskluzive G formo kun tipa diftongo (kiel en *daŭr-*, *laŭt-*, *ŝaŭm-*, *taŭg-*: Collinson 1950, 4). Apartenas al malgranda grupo de biologiaj terminoj de ĝermana origino, vd. Collinson l.c., 5. La romana ekvivalento (L *pellis*, F *peau*, H *piel*, I *pelle*) estis neebla pro alia signifo de *pel-*. ¶ 1894 *kut-* (< L *cutis*). ¶ Io *pelo*; IeIa *cute*.

El pĜ **hudhi-*, responda al L *cutis* s.s., de HE rad. **(s)ku-* "kovri, kaŝi", kp Sa *skunâti* "kovras", G *skytos* "ledo", L *scutum* "ŝildo", A *hide* "kaŝi", G *Hütte* "kabano". Kp *ŝaŭmo*.

HAV/I (f; Un): A *have*, G *haben*; F *avoir*, I *avere*, L *habere*. Kp ank. Sv *hava*; P *haver*. Kvankam la ĝermana kaj la latin-(id)a vorto havas malsaman originon (vd. sube), ili forme tiel akordas, ke ambaŭ konsistigas komunan fonton por la radiko. Ŝajne Z deiris de A (*hav-*), trovante apogon por *h-* en GL kaj por *-v-* en FI. ¶ 1881 *hab/i*. ¶ Io *hav/ar*, Ie *-er*, Ia *haber*.

Oni supozas kiel originon similajn sed ne identajn HE radikojn: AGSv (kp Gt *haban*) el pĜ **habai-* de HE rad. **kap-* "preni" (vd. *kapti*); L de HE rad. **ghabh-* s.s. (kp A *give*, G *geben* "doni"); ambaŭ radikoj estas eble origine imitaj (signantaj kaptan movon).

HAVEN/O (f; RE): G *Hafen*; ank. A *haven*, F *havre* (arĥ., spec.). Kp ank. Da *havn*, Nd *haven*. Verŝajne bazita sur G sed kun surpriza *-v-* laŭ AF (eble Z celis kompromisan formon). Se la vorto estas prenita el G, oni rilate la akcen-

ton komparu *fadeno, ĝardeno, posteno.* La latin(id)a ekvivalento (L *portus,* AF *port,* H *puerto,* I *porto*) ne taŭgis pro alia signifo de *port-; pord-* ankaŭ ne estis libera. ¶ Io *port/uo,* Ie *-u,* Ia *-o.*

El pĜ **hab(a)no-,* kredeble propr. "io kio alprenas, entenas" de HE rad. **kap-* "preni" (vd. *kapti,* kp *havi*).

HAZARD/O (2; RE): A *hazard,* F *hasard* [-z-], I *azzardo,* (H *azar*); ank. G *Hasard,* Po *hazard,* R *azart* "hazard-(lud)o". ¶ Io =, Ie *hasard/e,* Ia *-o.*

Pere de H el Ar vulg. *az-zahr* "ĵetkub/o, -a ludo" (*az* asimilita formo de la dif. art., vd. *algebro*), kp Ar klas. *jasara* "ludi per ĵetkuboj".

HE (1; RE): F *hé,* G *he;* kp (kun simila uzo) A *hey,* I *ehi,* Po *hej,* R *gej,* (H *eh*), L *heus.* ¶ Alvoka interjekcio Io *hola,* Ie *holá,* Ia *holla* (<A); en Ie ank. *hé, hey.*

Onomatopea.

HEBRE/O (1, 7; N-ro 13 1888, RE): A *hebrew,* F *Hébreu,* G *Hebräer,* I *Ebreo,* Po *Hebrajczyk,* R *jevrej,* (H *ebreo*); L *Hebraeus.* ¶ 1882 *hebr/o.* ¶ Io *Hebreo,* IeIa *hebreo.*

El Aramea *'ebrâyâ,* responda al He *'ibrî* "persono el trans (la rivero)", de *'êber* "la transa regiono", kp *'âbar* "transiri".

HEDER/O (f; RE): L *hedera;* F *lierre,* I *edera,* (H *hiedra, yedra*). Botanika termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *hedre,* Ia *hedera.*

Necerta etimologio.

HEGEMONI/O (4; Rabe, Wü): A *hegemon/y,* Po *-ia,* (H *-ía*), F *hégémonie,* G *Hegemonie,* I *egemonia,* R *gegemonija.* Ps-sf *-i* 1.

El Gr *hêgemonía* "hegemonio, politika superregado", de *hêgemôn* "gvidanto", de *hêgeísthai* "gvidi" (de HE rad. **sag-,* vd. *sagaca*).

HEĜ/O (8; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *plekt/-obar/il/o* aŭ sim.): A *hedge* [heĝ], F *haie,* G *Hecke.* Kp ank. Nd *heg.* Transskribo de la A prononco. ¶ Io *hego,* Ie *hag,* Ia *haga, sepe* (< L *saepes*).

El Ĝ okc. **hagjô(n)* kun orig. signifo "ĉirkaŭbarejo", de HE rad. **kagh-* "ĉirkaŭbari" (kp *kaĝo*).

HEJM/O (f; RE): A *home,* G *Heim.* Kp Ji *heym;* ank. Nd *heem,* No *heim* [hejm], Sv *hem.* Bazita sur G (la redono de *ei* per Eo *ej* ŝajnas inspirita de Ji same kiel en *hejti;* kp ank. *mejlo*). Formo laŭ A estis neebla pro alia signifo de *hom-.* La romanaj lingvoj malhavas vorton por tiu ĉi nocio. ¶ 1894 *sue dom* ("sia domo"). ¶ Io *hemo,* Ie *hem* (kp Berger 1947, 8), Ia *home.*

Identa kun Gt *haims* "vilaĝo", el pĜ **haima-,* orig. probable "restadejo", de HE rad. **kei-* "kuŝi", kp Sa *céte, cáyate* "kuŝas", Gr *keísthai* "kuŝi", *kômê* "vilaĝo", L *civis* "civitano" (vd. *civila*). Kp. ev. *hangaro.*

HEJT/I (f; Un): A *heat* [hi:t], G *heizen* [hajts-]. Kp Ji *heytsn.* Kompromisa formo inter A kaj G (Waringhien LV 80), kie *ej* reprezentas G *ei* (kp *hejmo*) kaj *t* estas prenita el A; tamen oni ne subtaksu la inspiron de la Ji formo. ¶ 1894 *fuok/a* (*fuok-* "fajr-"). ¶ Neniu speciala vorto en la aliaj L.I.

El pĜ **haitjan* "varmigi", kaŭza verbo de **haita-* "varm(eg)a", kp A *hot,* G *heiss;* par. al Li *kaîsti* "varmiĝi".

HEKATOMB/O (1; Jü): A *hecatomb,* (H *-e*), F *hécatombe,* G *Hekatombe,* I *ecatombe,* Po *hekatomba,* R *gekatomba.*

El Gr *hekatombê* "ofero de cent bovoj", kunm. de *hekatón* "cent" (vd. *hektogramo*) k *bous* "bovo" (vd. tiun).

HEKSAMETR/O (2; Be): A *hexameter,* F *hexamètre,* G *Hexameter,* I *esametro,* Po *heksametr,* R *gekzametr,* (H *hexámetro*). Malgraŭ R, Eo ne havas *-kz-* en tiu ĉi radiko (kp *ekzameno*); rimarku Po *-ks-* (cetere R varias, kp ekz. *heksagon* "heksagono"). ¶ IoIa *hexametr/o,* Ie *-e.*

El Gr *hexámetros* (adj., kp *hexámetra épê* "heksametraj versoj"), propr. "de ses mezur(unu)oj": *hex* "ses" (vd. tiun), *métron* "mezur(unu)o" (vd. *metro,* kp *metriko*).

HEKTAR/O (1; Be): AF *hectare*, G *Hektar*, I *ettaro*, Po *hektar*, R *gektar*, (H *hectárea*).

Vorto de la metra sistemo, konstruita en F (1795) el *hecto-*, reprezentanta Gr *hekatón* "cent" (vd. *hektogramo*) k *are* (> A *are*, G *Ar*, H *área*, I *aro*, PoR *ar*) "aro (100 kvm)" el L *area* "areo, placo".

HEKTOGRAM/O (2; Be): A *hecto/gram(me)*, F *-gramme*, G *Hektogramm*, I *ettogramma*, Po *hektogram*, R *gektogramm*, (H *hectógramo*). – **HEKTOLITR/O** (2; Be): A *hecto/litre*, *-liter*, F *-litre*, (H *-litro*), G *Hektoliter*, I *ettolitro*, Po *hektolitr*, R *gektolitr*. – **HEKTOMETRO** (2; Be): A *hecto/metre*, *-meter*, F *-mètre*, (H *-metro*), G *Hektometer*, I *ettometro*, Po *hektometr*, R *gektometr*.

Konstruitaj en F (1795): *hecto-* el Gr *he-katón* "cent" (kies unua elemento signifas "unu", devenante de HE **sem-*, vd. *simpla*, *sama*; la dua elemento identas kun L *centum* "cent", vd. tiun); pri la diversaj duaj elementoj, vd. *gramo*, *litro*, *metro*. – Kp ank. *hekatombo*, *hektaro*.

HEL/A (f; RE): G *hell*. Kp ank. Nd *helder*. Pli facile asimilebla ol A *bright*; la romanaj lingvoj ne posedas ekzaktan ekvivalenton. ¶ Mankas en 1894 ("hele = akute aŭ klare aŭ lume"). ¶ Neniu ekvivalento en la aliaj L.I. (Io *klara*, *lum-oza* ktp).

El G ant. *hel*, uzata pri sono ("laŭta, klara"), kp G *hallen* "sonori; resoni", de HE rad. **kel-* "voki" (kaj do prapar. al *klara*, vd. tiun).

HELIC/O (4; Jü) 1) geom. 2) meĥ. (ekde Ka): A *helix* (1) (kp *helical* "-a"), F *hélice* (1, 2), I *elica* (1, 2), (H *hélice* 1, 2). Kp L *hel/ix -icis* "-a ornamaĵo". Tiu ĉi radiko kaj la sekva (kiuj ambaŭ aperas en Jü) reprezentas diferencigojn de la L(-Gr) stemo *helic-*: *helic/o* konservas la L ortografion, *helik/o* respegulas la L (kaj Gr) prononcon (kp plue eo *heliks/o* Wü, bazita sur la L-Gr nominativo). Ĉe la distribuo de signifoj F supozeble influis. ¶ Io =, Ie *helice* (ank. "heliko"), Ia *helice* (ank. "heliko, helikso").

El Gr *hél/ix -ikos* "spiralo, volvaĵo", kp *eileín* "volvi", de HE rad. **ŭel-* "volvi" (vd. tiun). Etimologie identa estas *heliko*; kp ank. *helikoptero*.

HELIK/O (2; Jü): L zool. *Hel/ix* (*-icis*); A *helix*. Zoologia termino prenita el L. Pri la formo, vd. *helico*. ¶ Io =, IeIa *helice*.

Bazita sur Gr *hélix* "spiralo" (pro la spirala konko de la besto), vd. *helico*. (R *ulitka* s.s., citita de Bastien, ne ŝajnas parenca.)

HELIKOPTER/O (8; Wü; ne ĉe Z): A *heli/copter*, (H *-cóptero*), F *hélicoptère*, G *Helikopter*, I *elicottero*, Po *helikopter*, R *gelikopter*. ¶ Io =, Ie *helicopter/e*, Ia *-o*.

Konstruita (en F, 1907) el Gr *hélix* "ŝraŭb(kurb)o, spiralo" (vd. *helico*) k *pterón* "flugilo" (kp *pétesthai* "flugi"; vd sub *peti*).

HELIOTROP/O (2; Be): A *helio/trope*, Po *-trop*, (H *-tropo*), F *héliotrope*, G *Heliotrop*, I *eliotropio*, R *geliotrop*; L *heliotropium*. La foresto de radikfina *-i* montras ke la bazo estas la modernaj fontlingvoj, ne L (male ekz. *geranio*). ¶ Io =, Ie *heliotrop*, Ia *-io*.

El Gr *hêliotrópion* s.s., propr. "(io) sin turnanta laŭ la suno": *hêlios* "suno" (vd. s.t.v.), *tropê* "turno" (kp *tropo*) de *trépein* "turni" (vd. *tropo*).

HELP/I (f; Un): A *help*, G *helfen*. Kp ank. Nd *helpen*, Sv *hjälpa*. Bazita sur A; la ĝermana vorto estas 'pli distinga kaj pli konciza ol kiu ajn adapto de I *aiutare*, H *ayudar*, F *aider*' (Collinson 1950, 10). ¶ 1894 *juv-* (< L *iuvare*). ¶ Io *helpar*; IeIa *auxiliar* (< L *auxiliari*), Ia ank. *adjuvar* (< L *adiuvare*).

*El pĜ **helpan* (kp Gt *hilpan*), par. al Li *šelpti* "helpi".

HEPAT/O (f; RE): Gr *hêp/ar -atos*; L med. *hep/ar -atis*; kp L *hepat/icus*, A *-ic*, F *hépatique*, I *epatico*, (H *hepático*) "-a". Sendube la internacie disvastigita

adjektivo inspiris al Z la nekutiman procedon prunti radikon rekte el Gr (en L la vorto estas fremda); ankaŭ li povis trovi apogon en la nomo de malsano A *hepatite*, F *hépatite*, I *epatite* "hepat/it/o". ¶ Io =, Ie *hépate*, Ia *ficato* (kp I *fegato*), *hepate*.

El HE **jekŭr-* "hepato", kp Sa *yákrt*, L *iecur*.

HERB/O (f; Un): A *herb*, F *-e*, I *erba*, (H *hierba*, *yerba*); L *herba*. Rim. ankaŭ la internacian derivaĵon APo *herb/arium*, F *-ier*, (H *-ario*), G *Herbarium*, I *erbario*, R *gerbarij* > eo *herbari/o* EG. ¶ Io =, Ie *herb/e*, Ia *-a*.

Necerta etimologio.

HERED/I (f; Un): A *inherit* (kp *hereditary* "-a"), F *hériter* (kp *héréditaire* "-a"), I *ereditare*, (H *heredar*); L *her/es -edis* "-anto". Sendube bazita sur la L substantiva stemo, troviĝanta ankaŭ kiel bazo de la adjektivoj AF kaj la verbo I. ¶ IoIe *hered/ar*, Ia *-itar*.

L *heres* (der.: *hereditas* "-aĵo" kun *hereditarius* "-a") orig. kredeble "kiu ricevas la liberiĝintan ('orfan') posedaĵon" (por la semantiko, kp G *Erbe* "heredaĵo", par. al L *orbus* "orfa") de HE rad. **ghe-* "vaki, forlasi", kp Sa *jáhâti* "forlasas, rezignas", Gr *khêra* "vidvino".

HEREZ/O (f; RE): A *heresy*, F *hérésie* [-z-], G *Häresie*†, I *eresia* [-z-], Po *herezja*, R *eres'*, (H *herejía*); L *haeresis*. Laŭ AFIPo, oni atendus pseŭdosufikson *-i-*; ties foresto povas esti inspirita de R aŭ (pli verŝajne) bazita sur la L(-Gr) formo (normale Gr *-sis* > Eo *-z/o*, kp *analizo* < Gr *análysis*, *sintezo* < *synthesis* kaj multajn aliajn; vd. la ps-sf *-z*). Ekzakta paralelo ŝajnas *frenez/o*. ¶ 1894 *heresi-*. ¶ Io *herezio*, Ie *heresi/e*, Ia *-a*.

El Gr *haíresis* "sekto", pli frue "privata doktrino, opinio", propr. "kion oni elektas, elekto", de *haireín* "preni", mediale "preni por si, elekti".

HERMAFRODIT/O (2; RE): AF *herm/-aphrodite*, Po *-afrodyta*, (H *-afrodita*), G *Hermaphrodit*, I *ermafrodita*, R *germafrodit*. ¶ Io =, Ie *herm/afrodit*, Ia *-aphrodito*.

El Gr *hermaphróditos* s.s., kunm. de dinomoj *Hermês*, reprezentanta la viran principon, k *Aphrodítê*, reprezentanta la virinan (oni rakontis, ke Hermafrodito, la filo de Hermo kaj Afrodita, nedisigeble kuniĝis kun nimfo).

HERNI/O (f; RE): L *hernia*; A(H) *herni/a*, F *-e*, I *ernia*.¶ Io =, Ie *herni/e*, Ia *-a**.

Oni komparas la unuan elementon de L *haru-spex* "internaĵ- inspektisto", kredeble par. al Gr *khordê* "intesto" k Sa *hirâ* "vejno".

HERO/O (f; N-ro 14 1888, RE): A *hero*, F *héros*, I *eroe*, R *geroj*, (H *héroe*); G *Heroe*, PoL *heros* havas precipe la mitologian sencon. Kp G *hero/isch*, Po *-iczny* "-a"; vd. ankaŭ sub la sufikso *-in*. Substantiva radikfino *-o* ankaŭ en *alo/o*, *karo/o*. ¶ Io *hero(ul)o*, Ie *heróe*, Ia *heroe*.

El Gr *hêrôs* s.s., orig. pri duondioj; se orig. "protektanto, konservanto", par. al L *servare* "konservi" (vd. tiun k *servi*).

HEROLD/O (1; RE): A *herald*, (H *-o*), F *héraut* [-ró], G *Herold*, I *araldo*, Po *herold*, R *gerold*. Oni vidas, ke *-o-* havas sufiĉe vastan apogon (GPoR plus F prononco). ¶ IoIa *herald/o*, Ie *-e*.

El F ant. *heralt* (kp L mez. *heraldus*) de ĝerm. origino: Fk **hari-wald* "oficiro", propr. "armea ĉefo": por la unua elemento, kp G *Heer* "armeo" (HE **koro-* "milito k.s.", ekz. en Li *kâras* "milito"); por la dua, kp G *walten* "regi" (HE rad. **ŭal-*, vd. *valoro*).

HETMAN/O (2; RE): AFPo(H) *hetman*, G *Hetman*, I *etmano*, R *getman*. ¶ Mankas en la aliaj L.I.

Po vorto, el G *Hauptmann* "kapitano, ĉefo": *Haupt* "kapo" (vd. tiun), *Mann* "viro" (< pĜ **manna-*, ank. en A *man* "viro, homo"; kp Sa *mánu-* "homo", R *muĵ* "viro; edzo": HE **manu-*?).

HEZIT/I (3; Wü; antaŭe *ŝancel/iĝ/i*): A *hesitate* [-z-], F *hésiter* [-z-], I *esitare*

[-z-]; L *haesitare.* (Kp H *hesitación* "-o".) ¶ Io *hezitar*, IeIa *hesitar.*

Intensa verbo de L *haerere* s.s., orig. "fiksiĝi, resti senmova", eble par.al Li *gaîati* "heziti".

HIACINT/O (1; RE): A *hyacinth*, F *jac/inthe*, (H *-into*), G *Hyazinthe* [-ts-], Po *hiacynt*, R *giac/int*, I *-into*; L *hyacinthus.* Kiel botanika termino verŝajne bazita ĉefe sur L. ¶ Io =, Ie *hiacinte*, Ia *hyacintho.*

El Gr *hyákintos*, nomo de pluraj bluaj floroj; la sufikso indikas pregrekan originon (vd. *absinto*). Kp *vakcinio.*

HIDR/O (2; RE): APo *hydr/a*, F *-e*, G *Hydra*, I *idra*, R *gidra*, (H *hidra*). ¶ Io =, Ie *hidra*, Ia *hydra.*

El Gr *hydra* s.s., kp *hydros* "akvoserpento", el HE **udro-* "(en)akva (estaĵo)", kp Sa *udrá-* "speco de akva besto", AG *otter* "lutro" (kp tiun), R *vydra* "lutro". Kp sub *hidrofobio.*

HIDRARG/O (f; RE): L *hydrargyrus.* Prenita el L, supozeble sub influo de la ĥemia simbolo por hidrargo, *Hg.* Radikfina apokopo, kredeble por ne havi nenecese longan radikon (kp ekz. *cikatr-*, *erizipel-*, *kukum-*), des pli ĉar la restanta *-ir-* reprezentas alian signifon en Eo. ¶ 1894 *hidrargir-.* ¶ Io *merkurio*, Ie *mercuri/e*, Ia *-o* (< A *mercur/y*, HI *-io*, F *mercure*).

El Gr *hydrárgyros* s.s., kunm. de *hydôr* "akvo" (vd. *hidrofobio*) k *árgyros* "arĝento" (vd. tiun) (pro la moviĝemo kaj la koloro de la elemento, kp A *quicksilver*, F *vif-argent*, propr. "vigla arĝento").

HIDROFOBI/O (1; Jü): A *hydrophob/ia*, F *-ie*, I *idrofobia*, (H *hidrofobia*); L *hydrophobia.* Ps-sf *-i* 1.

El Gr *hydrophobía* s.s., de *hydrophóbos* "akvon timanta", kunm. de *hydôr* "akvo" (kunmeta formo *hydro-*, kp *hidrargo*, *hidro/geno*, *-statiko*, *-terapio*; kp ank. *hidro*) k *phóbos* "timo". La unua elemento el HE **ŭed-*, *ud-* "akvo" (kun diversaj sufiksoj): Sa *udán-* "akvo", L *unda* "ondo" (kp tiun), A *water* "akvo", G *Wasser* "akvo", R *voda* "akvo", Ir *uisce* "akvo" (kp *viskio*); la dua estas subst. de *phébesthai* "timi", kredeble par. al R *beĵat'* "kuri".

HIDROGEN/O (f; RE): A *hydro/gen*, F *-gène*, I *idrogeno*, (H *hydrógeno*); L mod. *hydrogenium.* ¶ Io =, Ie *hidrogen*, Ia *hydrogeno.*

Farita (en F, 1787, de de Morveau), propr. "akvon generanta", el Gr *hydôr* "akvo" (vd. *hidrofobio*) kaj Gr rad. *gen-*, ekz. en *gennán* "generi" (vd. sub *gento*; kp spec. *oksigeno*).

HIDROSTATIK/O (2; RE): A *hydrostat/ics*, F *-ique*, G *Hydrostatik*, I *idrostatica*, Po *hidro/statika*, (H *-stática*), R *gidrostatika.* Ps-sf *-ik.*

Konstruita el Gr *hydôr* "akvo" (vd. *hidrofobio*) k la sciencnomo A *stat/ics*, F *-ique*, I *-ica*, R *-ika*, G *Statik*, H *estática* > eo *statik/o* EG el Gr *statikós* "rilata al ekvilibro" de *statós* "star/anta, -igita" (vd. Gr *histánai* "starigi" sub *stari*).

HIDROTERAPI/O (2; Be): A *hydro/therapy*, F *-thérapie*, G *Hydrotherapie*, I *idroterapia*, Po *hidroterap/ia*, (H *-ía*), R *gidroterapija.* Ps-sf *-i* 1.

Konstruita el Gr *hydôr* "akvo" (vd. *hidrofobio*) k *therapeía* "kuracado" (vd. *terapio*).

HIEN/O (1; RE): A *hyena*, F *hyène*, G *Hyäne*, I *iena*, Po(H) *hiena*, R *giena*; L *hyaena.* ¶ Io =, Ie *hien*, Ia *hyena.*

El Gr *hyaina* s.s., propr. "porkino" (pro la dorsaj haregoj), der. (per ina suf. *-aina*, kp *léaina* "leonino") de *hys* (var.: *sys*) "pork(in)o" el HE **sû-s* s.s., kp L *sus* "porko", Sa *sû-karâ-* "apro, porko", A *sow*, G *Sau* "porkino", A *sw-ine*, G *Schw-ein* "porko".

HIERARĤI/O (*-rk-* 3; *-rĥ-* RE): A *hierarch/y* [-k-], Po *-ia* [-ĥ-], F *hiérarchie* [-ŝ-], G *Hierarchie* [-k-], I *gerarchia* [-k-], R *ierarĥija*, (H *jerarquía* [-k-]); L ekl. *hierarchia* [-k-]. Z uzis la formon kun *-ĥ-*; pri *-ĥ-/-k-*, kp *arĥeologo.* Ps-sf *-i* 1.

El Gr ekl. *hierarkhía* "(pastra) rangogra-

daro" de *hierós* "sankta" (*hiereús* "pastro"; kp *hieroglifo*) k *árkhein* "regi" (vd. *arkaika*).

HIERAŬ (f; Un): F *hier*, I *ieri*, (H *ayer*); L *heri*. Eo montras FI vokalismon kun *ie* el L *e* kiel en *fiera*, *mielo*, *piedo*. Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1881 *jur* (sen etimologio PVZ 5, 138; ĉu bizara uzo de F *jour* "tago"?). – 1894 *hieru*. ¶ Io *hiere*, Ie *yer*, Ia *heri*.

El HE **gh(j)es* "hieraŭ", kp Sa *hyas*, Gr *khthés*, G *ges-tern*, A *yes-terday* (la AG formoj estas orig. adj. kiel L *hes-ternus* "hieraŭa".

HIEROGLIF/O (2; Be): A *hiero/glyph*, Po *-glif*, F *hiéroglyphe*, G *Hieroglyphe*, I *geroglifico*, R *ieroglif*, (H *jeroglífico*). ¶ Io =, Ie *hieroglif*, Ia *hieroglyphico*.

Subst. formita el la responda adj. (kp supre la HI formojn, kiuj orig. estas adj.), el Gr *hieroglyphiká (grámmata)* "hieroglifaj (signoj)", propr. "sankta (pastra, religia) skribo", de *hierós* "sankta" (kp *hierarĥio*) k *glyphein* "enĉizi" (par. al L *glubere* "senŝeligi", A *cleave* "fendi").

HIGIEN/O (1; RE): A(H) *hygiene*, F *hygiène*, G *Hygiene*, I *igiene*, Po *higiena*, R *gigiena*. ¶ Io =, Ie *higien*, Ia *hygiene*.

El Gr *hygieinón* "sano", orig. subst.-igita adj. der. de *hygiês* "sana", reprezentanta HE pref. **su-* "bone" (ekz. en Sa *su-*) k rad. **gŭiŭ-* "vivi" (vd. tiun).

HIGROMETR/O (2; Be): A *hygro/meter*, F *-mètre*, G *Hygrometer*, I *igrometro*, Po *higr/ometr*, (H *-ómetro*), R *gigrometr*.

Konstruita (en F, 17a jc) el Gr *hygrós* "malseka" (de HE rad. **ugŭ-*, vd. *humoro*) k *métron* "mezuro" (vd. *metro*).

HIMN/O (1; RE): APo *hymn*, F *-e*, G *Hymne*, I *inno*, R *gimn*, (H *himno*); L *hymnus*. ¶ Io =, Ie *himn*, Ia *hymno*.

El Gr *hymnos* s.s., kredeble par. al *hymên* "geedziĝfesta kanto".

HIPERTROFI/O (2; Jü): A *hypertroph/y*, F *-ie*, G *Hypertrophie*, I *ipertrofia*, Po *hipertrof/ia*, (H *-ía*), R *gipertrofija*; L med. *hypertrophia*. Specialigita termino internacia, eble prenita rekte el L med. Ps-sf *-i* 1.

Propr. "tronutrado (de membro)", formita el Gr *hypér* "tro, super" (vd. sub *super*) k *trophê* "nutrado" de *tréphein* "nutri", orig. "dikigi, koaguligi".

HIPNOT/a (4; Be): A *hypnot/ic*, F *-ique*, G *hypnotisch*, I *ipnotico*, Po *hipnotyczny*, R *gipnotičeskij*, (H *hipnótico*). La radiko povas esti prijuĝata diversmaniere: (a) kiel bazita sur la citita adjektivo kun apokopo de la adjektiva sufikso (analoge en *elast/a*, *elektr/a*), (b) kiel retrograda formaĵo el sambazaj internaciaj derivaĵoj, ekz. A *hypnot/ize*, *-ism*, F *hypnot/iser*, *-isme*, G *hypnot/isieren*, *Hypnot/-ismus* ktp (kun Eaj sufiksoj anstataŭantaj tiujn de la fontlingvoj: *hipnot/ig/i*, *hipnot/ism/o*). Ĉiuokaze ĝi ne estas bazita sur la substantivo, kiu donus radikfinon *-z* (A *hypn/osis*, F *-ose*, G *Hypnose*, I *ipnosi*, Po *hipnoza*, R *gipnoz*). Analogaj problemoj ĉe la radikoj *hipokrit-*, *narkot-*. ¶ Io *hipnot-a*, *-o*; la naturalismaj L.I. duobligas la radikon: Ie *hipno/tic*, *-se*; Ia *hypno/tic*, *-se*.

El Gr *hypnôtikós* "dormiga" de *hypnoún* "dormigi" de *hypnos* "dormo" (vd. sub *somnambulo*).

HIPODROM/O (2; Be): AF *hippodrome*, G *Hippodrom*, I *ippodromo*, Po *hipodrom*, R *ip(p)odrom*, (H *hipódromo*).

El Gr *hippódromos* "ĉevalkurejo": *híppos* "ĉevalo" (< HE **ekŭos*, kp Sa *ácva-*, L *equus*; kp *hipopotamo*), *drómos* "kur/ejo, -ado" de *drameín* "kuri" (kp Sa *drámati* "kuras").

HIPOKRIT/A (f; RE): A *hypo/crite*"-ulo", F *-crite* "-a, -ulo", I *ipocrita* "-ulo", Po *hipokryta* "-ulo", (H *hipócrita* "-a, -ulo"). Evidente bazita sur la substantivo (uzata ankaŭ kiel adjektivo en FH); la ebla alternativo **hipokrizi-* (A *hypo/crisy*, F *-crisie*, I *ipocrisia*, Po *hipokryzja*) donus pli pezajn derivaĵojn: **hipokrizi/i*, *-ad/o*, *-ul/o*. Kp sub *hipnot-* ĉi-supre. Ps-pf *hipo-*. ¶ Io *hipo-*

krit-a, -(ul)o "-ulo"; Ie *hipocrit* "-ulo", *-ie* "-o"; Ia *hypocri/ta* "-ulo", *-sia* "-o".

El Gr *hypokrítês* "-ulo", ank. "aktoro" ('iu kiu ŝajnigas'), orig. "respondanto" (ĉar en la grekaj dramoj la aktoroj origine respondis al la kantoj de la ĥoro), agantnomo de *hypokrínesthai* "respondi", orig. "(responde) doni sian prijuĝon": *hypó* "sub" (vd. tiun; kp *hipo/teko, -tezo*), *krínesthai* "prijuĝi" (vd. *krizo*).

HIPOPOTAM/O (1; Jü): A *hippopotam/us*, F *-e*, I *ippopotamo*, Po *hipo/potam*, (H *-pótamo*), R *gippopotam*; L *hippopotamus*. ¶ Io =, Ie *hippopotam*, Ia *-o*.

El Gr *hippopótamos*, kuntirita formo de *híppos potámios* "ĉevalo rivera" (kp semantike G *Flussp ferd* s.s., propr. "riverĉevalo"): *híppos* "ĉevalo" (vd. *hipodromo*), *potam/ós* (adj. *-ios*) "rivero" (eble orig. "falanta akvo" de HE rad. **pet-* "fali", vd. *peti*).

HIPOTEK/O (1; Jü): A *hypo/thec*†, F *-thèque* [-k], G *Hypothek*, I *ipo/teca*, R *-teka*, Po *hipo/teka*, (H *-teca*). ¶ Io =, Ie *hipoteca*, Ia *hypotheca*. Ps-pf *hipo-*.

El Gr *hypothêkê* "garantiaĵo", propr. "deponaĵo", de *hypotithénai* "deponi; submeti": *hypó* "sub" (vd. *hipokrita*), *tithénai* "meti" (vd. *tezo*). Kp spec. sekv.

HIPOTEZ/O (1; RE): A *hypo/thesis*, F *-thèse* [-z], G *Hypothese*, I *ipotesi* [-z-], Po *hipoteza*, R *gipoteza*, (H *hipótesis*). Ps-pf *hipo-*; ps-sf *-z*.

El Gr *hypóthesis* "supozo", propr, "bazo (por argumentado), submetaĵo" (kp la saman semantikan evoluon en *supoz-*), subst. de *hypotithénai* "submeti" (vd. plue *hipoteko*).

HIRT/A (3; Jü): L *hirtus*; I *irto*. Kp P *hirto*. Kromformo L *hirsut/us*, AF *-e*, (H *-o*), I *irsuto*. Z preferis la mallongan formon, kredeble por oportuneco. ¶ I *hirsute*; Io *heris-ita*, Ie *herisset* (< F *hérisser* "hirtigi").

Kredeble par. al L *hircus* "kapro" ('hirtulo') k *horrere* "esti hirta; (pp haroj) stari" > "senti timon" kun der. *horror* "angoro, timo, teruro" (HE rad. **gher-*, vd. *hordeo*). Kp *erinaco*.

HIRUD/O (f; RE): L *hirud/o -inis*. Zoologia termino prenita el L. La L nominativa *-o* estas transprenita kiel Ea substantivsigno (same en *hirundo*; vd. plue *homo*.) ¶ Io *sangui/sugo*, Ie *-suc*, Ia *-suga* (< LI *sangui/suga*, H *-juela*, F *sangsue*, propr. "sangosuĉanto").

Necerta etimologio.

HIRUND/O (f; RE): L *hirund/o -inis*; F *hirondelle*, I *rondine*. Zoologia termino prenita el L (forme kp *hirudo*). ¶ Io =, Ie *hirund/e*, Ia *-ine*.

Eble onomatopea, kp L *hirrire* "grunti".

HISKIAM/O (f; RE): L *hyos/ciamus, -cyamum* (L bot. *Hyoscyamus*); F *jusquiame* [ĵyski-], I *giusquiamo*. La bazo estas L (botanika termino) sed kun evito de hiato (kiel en *franda*), probable laŭ modelo de F. ¶ Io = (espismo), Ie *hiosciame*; mankas en Ia.

El Gr *hyoskyamos* s.s., propr. "porka (= aĉa) fabo": *hyós* gen. de *hys* "porko" (vd. *hieno*), *kyamos* "fabo".

HISOP/O (2; Be): A *hyssop*, F *hysope*, G *Ysop*, I *issopo*, Po *hyzop*, R *is(s)op*, (H *hisopo*); L *hyssop/us, -um* (L bot. *Hyssopus*). Intervokala *-s-* (anst. *-z-*) normale rezultiĝas de origina *-ss-*. ¶ Io =; mankas en IeIa.

El Gr *hyssôp/os, -on* s.s., de semida origino (kp He *êzôb* s.s.).

HISPAN/O (7; Du): L *Hispanus*; A *Spaniard* (kp *Hispanic* "-a", *Hispano-American* "hispan-amerika"), F *Espagnol* (kp *hispanique* "-a"), G *Spanier*, I *Spagnuolo*, Po *Hiszpan*, R *ispanec*, (H *español*, ank. *hisp/ano, -ánico* "-a"). La L radiko retroviĝas en la slavaj formoj kaj en diversaj pli-malpli doktaj formaĵoj en okcidentaj lingvoj. ¶ Io *Hispano*, IeIa *h-*.

Eble ligita al la urbonomo L *Hispalis* "Sevilo" (de keltibera origino?).

HISTERI/O (1; Jü; *histerik-* RE, Be): A *hysteria*, F *hystérie*, G *Hysterie*, I *isterismo*,

Po *histeria*, R *isterija*, (H *histerismo*); L med. *hysteria*. Ps-sf *-i* 1.

Moderna formaĵo el la adj. A *hyster/ic(al)*, G *-isch*, F *hystérique*, H *histérico*, I *isterico* el L *hystericus* "-a, -ulo" el Gr *hysterikós* "-a", propr. "uter(e malsan)a" de *hystéra* "utero" (vd. tiun; kp sub *histriko*).

HISTORI/O (f; Du, RE): A *(hi)story*, F *hist/oire*, Po(H) *-oria*, I *storia*, R *istorija*. Kp G *historisch* "-a", L *historia* "historia verk(ad)o". ¶ Io =, Ie *histor/ie*, Ia *-ia*.

El Gr *histôría* "historio, esplorado, rakonto", orig. "sciado" (kp *historeín* "rakonti; sciiĝi; esplori"), der. de *hístôr* "scianto", pli frue **ŭidtor*, agantnomo de *eidénai* "scii" (rad. **ŭeid-*, vd. *vidi*).

HISTRIK/O (f; RE): L *hystr/ix -icis*; I *istrice*. Zoologia termino prenita el L. ¶ Io *porkespino*, Ie *porc spinut*, Ia *porcospino* (< A *porcupine*, F *porc- épic*, H *puerco espín*, I *porcospino*, propr. "porko pika (dorna)".

El Gr *hystrix* s.s.; la dua elemento estas *thrix* "haro", la unua eble identa kun *hys-* en Gr *hysteros* "posta" (vd. sub *utero*); origina signifo do "dorsharulo".

HO (f; Un): A *oh, ho*, F *oh, ô*, G *o(h)*, I *o*, Po *och, o*, R *o(ħ)*, (H *oh*); L *o(h)*. La plej internacia formo **o* estiŝ neebla, ĉar tiu elemento havis alian funkcion en la lingvo. Z do elektis *ho*, kredeble per inversigo de la skribo *oh* trovata en pluraj fontlingvoj (kp Szerdahelyi 1987, 134) – kaj ne surbaze de AF *ho*, kiuj nur parte kongruas kun la sencoj de Eo *ho*. La analogio al *ha* certe ludis rolon. ¶ 1881 *oh*; 1894 *o*. ¶ Io =, Ie *o(h)*, Ia *o(h)**.

Onomatopea interjekcio, kp Gr *ô*, Sa *â*.

HOBOJ/O (1; Jü): A(H) *oboe*, F *hautbois* [obŭá], G *Hoboe*, I *oboè*, Po *obój*, R *goboj*. Eo *h-* estas evidente inspirita de FG; *-oj-* povas esti transskribo de F *-oi-* (kp *fojo, fojno*) sed pli kredeble baziĝas sur la slavaj formoj; ĉiuokaze per ĝi estas evitita hiato. ¶ Io *hoboyo*, Ie *hoboe*, Ia *oboe*.

F vorto, propr. "alta ligno" (t.e. ligna instrumento kun altaj tonoj, kontraste al la fagoto): *haut* "alta" (vd. *alta*), *bois* "ligno; arbareto" (vd. *bosko*).

HODIAŬ (f; Un): L *hodie*; F *(aujourd')hui*, I *oggi* [óĝi] (kp *odierno* "-a"), (H *hoy*). Kp P *hoje*. G *heute* [hój-] estas analoge formita kaj povas servi kiel mnemonika apogo. Bazita sur L; malsame ol ĉe *hieraŭ*, la latinidaj formoj estas malfacile asimileblaj. Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1894, 1907 *hodiu*. ¶ Io *ca-die* ("tiun ĉi tagon") > *hodie* (1958), IeIa *hodie*.

L vorto signifanta "tiun ĉi tagon": *ho-*, ablativo de la pronoma radiko troviĝanta en L *hi-c* "tiu ĉi", *ho-c* "tio ĉi" (kp sub *ĉi*; el HE akcentiga partikulo **ghe*, **gho*, kp Sa *gha* "ja, vere"); *die*, ablativo de *dies* "tago" el HE **djeŭs* "taglumo; ĉielo; ĉiela dio", kp Sa *dyauh* "ĉielo, brilo, tago", Gr dinomo *Zeus*, L dinomo *Juppiter* (< **Iov-pater*), vd. *juglando, ĵaŭdo*; lastvice par. al la vortoj cititaj sub *dio*. Kp ank. *ĵurnalo*. – (G *heute* < **hiu tagu* "ĉi-tage": por la unua elemento, kp *hier* "tie ĉi"; por la dua, vd. *tago*.)

HOK/O (f; RE): A *hook*, G *Haken*, Po *hak*. Kp ank. Nd *haak*. Verŝajne bazita sur A ortografio (A *oo* > Eo *o*; alia rezulto en *fut-* < A *foot*); *hak-* estis neebla pro alia signifo. ¶ Io =; IeIa *croc* (vd. *kroĉi*), Ia ank. *uncino* (< I).

AG reprezentas diversajn apofoniajn formojn de sama pĜ rad. **hôka(n)* (HE rad. **kêg-* aŭ sim., kp R *kogot'* "ungego").

HOM/O (f; Un): L *hom/o -inis* (kp L zool. *Homo sapiens*, nomo de la homa specio); F *homme*, I *uomo*, (H *hombre*). Kp ank. P *homem*. Internacie konata ankaŭ per la derivaĵo *human-* "homeca", vd. tiun. Sendube prenita rekte el L (triadeklinacia substantivo akceptita en nominativa formo same kiel en *hirudo, hirundo, kartilago, lanugo, lentugo, ordo*); tamen ankaŭ la FI formoj apogas mallongan radikformon (cetere ra-

diko **homin-* estus absolute neebla pro la virina sufikso). ¶ 1878 *hom/oz/e* "hom/ar/o"; 1881 *hom/o.* ¶ Io =, Ie *hom*, Ia *homine.*

La latinida vorto signifas "homo" k "viro" (tiel ankaŭ A *man*); ĝi estas par. al Gt *guma* "viro" (kp G *Bräuti-gam* "novedzo", propr. "viro de la novedzino"). Orig, signifo supozeble "terulo" (kontraste kun la dioj): HE **ghom-* "tero, grundo" (vd. *humo*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *humana, oni.*

HOMEOPAT/O (7; Ka; antaŭe *homeopati/ist/o*): A *homoeopath*, F *homéopathe*, G *Homöopath*, Po *homeopata*, R *gomeopat*, (H *homeópata*). – Sistemnomo: **HOMEOPATI/O** (1; RE): A *homoeopathy*, F *homéopathie*, G *Homöopathie*, I *omeopatia*, Po *homeopat/ia*, (H *-ía*), R *gomeopatija*; L mod. *homoeopathia.* Ps-sf *-i* 1.

La sistemnomo estis unue uzata (en G, komence de 19a jc) de S. Hahnemann; ĝi estas konstruita el Gr *hómoios* "simila" (de *homós* "sama", vd. sekv. k *sama*) k *páthos* "sufero, malsano" (vd. *patoso*) laŭ la tezo de la homeopatio: 'similaj estas kuracataj per similaj'. La personnomo estas farita laŭ analogio de aliaj nomoj de sciencistoj konsistantaj el la sciencnomo minus *-i* (ekz. *arĥeologo, astronomo, geografo* ktp); kp ank. eo *psikopat/o* PIV.

HOMONIM/O (1; *-a* Jü): A *homo/nym*, F *-nyme*, Po *-nim*, G *Homonym*, I *omo/nimo*, R *-nim*, (H *homónimo*).

El Gr *homônymon* s.s., propr. "samnoma", subst.-igita adj. kunmetita el *homós* "sama" (vd. tiun) k *ónyma* "nomo" (vd. tiun k kp *an-, pseŭd/onima, sinonimo*).

HONEST/A (f; Un): A *honest* (H *-o*), F *honnête*, I *onesto*; L *honestus.* ¶ Io =, Ie *honest*, Ia *-e.*

Orig, "respektata, honorinda", de L *honos* "honoro" (vd. tiun).

HONOR/O (f; N-ro 15 1888, RE): A *hono(u)r*, F *honneur* (kp *honorer* "-i"), I *onore*, Po(H) *honor*; L *honor.* Ps-sf *-or* 2. ¶ Io =, IeIa *honor.*

L vorto (kromformo: *honos*) kun necerta etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *honesta, honorario.*

HONORARI/O (6; Jü): APo *honorar/ium*, (H *-io*), F *honoraires*, G *Honorar*, I *onorario*, R *gonorar*; L *honorarium.* L vorto akceptita en sia tuteco (konservita *-i-* ankaŭ en AIPo; **honorar/o* povus estigi konfuzon kun *honor-* plus suf. *-ar*). Ps-sf *-ar(i).* ¶ Io =, Ie *honorari/e*, Ia *-o.*

Orig, "honora donaco", der. de *honor* "honoro" (vd. tiun).

HONT/O (f; Un): F *honte*, I *onta.* Bazita sur F. ¶ 1894 *pudor-* (< L *pudor*). ¶ Io *shamo* (< A *shame*), Ie *honte*, Ia *vergonia* (< F *vergogn/e*, I *-a*).

El Fk **haunitha*, kp Gt *haunitha* s.s., samradika kun G *Hohn* "moko", *höhnen* "primoki", par. al Li *kaùns* "honto".

HOR/O (f; Un): L *hora*; A *hour*, F *heure* (kp *horaire* "horaro"), I *ora*, (H *hora*). Bazita sur L. ¶ Io =, Ie *hor*, Ia *-a.*

Latin(id)a vorto (> G *Uhr* "horloĝo") el Gr *hôra* "sezono; parto de tago, horo" el HE **jêro-* (vd. *jaro*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *horloĝo, horoskopo.*

HORDE/O (f; RE): L *hordeum*; F *orge*, I *orzo.* Botanika termino prenita el L. ¶ IoIeIa =.

Orig. der. de la HE vorto por "hordeo": **gherzda*, kp G *Gerste*, Gr *krithê.* La greno estas tiel nomita pro siaj longaj aristoj (HE rad. **gher-* "esti hirta", kp *hirta*).

HORIZONT/O (1; RE): AF *horizon* (kp AF *-tal* "horizontala"), G *Horizont*, I *orizzonte*, Po *horyzont*, R *gorizont*, (H *horizonte*); L *horiz/on -ontis.* – Adjektivo: **HORIZONTALA** (1; RE): AFG(H) *horizontal*, I *orizzontale*, R *gorizontal'nyj.* Ps-sf *-al.*

La adj. estas latinida der. de la subst., el Gr *horízôn (kyklos)* s.s., propr. "limiga (cirklo)", ptc. prez. de *horízein* "limigi" de *hóros* "lim(ŝton)o". Samfamilia vorto en Eo: *aforismo.*

HORLOĜ/O (f; Un): F *horloge* [-ĵ], I *orologio* [-ĝ-], (H *reloj*); L *horologium.* Bazita sur F; *-ĝ-* respegulas la molan prononcon en la latinidaj lingvoj. ¶ 1894 *horlog-*. ¶ Io *hor/lojo*, Ie *-loge*, Ia *-ologio.*

El Gr *hôrológion* "horloĝo (suna aŭ akva)", propr. "horo-kalkulilo" de *hôra* "horo" (vd. tiun) k *légein* "kalkuli" (vd. *logiko*; kp sub *legi*). Kp sekv.

HOROSKOP/O (2; Be): AF *horo/scope*, Po *-skop*, G *Horoskop*, I *oroscopo*, R *goroskop*, (H *horóscopo*); L *horoscopus.*

El Gr *hôroskópos* "konstelacio leviĝanta je la horo de naskiĝo", propr. "hor-rigardanta (konstelacio)", de *hôra* "horo" (vd. tiun) k *skopós* "rigardanto", kp *skopeín* "rigardi" (vd. *mikroskopo* k plue *spektaklo*).

HORTENSI/O (2; Be): F(H) *hortens/ia*, Po *-ja*, G *Hortensie*, I *ortensia*, R *gortenzija*; L bot. *Hydrangea hortensia*†. Ps-sf *-i* 4. ¶ Io =, IeIa *hortensia.*

Latineca nomo kreita de la franca botanikisto Commerson (1767) honore al s-ino *Hortense* Lépaute.

HORTULAN/O (f; RE; *ortulan/o* Ve): L zool. *Emberiza hortulana*; AFPo *ortolan*, I *-o*, G *Ortolan*, (H *hortelano*). La formo kiel zoologia termino estas prenita rekte el L malgraŭ la aliforma akordo de kvar modernaj fontlingvoj. Ps-sf *-an.* ¶ Io *ortolano*; mankas en IeIa.

El L adj. *hortŭlanus* "ĝardena" de *hortulus*, dim. de *hortus* "ĝardeno" (vd. tiun; kp *korto*).

HOSPITAL/O (1; RE): A(H) *hospital*, F *hôpital*, G *Spital*, *Hospital*, I *ospedale*, Po *szpital*, R *gospital'*. Ps-sf *-al.* ¶ Io =, Ia *hospital*, Ie *-e.*

El L mez. *hospitale* s.s., orig. "akceptejo, gastejo", subst.-igo de adj. *hospitalis* "gast-(am)a" de L *hosp/es -itis* "gasto; gastiganto" el **hosti-pot-s* "gasto-mastro" (kp, kun la samaj elementoj, R *gos-pod-in* "mastro, sinjoro"): vd. *gasto* resp. *povi.* Etimologie identa vorto en Eo: *hotelo.*

HOSTI/O (f; RE): L ekl. *hostia*; A *host*, F *-ie*, Po(H) *-ia*, G *Hostie*, I *ostia.* Kredeble bazita sur L kiel eklezia termino. ¶ Io =, Ie *host/ie*, Ia *-ia**.

En L klas. "oferaĵo", vorto kun necerta etimologio.

HOTEL/O (f; Un): APo(H) *hotel*, F *hôtel*, G *Hotel*, R *otel'*. ¶ Io =, IeIa *hotel.*

F vorto, el L mez. *hospitale* "gastejo" (vd. *hospitalo*).

HUF/O (f; RE): A *hoof* [huf], G *Huf.* Kp ank. Nd *hoef* [huf], Sv *hov* [hu:v]. La radiko respegulas AG prononcon kaj G skribon. Kontraŭ la akordo de la ĝermanaj lingvoj, la latinidaj montras plenan diversecon. ¶ 1894 *pedo/korn-*. ¶ Io =, Ie *huf*; Ia *ungula* (< L).

El pĜ **hofaz*, par. al Sa *caphá-* s.s.

HUM/O (4; Jü): AFIPo(H) *humus*, G *Humus*, R *gumus.* Kp P *humo.* Estas interese konstati, ke Z malgraŭ la latineca formo de la fontlingvoj preferis la pli mallongan L stemformon (vd. sube); tio montras, ke Z akceptis radikfinon *-us* nur por eviti homonimecon (vd. sub *fokuso*). ¶ Ie =, Io *humuso*, Ia *humus.*

Specialigita scienca senco de L *humus* (stemo *humo-*) "tero, grundo", el HE **gh(d)om-* s.s.: Sa *kaam-*, Gr *khthôn* (*khamaí* "sur la grundo", kp *kamomilo*), R *zemlja*; kp ank. L *homo* "terulo, homo" (vd. tiun). Samfamilia vorto en Eo: *humila.*

HUMAN/A (1; RE): A *hum/ane*, F *-ain* (kp *human/ité* "-eco", *-itaire* "-eca"), G *-an*, Po *-anitarny*, (H *-ano*), I *umano*, R *gumannyj*; L *humanus.* Ps-sf *-an.*

Orig, "hom(ec)a", der. de L *homo* (vd. *homo*).

HUMER/O (2; Jü): L *(h)umerus* (L med. *humerus*); A *humerus*, F *humérus*, I *omero*, (H *húmero*). Prenita el L med. ¶ IoIa =, Ie *húmerus.*

Specialigita senco de L *(h)umerus* "ŝultro", el HE **omso-* "ŝultro", kp Sa *ámsa-*, Gr *ômos.*

HUMID/A (8; PVS; ne ĉe Z; antaŭe *mal/sek/et/a*): A *humid*, F *-e*, I *umido*, (H

húmedo); L *humidus*. Ps-sf *-id*. ¶ Io =, Ie *humid*, Ia *-e*.

Der. de L *humere* "esti malseka" (vd. *humoro*).

HUMIL/A (f; Un): L *humilis*; AF *humble* (kp A *humil/ity*, F *-ité* "-eco"), I *umile*, (H *humilde*). La L vorto servis kiel modelo por la Ea radikoformo, eĉ se ĝi plej ofte havas alian sencon. Ps-sf *il*. ¶ Io =, Ie *humil*, Ia *-e*.

L *humilis* "malalta; malnobla, triviala; malkuraĝa, obeema, humila" estas der. de *humus* "tero, grundo" (vd. *humo*).

HUMOR/O (f; RE): A *humo(u)r*, F *humeur*, I *umore*, Po(H) *humor*. Kp G *Humor*, R *jumor* "bonhumoro, humuro". Por eviti la dusencecon de la radiko, nome: 1) "animstato", 2) "gaja ŝercemo" (tiel en AHIPo), estis enkondukata la paronimo *humur/o* (senco 2; PV). Influo de Io (*humoro/humuro*) estus verŝajna, se la nova radiko estus aperinta pli frue; anstataŭe mi emas rigardi ĝin farita laŭ la diferencigo en F (*humeur* "humoro" : *humour* [-u:r] "humuro", kun paraleloj en aliaj lingvoj: Nd *humeur* : *humor*, Sv *humör* : *humor*). Alia ebla modelo estas *terur/o*. Ps-sf *-or* 2. ¶ Pri Io, vd. supre. IeIa *humor* (1, 2).

El L *(h)umor* "fluidaĵo" (laŭ la antikva fiziologio, kvar fluidaĵoj determinas la konstitucion kaj la temperamenton de la homo; tial tiu vorto estis ekuzata pri anima [spirita] stato kaj poste ankaŭ pri ŝercoj kiel esprimoj de la karaktero), kp *(h)umere* "esti malseka", *(h)umidus* "malseka" (kp *humida*), el HE rad. **ugŭ-* "malseka", kp Gr *hygrós* "malseka" (vd. *higrometro*), Sa *ukŝáti* "fekundigas" (de tiu radiko la HE vorto por "virbovo", **ukŭsen-*, propr. "fekundiganto": Sa *ukŝá-*, A *ox*, G *Ochs*).

HUND/O (f; Un): G *Hund*. Kp A *hound* "ĉashundo", Ji *hunt*, ank. Nd *hond*, Sv *hund*. Bazita sur G. Oni foje kritikis (ekz. Meillet, Les langues dans l'Europe nouvelle, citita en Berger 1947, 3) ke Z ne preferis la latinidan ekvivalenton (vd. sube), kiu donus **kan/o*. La kaŭzo estas sendube la neceso eviti homonimecon kun alia radiko *kan-* el L *canna* (tiel Waringhien 1967, 46; Modrijan 35). Efektive, por "hundo" sin prezentis taŭga alternativo; ne tiel por "kano". (La supozo de Berger, ke Z deziris "evitar li colision del dente canin con li can feminin", estas erara: Z ne uzis la radikon eo *kanin-* Wü.) ¶ 1894 *kan-*. ¶ Io =, Ie *can*, Ia *-e*.

El pĜ **hunda-*, el HE *kuon* "hundo": Sa *cvâ*, Gr *kyôn* (kp *cinika*), L *canis* (> F *chien*, I *cane*, Pg *cão*).

HUNGAR/O (8; PR; *Hungar/ujo* N-ro 20 1889): A *Hungarian*, F *Hongrois*, G *Ungar*, I *ungherese*; L mez. *Hungarus*. Bazita sur L same kiel ekz. *german-*, *hispan-*. ¶ Io *Hungariano*, Ie *h-*, Ia *hungaro*.

Pluraj variantoj en L mez. (plur.): *(H)ungari*, *Ungri* (> G; > Po *Wegier*, R *vengr*), *Ugri* (> R ant. *ugri*, kp la terminon *finno-ugraj lingvoj*), kp Gr biz. *Onoguroi*, el turka tribara nomo *on-ogur*, propr. "dek sagoj". Carlevaro PL 10/1984, 18.

HURA (3; Du, RE): A *hurrah* [-á:], F *hourra* [-u-], G(H) *hurra*, I *urrà*, Po *hura*, R *ura*. ¶ Io =, Ie *hurr/a*, Ia *-ah*.

De necerta origino, ofte rilatigata al G mez. *hurren* (= A *hurry*) "rapidi" (la vorto estis multe uzata kiel atakkrio).

HUSAR/O (f; RE; *huzar-* N-ro 14 1888): A *huss/ar*, F *-ard*, G *Husar*, I *ussaro*, Po *huzar(z)*, R *gusar*, (H *húsar*). La intervokala Ea *-s-* baziĝas sur la akordo de la fontlingvoj krom Po. Kp sekv. ¶ Io =, Ia *hussar*, Ie *-e*.

El Hu *huszár* s.s., probable pere de SK *gusar* "pirato" el L mez. *cursarius* (kp I *corsaro*) "pirato" (vd. la tiuokaze etimologie identan *korsaro*).

HUZ/O (f; RE): L zool. *Acipenser huso*; G *Hausen* (< G ant. *huso*). Zoologia termino bazita sur L. Eo *-z-* verŝajne

nur pro la ĝenerala tendenco voĉigi intervokalan s-sonon; eble Z ankaŭ volis tiamaniere eviti la teorie eblan homonimecon de *huz/ar/o* kaj *husar/o.* ¶ 1894 *hus-*. ¶ Mankas en la aliaj L.I.

La L scienca termino baziĝas sur la G vorto. La fiŝo ekhavis sian nomon pro la osta kiraso de la kapo, kp Is *haus* "kapo, kranio".

Ĥ

ĤAOS/O (f; RE; *kaos/o* Wü): AFPo *chaos*[AF k-, Po ĥ-], G *Chaos* [k-], I(H) *caos* [k-], R *ĥaos*. Eo *ĥ-* reprezentas en grekdevenaj vortoj la literon ĥi (X, en nia transskribo *kh*), en la antikveco prononcatan [kh], nuntempe [ĥ] aŭ [c]; tiu reprezento estas pli vere influita de RPo ol de Gr mod. La koncerna litero estas redonata en AFGPo per *ch*, en H per *c* aŭ *qu*, en I per *c* aŭ *ch*, en R per *x* (en nia transskribo *ĥ*); pri la prononco, vd. la unuopajn vortojn. Preskaŭ dum la tuta ekzistado de Eo oni rimarkis tendencon redukti la uzadon de *ĥ* (vd. Blanke 1985, 233; Szerdahelyi 1987, 115), ĉe kio *k* aperis kiel la plej uzata alternativo (apogata sur prononco de AFGHI + Gr ant.); en tiu ĉi radiko Z jam en 1894 provis tiun anstataŭigon (*kaos-*), kaj 1907-12-20 li proponis al LK (PVZ 8, 179; LZ II, 121): "La ĝis nun jam ekzistantajn vortojn kun 'ĥ' estas permesate uzi ankaŭ kun 'k'" (pri la specialaj rimedoj aplikendaj ĉe *ĥor-* kaj *ĥoler-*, vd. tiujn). – Eo *-s* (senvoĉa) en radikfino; kp *patoso*. ¶ Io *kaoso*, Ie *cáos* [k-], Ia *chaos* [k-].

Pere de L *chaos* el Gr *kháos* "malplena spaco (origina konfuza stato de la universo)", propr. "faŭko" (kp *khaínein* "malfermi la buŝon, oscedi"), par. al G *Gaumen* "palato".

ĤEMI/O (f; RE; *kemi/o* Ve, Wü): A *chemistry* [k-], F *chimie* [ŝ-], G *Chemie* [c-], I *chimica* [kí-], Po *chemia* [ĥ-], R *ĥimija*, (H *química* [kí-]). Pri Eo *ĥ-* kaj pri ĝia anstataŭigo per *k-*, vd. *ĥaoso*. La radiko kopias la originan formon de la substantivo, troviĝantan en FGRPo (kp krome A *alchemy*, I *alchimia*, H *alquimia* "alĥemio"). La diversa apero de la radikvokalo kiel *-e-* (AGPo) aŭ *-i-* (FHIR) faras elekton malfacila. (Ps-sf *-i* 1.) ¶ 1894 *kemi-*. ¶ Io *kemio*, Ie *chimie* [a-], Ia *chimia* [k-].

El Gr *khymeía*, *khêmeía* "(al)ĥemio, la arto transformi metalojn" kun pridisputata etimologio: ĉu de Gr *khyma* "fandado, metalmiksado" de *khein* "fandi, verŝi" (vd. *fandi*); ĉu de Eg *kemi*, indiĝena nomo de Egiptujo, propr. "nigra" (do Gr *khêmeía* signifus orig. "la egipta arto" aŭ "la nigra arto"). Kp. *alĥemio*.

ĤIMER/O (f; RE; *kimer/o* Ve, Wü): AIPo *chimera* [AI k-, Po ĥ-], F *chimère* [ŝ-], G *Schimäre* [ŝ-], R *ĥimera*, (H *quimera*). Pri Eo *ĥ-* kaj pri ĝia anstataŭigo per *k-*, vd. *ĥaoso*. ¶ 1894 *kimer-*. ¶ Io *kimero*, Ie *chimere* [ŝ-], Ia *chimera* [k-].

El Gr *khímaira*, nomo de mita monstro kun kapra korpo (> "fantaziaĵo"), ank. "kaprino", orig. "unuvintra (kaprino)", kp Gr *kheimôn* "vintro" (HE **ghim-* "vintro", kp Sa *hímâ*, L *hiems*, R *zima* s.s.)

ĤOLER/O (f; RE; *kolera/o* PIV): APo *cholera* [A k-, Po ĥ-], F *choléra* [k-], G

Cholera [k-], I *colera* [k-], R *ĥolera*; L med. *cholera* [k-]. Pri Eo *ĥ-*, vd. *ĥaoso.* Tie ĉi oni ne povas tutsimple anstataŭigi *ĥ* per *k* pro la ekzisto de la radiko *koler-*. La anstataŭa formo *kolera/o* aperas malfrue; Szerdahelyi 1987, 115 preferus **holer/o.* ¶ 1894 *koler-*; 1907 *ĉolero.* ¶ Io *kolero*; Ie *cólera* [k-]; Ia *cholera* [k-] (ank. "kolero").

El Gr *kholéra* "galmalsano", kredeble der. de *kholê* "galo" (vd. tiun).

ĤOR/O (f; RE; *korus/o* Ve): A *choir, chorus* [k-], F *choeur* [k-], G *Chor* [k-], I(H) *coro* [k-], Po *chór* [ĥ-], R *ĥor*; L *chorus* [k-]. Pri Eo *ĥ-*, vd. *ĥaoso.* Ne eblas tutsimple anstataŭigi *ĥ* per *k* pro la jama radiko *kor-*. La propono de Z en 1894 (*korus-*) estas inspirita de la L formo (kp *fokus/o* k.s.). (Modrijan 38 aludas radikkolizion kun *hor-*, sed tia neniam okazis: la *ĥ-* en tiu ĉi vorto rezultas de normala transskribo.) ¶ 1907 *ĉor/o.* ¶ Io *koro*, Ie *cor* [k-], Ia *choro* [k-].

El Gr *khorós* "danco; grupo de dancantoj kaj kantantoj, ĥoro", eble orig. "dancejo" (tiuokaze par. al la vortoj cititaj sub *korto*).

I

IA (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *alikve* (< L *aliquis*). ¶ Io *ulaspeca*, Ie *alqual*, Ia *ulle* (L *ullus*).

IAL (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *por alikvo* (< L *aliquod* "io"). ¶ Io *pro ulo, ulkauze*; Ie *pro alquo*, Ia *per alicun causa.*

IAM (f; *ian* Un, *iam* Ald): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1882 *kɑ.ɹ* (korelativo, vd. LV 42); 1894 *alikvam* (kp L *aliquando*; *-am* laŭ la korelativoj de 1887). ¶ Io *ultempe, ulfoye*, Ie *alquande*, Ia *aliquando.*

IBIS/O (f; RE): AFPoR(H) *ibis*, G *Ibis*, I *ibi*; L *ibis* (kp L zool. *Ibis*† *religiosa*). Eo *-s* (senvoĉa) en radikfino, kp. ekz. *iriso, lapiso.* ¶ Io =, IeIa *ibis.*

El Gr *ibis* s.s., el Eg *hîb* s.s.

IDE/O (1, f', 7; RE): AIPo(H) *idea*, F *idée*, G *Idee*, R *ideja.* ¶ Io =, Ie *idé*, Ia *idea.*

El Gr *idéa* "ideo, pura nocio" (ĉe Platono), orig. "formo, aperaĵo", de la rad. de *ideín* "vidi" (vd. tiun). Kp spec. sekv. k *ideografio.*

IDEAL/O (1; RE; kp *idealist-* Z en letero 1887-11-27: PVZ 1b, 60): AR(H) *ideal*, I *-e*, F *idéal*, G *Ideal*, Po *ideal'*: origine substantivigo de la responda adjektivo, kiu donus la saman radikformon. Ps-sf *-al.*

La adj. el L postkl. *idealis* "modela" ("tiel perfekta ke nur la ideo povas ĝin atingi", Bastien), de L-Gr *idea* "ideo" (vd. tiun).

IDENT/A (1; Be): A *ident/ical*, F *-ique*, G *-isch*, I *-ico*, Po *-yczny*, R *-ičnyj*, (H *idéntico*). Ellaso de la adjektiva sufikso (vd. analogajn kazojn sub *hipnota*), eble laŭ modelo de la responda substantivo (A *ident/ity*, F *-ité*, I *-ità*, G *Identität* ktp "-eco") aŭ faktitiva verbo (A *ident/ify*, F *-ifier*, G *-ifizieren*, I *-ificare* ktp "-igi"). ¶ Io =, IeIa *identic.*

El L mez. *identicus* s.s., formita laŭ la postkl. subst. *identi/tas -tatis* "identeco, sameco", de L *idem* "la sama", konsistanta el *id* "ĝi, tio" (de HE pron. rad. **i-*, kp Sa *idám* "ĝi", A *it* "ĝi") k partikulo *-dem* (de pron. rad. *do-*, vd. sub *de*).

IDEOGRAFI/O (3; Be): A *ideography*, F *idéographie*, G *Ideographie*, IPo *ideograf/-ia*, R *-ija*, (H *-ía*). Ps-sf *-i* 1.

Scienca termino (19a jc) signifanta "bildskribo", kreita el Gr *idéa* "ideo, formo, aspekto" (vd. *ideo*) k *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*; por la formo de la dua elemento, kp ekz. *biografio, geografio.*

IDILI/O (f; RE): A *idyll*, F *-e*, Po *-a*, G *Idyll*, I *idill/io*, R *-ija*, (H *idílio*). Eventuala pli mallonga formo **idil-* estis neebla pro la sufiksoj *id* kaj *il* (Szerdahelyi 1987, 134). Cetere Gr *-ion* (vd. sube) normale reprezentiĝas per *-io* en Eo, kp *bakterio, evangelio, ganglio, geranio, kranio, kriterio.* ¶ Io =, Ie *idille*, Ia *idyllio.*

El Gr *eidyllion* "paŝtista poemeto" (> L *idyllium* s.s.), orig. "sceneto, bildeto", dim. de *eídos* "formo, aperaĵo" (kp *kalejdoskopo*), subst. responda al la verbo *ideín* "vidi" (vd. tiun). Kp spec. *idolo.*

IDIOM/O (2; Be): A *idiom,* F *-e,* I(H) *-a,* G *Idiom.* Kp sub *idiotismo.* Ps-sf *m(at)-.* ¶ Io =, IeIa *idioma.*

El Gr *idíôma* "idiotismo", propr. "propraĵo, unika trajto", der. de *idioún* "(al)proprigi" de *ídios* "propra" (< **ŭidios*), rilatigita aŭ al HE **ŭi-* "dis-" (kp Sa *ví* "dise", G *wider-* "kontraŭ" aŭ al HE refl. pron. **sŭe-* (vd. *si*); en la unua kazo, la orig. signifo estas "aparta", en la dua, "sia". Samfamiliaj vortoj en Eo: *idiot/o, -ismo.*

IDIOT/O (1; RE): AFR *idiot,* IPo(H) *-a,* G *Idiot.*

El Gr *idiôtês* "apartulo; privatulo, nefakulo, laiko, neerudiciulo" de *ídios* "propra, privata" (vd. *idiomo*).

IDIOTISM/O (3; Be): F *idiotism/e,* I(H) *-o,* G *Idiotismus.* Ps-sf *-ism.* – En APoR, oni por la sama nocio uzas la vorton *idiom* (vd. s.t.v.). ¶ Io =, Ie *idiomatisme,* Ia *idiotismo* (ank. "idioteco").

El Gr *idiôtismós* "vulgara esprimo", subst. de *idiôtízein* "paroli en sia propra maniero", der. de *idiôtês* "privatulo" (vd. *idioto*).

IDOL/O (f; N-ro 15 1888, RE): AR *idol,* F *-e* I(H) *-o,* G *Idol.*

El Gr *eídôlon* "figuro de diaĵo", orig. "figuro, bildo", kp *eídos* "formo, bildo" (kp *idilio*), ambaŭ de rad. de *ideín* "vidi" (vd. tiun).

IE (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *in alikve loko.* ¶ Io *ulaloke,* Ie *alcú* (kp *ú* "kie?"), Ia *alicubi* (< L), *in alicun loco.*

IEL (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *in alikve maniere.* ¶ Io *ulmaniere,* Ie *alquam,* Ia *de alicun maniera.*

IES (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *de alikvu.* ¶ Io *di ulu, di ula,* Ie *de alqui,* Ia *de alicun.*

IGNOR/I (2; Jü): A *ignor/e,* G *-ieren,* Po *-owac',* R *-irovat'.* (Rimarku, ke la responda latinida verbo – F *ignor/er,* H *-ar,* I *-are* – signifas "nescii".) Ps-pf *in-* 2, var. *i-.* ¶ IoIeIa *ignorar* (IeIa ank. "nescii").

El L *ignorare* "nescii" de *ignarus* "nescianta": *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf *in-* 2), *gnarus* "scianta" (samradika kun *(g)noscere* "koni", vd. tiun).

IĤTIOKOL/O (f; EG; *iktiokol-* Ve, kp 1894): F *ichthyocolle* [ik-], I *ittiocolla,* (H *ictiocola*); L *ichthyocolla.* Eo *-ĥ-* reprezentas Gr X [kh] (vd. sube) kaj povas, se dezirate, esti anstataŭata per *k* sen maloportuno (vd. sub *ĥaoso*). ¶ 1894 *iktiokol-.* ¶ Io *iktiokolo,* Ia *ichthyocolla;* mankas en Ie.

El Gr *ikhthyokólla* s.s., propr. "fiŝgluaĵo": *ikhthys* "fiŝo" (par. al Li *zuvìs* s.s.), *kólla* "gluaĵo" (vd. *protokolo*).

ILEKS/O (2; Jü): L *il/ex -icis;* A *ilex*†, I *leccio, elce.* Botanika termino prenita el L. Eo transprenis la L nominativan formon same kiel en *indekso.* ¶ Io *ilexo,* Ie *ilex,* Ia *ilice.*

Eble pruntita el iu mediteranea lingvo.

ILI (f; Un): L *illi* (mask.); F *ils* (mask.), (H *ellos,* mask.). Kp I *li* "ilin" (mask.); ank. P *êles* "ili" (mask.). Inter la personaj pronomoj, nur tiu ĉi estas dusilaba, supozeble ĉar akceptebla unusilaba alternativo ne troveblis. L prezentis per *illi* (envere dem. pron., vd. sube) formon oportune finiĝantan per *-i* kiel ĉiuj ceteraj Eaj pronomoj personaj (vd. pri tio sub *mi*) kaj estis apogata de F *ils.* Kp Waringhien LV 59. ¶ 1881 *po* (sen etimologio: PVZ 5, 144); 1894 *loru* (< I *loro*). ¶ Io *li,* Ie *ili,* Ia *illes* (mask.)/*illas* (fem.).

L *illi* estas plur. mask. formo de la dem. pron. *ille* "tiu" (kun *i-* eble laŭ la aliaj demonstrativoj, precipe *iste* "tiu") el L ant. *ollus* de HE pronoma rad. **ol-* "tiu" (kp ank. L *ultra* "trans", propr. "je tiu flanko").

ILUMIN/I (f; Du, RE): A *illumin/ate*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *iljuminovat'*, (H *iluminar*). Ps-pf *in-* 1, var. *i-*.

El L *illuminare* "prilumi; dekoracii", de *in-* "en, sur" (vd. *en*) k *lum/en -inis* "lumo" (vd. tiun).

ILUSTR/I (1; Jü): A *illustr/ate*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *ilustr/owac'*, (H *-ar*), R *iljustrirovat'*. Ps-pf *in-* 1, var. *i-*.

El L *illustrare* "prilumi, klarigi" (en L mez. "ilustri"): *in-* "en, sur" (vd. *en*), *lustrare* "prilumi" (vd. *lustro*), kp plue *lumo*.

ILUZI/O (1; Be): AF *illus/ion* [F -z-], I *-ione* [-z-], G *Illusion*, Po *iluzja*, R *illjuzija*, (H *ilusión*). Ps-sf *-cio*, var. *-zio*.

El L *illus/io -ionis* "moko", de *illudere* "primoki", propr. "ludi (kun iu)": *in-* "en, sur" (vd. *en*), *ludere* "ludi" (vd. tiun).

IMAG/I (f; RE): A *imagin/e*, F *-er*, Po *-owac'*, (H *-ar*), I *immaginare*; L *imaginari*. Apokopo de *-in*, sendube por eviti kolizion kun la inseksa sufikso (la malpli longa formo estas apogata de la L originvorto, vd. sube). Analogaj kazoj: *ekstermi*, *prokrasti*; kp. ank. *intesto* (Szerdahelyi 1987, 135). ¶ IoIeIa *imaginar*.

Orig, "bildigi", der. de L *imag/o -inis* "ideo, bildo, refiguraĵo" (> F *image*, H *imagen*, I *immagine*, kp sub *bildo*), etimologie ligita kun la sekva, kp tiun.

IMIT/I (f; RE): A *imit/ate*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*); L *imitari*.

Par. al L *imago* "bildo" (propr. "refiguraĵo, imitaĵo"; kp *imagi*) k *aemulus* "rivalo, konkuranto" (propr. "kiu volas imiti").

IMPERATIV/O (2; Jü): A *imperat/ive*, I(H) *-ivo*, F *impératif*, G *Imperativ*; L *(modus) imperativus*. Ps-pf *in-* 1, var. *im-*; ps-sf *-iv*.

Propr. "komanda (modo)", adj. der. de L *imperare* "komandi", kunm. de *in* "en, al" (vd. *en*) k *parare* "prepari, aranĝi" (vd. *prepari*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *impери/o, -alo, -alismo*.

IMPERFEKT/O (2; Jü): A *imperfect (tense)*; F *imparfait*, G *Imperfekt(um)*, I *imper/fetto*, (H *-fecto*); L *(tempus) imperfectum*. Ps-pf *in-* 2, var. *im-*; *per-*.

Propr. "nefinita (tempo)" (la koncerna verboformo en L, latinidaj k slavaj lingvoj esprimas estintan agon nefinitan): L *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf *in-* 2), *perfectus* "finita, plenumita" (vd. *perfekt/a*, kp *-o*).

IMPERI/O (f; RE): AF *empire* (kp A *imperial*, F *impérial* "-a"), G *Imperium*, I *imper/o*, R *-ija*, Po *-ium*, (H *-io*); L *imperium*. L *-i-* estas apogata de la plimulto de la modernaj fontlingvoj (alie en *mister/o*). Ps-pf kiel en *imperativo*. ¶ 1882 *imper/estr/o* "imperiestro". ¶ IoIa *imper/io*, Ie *-ia*.

La L vorto signifas "komando; potenco; imperio" k estas derivita de *imperare* "komandi" (vd. *imperativo*). Kp spec. *imperialismo*.

IMPERIAL/O (1; RE): AR(H) *imperi/-al*, I *-ale*, Po *-al'*, F *impériale*, G *Imperiale*. Ps-pf kiel en *imperativo*; ps-sf *-al*. ¶ Io *emperialo*, Ia *imperial*; mankas en Ie.

Propr. "imperi(estr)a (loko)" (ĉar la koncerna loko troviĝas supre sur la veturilo), el L postkl. *imperialis* "imperi(estr)a" de L *imperium* "imperio" (vd. tiun).

IMPERIALISM/O (3; Jü; kp *imperi/-ismo* PV): A *imperial/ism*, I(H) *-ismo*, PoR *-izm*, F *impérialisme*, G *Imperialismus*. Ps-pf kiel en *imperativo*; ps-sf *-al*, *-ism*.

Formita (19a jc) el L *imperialis* "imperi(estr)a" (vd. *imperialo* k *imperio*).

IMPERTINENT/A (3; Jü): AF(G†) *impertinent*, I(H) *-e*, Po *impertynencki*. Ps-pf *in-* 2, var. *im-*; *per-*; ps-sf *-ent*.

El L *impertin/ens -entis* "neapartena, nerilata" (semantika evoluo: > "nekonvena" > "arogante malrespekta"): *in-* "ne-" (vd. tiun kaj la ps-pf) k *pertinens* ptc. prez. de *pertinere* "esti ligita (kun), koncerni" (vd. *aparteni* k *teni*).

IMPET/o (8:*-o* Wü, *-i* PV; ne ĉe Z): L *impetus*; I *impeto*, (H *ímpetu*). Kp F *impé-*

tueux "-ega". Origine bazita sur la L substantivo kun signifo "puŝforto, movenergio, torenteco, vervo" (Wü); poste refarita kiel verbo kun la sencoj "forte kaj vive sin ĵeti antaŭen; arde, fervore aspiri" (PV). Ps-pf *in-* 1, var. *im-*. ¶ Io *impetuo*, Ie *ímpetu*, Ia *impeto*.

L *impetus* ("alkurego, sturmo; intenso, torenteco; fervoro") estas subst. de *impetere* "ataki, sturmi": *in* "en, al, sur" (vd. *en*), *petere* "sin direkti al, ataki" (vd. sub *peti*).

IMPLIK/I (f; EG): L *implicare*, A *implic/até*†, (H *-ar*); ank. F *impliquer*, I *implicare* "impliki (en aferon)". (Prononco [-k-] en ĉiuj fontlingvoj, kp cetere *kompliki*). Kaj forme kaj semantike bazita sur L, el kies senco konkreta (= PIV 1) la figuraj sencoj (= PIV 2) evoluis. Ps-pf *in-* 1, var. *im-*. ¶ Io *intrikar* (< I *intricare*), Ie *implicar**, Ia *imbroliar* (kp F *embrouiller*, H *embrollar*), *intricar*.

Propr. "envolvi", kunm. de L *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf) k *plicare* "(en)volvi, faldi" (vd. *plekti*, kp *faldi*).

IMPON/I (1; Ald, Be): F *(en) imposer*, G *imponieren*, Po *imponowac'*, R *imponirovat'*, (H *imponer*). Kp A *imposing*, I *imponente* "-a". Radiko analoga al *deponi* (kp la nacilingvajn formojn s.t.v.). Ps-pf *in-* 1, var. *im-*. ¶ Io *impozar*, Ie *imposar*, Ia *imponer*.

El L *imponere* "surmeti" (> "trudi al iu [respekton, admiron]"): *in* "sur" (vd. *en* k la ps-pf), *ponere* "meti" (vd. *pozitiva*). Samelementa vorto en Eo: *imposto*.

IMPORT/I (1; Jü): A *import*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*). Ps-pf *in-* 1, var. *im-*. ¶ Io *importacar* (kp *importar* "esti grava"), IeIa *importar*.

El L *importare* s.s., propr. "enporti": *in* "en" (vd. tiun kaj la ps-pf), *portare* "porti" (vd. tiun).

IMPOST/O (1; Be; antaŭe *de/pago*): F *impôt*, I *imposta*, (H *impuesto*). Kp P *imposto*. Sugestita al Z de de Beaufront, vd. LZ I, 23. Ps-pf *in-* 1, var. *im-*. ¶ Io *impost-uro*, Ie *impost/e*, Ia *-o*.

El L *impositum* "(io) ŝarĝita sur (iu)", (io) surmetita", ptc. perf. de *imponere* "surmeti" (vd. *imponi*).

IMPRES/o (f; RE): AF *impress/ion* (kp A *impress* "-i"), I *-ione*, (H *impresión*); L *impress/io -ionis*. Prezentita kiel substantiva radiko en UV, Jü, Ka, poste kiel verba en Wü, PV, PIV. La radikformo ŝajnas indiki la substantivon kiel fonton. Oni atendus *impresi/o* (tiel Be! kp ekz. *koncesi/o*, *procesi/o*); la pli mallonga formo eble dependas de tio, ke Z jam dekomence (inspirite de A?) antaŭvidis ampleksan uzadon de la radiko en verba formo (*impresi/i* sendube estus maloportuna). Ps-pf *in-*, var. *im-*. ¶ Io *impres/o* (*-ar* "-i"), Ie *impress/-ion* (*-er* "-i"), Ia *impression*.

Propr. "en-, sur/prem(ita sign)o" (laŭ la ideo ke la perceptoj postlasas spuron en la animo; kp semantike G *Eindruck* s.s., propr. "enpremo"), subst. de L *imprimere* "enpremi": *in* "en, sur" (vd. *en* k la ps-pf), *premere* "premi" (vd. tiun; kp. spec. *presi*).

IMPRESARI/O (2; Jü): AFIPoR(H) *impresario*, G *Impresario*. Ps-pf *in-* 1, var. *im-*; ps-sf *-ar(i)*. ¶ IoIeIa *impresario*.

I teatra termino, propr. "entreprenisto", der. de *impresa* "entrepreno", de *imprendere* "entrepreni", propr. "preni en (la manojn) aŭ sim." (kp semantike *entrepreni*), el L *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf) k *prendere* "preni" (vd. tiun).

IMPROVIZ/I (1; Jü): A *improvis/e*, F *-er* [-z-], G *-ieren*, (H *-ar*), I *improvvisare* [-z-], Po *improviz/owac'*, R *-irovat'*. Ps-pf *in-* 2, var. *im-*; *pro-*. ¶ Io *improvizar*, IeIa *improvisar*.

De I *improvviso* "neantaŭvidita" el L *improvisus* s.s. de *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf) k *provisus*, ptc. perf. de *providere* "antaŭvidi" (vd. *providenco*).

IMPULS/O (1; Jü): A *impuls/e*, F *-ion*, I *-o*, (H *-o*), G *Impuls*, Po *impuls*, R *impul's*. Ps-pf *in-* 1, var. *im-*.

El L *impulsus* "impulso, incito", propr.

"puŝo, ekŝovo", de *impellere*"alpuŝi [iun]": *in* "en, al, sur" (vd. *en* k la ps-pf), *pellere* "peli" (vd. tiun). Kp spec. *pulso.*

IMUN/A (4; Jü): AI *immun/e,* F *-isé* (kp *immun/ité* "-eco"), G *immun,* (H *inmune*); kp PoR *immunitet* "-eco". Ps-pf *in-* 2, var. *i-.* ¶ Io =, Ie *imun,* Ia *immun.*

El L *immunis* "libera de ŝtataj devoj (impostoj, ŝuldoj, oficoj)" el *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf) k *munus* "devo, tasko, ofico; imposto" (vd. *komuna*).

INAŬGUR/I (4; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *inaŭguraci/i*): A *inaugur/ate,* F *-er,* I *-are,* Po *-owac',* (H *-ar*); L *inaugurare.* Ps-pf *in-* 1. En Eo, tiu ĉi radiko estas retrograde formita el: **INAŬGURACI/O** (3; Jü): AF *inaugur/ation,* I *-azione,* Po *-acja,* (H *-ación*). Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-cio.* ¶ Io *inaugur/ar, -o;* IeIa *inaugur/ar, -ation.*

El L *inaugurat/io -ionis,* subst. de *inaugurare,* orig. "inaŭguri per ceremonioj de birdo-observado", kunm. de *in-* "en-" (tie ĉi komenca pref.; vd. *en* k la ps-pf) k *augurare* "observi birdojn por trovi antaŭsignon, esti aŭguro", der. de *augur* "aŭguro" (vd. tiun).

INCENS/O (2; Ka): A *incens/e,* I *-o,* F *encens,* (H *incienso*); L ekl. *incensum.* Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIa =, Ie *incense.*

L *incensum* propr. "(io) bruligita", ptc. perf. de *incendere* "(ek)bruligi, ekflamigi", kunm. de *in-* "en, al, sur" (tie ĉi komenca pref.; vd. *en* k la ps-pf) k verbo paralela al *candere* "ardi, blanki" (vd. *kandelo*).

INCIT/I (f; RE) 1) koleretigi, moki, ataketi, 2) eksciti, vigligi, sproni: L *incitare* (1, 2); A *incit/e* (2), I *-are* (2), (H *-ar* 2). La semantika kampo de *inciti* interkovriĝas per tiu de *provoki* (1) kaj de *eksciti* (2) (tiel, ke niaj vortaroj uzas tiun vorton por difini *inciti*: Grenkamp 1937 "eksciti kontraŭ si mem aŭ kontraŭ iu alia"; kp ank. Ka, PV, PIV). La vasta signifosfero de *inciti* ŝajnas baziĝi sur L sola; la Z-aj alternativoj en pEo kaj 1894 indikas hezitadon pri la adekvateco de la adoptita radiko. Ps-pf *in-* 1. ¶ 1882 *veks-* (< L *vexare*); 1894 *irit-* (< L *irritare*). ¶ IoIeIa *vexar;* IoIe *iritar,* Ia *irritar.*

L *incitare* orig. "ekmovi, akceli": *in* "en, sur, kontraŭ" (vd. *en* k la ps-pf), *citare* "movi" (vd. *citi*; kp spec. *eksciti*).

INDEKS/O (4; Jü): AF *index,* G *Index,* I(H) *indice,* PoR *indeks.* Malgraŭ la modernaj fontlingvoj la vera bazo de la radiko sendube estas la L nominativa formo (vd. sube); same en *ilekso.* Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *index/o,* Ie *-e,* Ia *indice.*

El L *ind/ex -icis* "indikanto" (> "registro"), agantnomo formita el la radiko de *indicare* "indiki" (vd. tiun, etimologie identan).

INDIFERENT/A (f; La E-isto 1/1889, UV, Be): A(G†) *indifferent,* I *-e,* F *indifférent,* (H *indiferente*); L *indiffer/ens -entis.* Ps-pf *in-* 2 kaj *dis-*, var. *di-*; ps-sf *-ent.*

Propr. "kiu ne faras diferencon": L *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf) k *differ/ens -entis,* ptc. prez. de *differre* "diferenci" (vd. tiun).

INDIG/O (4; RE; *indigot-* Ve): AFR *ind/igo,* I *-aco,* Po *-ygo,* G *Indigo,* (H *índigo*); L *indicum* (kp L bot. *Indigofera* "-ujo"). ¶ IoIeIa *indigo.*

En la adoptita formo la vorto estas H adj. signifanta "hinda", el L *Indicus,* adj. de *India* "Hindujo" el Gr *Indía* s.s., de *Indós* "Induso" (rivernomo) el Pe *hind* (Pe ant. *hindu-*), responda al Sa *síndhu-* "rivero; la rivero Induso; la Induso-regiono, Sindo", ev. ligita kun *syándate* "fluas, kuras". Vd. la debaton en Albault 1987.

INDIGN/I (f; RE): F *(s')indigner,* I *indignar/(si),* (H *-se*); L *indignari.* Kp A *indign/ant,* G *-iert* "-a". Senrefleksivigo en Eo (aldonenda al la ekzemploj sub *aboni*), eble laŭ modelo de L. Latinida [n'] redonita per ortografia *-gn-*, eble sub influo de *digna.* Ps-pf *in-* 2. ¶ Io *indignar,* IeIa *indignar se.*

Orig, "opinii nedigna" (> "malaprobi, esti nekontenta" > "indigni"), der. de L *indignus* "nedigna, neinda": *in-* "ne-" (vd. tiun kaj la ps-pf), *dignus* "digna" (vd. tiun).

INDIĜEN/O (4; EG): F *indi/gène* [-ĵ-], I *-geno* [-ĝ-], (H *indígena*); L *indigen/a, -us.* Kp A *indigenous* [-ĝ-] "-a". Eo *-ĝ-* kombinas la ortografion kun la mola prononco en la modernaj fontlingvoj. ¶ Io *indijena* "-a", Ie *indigen,* Ia *-a.*

Propr. "(iu) naskita en (iu lando)", kunm. de L *indu* "en" (vd. *industrio*) k *-gena,* subst. de L ant. *genere* "naski" (vd. *gento*).

INDIK/I (3; Grosjean-Maupin 1911, Wü; ne ĉe Z): A *indic/ate,* I *-are,* (H *-ar*), F *indiquer* [-k-]; L *indicare.* Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *indikar,* IeIa *indicar.*

Propr. "montri al", kunm. de L *in* "en, al" (vd. *en* k la ps-pf) k *dicare* "proklami" (vd. sub *diri*; kp spec. *abdiki, prediki*). Samelementaj vortoj en Eo: *indekso, indikativo.*

INDIKATIV/O (2; RE): A *indicat/ive,* F *-if,* I(H) *-ivo,* G *Indikativ;* L *(modus) indicativus.* Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-iv.*

Propr. "indika (modo)", de L *indicare* "indiki" (vd. tiun).

INDIVIDU/O (1; RE): A *individ/ual,* F *-u,* I(H) *-uo,* G *Individuum,* Po *indywiduum,* R *individ(uum).* Analoga radikfino, bazita sur la sama L sufikso *-uus* (vd. sube) en *kontinu/a.* Ps-pf *in-* 2. ¶ IoIa =, Ie *individue.*

El L adj. *individuum* "(io) nedividebla, neseparebla" (semantika evoluo: > "nedisigeble ligita (kun)" > "karakteriza" > "aparta [persono]"): *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf), *dividuus* "dividebla" de *dividere* "dividi" (vd. tiun).

INDUKT/I (3; Wü; ne ĉe Z; *induk-* Jü, *indukci-* Jü 1) 1) log. 2) fiz.: A *induce* (1, 2), F *induire* (1, 2), G *induzieren* (1, 2), I *indurre* (1, 2), (H *inducir* 1, 2). Subst.: AF *induc/tion,* (H *-ción*), G *Induktion,* I *induzione,* Po *induk/cja,* R *-cija.* La Z-a formo *induk-* analoge al *konduk-*; *indukci-* laŭ la citita substantivo. La poste oficialigita formo *induktpovas* esti bazita sur L supina radiko (vd. sube) troviĝanta en la substantivo, sed pli kredeble ĝi estas farita laŭ modelo de *dedukt/i* (Z); ambaŭ estis oficialigitaj samtempe. Provo distingi la du sencojn estas farita en Ve: *induk-* (2), *indukci-* (1). Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *induktar* (1, 2), Ie *inducter,* Ia *inducer* (1, 2).

El L *inducere* (supina rad.: *induct-*) "enkonduki": *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *ducere* "konduki" (vd. tiun). – La logika termino estas adoptita kiel antonimo de *deducere,* vd. *dedukti.*

INDULG/I (f; RE): L *indulgere.* Kp AF *indulgent,* I(H) *-e* "-a". Supozeble la Ea radiko ne estas bazita sur la L verbo sed sur la AFI adjektivo (minus la participa finaĵo). Paralela estas tiuokaze *intermiti.* ¶ Io *indulg/ar,* IeIa *-er.*

L bazo *dulg-* kun necerta etimologio.

INDUSTRI/O (f; RE): A *industr/y,* F *-ie,* I(H) *-ia,* R *-ija,* G *Industrie.* ¶ Io =, Ie *industri/e,* Ia *-a.*

El L *industria* "agemo, laboremo" (moderna signifo de la 18a jc.), kp *industrius* "agema, diligenta", probable el *indu* "en(e)" (kies unua elemento estas *in* "en", vd. tiun; kun la dua kp R *do* "ĝis"; kun la tuto kp A *into* "en [ion]", Gr *endo-* "ene, interne") k *struere* "konstrui" (do orig. "inventema, kreiva" aŭ sim.); vd. *konstrui,* kp semantike *instrui.*

INERT/A (4; Jü; *inerci-* ER): A *inert,* FI(H) *-e,* R *-nyj;* L *ine/rs -rtis.* Z prezentas ankaŭ la varianton *inerci-* laŭ la responda substantivo: A *inert/ia,* F *-ie* [-s-], I *-zia* [-ts-], (H *-cia*); L *inertia.* Ps-pf *in-* 2. ¶ Ie *inert,* Io *-a,* Ia *-e.*

L *iners* "inerta, neagema, timema", orig. "nekapabla, nescia", el *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf) k *ar/s -tis* "arto, scienco" (vd. *arto*).

INFAN/O (f; Un): L *infa/ns -ntis;* F *enfant* [âfâ]. Kp (H *infante* "knabeto"), A *infan/cy,* I *-zia,* (H *-cia*) "-eco". Inter-

nacie konata per la derivaĵo AI *infant/-ile*, G(H) *-il* "-eca". Nur en F la vorto estas la ordinara esprimo por "infano" ĝenerale. Radikfina apokopo de *t* (supozeble laŭ F, kie ĝi estas neprononcata), ŝajne por eviti participsimilan aspekton; tamen, konsiderante ke la *t* mankis jam en pEo, mi emas rigardi la apokopon kiel modifon restantan de pli frua lingvostadio. Ps-pf *in-* 2. ¶ 1882 *fan/o*; 1894 *infant-*. ¶ Io *infant/o*, IeIa *-e*.

Orig, "infaneto", propr. "kiu ne parolas": L *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf); *fa/ns -ntis* "parolanta", ptc. prez. de *fari* "paroli" de HE rad. **bhâ-* "paroli", kp Gr *phánai* "diri", *phônê* "voĉo, sono" (vd. *fonetiko*); L *fabula* "rakonto" (vd. *fabelo, fablo*), *affabilis* "alparolebla" (vd. *afabla*), *fama* "famo" (vd. tiun), *fatum* "sorto" (vd. *fatala, feo*), *fateri* "konfesi" (vd. *konfesi, profes/io, -oro*). Kp spec. sekv.

INFANTERI/O (1; RE): A *infant/ry*, F *-erie*, (H *-ería*), G *Infanterie*, I *fanteria*. Ps-sf *-eri*.

H der. de *infante* "junulo", orig. "knabo" (vd. *infano*).

INFEKT/I (f; RE): A *infect*, F *-er*, (H *-ar*), G *infizieren*, I *infettare*; L *inficere* (sup. rad.: *infect-*). Kp Po *infek/cja*, R *-cija* "-o". La plimulto de la fontlingvoj bazas sian verbon sur la L supina radiko (ankaŭ trovebla en la substantivo); Eo sekvas tiun ekzemplon. (Tute paralela estas la kazo de *injekti*, kp tiun.) Kp spec. *afekt/i, difekt/i* (sed *efik/i*): vd. la sinoptikon sub *fari*. Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *infektar*, Ie *infect/er*, Ia *-ar*.

L *inficere* "infekti, makuli, veneni", orig. "enmeti (ion malutilan)": *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *facere* "fari; meti" (vd. *fari*).

INFER/O (f; RE; *infern-* N-ro 15 1888): F *enfer*, I *inferno*, (H *infierno*). Kp A *infern/al*, G *-alisch* "-a". Formo sen *n*, kredeble laŭ F (kp ankaŭ sube la L fontadjektivon), pro malfacile diferenca motivo (eble Z timis ke **infern-* tro facile konfuziĝus kun *intern-*?). ¶ IoIa *infern/o*, Ie *-e*.

El L *inferus* (var.: *infernus*) "malsupra, suba, subtera" (> L mez. *infernum* "infero") el HE **ndhero-* "malsupra", kp Sa *ádhara-* "malsupra"; G *unter*, A *under* "sub".

INFINITIV/O (2; Jü): A *infinit/ive*, F *-if*, I *-o*, (H *-ivo*), G *Infinitiv*; L *(modus) infinit(iv)us*. Ps-pf *in-* 2; ps-sf *-iv*.

Der. de L *infinitus* "nedifinita" (ĉar ne montranta personon nek nombron): *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf); *finitus*, ptc. perf. de *finire* "(di)fini" (vd. tiujn).

INFLAM/O (4; Ka; antaŭe *brul/um/o* RE): AF *inflam/mation*, (H *-ación*), I *infiammazione*; L *inflammat/io -ionis*. Adoptita kiel substantivo; la apartenanta verbo (A *inflame*, F *enflammer*, I *infiammare*, kp H *inflamar*) signifas "inflamigi" kaj do semantike ne precize respondas al Eo *inflam/i*. Ps-pf *in-* 1. ¶ Io =, IeIa *inflammation*.

Propr. "ekbruligo" (kp semantike Eo *brulumo*), subst. de L *inflammare* "ekbruligi" de L *in* "en, sur, al" (vd. *en* k la ps-pf) k *flammare* "brul(ig)i" de *flamma* "flamo" (vd. tiun).

INFLU/I (f; RE): A *influ/ence*, F *-er*, I *-ire*, (H *-ir*). Kp G *Einfluss* "-o". Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *influ/ar*, IeIa *-er*.

El L *influere* "enflui, enpenetri" (uzata de la astrologoj pri supozata astra fluidaĵo, kiu de la astroj fluis al la tero, tiel 'influante' la sorton de la homoj): *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *fluere* "flui" (vd. tiun). – G *Einfluss* estas paŭso de la L vorto.

INFORM/I (1; RE): A *inform*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*). Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIeIa *informar*.

El L *informare* "instrui, priskribi", propr. "formi (interne, spirite)": *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf); *formare* "formi" de *forma* "formo" (vd. tiun). Kp semantike *instrui*.

INFUZ/I (f; RE): A *infus/e* [-z], F *-er* [-z-], I *infondere* (kp *infusione* [-z-] "-o"), (H *infundir*, kp *infusión* "-o").

Sendube la substantivo (ank. AF *infusion*) kontribuis ĉe la formado de la Ea radiko; kp cetere *konfuzi*. Ps-pf *in-* 1.¶ 1894 *infus-*. ¶ Io *infuzar*, Ie *infuser*, Ia *infunder*.

El L *infundere* (sup. rad.: *infus-*) "en-, sur/verŝi": *in* "en, sur" (vd. *en* k la ps-pf), *fundere* "verŝi" (vd. *fandi*).

INGREDIENC/O (6; Mart, Wü): AR *ingredi/ent*, I(H) *-ente*, G *Ingredi/enz* [-ts], *-ens*. La Ea formo ŝajnas respeguli nur G *-enz*; oni atendus *-ento* laŭ la aliaj fontlingvoj. Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-enc*. ¶ Io *ingredient/o*, IeIa *-e*.

El L *ingredi/ens -entis* "(io) kio envenas (en ion), kio estas enmetata", ptc. prez. de *ingredi* "eniri, enveni": *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *gradi* "iri" (vd. *grado*).

INGVEN/O (f; RE): L *ingu/en -inis*; F *aine*, I *inguine*, (H *ingle*). Kp AFI(H) *inguinal* "-a". Bazita sur L nom.; tiel Z evitis kolizion de la radikfino kun la ina sufikso (kp la vokalŝanĝojn *in* > *en* sub *abomeni*). Pri Eo *-gv-* el L *-gu-*, vd. *lingvo*. ¶ 1894 *ingvin-*. ¶ Io *inguin/o*, Ie *-e*, Ia *-e**.

Orig. "ŝvelaĵo ĉe la ingveno"; L vorto identa al Gr *adên* "glando".

INĜENIER/O (f; RE): A *engineer* [-ĝ-], F *ingénieur* [-ĵ-], G *Ingenieur* [-ĵ-], I *ingegnere* [-ĝ-], Po *inz'ynier*, R *inĵener*, (H *ingeniero* [-ñ-]). Eo *-ĝ-* respegulas la ortografion de AFGI kaj indikas samtempe molan prononcon (en ĉiuj fontlingvoj). Eo *-ni-* havas la apogon de FGPo; ĝi ankaŭ estas unu el la reprezentiĝoj de [n'] (I), vd. sub *cikonio*. (Ps-pf *in-* 1); ps-sf *-i(e)r*. ¶ 1894 *ingenier-*. ¶ Io *injenioro*, IeIa *ingeniero*.

El F ant. *engeigneur*, der. de *engin* "militmaŝino", kp L mez. *ingenium* "maŝino" el L *ingenium* "talento, inventa kapablo", propr. "(io) nature naskita en (iu)", el *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf) k la radiko de L ant. *genere* "naski, krei" (vd. *gento*).

INICIAT/I (f; RE; *iniciativ-* Ald, Jü): A *initiate*; kp AF *initiative*, G *Intitiative* [-ts-], I *iniziativa* [-ts-], Po *inicjatywa*, R(H) *iniciativa* "-o". Z ŝajnas esti uzinta ambaŭ radikformojn sinonime; tamen *iniciat-* estas prezentita kiel verba (UV), *iniciativ-* kiel substantiva (Jü). A povas esti la modelo de la malpli longa formo; tamen *initiate* ne estas inter la A tradukoj de la radiko en UV, kaj estas eble, ke Z pro praktikaj motivoj mallongigis ĝin: *iniciat/into* estas sendube multe pli oportuna ol **iniciativ/-into* (kp cetere la ellason de *-iv* en *intens/a*). La substantivo tamen estas tiel frape internacia, ke ne eblas ekskludi ĝin el la radikaro. Por *ti* > Eo *ci* (laŭ prononco de GIPoR), kp precipe la ps-sf *-cio*. Ps-pf *in-* 1. ¶ 1894 *iniziativ-*. ¶ IoIe *iniciar*, Ia *initiar*.

A *initiate* devenas de la ptc. perf. de L *initiare* "adeptigi, inici", propr. "komenci" (F *initiative*, el kiu la AGHIPoR subst., estas dokta derivaĵo de la sama verbo), de *initium* "komenc(iĝ)o", de *inire* "komenci", propr. "eniri (en aferon)": *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *ire* "iri" (vd. tiun).

INJEKT/I (8; Jü): A *inject*, F *-er*, G *injizieren*, I *iniettare*, (H *inyectar*); L med. *injicere*. Kp Po *injekcja*, R *in'ekcija* "-o". En la plimulto de la fontlingvoj la verbo estas bazita sur la L supina radiko (*inject-*), kiu troviĝas ankaŭ en la substantivo (ank. AF *injection*, G *Injektion*, I *iniezione*). Eo sekvas tiun ekzemplon; la sama supinradiko aperas verbe en *konjekti*, substantive en *ob-*, *pro-*, *sub/jekto*. Cetere la alia radikformo estas pli malfacile asimilebla. – Paralela estas la kazo de *infekti*, kp tiun. Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *injektar*, Ie *injecter*, Ia *injicer*.

El L *inicere* "en/meti, -ĵeti": *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *iacere* "ĵeti; meti" (vd. *ĵeti*).

INK/O (f; Un): A *ink*, F *encre*, I *inchiostro* [ink-]. Bazita sur A; Z preferis la plej mallongan el la imageblaj formoj. ¶ 1894 *atrament-* (< L *atramentum*). ¶ Io =, Ie *incre*, Ia *tinta* (< G *Tinte*, H *tin-*

ta).

El L *encaustum* "ruĝa inko", el Gr *énkauston* "(io) enbruligita", adj. de *enkaíein* "enbruli": *en* "en" (vd. tiun); *kaíein* "bruligi" (verba radiko: *kau-*), kp *kaŭterizi.*

INKLIN/A (f; RE): A *inclined,* F *enclin,* I *incline,* (H *inclinado*); L postkl. *inclinis.* Samradika verbo en pluraj lingvoj (A *inclin/e,* F *-er,* IL *-are* "-i"); ties ptc. perf. servas kiel adjektivo signifanta "-a" (kp AH supre kaj L *inclinatus*). Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *inklinar* "-i", Ie *inclinar* "-i", Ia *inclinar* "-i; -igi".

L adj. samradika kun la verbo *inclinare,* uzita jen transitive ("-igi"), jen intransitive ("-i"), propr. "klini [iun] al [io]": *in* "en, al" (vd. *en* k la ps-pf), *clinare* "klini" (vd. tiun).

INKLUZIV/A (2; *-e* Ka; *inklusiv/e* Jü): A *inclusiv/e,* I *-o* [-z-]; kp F *inclusivement* [-z-], G *inklusive,* (H *inclusive*) "-e". Formo paralela al *ekskluziva,* kp tiun. Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-iv.* ¶ Io *inkluz/anta, -iva,* Ie *inclusiv,* Ia *-e.*

Propr. "enhavant/a, -e, enfermant/a, -e", der. de L *inclusus,* ptc. perf. de *includere* "enfermi": *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *claudere* "fermi" (vd. *konkludi*). Kp spec. *ekskluziva.* Kp semantike R *vkljuĉitel'no* s.s., propr. "enfermante"".

INKOGNIT/O (1; Jü): AFIPo *incognito,* G *Inkognito,* R *inkognito,* (H *incógnito*). Ps-pf *in-* 2. ¶ Io =, IeIa *incognito.*

I vorto signifanta "ne(re)konata", el L *incognitus* s.s.: *in-* "ne-" (vd. tiun k la ps-pf); *cognitus,* ptc. perf. de *cognoscere* "(ek)koni" (vd. *koni*).

INKVIZICI/O (1; RE): AFG *inquisition* [AF -z-], I *inquisizione* [-z-], Po *inkwizycja,* R *inkvizicija,* (H *inquisición*). Eo *-kv-* estas normala reprezentiĝo de L-devena *qu* (vd. *akvo*); *-z-* laŭ la prononco de la plej multaj fontlingvoj. Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-cio.* – Agantnomo: **INKVIZITOR/O** (1; RE): A *inquisit/or* [-z-], F *-eur* [-z-], I *-ore* [-z-], G *Inquisitor,* Po *inkwizytor,* R *inkvizitor,* (H *inquisidor*). Radikmezo *-kviz-* konforma al *inkvizicio.* Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-or* 1. ¶ Io *inquizi/ciono, -toro,* Ie Ia *inquisit/ion, -or.*

El L *inquisit/io -ionis* resp. *inquisitor,* agonomo resp. agantnomo de *inquirere* "esplori, pridemandi", orig. "direkti reserĉadon al (io, iu)": *in* "en, al" (vd. *en* k la ps-pf), *quaerere* "serĉi" (vd. sub *konkeri*).

INOKUL/I (f; RE) 1) bot., 2) med.: A *inocul/ate* (1, 2), F *-er* (2), I *-are* (2), (H *-ar* 2); L *inoculare* (1). Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *inokular* (2), Ie *inocular* (2), Ia *inocular* (1, 2). Kp (1) IoIe *greftar* (<A *graft,* F *greffer*).

Propr. "enmeti burĝonon", de L *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf) k *oculus* "okulo; burĝono" (vd. *okulo*).

INSEKT/O (f; RE) A *insect,* F *-e,* (H *-o*), G *Insekt,* I *insetto;* L *insectum.* Ps-pf *in-* 1.

Propr. "entranĉita (besto)" (pro la mallarĝeco de la meza parto), subst.-igita ptc. perf. de *insecare* "entranĉi": *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *secare* "tranĉi" (vd. *sekci*). – La L termino estas paŭso de Gr *éntomon* s.s. (vd. *entomologio*).

INSID/I (f; EG): I *insidi/are* , (H *-ar*); L *insidiari;* kp A *insidi/ous,* F *-eux* "-a". Apokopo de *i,* evidente por eviti hiaton (**insidi/i*). Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIa *insidiar;* kp Ie *insidie* "-o".

De L *insidiae* "insido, embusko" de *insidere* "sidi (t.e. sin kaŝi) en (loko)" (kp semantike *embusko*): *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *sedere* "sidi" (vd. tiun).

INSIGN/O (f; RE) 1) distinga signo, 2) (spec. *-oj*) her.: A *ensign* (1), *insignia* (2), F *insigne* (1), G *Insignien* (2), I *insegna* (1, 2), (H *insignia* 1); L *insign/e* (plur. *-ia*) (1,2). Pri la origina senco de la radiko ĉe Z (2), vd. Waringhien LV 8l; pri la posta distingo inter 1) kaj 2), vd. LV 88. Eo *-gn-* laŭ la ortografio de ĉiuj fontlingvoj kaj analoge al *signo* (vd. cetere sub *digna*). Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *insigno* (1, plur. 2), Ie *insigne* (1, plur.

2), Ia *insignia* (1, plur. 2).

Orig. subst.-igo de L adj. *insignis* "markita per signo(j), sursignita" el *in* "en, sur" (vd. *en* k la ps-pf) k *signum* "signo" (vd. tiun).

INSIST/I (1; Be): A *insist*, F *-er*, G *-ieren*, I *-ere*, (H *-ir*); L *insistere*. Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *insist/ar*, IeIa *-er*.

Propr. "resti ĉe (io), stari sur (io)": *in* "en, sur" (vd. *en* k la ps-pf), *sistere* "(ek)stari" (vd. sub *stari*). Semantika evoluo: > "altrudiĝi, altrudi sian opinion" > "firme postuli, insisti"; kp semantike *instanco*.

INSPEKT/I (2; Jü): A *inspect*, F *-er*, G *inspizieren* (kp *Inspektion* "-o"), I *inspezionare*, (H *inspeccionar*). Kp Po *inspek/cja*, R *-cija* "-o". Ps-pf *in-* 1. – Agantnomo: **INSPEKTOR/O** (1; RE): A *inspect/or*, F *-eur*, G *Inspektor*, I *ispettore*, PoR *inspektor*, (H *inspector*). Ambaŭ vortoj baziĝas (en Eo kiel en la fontlingvoj krom G) sur L supina radiko (vd. sube), troviĝanta ankaŭ en la responda agosubstantivo; kp la saman radikformon en *re-, su/-spekti, a-, pro/-spekto*. ¶ Io *inspektar*, Ie *inspecter*, Ia *inspicer, inspectar*.

El L postkl. *inspector* "kontrolanto" kaj *inspectare* "kontroli", agantnomo resp. intensa verbo de *inspicere* (sup. rad.: *inspect-*) "esplori", propr. "superrigardi, al-, en/-rigardi": *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf), *specere* "rigardi" (vd. *spektaklo*).

INSPIR/I (f; RE): A *inspir/e*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*); L *inspirare*. Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIeIa *inspirar*.

Propr. "spiri, blovi (ion) en (iun)", de L *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf) k *spirare* "spiri, blovi" (vd. *spiri*).

INSTAL/I (2; Jü): A *install*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-instalowac'*, (H *instalar*). Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *instalar*, IeIa *installar*.

El L mez. *installare* (pp personoj), propr. "starigi en (lokon)", el L *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf) k L mez. *stallum* "starloko en ĥorejo (kie oni instalis ekleziajn oficistojn)" el G ant. *stal* "stalo, starejo" (vd. *stalo*).

INSTANC/O (2; RE): AF *instance*, G *Instanz*, I *istanza*, Po *instan/cja*, R *-cija*, (H *instancia*). Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-anc.* ¶ Io *inst/anco*, Ie *-antie*, Ia *-antia*.

El L *instantia* "insista pet(ici)o", "insisto", subst. de *instare* "insist(e pet)i": *in* "en, sur" (vd. *en* k la ps-pf), *stare* "stari" (vd. tiun); por la semantiko, kp *insisti*.

INSTIG/I (f; RE): A *instig/ate*, (H *-ar*), I *istigare*, L *instigare*. Kp F *instigation* "-o". Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIeIa *instigar*.

Orig. "sproni, piki": la unua elemento estas *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf); la dua ne ekzistas memstare en L, kp tamen *stinguere* "piki" (vd. *distingi, estingi* k la sekvan), de HE rad. **(s)teig-* "piki", kp Sa *téjate* "estas akra"; Gr *stízein* "piki"; L *stilus* "skribilo" (kp *stilo*), *stimulus* "pikilo" (kp *stimuli*); G *stechen* "piki" (kp *etiketo*).

INSTINKT/O (1; RE): AF *instinct*, G *Instinkt*, I *istinto*, Po *instynkt*, R *instinkt*, (H *instinto*). Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *instinto*, Ie *instinct/e*, Ia *-o*.

El L *instinctus* "impulso, instigo", de *instinguere* "instigi, inciti": *in* "en, al" (vd. *en* k la ps-pf), *stinguere* "piki" (vd. *instigi*).

INSTITUCI/O (f, 1, 7; Be): AF *institu/tion*, (H *-ción*), G *Institution* [-ts-], I *istituzione* [-ts-], Po *instytucja*. Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-cio*. ¶ Io *institu/co*, IeIa *-tion*.

El L *institut/io -ionis* "aranĝo", de *instituere* "aranĝi, establi", vd. sekv.

INSTITUT/O (f; N-ro 15 1888, RE): FR *institut*, A *-e*, (H *-o*), G *Institut*, I *istituto*, Po *instytut*. Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIa *institut/o*, Ie *-e*.

El L *institutum* "aranĝo, establaĵo", orig. "(io) establita", ptc. perf. de *instituere* "establi, konstrui", propr. "starigi (ion) sur (io)": *in* "en, sur" (vd. *en* k la ps-pf); *statuere* "starigi", de *status* "staro" (vd. plue *stari*). Kp spec. *institucio*.

INSTRU/I (f; Un): A *instruct*, F *instru/ire*, G *-ieren*, (H *-ir*), I *istruire*. Z ak-

ceptis la prezencan radikon de la L originverbo (vd. sube) same kiel en *detru-*, *konstru-* (ambaŭ en Un); la supina radiko aperas en *instrukci/o*; ambaŭ elektoj akordas kun la plimulto de la fontlingvoj. Ps-pf *in-* 1. ¶ 1881 *stutt-* (apenaŭ el L *studere*, kiel proponas PVZ 5, 147; pli verŝajne oportunigo de la sup. rad. *struct-*). ¶ Io *instruktar*, Ie *instructer*, Ia *instruer*. – Agonomo: **INSTRUKCI/O** (f; RE): AF *instruc/tion*, (H *-ción*), G *Instruktion* [-ts-], I *istruzione* [-ts-], Po *instruk/cja*, R *-cija*. Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-cio*. ¶ 1894 *instrukzi-*. ¶ Io *instru/ciono*, IeIa *-ction*.

El L subst. *instruct/io -ionis* resp. el la verbo de kiu ĝi deriviĝas: *instruere* "instru/i, -kcii, prepari, ekipi", propr. "surkonstrui" (kp semantike *edifi*): *in* "en, sur" (vd. *en* k la ps-pf), *struere* "amasigi, konstrui"(vd. la lastan). Kp spec. sekv.

INSTRUMENT/O (1; Du, RE): AF-PoR *instrument*, (H *-o*), G *Instrument*, I *strumento*; L *instrumentum*. Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-ment*.

Orig. "ekipaĵo", der. de L *instruere* "ekipi, prepari, konstrui" (vd. *instrui*).

INSUL/O (f; Un): L *insula*; A *isl/e, -and*, F *île*, G *Insel*, I *isola*, (H *isla*). Kp A(H) *insul/ar*, F *-aire* "-a". Bazita sur L, kies formo aperas ankaŭ en la AFH adjektivo kaj estas apogata de la G substantivo. ¶ Io =, Ie *insul*, Ia *-a*.

Eble el L *in salo* "(kiu estas) en la maro": *in* "en" (vd. tiun), *salum* "maro" (vd. *salo*). Samfamilia vorto en Eo: *izoli*.

INSULT/I (f; Un): A *insult*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*); L *insultare*. Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIeIa *insultar*.

Propr. "piedbati, surtreti, salti sur": L *insultare* estas intensa verbo de *insilire* "salti sur (iun)": *in* "en, al, sur" (vd. *en* k la ps-pf), *salire* "salti" (vd. tiun).

INTELEKT/O (4; Jü): AF *intellect*, G *Intellekt*, I *intelletto*, Po *intelekt*, R *intellekt*, (H *intelecto*). Ps-pf *inter-*, var. *inte-*.

El L *intellectus* "kompreno, scio", de *intellegere* "kompreni" (vd. sekv.).

INTELIGENT/A (1; RE): AFG *intelligent*, I *-e*, R *-nyj*, Po *inteligent/ny*, (H *-e*). Ps-pf *inter-*, var. *inte-*; ps-sf *-ent*. ¶ Io =, Ie *intel/igent*, Ia *-ligente*.

El L *intellig/ens -entis* "kompreniva, scianta", ptc. prez. de *intel/legere (-ligere)* "kompreni, (ek)scii, rimarki", kredeble propr. "elekti (el) inter": *inter* "inter", *legere* "elekti" (kp tiun; vd. plue *legi*). Kp spec. *intelekto*.

INTENC/o (f; Un): AF *inten/tion*, I *-zione* [-ts-], Po *-cja*, (H *-ción*); L *intent/io -ionis*. Kp A *intend*, (H *intentar*) "-i". Certe bazita sur la substantivo; responda verbo mankas en la plimulto de fontlingvoj. Z tamen evidente deziris unualoke oportunan verbon kun la signifo "havi la intencon (fari ion)" kaj tial modifis la radikon (oni atendus *-cio*) por faciligi la verbformadon. Eo *-c* povas esti resto de **-cio* (kp. *donac-*) sed trovas motivigon en la IPo prononco kaj la Po ortografio. La radiko *atenc-*, kvankam ne etimologie parenca, povas esti influinta la formon. Strikte, kaj **intend-* kaj **intent-* estus same eblaj; la unua tamen donus kolizion **intend/-ant/o* : *intendant/o*. Ps-pf *in-* 1. ¶ 1894 *intenz-*. ¶ Io *intencar*, Ie *intenter*, Ia *intender* "-i"; Io *intenco*, IeIa *intention* "-o".

L *intentio* "intenco; atento, klopodo", propr. "streĉo direkte al (io)", de *intendere* "streĉi; direkti sian atenton al": *in* "al" (vd. *en* k la ps-pf), *tendere* "streĉi" (vd. *etendi*). Kp semantike *atenta*. Kp spec. la sekvajn.

INTENDANT/O (2; Jü): AFR *intend/-ant*, I(H) *-ente*, Po *-ent*, G *Intendant*. Ps-pf *in-* 1; ps-sf *-ant*. ¶ Io =, Ie *intend/-ante*, Ie *-ente*.

El L *intend/ens -entis*, ptc. prez. de *intendere* "direkti sian atenton al, dediĉi sin al" (vd. *intenco*).

INTENS/A (4; Jü): AF *intens/e* (A ank. *-ive*, F ank. *-if*), G *-iv*, I(H) *-o*, Po *-ywny*,

R *-ivnyj*. La mallonga formo de AFI estis evidente rigardata pli oportuna; en la fontlingvoj ĝi aperas ankaŭ en la substantivo (A *intens/ity*, F *-ité*, I *-ità*, G *Intensität* "-eco") kaj en la faktitiva verbo (A *instensi/fy*, F *-fier*, I *-ficare*). Analoga eventuala ellaso de *-iv-* en *iniciat-*. Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *intens(iv)a*, Ie *intens/i, -iv*, Ia *intens/e, -ive*.

El L postkl. *intensus* s.s., orig. ptc. perf. de *intendere* "streĉi": *in* "al, en" (vd. *en* k la ps-pf), *tendere* "streĉi" (vd. *etendi*).

INTER (f; Un): L *inter*; F(H) *entre*. Prenita, kiel multaj aliaj prepozicioj, el L, kies formo estas konata per derivaĵoj en pluraj lingvoj, ekz. AFG *inter/-national*, I *-nazionale*, (H *-nacional*) "-nacia", A *interspace* "-spaco", F *inter-urbain* "-urba", I *interporre* "-meti" ktp. ¶ 1881 *bu/l* "inter la" (laŭ Mattos 30 influita de Vp *bevü* s.s.). ¶ IoIa =, Ie *ínter*.

El HE **enter* s.s., kp Sa *antár* "en, inter", G *unter* "inter". Der. de HE **en* "en", do orig. "en la mezo, en la interspaco (de)". Ank. ps-pf, vd. tiun. Kp spec. *interna*.

INTERES/I (f; RE; dukateg. *-o/-i*, vd. OA 8, p. 40): A *inter/est*, G *-essieren*, I *-essare*, Po *-esowac'*, R *-esovat'*, (H *-esar*), F *intéresser*. Eo *-s-* (bazita sur origina *-ss-*) laŭ [s] en ĉiuj fontlingvoj; tio donis eblecon formi ĝemelan radikon eo *interez/o* Wü por alia senco de la sama vorto (kp A *interest*, F *intêret*, I *interesse* "intereso; interezo"). Ps-pf *inter-*. ¶ Io *inter/esar*, IeIa *-essar* "-i" (kp Io *inter/-eso*, IeIa *-esse* "intereso"; Io *inter/esto*, Ie *-este*, Ia *-esse* "interezo").

El L *interesse* "esti grava por (iu), koncerni (iun)" (la responda latinida subst. signifis orig. "kio gravas [por iu]", poste kiel jura termino en F "damaĝo" > "kompenso de damaĝo" > "profito, interezo"), orig. "esti aktuala, esti en la mezo": *inter* "inter" (vd. tiun), *esse* "esti" (vd. tiun).

INTERJEKCI/O (f; RE): AF *interjec/-tion*, (H *-ción*), G *Interjektion* [-ts-], I *interiezione* [-ts-]; L *interiect/io -ionis*. Ps-pf *inter-*; ps-sf *-cio*. ¶ 1894 *interjekzi-*.

Propr. "inter/metaĵo, -ĵetaĵo", de L *intericere* "intermeti": *inter* "inter", *iacere* "meti, ĵeti" (vd. *inter* resp. *ĵeti*)).

INTERMIT/I (f; RE): L *intermittere*; A *intermit*. Kp AF *intermit/tent*, I *-tente*, (H *-ente*), G *-tierend* "-a". Kredeble bazita sur la adjektivo minus la participeca finaĵo; kp *indulgi*. Ps-pf *inter-*.

La LA verboj estas uzataj jen transitive ("intermitigi, interrompi"), jen netransitive ("intermiti"). La unua uzo estas la origina: propr. "intermeti, enŝovi (paŭzon)", kunm. de L *inter* "inter" (vd. tiun) k *mittere* "meti, sendi" (vd. *meti*).

INTERN/A (f; Un): A *intern/al*, F *-e*, I(H) *-o*; L *internus*. ¶ Io =, Ie *intern*, Ia *-e*.

Propr. "ena", der. de L *inter* "inter, meze de" (vd. *inter*); kp la paralelajn formaĵojn *interior* "interna", *intimus* "plej interna" (vd. sub *intima*).

INTERPELACI/o (8; Jü): AF *interpell/-ation*, I *-azione*, R *-jacija*, G *Interpellation*, Po *interpel/acja*, (H *-ación*). Ps-pf *inter-*; ps-sf *-cio*.

El L *interpellat/io -ionis* "interrompo" de *interpellare* "interrompi, objeti"' kunm. de *inter* "inter" (vd. tiun) k *-pellare*, eble samradika kun *pellere* "puŝi, peli" (vd. *peli*). Kp spec. *apelacio*.

INTERPRET/I (1; Jü): A *interpret*, G *-ieren*†, I *-are*, Po *-owac'*†, (H *-ar*), F *interpréter*; L *interpretari*. Ps-pf *inter-*. ¶ IoIe Ia *interpretar*.

De L *interpr/es -etis* "-isto; negocianto, peranto": la unua elemento estas la prep. *inter* (vd. *inter*); la dua eble ligita al *pretium* "prezo".

INTERPUNKCI/O (f; RE): G *Interpunktion*, I *inter/punzione*, Po *-punkcja*; L *interpunct/io -ionis*. (Kp A *punctuation*, F *ponctuation*, H *puntuación* s.s.). Ps-pf *inter-*; ps-sf *-cio*. ¶ 1894 *interpunkzi-*. ¶ Io *punt-iz-ado*, Ie *interpunctuation*, Ia *punctuation*.

De L *interpungere* "interpunkcii", propr. "interpunkti, meti punkton inter (vortoj)" el *inter* "inter" k *pungere* "piki, punkti" (vd. *inter* resp. *punkto*).

INTERVJU/O (3; Jü): AF *inter/view* [-vju], Po *-view* [-vju], R *-vju*, (H *-viú*), G *Interview* [-vjú]. Kp la samelementajn I *intervista*, (H *entrevista*). Formo laŭ la prononca akordo de la fontlingvoj; la ortografio estis apenaŭ asimilebla. Ps-pf *inter-*. ¶ Io *inter/viuvo*, Ie *-viuv*, Ia *-view*.

Propr. "intervidiĝo", A kunm. de L pref. *inter-* "inter" (vd. tiun) k A *view* "vid(iĝ)o" el F *vue* s.s. (vd. *vidi*).

INTEST/O (f; RE): A *intest/ine*, F *-in*, I(H) *-ino*; L *intestinum*. Apokopo de *-in*, evidente por eviti aspekton de virinsufiksa vorto (kp *ekstermi*). ¶ 1894 *intestin-*. ¶ IoIa *intestin/o*, Ie *-e*.

Orig. subst.-igo de L adj. *intestinus* "ena, interna", de *intus* "interne", identa al Gr *entós* "(de) interne", ambaŭ der. de HE **en* "en" (vd. tiun).

INTIM/A (f; RE): A *intim/ate*, F *-e*, I *-o*, R *-nyj*, G *intim*, Po *intymny*, (H *íntimo*).

El L *intimus* "plej familiara, plej intima", propr. "plej interna", superl. responda al la komp. *interior* "(pli) interna"; kp Sa *ántama-* "proksima, venonta". Kp *inter*, *interna*. La L superlativ-sufikso *-im(us)* ank. en *proksima*, *optim/ismo*, *-isto*, *pesim/ismo*, *-isto*.

INTRIG/I (f; Du, RE): A *intrig/ue* [-g], F *-uer* [-gé], G *-ieren*, I *-are*, R *-ovat'*, (H *-ar*), Po *intrygowac'*. Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIeIa *intrigar*.

El L *intricare* "embarasi, konfuzi", el *in* "en" (vd. tiun k la ps-pf) k *tricae* (plur.) "intrigoj" kun necerta etimologio.

INUND/I (4; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *super/akv/i*): A *indund/ate*, (H *-ar*), F *inond/er*, I *-are*; L *inundare*. Kvankam Eo havas la formon *ond-* (laŭ F) por la etimo mem (kp sube), la adoptitaj kunmetoj (*abundi*, *inundi*) estas bazitaj rekte sur L. Influo de Io ebla. Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIeIa *inundar*.

Propr. "superakvi": L *in* "en, sur" (vd. *en* k la ps-pf) k *undare* "ondi" de *unda* "ondo" (vd. tiun).

INVAD/I (3; Jü): A *invad/e*, I *-ere*, (H *-ir*), F *envahir*; L *invadere*. Kp AF *invasion*, G *Invasion*, Po *inwazja* "-o". Ps-pf *in-* 1. ¶ Io *invad/ar*, IeIa *-er*.

L *invadere* (sup. rad.: *invas-*) propr. "marŝi kontraŭ (iun)": *in* "en, al, kontraŭ" (vd. *en* k la ps-pf), *vadere* "iri, marŝi" (vd. *vadi*).

INVALID/O (1; Jü): AR *invalid*, F *-e*, I *-o*, G *Invalide*, Po *inwalida*, (H *inválido*). Ps-pf *in-* 2; ps-sf *-id*.

El L *invalidus* "senforta": *in-* "ne-" (vd. *ne* k la ps-pf), *validus* "forta, vigora" (vd. *valida*).

INVENT/I (8; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *el/pens/i*, *el/trov/i*): A *invent*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*); L *invenire*. Influo de Io ebla. Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIa *invent/ar*, Ie *-er*.

La modernlingvaj formoj estas bazitaj sur la L sup. rad. *invent-* de *invenire* "eltrovi" (kp L *invent/io* "-aĵo", *-or* "-into"), propr. "trafi en (ion), alveni al (io)": *in* "en, al, sur" (vd. *en* k la ps-pf), *venire* "veni" (vd. tiun).

INVERS/A (4; Jü): AF *invers/e*, I(H) *-o*. Ps-pf *in-* 1. ¶ Io =, Ie *invers/i*, Ia *-e*.

El L *inversus* "renversita, (re)turnita", ptc. perf. de *invertere* "(re)turni": *in* "en, al, kontraŭ" (vd. *en* k la ps-pf), *vertere* "turni" (vd. *verso*). Kp spec. *renversi*.

INVIT/I (f; Un): A *invit/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*); L *invitare*. Ps-pf *in-* 1. ¶ IoIeIa *invitar*.

Kunm. de L *in* "en, al" (vd. *en* k la ps-pf) k dua elemento, eble samradika kun L *vis* "ci volas", kp *invitus* "nevola".

IO (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *alikvo* (< L *aliquod*). ¶ Io *ulo* (< L *ullum*); Ie *alquó*, Ia *alique*, *alicun cosa*.

IOM (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1882 *kom* (korelativo); 1894 *alikvantu* (< L *aliquantum*). ¶ Io *kelke*; Ie *un poc* (< HI *un poco*, F *un peu*); Ia *aliquanto*, *un pauc*.

IR/I (f; Un): L *ire*; I *ire*†, (H *ir*); kp F *il*

ira "li iros". Enestas en la Ea radiko la L infinitiva finaĵo *-r-* (analogaj kazoj, vd. *diri*) kiel kombinsono, ĉar la nuda L radiko *i-* ne estis kombinebla kun la Eaj finaĵoj. Eble la F futura formo kuninspiris. ¶ 1882 *all-* (< F *aller*). ¶ Io *irar* (espismo), Ia *ir*, Ie *ear* (< L *eo* "mi iras").

De HE rad. **i-/ei-* "iri", kp Sa *imás* "ni iras"; Gr *iénai* "iri"; L *iter* "voj(aĝ)o"; Li *iêt* "iri"; R *itti, idti* "iri", Po *is'c'* "iri"; vd. ank. sub *jaro*. La radiko enestas en la jenaj L-devenaj Eaj vortoj: *abituriento, ambicio, iniciati, preterito, subita, transit/o, -iva.*

IRAK/O (8; PIV; ne ĉe Z): AF *Irak*, *Iraq*, GPoR(H) *Irak*, I *Iraq*. ¶ IoIeIa* *Irak*.

El Ar *al-'Irâq* s.s., el Pe mez. *êrâk* "persa". Kp sekv.

IRAN/O (8; Wü; ne ĉe Z): AFGIPoR *Iran*, (H *Irán*). ¶ IoIeIa* *Iran*.

El Pe *Irân* s.s., kp Pe ant. *ariya-*, identa kun Sa *ârya-* "arjo" de *aryá-* "nobla".

IRID/O (2; Jü): AFR(H) *iris*, G *Iris*, I *iride*, Po *irys*; L *ir/is -idis*. Identa kun kaj en la fontlingvoj homonima al *iris/o*. Z diferencigis la du sencojn, elektante la L oblikvakazan stemon por la botanika senco (kp L bot. *Iridaceae* "iridacoj", ank. la zool. *akrido, aspido, kantarido*: Wüster Esp. princ. 58) kaj la L nominativon por la anatomia. ¶ Io =, Ie *iride*, Ia *iris*.

El Gr *ír/is -idos* s.s., propr. "ĉielarko" (la planto estis tiel nomata pro la diversaj koloroj de ĝiaj floroj); vd. sekv.

IRIS/O (1; Jü): AF(H) *iris*, G *Iris*, I *iride*; L med. *ir/is -idis*. Identa kun *irido*, kp tiun. Senvoĉa *-s* en radikfino; kp *ibiso*. ¶ Io =, IeIa *iris*.

El Gr *ír/is -idos* "ĉielarko" (poste pri ĉia 'kolorriĉa cirklo'); kredeble orig. **ŭir-*, de HE rad. **ŭei-* "fleksi; fleksebla branĉo", kp Sa *váyati* "plektas", L *vimen* "vergo", A *wire* "drato, metalfadeno".

IRLAND/O (8; EG; *irland/o/j* "-anoj" PR): A *Ireland*, F *Irlande*, G *Irland*, I(H) *-a*, Po *-ia*, R *-ija*. ¶ Io =, Ie *Irland*, Ia *-a*.

El A ant. *Irland* (por la dua elemento *land*, vd. *lando*), kp *Iras* "-anoj", der. de Ir *Ériu* "Irlando".

IRONI/O (1; RE): A *iron/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Ironie*. (Ps-sf *-i* 1.)

El Gr *eirôneía* "ironio, ŝajnigita nescio, trompa ŝajnigo", der. de *eírôn* "kiu ŝajnigas (nescion)", eble orig. "kiu diras (sed ne opinias tiel)", tiuokaze ptc. prez. de *eírô* "mi diras" (vd. *retoro*).

ISLAND/O (8; EG): A *Iceland*, G *Island*, F *-e*, I *-a*, Po(H) *-ia*, R *-ija*. ¶ Io =, Ie *Island*, Ia *-a*.

El Is *Island*, propr. "glaci-lando": *ís* "glacio" (identa al A *ice*, G *Eis* s.s., el pĜ **îsa-*), *land* "lando" (vd. tiun).

ISTM/O (1; Jü): A *isthm/us*, F *-e* , G *Isthmus*†, I(H) *istmo*; L *isthmus*. ¶ Io =, Ie *istme*, Ia *isthmo*.

El Gr *isthmós* s.s., eble der. de *iénai* "iri" (tiuokaze orig. "irejo, pasejo"), vd. tiun.

ITAL/O (8; Du, EG): A *Ital/ian*, F *-ien*, G *-iener*, I(H) *-iano*, R *ital'janec*; L *Italus*. La Ea formo estas apenaŭ bazita sur L; pli vere ĝi estas identa kun la stemo de la landnomo (A *Ital/y*, F *-ie*, G *-ien*, HIL *-ia*, R *-ija*). ¶ Io *Italiano*, IeIa *italiano*.

L *Italus* estis jam en la antikveco asociita kun L *vitulus* "bovido" (kp Oska *Víteliú* = L *Italia*): "ĉar ĝi havas grandajn bovojn" (Festo, 2a jc). La landnomo (kiu ŝajnas esti pli frua ol la gentnomo) signifis origine nur la sudokcidentan parton de la duoninsulo.

IU (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *alikvu* (kp L *aliquis*). ¶ Io *ulu, ula* (< L *ullus*); Ie *alquí, alcun* (< I *alcuno*); Ia *alicun(o)*.

IZOL/I (f; RE): A *isol/ate*, F *-er* [*-z-*], G *-ieren*, I *-are* [*-z-*], Po *izol/owac'*, R *-irovat'*, (H *aislar*). Eo *-z-* laŭ prononco de FIPoR kaj la tendenco voĉigi intervokalan *s*-sonon. ¶ 1894 *isol-*. ¶ Io *izolar*, IeIa *isolar*.

Propr. "insuligi", de I *isola* "insulo" el L *insula* s.s. (vd. insulo).

J

JA (f; Un): G *ja*. Kp Ji *yo* [j-], ank. Da *jo*, Sv *ju* s.s. Forme G *ja* estas la ekskluziva fonto; vd. Collinson 1959, 11; Waringhien 1967, 23. (Pliaj – netrafaj – etimologiaj koneksoj ĉe Bianchini, 75.) La rolo de *ja* kiel verbemfazilo povas esti inspirita de Ji, vd. Back 1980, 326. ¶ 1881 *et* (< L *et* laŭ PVZ 5, 135; semantike tre dubebla). ¶ IoIeIa* *ya* (espismoj).

G *ja* signifas "ja, vere, jes" (= DaNdSv *ja* "jes", A *yea*† "jes", kp la parte identan *jes*), el pĜ **ja*.

JAGUAR/O (1; Be): AFPoR(H) *jaguar*, G *Jaguar*, I *giaguaro*. ¶ Io =, Ie *jaguar*, Ia *jaguar**.

El Tupia (Brazilo) *jagoara*, signifanta ĉian karnomanĝantan beston.

JAK/O (f; RE): A *jacket*, G *Jacke* [jáke], I *giacca*, (H *chaqueta*). Supozeble bazita sur G (sola fontlingvo kun prononco [j-]). Z evitis la sufiksecan *et* por ebligi formadon de Ea diminutivo (kaj eble por pli klare diferencigi la radikon disde *ĵaketo*, kp tiun). – La Z-a *ĵak/o* GE povas esti preseraro anstataŭ *jak/o* (Wü s.t.V.); alie Wiener 1950, 101, kiu trovas *ĵak-* = F *jaquette* kaj *jak-* = G *Jacke* (se temas pri diferencigo, oni povas kompari *ĵur-* : *jur-*). ¶ Io *vestono* (< F *veston*); Ie *jaque*, *veston*; Ia *jaco*, *jachetta*.

El F ant. *jaque* "mallonga k strikta jako" el H *jaco* s.s., eble el Ar *ŝakk* "kirasĉemizo". (Alia etimologio ĉe Wiener l.c.). Kp *ĵaketo*, etime identan.

JAM (f; Un): L *iam* [j-]; F *déjà*, I *già*, (H *ya*). Eo transprenis senŝanĝe la L vorton, kio ne tiel ofte okazas ĉe adverboj kiel ĉe prepozicioj. ¶ 1878 *jam*; 1881 *jam*. ¶ IoIe *ja*, Ia *jam*.

L *iam* "jam; nun", orig. kaza formo de HE pron. rad. **i-* (vd. *identa*); de la sama radiko Li *jaŭ* "jam".

JANUAR/O (f; letero 87-03, Du, RE): A *Janu/ary*, G *-ar*, F *janvier*, I *gennaio*, R *janvar'*, (H *enero*); L *(mensis) Ianuarius* [j-]. Radiko prenita rekte el L; paralela al *februaro*, kp tiun. Ps-sf *-ar(i)*. ¶ Io =, Ie *januar*, Ia *-io*.

Propr. "(monato) de Jano", der. de L *Ianus*, dio de la komenco.

JAR/O (f; Un): A *year*, G *Jahr* [ja:r]. Kp Nd *jaar*. La formo de pEo 1881 (*anno*) montras, ke Z hezitis inter la ĝermana kaj la romana (L *annus*; F *an*, H *año*, I *anno*) vortoj. La motivon por la definitiva elekto donas Collinson 1959, 7: 'pli distingiga ol L. annus, kiu en Eo povus kolizii kun la sufikso *-an*'. Same Privat VZ 44: "Dum tiu puriga laborado" (inter 1881 kaj 1887) "ankaŭ forigis el la lingvo kelkaj latinaj radikoj, kiel ekzemple *anno*... Efektive, -ano jam estis sufikso kun senco malsama, kaj aliflanke Z ne volis vortojn kun duobla litero." Efektive, kiam duoblaj li-

teroj ne plu estis uzeblaj, *annus* ne estis klare esperantigebla. ¶ 1881 *anno*; 1894 *anu*. ¶ Io *yaro*; Ie *ann/u*, Ia *-o*.

El pĜ **jêra-* (kp Gt *jêr*), el HE **jêro-* "jaro, sezono", kp Av *yara* "jaro", Gr *hôra* "sezono; horo" (kp tiun). Oni atribuas la vorton al la rad. **i-* "iri" (vd. tiun); la orig. signifo estus "irado (de la tempo)".

JASMEN/O (f; RE): F *jasmin* [-ê], A *-e*, G *Jasmin*, I *gelsomino*, Po *jas'min*, R *jasmin*, (H *jazmín*). Vokalŝanĝo *i* > *e* probable por eviti aspekton de virinsufiksa vorto (vd. *abomeni*); la ŝanĝo havas ioman apogon en la F prononco. ¶ 1894 *jasmin-*. ¶ Ia *jasmin*, Io *-o*, Ie *-e*.

Pere de Ar *jâs(a)mîn* el Pe *jâsämîn* s.s.

JE (f; Un): Semantike tiu ĉi vorto, de Z nomata "universala prepozicio", havas neniun ekvivalenton en la fontlingvoj. Ĝi estis kreata en la prova periodo antaŭ 1887 (vd. la leteron al Borovko, OV p. 421). Forme oni komparis G *je* (Waringhien 1967, 36; Gregor 1982, 11), kiu tamen ne estas prepozicio sed adverbo ("po; iam") kaj konjunkcio ("ju"). Ŝajnas ne eble determini, ĉu Z sin apogis sur la citita vorto aŭ 'inventis' la prepozicion. – Senvaloraj hipotezoj ĉe Bianchini, 70. ¶ 1881 *je/l* "je la". ¶ IoIe *ye* (espismo); ank. Nl *ye* (kp Jespersen 1928, 161: 'nedifinita prepozicio, kreita per la genio de Zamenhof'): vd. Manders 1947, 326 s. – Mankas en Ia.

Vd. ev. pri G *je* sub *ju*.

JEN (f; Un): Oni proponis du etimojn: (1) la radiko de G *jener* "tiu" (Collinson 1959, 11; Berger 1947, 18); (2) L *en* "jen". Waringhien konstatas (LV 55): "Estas eraro ekspliki la vorton *jen* per D (=G) *jener*, ĉar en la dialekto de 1881 la formo de tiu vorto estis *en*, laŭ la latina samsignifa adverbo." Do oni devus preferi la duan proponon; restas tamen klarigi la *j-*. Evidente la neŝanĝita L formo estis neebla pro la prepozicio *en*; temas do pri modifo, eble inspirita de la ruslanda prononco de la koncerna vorto (Waringhien 1967, 23: 'L *en*, prononcita rusmaniere'); je tiu stadio ankaŭ influo de la G pronomo estas teorie ebla. ¶ Io *yen* (espismo); Ie *yen*† (espismo; poste anstataŭigita per *vi* el la verbo *vider* "vidi": vd. de Wahl en Cgl. 103); Ia *ecce* (< L).

L *en* estas identa kun Gr *ên* s.s.

JES (f; Un): A *yes* [j-]. Kp Ji *ye* [j-], G (ank. NdSv) *ja* s.s. La alternativa solvo estus evidente romana *si* (tiel 1881), sed tiu formo ricevis en la definitiva projekto de 1887 alian rolon. El inter la ĝermanaj formoj oni atendus elekton de **ja* (certe la konfirma adverbo devus havi prioritaton super la partikulo). Eble Z konsideris la pluformadon (*jes/i* pli oportuna ol **ja/i*). ¶ 1881 *si* (< I *sì*, H *si* "jes", F *si* "sed jes"); 1894 *si*. ¶ IoIe *yes*, Ia *si*.

A vorto, kies unua elemento estas identa kun GNdSv *ja*, Gt *ja*, A *yea*† "jes" el pĜ **ja*; la dua probable egalas al A *so* "tiel" = G *so*, Gt *swa* (de HE refl. rad. **sŭe-*; vd. *si*; kp ank. *se*).

JESU/O (3; Be; ank. *Jezu/o* Wü): AG *Jesus* [-s-], F *Jésus* [-z-], I *Gesù* [-z-], Po *Jezus*, R *Iisus*, (H *Jesús* [-s-]); L *Iesus*. La diferencigo disde *jezuit-* estas eble intenca; ĉiuokaze la oficialaj formoj de la du radikoj konformas al la uzado de Z. ¶ IoIe *Jesu*, Ia *-s*.

Pere de Gr *Iêsoús* el He *Jêšûa* (kp *Jeŝua* Neĥ. 9:4), mll de *Jehôšûa* (kp *Josuo* Nombr. 13:16), probable signifanta "Javeo (Jehovo) estas savo" (He *jâša* "savi"). Kp. sekv.

JEZUIT/O (1; RE; ank. *jesuit/o* Wü): AG *Jesuit* [A -z-], F *jésuite* [-z-], I *gesuita* [-z-], Po *jezuita*, R *iezuit*, (H *jesuita*). Ps-sf *-it* 2. Pri la formo kun *-z-*, kp sub *Jesuo*. ¶ Io =, Ie *jesuit*, Ia *-a*.

El L mod. *jesuita* s.s., formita laŭ la nomo *Societas Iesu* (1540), t.e. "Societo de Jesuo" (vd. *Jesuo*).

JOD/O (1; RE): A *iodine*, F *iode* [j-], G *Jod*, I *iodio*, Po *jod*, R *iod*, (H *yodo* [j-]). ¶ IoIa *iod/o*, Ie *-e*.

Konstruita (en F, 1812) de Gay-Lussac el Gr *iôdês* "viol/simila, -kolora" (pro la violeca koloro de la jodaj vaporoj) el *íon* "violo" (kp tiun) k *-eidês* "simila, -forma", de *eídos* "formo" (kp *idilio*; vd. ank. sub *vidi*).

JU (f; Un): G *je* (*...desto*); kp Sv *ju* (*...dess/desto*), No *jo* (*...dess*). Malfacile klarigebla etimo: se Z deiris de la G konjunkcio, li tamen ŝanĝis ambaŭ elementojn (al *je* ja estis donita alia rolo; *desto* havis maloportunan finon). La koincido kun Sv devas esti rigardata kiel hazarda. Kp Gregor 1982, 10 (:el G), Waringhien 1967, 23 (:el G kaj Sv), Bianchini 19 (:el Sv, No; Li *ju*, Latva *jo.)* Envere la Li ekvivalento estas *juo... tuo*: ties ununa parto povis eventuale sugesti al Z la formon *ju*. ¶ 1894 *kvantu... tantu* (< L *quanto... tanto*). ¶ Io *quante... tante*, Ie *quant... tant*, Ia *quanto... tanto*.

G *je*, Sv *ju* estas adv. orig. signifanta "(ĉ)iam" (por ĝia uzo antaŭ komparativo, kp la esprimon "ĉiam pli..."), responda al Gt *aiw* "iam", orig. kaza formo de subst. signifanta "epoko, tempo" (= L *aevum* s.s., vd. *eterna*).

JUBILE/O (1; RE): A *jubil/ee*, F *-é*, Po *-eusz*, R *-ej*, (H *-eo*), G *Jubiläum*, I *giubileo*. ¶ IoIeIa =.

El L mez. *(annus) iubilaeus* "jubilea jaro" (romkatolika aranĝo ekde 1300), pere de Gr ekl. *iôbêlaíos* de *iôbêlos* el He *jôbêl* "trombono" (ĉar ties sonoj inaŭguris la jubilean jaron), orig. probable "(korno de) virŝafo".

JUD/O (3; N-ro 15 1888, Jü): A *Jew* (kp *Judaic* "-a"), F *juif* (kp *judaïque* "-a"), G *Jude*, I *giudeo*, Po *ż'yd*, R *jid* (malindiga termino), (H *judio*); L *Iudaeus* [j-]. Bazita ĉefe sur G. ¶ Io *Judo*, Ie *judéo*, Ia *judeo*.

Pere de Gr *Ioudaíos* s.s. el He *jehûdi*, de *jehûdâh* ("laŭdato"), nomo de juda patriarko k de la tribo devenanta de li (> L *Iuda*). Kp sekv.

JUDAISM/O (3; antaŭe *jud/ism/o*): A *Judaism*, F *judaïsme*, I *giudaismo*, Po *juda/izm*, (H *-ismo*). Ps-sf *-ism*. ¶Io *Jud-ismo*, Ie *judeisme*, Ia *judaismo*.

El Gr *Ioudaïsmós* s.s., subst. de *ioudaízein* "adaptiĝi al judaj kutimoj, vivi en juda maniero", de *Ioudaíos* "juda" (vd. *judo*).

JUG/O (f; RE): L *iugum* [j-]; A *yoke*, F *joug* [-u-], G *Joch*, I *giogo*, R *igo*, (H *yugo*). Formo kopianta L. ¶ Ie *yug*, Io *-o*, Ia *jugo*.

La cititaj formoj latin(id)aj-ĝermanaj-slava estas paralelaj, ĉiuj devenantaj de HE **jugom* s.s., kp ank. Sa *yugám*, Gr *zygón*, Li *jùngas*; de rad. **jug-* "kunigi, jungi" (vd. tiun).

JUGLAND/O (f; RE): L *iuglan/s -dis* [j-]. Kvazaŭbotanika termino prenita el L (kp L bot. *Juglans regia* "-ujo"). La Ea radiko baziĝas sur la oblikva stemo de la L vorto; alie en *glano* (kp tiun). ¶ 1906a *jugl-*. ¶ Io *nuc/o*, IeIa *-e* (vd. sub *nukso*); kp Ie *juglande* "-ujo".

L *iuglans* el *Iovis glans* "glano de Jupitero" (vd. *ĵaŭdo* resp. *glano*); la esprimo paŭsas Gr *Diós bálanos* "glano de Zeŭso" (= kaŝtano).

JUĜ/I (f; Un): A *judge* [-ĝ], F *juger* [-ĵ-], I *giudicare*, (H *juzgar*); L *iudicare* [j-]. Bazita sur AF; mola prononco de *g* en tiaj okazoj normale rezultigas Eo *ĝ* (vd. *aĝo*). Prefero de la AF mallonga radikformo; kp la kazon de *dubi*. ¶ 1894 *judik-*. ¶ Io *judikar*; (jur.) *judiciar*; IeIa *judicar*.

Der. de L *iu/dex -dicis* "juĝisto", propr. "kiu montras la juron", el *ius* "juro" (vd. tiun) k la rad. *dic-* "montri" (kp *indiki*; vd. sub *diri*).

JUK/I (f; RE): G *jucken* [juk-]. Kp Nd *jeuken*. Bazita sur G sola. ¶ 1894 *prur-* (< L *prurire*, I *prudere*, kp F *prurigineux* "-iga"). ¶ IoIe *pruritar* (kp L *pruritus* "-ado"), Ia *prurir*.

GNd estas par. al A *itch* s.s., el pĜ **jukjan*.

JULI/O (f; Du, RE): L *(mensis) Iulius* [j-]; A *July*, F *juillet*, G *Juli*, I *luglio*, R *ijul'*, (H *julio*). Bazita rekte sur L kiel la aliaj nomoj de monatoj; kp spec. la paralelan *junio*. ¶ IoIa =; Ie *julí* (por pli klara distingo de *junio*).

Propr. "(monato) de Julio": la monato estis nomata honore al *Caius Iulius Caesar*, naskita en ĝi.

JUN/A (f; Un): A *young* [j-], F *jeune*, G *jung*, I *giovane*, R *junyj*, (H *joven*); L *iuvenis* [j-] (kp *iunior* "pli juna"). La Ea formo sin bazas sur L (komp.) plus GR kun apogo de A kaj F. ¶ 1881 *mal/jun/a* "maljuna". ¶ Io *yuna* [j-], Ie *yun* [j-], Ia *juvene*.

El HE **juŭen-* s.s.; kp ank. Sa *yúvan-* (fem.: *yûnî*); Li *jáunas*; Gt *juggs*(pĜ **jungaz*).

JUNG/I (f; RE): L *iungere* [j-]. Kp P *jungir*. ¶ Io *jungar*; Ie *atelar* (< F *atteler*); Ia *attacc/ar* (< I *-are*), *junger*.

L *iungere* estas intime ligita kun *iugum* "jugo" (vd. tiun) k do orig. signifas "(kun)jugi"; neprimara senco "kunigi" (> A *join*, F *joindre*, H *juntar*, I *giungere*). De HE rad. **jeŭg-/jug-* "kunigi, jungi", kp Sa *yunákti* "jungas, kunigas", Gr *zeugnynai* "kunigi", Li *jùngti* "jungi, kunigi". Samfamiliaj vortoj en Eo: *jugo*, *kon/jugacio*, *-junkcio*.

JUNI/O (f; Du, RE): L *(mensis) Iunius* [j-]; A *June*, F *juin*, G *Juni*, I *giugno* [-n'-], R *ijun'*, (H *junio*). Bazita sur L same kiel la aliaj nomoj de monatoj; kp spec. la paralelan *julio*. ¶ IoIeIa =.

Propr. "(monato) de Juno" (L *Iuno*), al kiu diino la koncerna monato estis dediĉita.

JUNIPER/O (f; RE): L *iuniperus* [j-]; A *juniper*, F *genévrier*, I *ginepro*, (H *enebro*). Botanika termino kopianta L. ¶ 1894 *junipr-*. ¶ IoIa =; Ie *junevre*.

La unua elemento de la L vorto kredeble respondas al *iuncus* "junko" (la brancoj de ambaŭ arbustoj liveras materialon por plektaĵoj); la dua elemento estas obskura. L *iuniperus* > F mez. *genevre* (vd. *ĝino*, kiu do estas etimologie identa). Kp sekv.

JUNK/O (1; Jü): L *iuncus* [j-]; F *jonc*, I *giunco*, (H *junco*). Botanika termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *junco*, Ia *junco**.

Ev. par. al *junipero*, kp tiun.

JUP/O (f; RE): F *jupe*, R *jubka*. Moda termino prenita el F. La uzo de komenca *j-* anstataŭ *ĵ-* (F prononco) eble ŝuldiĝas al R influo. ¶ Io =, Ie *jup*; Ia *gonn(ell)a* (< I).

El Ar *ĝubba* "subvesto el kotono".

JUR/O (f', 3; Ka): L *ius* (gen.: *iuris* [j-]; G *Jura*, I *giure*. Efektive la Ea formo probable estas retrograde formita el *jur/ist/o*, pli frue oficialigita (vd. tiun). ¶ Io *yuro-cienco*, *jurisprudenco* (< L *iurisprudentia*); IeIa *jure*.

L *ius* "juro, leĝo, rajto" identas kun Sa (Vd) formulo *yos* "sanon! bonfarton!". Samfamiliaj vortoj en Eo: *ĝusta*, *juĝi*, *juristo*, *justa*, *ĵuri*.

JURIST/O (f', 1; Jü; post 3a OA analizata *jur/ist/o*): AR *jurist*, F *-e*, (H *-a*), I *giurista*. Ps-sf *-ist*.

El L mez. *jurista* s.s., de L *iu/s -ris* "juro" (vd. tiun).

JUST/A (f; Un): A *just* [ĝ-], F *juste* [ĵ-], I *giusto* [ĝ-], (H *justo* [ĥ-]); L *iustus* [j-]. Bazita sur la L originformo; la modernaj formoj kun mola prononco vortkomence estis deirpunkto por la ĝemela radiko *ĝust/a* (Wiener 1950, 105). ¶ Io *yusta*, Ie *just*, Ia *-e*.

Propr. "apartenanta al, konforma al la juro", der. de L *ius* (gen.: *iuris*) "juro" (vd. tiun). Etimologie identa kun *ĝusta* k *ĵus*.

JUVEL/O (f; : A *jewel* [ĝu-], F *joyau* (kp *joaillerie* "juvelarto"), G *Juwel*, I *gioiello*, (H *joya*). Kp Po *jubiler*, R *juvelir* "-isto". Kp ank Sv *juvel* "-o". Ŝajnas bazita sur G plus A (rimarku la A prononcon) kun apogo de la R derivaĵo. ¶ Io =, Ie *juvel*, Ia *joiel*.

El L mez. *jocale* s.s., propr. "amuzilo" aŭ "ludilo", der. de L *iocus* "ŝerco, ludo" (vd. *ĵongli*).

Ĵ

ĴAKETO (3; Jü) 1) vira vesto 2) virina jako: A *jacket* [ĝ-] (2), F *jaquette* [ĵakét] (1, 2), G *Jackett* [ĵakét] (2), Po *z'akiet* [ĵ-] (2), R *ĵaket(ka)* (2), (H *chaqué* 1, *chaqueta* 2). Kp I *giacchetta* "jaketo". Moda termino bazita sur F (kaj alprenanta la du sencojn de la F vorto). Ps-sf *-et.* – Pri la Z-a *ĵak/o* GE, vd. sub *jako.* (Ĉiuj Eaj radikoj komenciĝantaj per *ĵ-* sin bazas sur F prononco [ĵ], kutime apogata de analoga sono en PoR kaj ofte en G fremdvorto; la responda sono en A estas [ĝ]. En aliaj pozicioj F [ĵ] kaj A [ĝ] normale rezultigas Eo *ĝ,* vd. *aĝo*; kp Szerdahelyi 1987, 122.) ¶ Io *jaketo* (2), Ie *jaquette* (2), Ia *jachetta* (2); vortoj kun la signifo 1 ŝajnas manki.

Dim. de F *jaque,* vd. sub *jako.*

ĴALUZ/A (f; RE): A *jealous* [ĝ-], F *jaloux* [ĵ-] (fem.: *jalouse* [-ú:z]), I *geloso* [ĝ-], (H *celoso*). Bazita sur F (kp sub *ĵaketo*), formo konata ankaŭ ekster la franca lingvoteritorio (kp Da *jaloux* "-a", Nd *jaloezie* "-o"). ¶ 1894 *jalus-.* ¶ Io *jaluza,* Ie *jalusi,* Ia *jelose, zelose.*

El L vulg. **zelosus,* der. de L postkl. *zelus* "fervoro; ĵaluzo" el Gr *zêlos* "fervoro; ĵaluzo, envio" (kp semantike G *Eifer* "fervoro", *Eifersucht* "ĵaluzo"), verŝajne ligita kun *zêteín* "serĉi".

ĴARGON/O (1; Jü): AF *jargon* [A ĝ-, F ĵ-], G *Jargon* [ĵ-]; I *gergo* [ĝ-], Po *z'argon* [ĵ-], R *ĵargon,* (H *jerigonza*). La Ea formo kongruas kun F (kaj ties kopio G) kaj la slavaj formoj (kp sub *ĵaketo*). ¶ IeIa *jargon,* Io *-o.*

Kredeble par. al F *gargouiller* "gargarbrui" (la radiko *garg-* indikante "gorĝon").

ĴAŬD/O (f; Un): F *jeudi* [ĵ-], I *giovedì* [ĝ-], (H *jueves* [ĥ-]). Kiel la ceteraj nomoj de la tagoj de la semajno, tiu ĉi estas prenita el F (ĉe kio la fina *-i* forfalas, kp *lundo, mardo* ktp). Malfacile klarigebla estas la diftongo *-aŭ-*; F *eu* en aliaj vortoj rezultigas Eo *e* (*meblo*; kp *kero, parkere* el F *coeur*) aŭ *eŭ* (*leŭtenanto*). ¶ 1894 *joved-.* ¶ Io *jovdio,* Ie *jovedí,* Ia *jovedi.*

El L *Iovis dies* "tago de Jupitero": *Iovis* gen. de *Iuppiter* (< **Iov- pater*), *dies* "tago", ambaŭ el HE **djeŭs* "ĉielo" (vd. *hodiaŭ*).

ĴET/I (f; Un): F *jeter* [ĵ-], I *gettare* [ĝ-]; L *iacere* (vd. sube). Formo kopianta F. ¶ 1894 *jet-.* ¶ Io *jetar,* Ie *jettar,* Ia *jectar.*

El L *iactare* "ĵetegi", verbo intensiva de *iacere* "ĵeti" (sup. rad. *iact-*, en kunm. *iect-*), par. al Gr *hiénai* "ĵeti; sendi" (HE rad. **je-*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *adjektivo, injekti, interjekcio, konjekti, objekto, projekto, subjekto.*

ĴONGL/I (f; RE): A *juggle* [ĝ-], F *jongler* [ĵ-], G *jonglieren* [ĵ-], Po *z'onglowac'* [ĵ-], R *ĵonglirovat'.* (Kp H *juglar* "-isto".) Bazita sur la fonetike akordantaj formoj de FGPoR: kp sub *ĵaketo.* ¶ 1894 *jongl-.* ¶ IoIe *jonglar,* Ia *jocular.*

Der. de F *jongleur* "-isto" el L *ioculator* "ŝercisto" (F *-n-* dependas de kruciĝo kun F ant. *jangler* "babili"), agantnomo de *ioculari* "ŝerci" de *ioculus* "ŝerceto", dim. de *iocus* "ŝerco" (> F *jeu*, H *juego*, I *gioco* "ludo", A *joke* "ŝerco"), kp Li *juokas* "ŝerco". Samfamilia vorto en Eo: *juvelo.*

ĴUR/I (f; Un): F *jurer* [ĵ-], I *giurare* [ĝ-], (H *jurar*); L *iurare.* Kp A *perjure* "rompi ĵuron", *juror* "ĵurinto" kaj ankaŭ la internacie uzatan derivaĵon *jury* (eo *ĵuri/o* PVS). Formo imitanta F, en tiu ĉi kazo sendube por havi formon diferencigitan de *jur-* (kp Wiener 1950, 101). ¶ 1894 *jur-.* ¶ IoIeIa *jurar.*

L *iurare* der. de *ius* (gen.: *iuris*) "juro", kiu en certaj esprimoj (speciale *ius iurandum*) signifas ankaŭ "ĵuro". Vd. la ĝemelan *juro.*

ĴURNAL/O "ĉiutaga gazeto" (f', 1; Ald, RE): A *journal* [ĝ-] (ank. "gazeto, revuo, taglibro"), F *journal* [ĵu-] (ank. "gazeto, taglibro"), G *Journal* [ĵu-] ("ĵurnalo†, revuo, taglibro"), I *giornale* [ĝ-] (ank. "gazeto, taglibro"). Kp P *jornal* "ĵurnalo". La formo estas bazita sur F prononco (kun apogo de R *ĵurnal* "revuo, taglibro"). Internacia vorto, ĝenerale kun pli vasta signifo ol la Ea radiko (almenaŭ antaŭ PIV). La ĉefa senco de la Ea vorto povas esti ekstraktita el la internacia derivaĵo *ĵurnal/isto* (A *journalist*, F *-e*, G *Journalist*, I *giornalista*, R *ĵurnalist*) "profesia kunlaboranto de gazeto"; eble kontribuis la etimologia signifo (vd. sube). Ps-sf *-al.* ¶ Ie *jurnal*, Io *-o*, Ia *jornal* (ank. "periodaĵo, taglibro").

Propr. "taga (gazeto)", el L *diurn/alis*, ank. *-us* "taga" (kp *acta diurna* "gazeto", propr. "tagaj okazaĵoj"), der. de *dies* "tago" (vd. *hodiaŭ*).

ĴUS (f; RE): A *just* [ĝ-], F *justement* [ĵ-]. Kp ank. Nd *juist*, Sv *just.* La aserto de Wiener (1950, 105) ke la adverbo en tiu ĉi senco estas "internacia", estas tre troigita. Forme la vorto ŝajnas inspirita de A, fonetike de F. Z devis krei formon diferencigitan de la en la fontlingvoj homonimaj *just-* kaj *ĝust-* (vd. Wiener l.c.; kp Szerdahelyi 1987, 128). Li faris tion, prenante la komencsonon el F (kp *ĵuri* el F *jurer*) kaj apokopante *t* (iom analoge al *ĝis*, se el F *jusque*). ¶ 1894 *antu momento.* ¶ Io *jus* (espismo, adoptita ankaŭ de Nl, vd. Jespersen 1928, 151); Ie *just (nu)*, Ia *justo (nunc).*

Adv. orig. signifanta "ĝuste, juste" (la senco "ĵus" estas elipso de "ĝuste nun", kp A *just now*), el L *iuste*, adv. de *iustus* "justa". Kp la etimologie identajn *ĝusta, justa.*

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO
VOLUMO 2: E – Ĵ

ISBN 91 85288 19 5